AŬGUST ŜENOA

LA TREZORO DE L'ORAĴISTO

ZLATAROVO ZLATO



EL KROATA LINGVO TRADUKIS

FRAN KOLAR-KROM.

ZAGREB
PROPRA ELDONO.



Ključ Esperanta. Mala knjižica za džep sadržaje čitavu gramatiku i rječnik, a stoji samo 5 helera (filira, para).

Tra Bosnio-Herzegovino. Prekrasni vodič, bogato ilustrov. Ciena 2 respondkupona (48 h).

Izdalo Društvo bosansko-hercegovačkih esperantista »***La Stelo Bosnia***« u Sarajevu (Bosna).

Ovo je društvo izdalo takodjer krasne propagandne ***dopisnice*** u latinici i ćirilici. Prodaju se na 100 kom. po 1 K ili 50 kom. za 50 hel.

Sprema se osim toga za štampu potpuni ***hrvatsko (srpsko)-esperantski rječnik*** uz još neke potrebne knjige.

Za izučavanje Esperanta kod nas su do danas izašle ove knjige:

1. ***Potpuna gramatika Esperanta*** od *Danice pl. Bedeković-Pobjeničke.* Opsežna slovnica i sintaksa s vj žbama, razgovorima i bogatim beletrističkim dodatkom u pjesmi i prozi. Stoji K 3.—.

2. ***Veliki Esperanto-hrvatski rječnik*** od *Danice pl. Bedeković-Pobjeničke.* Potpuni rječnik sa svim izvedenim riječima. Stoji K 4.—.

3. ***Učbenik pomoćnoga medjunarodnoga jezika Esperanta*** u 9 lekcija (ćiril.). Stoji 1 dinar (= 1 K).

Izdalo ***Društvo srpskih Esperantista u Beogradu*** (Srbija). Pop-Lukina br. 4.

4. ***Praktična obuka u Esperantu sa rječnikom*** od *M. Špicera.* K 2.60.

5. ***Medjunarodni jezik Esperanto i njegovo opće značenje*** od *M. Špicera.* K —.30.

Knjižara i esperantska naklada

JOSIP SOKOL

Marovska ulica 21, Zagreb (Hrvatska).

POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto por propagando de Esperanto.

Jara abonprezo kun „Liter. Jarlibro“ rb. 2 50 (Sm 2.65) Sen „Liter. Jarlibro“ rb. 2.— (Sm 2.10).

Adreso: Warszawa-Varsovio (Polujo), Redakcio: Krucza 47-A — Administracio: Hoza 20.

SERBA ESPERANTISTO

Propaganda kaj oficiala monata organo de la „Serba Esperantista Societo“.

Direktoro: **Ing. Dragomir M. Andonović**, Universitata Docento.

SERBUJO, Belgrado, Pop Lukina 4.

Jara abono: 5 Dinaroj (Sm 2); Duonjare 2.50 Din. (Sm 1); Kvaronjare 1.35 Din. (Sm —.60).

LA ONDO DE ESPERANTO

Волна Эсперанто.

Ĉiumonata organo de ruslandaj esperantistoj, eldonata de la jaro 1909.

En ĉiu numero aperas portretoj de konataj esperantistoj.

Estas organizataj literaturaj konkursoj,

Al kunlaborado ĉiam estas altirataj la plej bonaj esperantaj verkistoj.

Jara aborprezo kun senpage aldonitaj libroj 2 rubl. (2.120 Sm).

Redakcio kaj Administracio: ***Moskvo (Rusujo), Tverskaja 26.***

Postulu senpagan katalogon.

DANUBO

organo de la rumanaj kaj bulgaraj esperantistoj.

Internacia gazeto redaktata nur en esperanto.

Redakcio kaj Administracio: ***Strato J. C. (Bratianu 5, Bucureşti Bukurešt)***, Rumanujo.

— ***Jara abono 3.50 fr. (1.40 Sm).*** —





AŬGUST ŜENOA

LA TREZORO DE L' ORAĴISTO

ZLATAROVO ZLATO

KUN PORTRETO DE L' AŬTORO

EL KROATA LINGVO TRADUKIS

FRAN KOLAR-KROM

Prezo: 1 Sm (2 K 50 H)

Propra eldono.

WERNER HEINRICH
FOTOGRAF
(1) WILMERSDORF
PFALZBURGER STR. 52, GTH.

ZAGREB 1911.
NAKLADNA TISKARA ANTUNA SCHOLZA
Gajeva ulica 7.

ĈIUJ RAJTOJ REZERVITAJ.

LA TREZORO DE L' ORAĴISTO

HISTORIA ROMANO EL XVI. JARCENTO.

Varsovio 24. IX. 1910.

„... Kaj antaudiras plenan sukceson; juĝante lau l a s t i l o de via letero, mi ne dubas, ke „LA TREZORO DE L' ORAĴISTO" estos vera ornamo de nia literaturo."

K. BEIN (Kabe).

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 2492
FILIA Nr 14
w Białymstoku
82-3
BL.163-12-312

August Šenoa

(1838.—1881.)

Maloftaj estas tiuj kroataj verkistoj, kies nomo transiris hejman sojlon. Inter tiaj maloftuloj trovis nia Aŭgust Šenoa distingan lokon.

Sian ĉarman, blankan Zagreb-urbon, kie li naskiĝis la 14.an de Novembro 1838., kaj kie li la 13.an de Decembro 1881. por ĉiam fermis la okulojn — skribiginte en sia' plej granda historia romano „Kletva“ (Interdikto) la lastan vorton „Hrvat“ (kroato) — priskribis li en siaj poemoj, felietonoj, noveloj, skizoj kaj romanoj. Kaj sole tiu granda adoro, supermezura inklino al sia naskiĝurbo speciale, kaj ĝenerale al sia patrujo Kroatujo, igas lin ĉerpi la ideojn kaj temojn el nur malnovaj folioj de l' kroata historio. Cetere jen tiurilate liajn poprajn vortojn el la novelo: „Prijan (amiĉjo) Lovro“....: „Guste la kadro de nia malgrandeco, kiu ofte katenas la trobravan spiriton kaj flamantan koron, naskas tiom da bataloj, tiom da atakoj, ke ili ekskuos forte la animon; kaj la historio de l' homa koro estas ĉe ni tiel diversa kiel viva, ke niaj verkistoj ne bezonas serĉi aliloke la ideojn.“

Jam dum sia infaneco estis li per siaj gepatroj lerte instruata pri literaturo, poezio, muziko kaj teatro. En sia 8. jaro li deklamis „La sonorilon“ de Schiller kun vekiĝanta deklama talento. — Pro siaj bonaj atestoj kaj kapabloj en mezlernejo, li volis

daŭrigi la studojn en orienta akademio en Wien, kie li faris eminente la porakceptan ekzamenon; sed ne ricevinte la stipendion, devis li ŝanĝi sian planon. Post kvarjara restado en Praha, finis li jurajn studojn. Kvankam li estis destinita por profesoro sur zagreba universitato, se li doktoriĝos, malhelpis ĝin lia tiam jam vekiĝinta poeta naturo. Estinte redaktoro de l' revuoj: „Glasonoŝa (heroldo) kaj „Slavische Blätter" (slavaj folioj); elstudinte profunde boheman, polan kaj rusan lingvojn; starante en amikaj rilatoj kun eminentaj bohemaj junaj verkistoj: Dro Gregr, J. Neruda k. c.; kolektinte belan spiritan provizon el pola, rusa, franca kaj angla historioj — revenis li hejmen, kie li en Zagreb fariĝis ĉe la magistrato urba notaro kaj poste senatano.

La verkoj de Aŭgust Šenoa — pro ilia originaleco, majstra stilo, viglaj priskriboj de l' naturo kaj tipoj, kun tiu trafa satiro kaj retorika majstreco — estas legindaj, studindaj kaj imitindaj. Eĉ la plej malgranda poemo malkovras eksterordinaran talenton, multfakecon, altan spiriton — ja veran genion. Inter liaj lirik-eposaj poemoj troviĝas veraj perloj, kompareblaj kun plej bonaj poemoj de Byron' aŭ Mickievicz. Mi citu nur kelkajn:

„Fera giganto", „Sur Ozalj-kastelo", „Herooj-nudkapuloj", „Monaĥa testamento", „Fulmo de Gabela", „La patrinlakto", „Du Dujmoviĉ'oj", „Pereo de Venecia", „Al kalumniantoj de Kroatujo", „Kiel kroatoj manĝas infanojn", „Ŝtoniĝintaj edziĝgastoj", „Ora kruco", „Granda Vendredo en Pisa", „Zagreb", „Ŝah-mat", „La diablo kaj botisto", „La domo de l'pesto".[1] — Laŭ juĝo de nia universitata profe-

[1] Kroate: „Gvozden div", „Na Ozlju-gradu", „Junaci gologlavci", „Fratarska oporuka", „Munja od Gabele",

soro kaj fama poeto: Dro Franjo Markoviĉ, Aŭgust Šenoa en ĉi tiu lasta historia eposo supermajstris kvazaŭ sin mem per viglecaj priskriboj, originaleca karakterizo, drameca disvolvigo kaj majstreca verso. Liaj unuaj poemoj aperis en j. 1855., titolitaj: „Sonetaro". Ĝi, kiel ankaŭ tiuj: „Ĉe Sava-elfluo", granda poemo: „Bohinj-lago" kaj novelo: „La dianto el la poeta tombo" estas verkitaj sub influo de l' impresoj ricevitaj dum vojaĝado en ĉarmoplena Karniolio. Citindaj estas liaj „Hrvatulje", 14 belegaj amaj kaj patriotaj poemoj jen humoraj jen seriozaj.

Per „Prahaj leteroj", „Zagrebulje", „Ĉiama Judo en Zagreb" metis Šenoa en tiama ĵurnalo „Pozor" (nuna „Obzor") fundamentan ŝtonon por kroata felietono. „Zagrebulje" estas sprite ĉu humore aŭ satire ĉu serioze, skribitaj scenoj el kroata socia, politika, literatura kaj artista vivo. — Pro siaj kapabloj fariĝis Šenoa en kroata teatro dramaturgo kaj poste direktoro. Konante bonege francan kaj italan lingvojn, tradukis li multajn teatraĵojn kroaten.

Liajn novelojn kaj romanojn kunligas ĉiam jen akra satiro, jen mola humoro. Liaj noveloj kaj rakontoj estas jenaj: „Vladimir", „Turopolja kanono", „Amiĉjo Lovro", „Barono Ivĉjo", „Juna sinjoro", „Gardu vin de Senjana mano" (tr. italen), „La testamento de Ilija", „La dianto el la poeta tombo" (tr. italen, francen), „Almozulo Luka", „Ĝis trifoje Dio helpas", „La amatino de kanario", „Branka" novelo en leteroj, kaj „Prima donna" (tr. italen) unika lia verko el fremda lando — Italujo. Pli mal-

„Majčino mlijeko", „Dva Dujmovića", „Propast Venecije", „Klevetnikom Hrvatske", „Kako Hrvati djecu jedu", „Kameni svatovi", „Zlatan krst", „Veliki Petak u Pizi", „Zagreb", „Šah-mat", „Vrag i postolar", „Kugina kuća".

grandaj noveletoj kaj skizoj estas: „La prusa reĝo“, „La turkoj venas“, „La sonorigisto-kanonisto“, „En akvarium“.

Ĉarmaj estas liaj kvar historiaj romanoj: „Interdikto“, „Vilaĝana ribelo“ (Seljačka buna), „Diogenes“ (tr. italen, germanen, francen) kaj „La trezoro de l' oraĵisto“. Ili estas benita frukto de fervora pristudado de kroata historio kaj arĥivaj dokumentoj. En „Vil. ribelo“ priskribis Šenoa la kroatan historion de 1564.—1574. jaro. La ĉefa persono Matija Gubec, iniciatinto de la servutula ribelo kontraŭ „sinjoroj“, finis tragike. Li estis kronita per ardanta fera krono sur Marka placo kiel vilaĝana reĝo. Kvin kvadrataj ŝtonoj sur dirita loko rememorigas la pasanton ankaŭ nun pri tiu malĝoja okazintaĵo. Nobla estas tendenco de la romano: humaneco, egaleco kaj libereco.

„Diogenes“ estas bela patriota romano, bazita sur intrigo. La donitaj tipoj en ĝi estas kvazaŭ skulptitaj, neforgeseblaj. La ĉefa persono, riĉa nobelo Jankoviĉ, estas elpensita, dum la certeraj estas laŭhistoriaj. — Samtempe verkadis Šenoa du verkojn, ĉar sur sia mortlito diktadis li „Branka'n“ al la edzino Slava, kaj plej grandan historian romanon „Kletva“ al la filo Milan. Sed la senkompata morto forĵetis la plumon el lia mano ne permesinte finfari la plej grandan, hist. romanon. „Kletva“ priskribas grandan movadon en XIV. jarcento de l' kroata historio, kaj estas verkita de A. Šenoa ĝis la paĝo 721.; la finon ĝis la paĝo 915. verkis Josip Eŭgen Tomiĉ.

„La trezoro de l' oraĵisto“ (Zlatarovo zlato), unua historia romano de A. Šenoa, kun siaj ĉarmaj priskriboj, patriota amo, dramecaj epizodoj — estas

vera trezoro de kroata literaturo. Tion pruvas ankaŭ ĝia jam sesa kroata eldono. Ĝis nun estas ĝi tradukita pole: „Zlota dziewecka“ de Bronislaw Grabowski, boheme: „Zlatnikŭv zlatoušek“ de Marija Fabkoviĉ, germane: „Das Goldkind“ de Podermanski, slovene: „Zlatarjevo zlato“ de Silvester Košutnik. — En la romano ne estas ĉefa ama fablo, sed karakterizo de opstina defendo de la privilegioj de l' nobela burĝaro kontraŭ arbitra kaj fiera aristokrataro. Ĉiuj klasoj ĵaluze defendas sian individualecon reciproke, ĉiuj kun armita mano staras sur la sojlo de l' Kristaneco. Dum ili batalante, hejme malprosperas, aliaj nacioj kulture altiĝas. Ĉu Kroatujo ĝuas ian dankon por sia agado? ... Ĝi estas intence preskaŭ nekonata lando ĝis plej nova tempo.

La sulko sur literatura kampo, kulturata de A. Šenoa, ankoraŭ ne trovis ĝustan plugiston. Se per ia miraklo estus Šenoa revivigita, certe li ektrempus decide la plumon por finverki siajn ĉirkaŭ 50 nesolvitajn planojn. Li estus ankaŭ nun en unua vico sur sudslava Parnaso ...

Zagreb, en Aŭgusto 1911.

La tradukinto.

La trezoro de l' orajisto.

I.

Ĉe la fino de XVI. jarcento dum la reĝado de Maksimiliano II., kaj banusado de l' episkopo Ĝuro Draŝkoviĉ, viciĝadis malaltetaj budoj ĉirkaŭ la paroĥa preĝejo de s[a] Marko, kie la butikistoj kaj vendistinoj vendadis al la indulgemaj burĝoj de nobela urbo sur „Griĉ-monteto“ vakskandelojn, oleon, flanon kaj aliajn bagatelaĵojn bagatele uzotajn kaj por bagatelaj moneroj.

La malnovaj zagrebanoj, kvankam en ĉiama malpaco kun honorindaj sinjoroj de l' kapitolo, estis sufiĉe piaj homoj. Foje ili sin eĉ laŭdis antaŭ lia reĝa moŝto, ke, dank' al Dio, estas en ilia urbo tiom da monaĥoj kaj pastroj, kiom da burĝoj. Sed spite tia sufiĉega kaj grandega pieco malmulte ili rememoris la s[an] Skribon, kie estas legeble, ke la filo de Dio forvipis la bankierojn kaj komercistojn el la halo de l' dia templo. La budoj kviete staris sub patroneco de s[a] Marko kaj eĉ kelkfoje antaŭ ili sin haltis laikaj kaj pastraj sinjoroj.

La plej rimarkinda persono en ĉi tiuj budoj estis Magda „pipraĵistino“.[1] La junaj kaj maljunaj, la grandaj kaj malgrandaj en la urbo konis Magdan pli bone ol eĉ la urban tamburiston Ĝuron Garuc, la

[1] Pripraĵistino, vendistino de piprokukaĵoj. N. d. t.

longulo, al kiu oni alkudris la epiteton: „Episkopa bastono“.

Magda vere estis tre mirinda kapo. Maldika kiel kandelo, vaksoflava, havis pintan, ĉe la ekstremo kurban nazon kvazaŭ tiriĝanta pruno, kaj sur la pinto de l' nazo vilan verukon. Sur ŝia longeta vizaĝo oni vidis pli da faldoj ol sur la vilaĝana ĉemizo. Dentodoloron ŝi ne havis, ĉar ŝi ilin ne posedis, kaj en la grizentajn, ĝenantajn okulojn malofte riskus in ajn enrigardi, ĉar ilin la maljunulino fermadis, nur kelkan fojon palpebrumante en la dian mondon.

Observante ŝin, kiel ŝi klinita en la budo kaŭras sub la blanka flugila kufo, ĉiu ekpensus: Magda ne estas sen —, Magda rajdas ĉiuvendrede kontraŭ Klek aŭ al la vojkruciĝo de Lomnica[1], por diable sin amuzigi en la rondo de l' hufofratinoj, nu, — ĉiu ekpensus, Magda estas sorĉistino.

Tamen ŝia animo ne estis malplena, la koro malica; la pipro-kukaĵistino estis eĉ tre pia maljunulino. En ŝia budo pendis fulgita pentraĵo de l' mirakla Remeta Dipatrino, kaj antaŭ ĝi brulis je honoro de l' Dipatrino kaj savo de l' animo bronza lumigilo. Magda sidante dum la tuta tago en sia ligna kaŝejo, dormetante tordadis la grajnan benitan rozarion, metinte nur po kelkfoje frostigitajn siajn manojn super la poto, plena da ardo, aŭ parolante kelkajn vortojn kun kia burĝino aŭ kun la sonorigisto. Ŝi kutime murmuris: „Patro nia“ kaj „Ave Maria“ ĉu la suno brilis ĉu pluvis. Do tion certe sorĉistino ne faras!

La epiteton „priprajistino“ oni aldonis al ŝi pro tio: En la tuta urbo ekzistis nek aristokratino nek burĝino, scianta knedi tiel pipro-kukon, kiel Magda. Tial estis vendrede kaj dimanĉe vetkonkuro por ŝiaj piprokukoj, kaj eĉ la urba juĝisto mem, Ivan Blaĵekoviĉ, lasis kelkfoje belan denaron en ŝia monujo.

La maljunulino vidviniĝis jam de longe. Ŝia

[1] Kunvenejoj de sorĉistinoj, N. d. t.

mortinta edzo estis sonorigisto ĉe sa Marko. Tiel ŝi vivaĉis senparenca kaj senfrukta, nokte bakante la piprokukojn en sia loĝejo ĉe Kamenita-vrata (Ŝtonpordego) kaj tage vendante ilin antaŭ sa Marko.

Oni ne memoris, ke ŝi estis iam pli juna, nek oni rimarkis ke ŝi maljuniĝas; ĉiam sama kaj sama kiel antikva bildo, kiu, pendante, jarojn post jaroj en kaŝita kastelo, sian formon ne ŝanĝas. Sed ĉiu vidis, ke la maljunulino kolektas belan monsumon, kaj malmulte elspezas, ĉiu demandis — kiel oni jam demandas pri ĉio — por kio al Magda la mono?

Vere, en la angulo de sia multkolora kesto gardis Magda la malnovan ŝtrumpon, plenan da denaroj, groŝoj, eĉ malnovaj cekinoj de l' reĝo Matiaŝo.

Sed por kio al Magda la mono?

„Por ripozo de l' animo“, trankvile rediris la maljunulino al tiaj trudemuloj, pluturnante la rozarion.

Jes, por ripozo de l' animo! La bona maljunulino, okupita de la pia revo, flanken metadis pene akiritan denaron al denaro, por povi kolekti tiom da mono, ke, post ŝia morto, por animripozo de ŝi kaj ŝia mortinta edzo oni faru meson ĉiujare ĉe sa Marko je Magda-tago.

Priokupata de tiu penso ŝi laboris fervore, ŝi estis feliĉa.

Nenia miro tial, ke ŝi estis amata de ĉiuj geburĝoj, vivante, kun ĉiuj en reciproka estimo. Nur unu homo ŝin malplaĉis: la urba razisto Grga Ĉokolin, kiu tenis sian butigeton sub la arkaĵaro de malnova urba domo, angule de la placo de sa Marko.

Strangulo estis tiu Grga Ĉokolin! Maldiketa kurulo. La kapo dika, ronda kiel brasiko, la brovoj densaj, volbitaj super la nazo, la okuloj malgrandaj, nigraj, pikantaj, kiam ilin vina nebulo ne vualis; la nazo malakra, larĝa, kurbita supren, kaj ruĝa, ke vi timas alproksimigi al ĝi pulvon, la vizaĝo lekita, senbarba, por tiel diri: viva montrilo de la metio de Grga. Tia estis eksteraĵo de l' urba razisteto. Sed eĉ lia animo ne estis pli bone subŝtofita. Ŝance-

liĝemulo, obstinulo, ŝajnigulo, en ĉiuj anguloj semata, ĉie enŝovanta siajn sapumitajn fingrojn, k i e l i n e ĉ n e n i o n k o s t i s.

Ĝuste oni ne sciis, de kie Grga falis; lia parolo ŝajnetis kvazaŭ zagorjana, laŭ bezono li sciis saluti la juĝiston aŭ kapelanon latine: bonan matenon. Oni lin eĉ ne demandis pri la hejmo, kaj, sciante, ke li de ie hazarde alvagis, oni evitis ofendi lin, ĉar lia lango estis vera diabla vipo. Tra la mondo sufiĉe li vagis, almenaŭ li tiel diris; li sin laŭdis, ke li servis en la armeo de l' banuso sub la standardo de Petar Bakač, ke apud Ivaniĉ-grad estis vundita, kaj mire li sciis paroli pri turkoj, pri sia kuraĝo, kaj se ŝajnis tro brava tiu lia kuraĝo al la aŭskultantoj, abrupte Grga turniĝis al ili kaj montrinte cikatron sur la frunto ekkriis: „Malsaĝuloj! Ke ĝi ne estas vera? Jen vidu! Tie ĉi kisis min la turka sabro! Danku Dion, ke pli profunden ĝi ne enhakis, ĉar vi tiam ne havus iun, kiu vin razus!" La homoj ekmemoris, ke oni povas ricevi cikatron eĉ drinkante, tamen Grga restis heroo, vera heroo. Grga vere ne estis sanktulo; eĉ kun malplena stomako li havis plenan sakon da ŝercoj kaj amuzaĵoj, eĉ animo ne restis ĉe li sen flikaĵoj. La burĝojn li kuracis per kamforo kaj hirudoj, la brutaron per hostio, li razis sinjorojn, razis ankaŭ vilaĝanojn el Trnje pere de ligna kulero.[1]

Kaj dum cetera tempo li trinkis, ĵetis la kubojn kaj ŝercadis.

Cirkuladis famo, ke li sin okupas je misteraj specialoj — ke kuiras iajn trinkaĵojn kaj pli de tia speco. Kompreneble tion oni nur parolaĉis, sed oni sciis certe, ke Ĉokolin merkrede kaj vendrede ne fastas.

Sekve nenia miro, ke lin Magda tre aminde ne rigardis, sed hazarde okazis, ke la razisto kaj pipraĵistino tute malpaciĝis. Magda loĝis apud Kamenita

[1] La tiamaj vilaĝrazistoj metadis al la kamparanoj en la buŝon lignan kuleron por pli facile razi ilin. N. d. t.

vrata, ĝuste kontraŭ la ĝardeno de Draŝkoviĉ, en la domo de Petar Krupiĉ, la oraĵisto kaj urba estro.

Petar Krupiĉ, nobelo el Velika Mlaka, vivis de la juneco en Zagreb. Poste li rondiris sufiĉe la mondon pro oraĵista metio, venis eĉ en Venecion mem, kie oni forĝas la plej delikatan oron kaj ŝpinas ĝin en maldikajn fadenojn. Post multaj penado kaj lernado revenis li Zagrebon, tie enskribis sin en korporacion, aledziĝis la metion de l' bopatro kaj brikan domon apud Kamenita-vrata. Kvankam la metio prosperis al li kaj feliĉo floris, neniam fieriĝis la majstro Petar nek per maljusta ago makuligis sian nomon, kaj la burĝoj rapide ekamis lin pro lia honesta koro kaj sagaca prudento elektinte lin magistratano. Sed feliĉo pasas rapide, kaj malfeliĉo venas pli rapide. Je granda ĉagreno de l' oraĵisto mortis baldaŭe lia fidela edzino postlasinte etan solfilinon — nomata Dora.

Al tiu Dora estis la maljuna Magda baptopatrino, tiun baptofilinon atentis Magda kiel okulon en la kapo. Krupiĉ ne havis tempon por eduki sian trezoron. La turka superforto tedis ĉiuflanke, tial oni devis kolekti nutraĵon kaj defendaĵon, helpotaj al la urbo. Sed ankaŭ la aristokratoj: Zrinskioj, Bakačoj kaj Alapiĉoj ĉagrenis sufiĉe zagrebanojn, ke procesoj estis senfinaj. Ankaŭ inter si ĉagreniĝadis kaj malpaciĝadis zagrebanoj laŭ pratempa kutimo, kaj oni devis paciĝadi, juĝadi, kaj eĉ por nenia salajro sed por la honoro, danko kaj du paroj da botoj. Oni devis do peni por vivi, kaj plani kaj forĝi de la tagiĝo ĝis la malluma nokto. Apartigita tiel de sia kameno ĉu per oraĵista ĉu senatana okupo, Krupiĉ ĝojis je la zorgado de Magda, sciante, ke la maljunulino estas ora animo kaj ke ŝi per pia mano kaj instruado edukos sian baptofilinon por la vojo de tempa kaj eterna feliĉo.

Sed Dora eĉ ne bezonis tiom da atento kaj zorgo. La junulino, bona de sia animo kaj ne konante malbonon, trovus ankaŭ per si mem la vojon irotan, por ne eniĝi en malbonon. Ŝi estis sagaca, viva, fariĝinte en malfrua infaneco tiel libera, ke

ŝin oni ne rigardis infano, ke ŝin ĉiuj eĉ nomadis „la saĝulino de l' oraĵisto", ĉar la etulino — kaj tio ne estis ŝerco tiutempe — ellernis legi kaj skribi de la urba instruisto, Blaĵ Dragŝiĉ.

Kiam do nur la burĝono fariĝos floro, la infano junulino! Mirinda ĉarmo tiam por okulo!

Kiam ŝi dimanĉe kaj festotage, revenanta hejmen tra la Marko-placo, paŝadetis per siaj etaj piedetoj, vestitaj en ruĝepintaj botetoj, kiam ŝia bela kapeto sin balancis sub la ornamriĉa parta[1] kaj abundaj ŝiaj nigraj harligoj malleviĝis malsupren de la blueta korsaĵo ĉirkaŭkudrita per ŝafofelo; kiam ŝi tenis per la manetoj sur la brusto grandan, arĝente laditan preĝaron, honte antaŭ sin rigardante, ke vi ne povis ekvidi la fulmantajn okulojn pro longaj silkosimilaj palpebroj, ĉiu estus dirinta: Jen sanktulino deiris de l' altaro inter la popolon por per sia aminda aperaĵo ĝojigi la malgajajn homojn...

Kelkaj burĝidoj — sed ne kia-ajnuloj — ŝtele ĵetadis la okulojn al Dora; kelka patrino sekrete kalkulis, kiam Dora maturiĝos por sia filo, eĉ aristokrataj sinjoridetoj se ilin subite brulpikis la brilokulo de l' oraĵista filino, sufloris unu al alia: „He, se ŝi ne estus, kio estas!"

Sed Dora ne altiĝis sole per bela vizaĝo, sed ankaŭ per pli bela animo. Estis ankaŭ alia kialo, vere gravega, ĉar ĝi oron valoras. Oni diras: „Bona famo estas pli valora ol zono ora"; kaj Dora posedis kiel bonan famon tiel oran zonon.

Nenia miro do estas, ke ĉiuj belegaj zagrebaj junuloj proponis al la junulino Kristnaskan pomon, rondirante, sopirante, kaj planante la trezoron de l' oraĵisto; sed de tiu trezoro ne estis por ili oro, kaj fermita la pordo de l' oraĵisto.

Ĉio tio estis nenia miro, sed miro el miroj, pri kiu sonĝis nek unu animo en la urbo, estis jena:

Kion kuraĝis nek ia sinjoro nek sinjora ido, tion kuraĝis mizera razisto Grga Ĉokolin. Li ekde-

[1] Parta junulina kapkovrilo. N. d. t.

ziris Doran! Kaj ĝuste li! Malbelaĵo serĉas ĉiam belaĵon, la rano ekdeziris sin hufigi kaj Ĉokolin volis fariĝi bofilo de l' oraĵisto!

Antaŭ ĉio li paroletis al Magda, sciante, ke la maljuna priparaĵistino estas la plej bona ŝlosilo al la pordo de Dora. Sed Magda kvazaŭ ne aŭdis. Fine la razisto ekkuraĝiĝis, fariĝu kio-ajn! Ian tagon fruleviĝis Ĉokolin, stariĝis antaŭ stanospegulon, sin beligis kiel eble plej bone, surmetis la drapan dolmanon[1], brilajn botojn kun arĝentaj fraĝoj, ĉe la zono metis ruĝsilkan tukon, kaj kiam la popolo revenadis de l' meso de sa Marko, nia razisto senhezite frap' sur la pordo de l' oraĵisto.

„Bonan matenon, bonum mane, mastro „Krupiĉ", ektusis pufiĝinta Grga.

„Dio donu bonan, sinjoro Grga!", rediris lin maljunulo Krupiĉ, sin levinte de granda nuksa seĝo. „Kia bona feliĉo vin portas tiel frue sub mian tegmenton? Sidiĝu, amiko Grga! — — Dora! — alportu glason da prun-brando!"

„Malvarme, vere tre malvarme; eĉ la Pasko pasis jam, kaj tamen povus fali la frosto", rediris Grga, sin turnadante sur la benko, sur kiu li sin sidigis kaj iel senvole sufokante sin, — „sed" daŭrigis li — „post nubila Phoebus[2], ergo konsolu nin!"

Ambaŭ eksilentis. Dume Dora metis sur la tablon platan botelon kaj du glasetojn, kaj eĉ ne levinte la okulojn diris mallonge: „Bonan matenon," kaj eliris el la ĉambro.

Krupiĉ silentis, divenante proksimume, pri kio oni agas, dum Grga perdis la vorton, post kiam subite aperis bela junulino antaŭ li.

Sorbinte li iom da brando, fariĝis iom pli kuraĝa, kaj fine komencis: „Vi ekdemandis min antaŭe, mastro Krupiĉ, kia feliĉo min portas sub vian tegmenton. Mi diros al vi, kio estas. Povas esti feliĉo kaj malfeliĉo por mi —"

[1] Dolmano, nacia festa vesto. N. d. t.
[2] Post pluvo aperas la suno.

„Ho jen! Serioze vi komencis," intermetis la maljunulo.

„Ŝerci mi nun eĉ ne povas. Mi ne bezonas longe rakonti kiu kaj kio mi estas. Tion vi, majstro, plej bone scias. Certe troviĝas personoj en la urbo, por kiuj la honesto de aliaj nenio estas ol malnova peltaĵo, forte depolvota, sed kalumnio estas kiel kardo ĝermanta, kie vi ĝin ne estas seminta. Mi diras al ĉiu: „animon en sin", kaj oni balaŭ antaŭ sia pordo; mi diras, Grga Čokolin ne estas malplena sapoŝaŭmo, kia li estas rigardata. Kaj mi volus esti pli bona, ol mi estas, sed al la diablo estas tiel solumi kaj nenion faraĉi et caetera. Tial, majstro, por ne turmenti vin per longa litanio, — mi firme decidis edziĝi." Ĉi tiujn lastajn vortojn Grga iel pene elpremis, sed ektusinte, li daŭrigis:

„Por edziĝo, kiel vi scias mem, necesas viro kaj virino."

„Vi diris tute prave", aldonis Krupiĉ.

„La viron, scilicet min, mi havus, sed la alia duono, la Adam-ripo mankas, — en tiu arbetaĵo kuŝas la leporo!"[1]

„Ankaŭ tio estas vera!"

„Longe mi tordis kaj tordis ĉi tiun penson en la kapo, kaj pense kribligis ĉiujn zagrebajn knabinojn, kaj fine, re bene cognita, jen min ĉi tie pro via Dora! Ne prenu malbone, majstro Petar! Dixi!", penege ekspiris Grga.

Krupiĉ estis ekaŭdinta, kien celas la okulo de l' razisto, do li eĉ plej malmulte ne estis mirigita, sed kiel bonulo, ne volante eĉ iun ajn ofendi, ne rifuzis la varbanton koncize, sed respondis al li:

„Kara amiko Grga! Honoro kaj respekto al via metio! Ni ĉiuj vivas de dia donaco, ĉu plugante, ĉu forĝante aŭ razante. Mi scias ankaŭ tion, ke la mondo estas klaĉema kaj longlanga, ke oni malĝojas pri alia feliĉo, kaj ĝojas pri alia malfeliĉo. Sed mi scias, kio estas justa kaj bona. Ne opiniu, ke pli bona lango estas al mi ulno per kiu mi mezuras ies

[1] Tie estas la ĉefaĵo. N. d. t.

honestecon. Sed, kara majstro Grga, la frukto ne estu ŝirkolektota ĝis kiam ĝi ne maturiĝos, kaj la knabino edziniĝota, ĝis kiam ŝi ne taŭgas por patriniĝo. Dora estas, dank' al Dio, knabino kerna kaj sana, sed je Triunuo ŝi estos apenaŭ deksesjara. Estus trofrue, ĉiaokaze trofrue. Ŝi portu ankoraŭ kelke da jaroj la parta'n,[1] estos jam sufiĉa tempo kaj ŝarĝo por la kufo.[2] Vi scias ankaŭ tion, ke mi estas sola, ke mi estas vidvo; de tago al tago la manoj malfortiĝas, la okuloj min iom post iom perfidas, kaj da zorgoj plena sako; kuru tien kuru ĉi tien, kaj la knabinon ŝarĝas la tuta domo. Sekve prenu ankaŭ tiun bastonon al mia maljuneco — tiam Petar adiaŭ. Tial ne prenu malbone, majstro Grga, mi deziras al vi honestan kaj pian virinon, sed Dora estas tro juna.

„Ne prenu malbone!", ekbalbutis Grga, nesciante kien meti la manojn kaj piedojn, kaj korpremita kaj pala ĝis la nazo foriris hejmen.

Dora aŭdis tutan tiun interparoladon tra la fenestreto, komunikanta inter la ĉambro kaj kuirejo, kaj de hahado ŝi preskaŭ formordis sian langon. Brogita Grga razante tiun tagon ektranĉis urban kapelanon Šalkoviĉ, ke li ekkriis de doloro kaj ĉagreno.

Magda elflaris, kiaspeca lano estas tie ŝpinata — kaj kie kompatinda Grga esperis trovi la ŝlosilon, li trovis fermilon, kaj tio malbonigis lian kalkulon.

„Tiu sinjoraĉo razilulo ne estas el malsaĝula domo", diris la maljunulino al Krupiĉ jam antaŭ la vizito de Grga. Ankaŭ cigano ekdeziris fariĝi turka caro! Mi, je Dio kaj kredo, malamas fierecon; pro fiereco rulfalis la anĝeloj kaj gardu Dio, ke Dora makulu sian animon per morta peko. Sed sinjoro baptano! kvankam ni estas ĉiuj gefratoj, troviĝas ĉiuspecaj inter ni, kaj mi neniam aŭdis, ke la vinagro estas miksata kun vino. Donu Dio al Dornjo bonan edzon, por ke estu iliaj animo ĉe animo kiel

[1] Kapkovrilo de la junulinoj.
[2] Kapkovrilo de la virinoj.

fingro ĉe fingro. Mi ne vidu eternan feliĉegon, se mi por tio ne preĝas ĉiutage karan Dion. Sed kiam oni destinas al la knabino bonon aŭ malbonon ne de hodiaŭ ĝis morgaŭ, sed por tuta ĉi tiu morta jararo, tiam oni devas ege kuntiri la okulojn, por ke ne naskiĝu, diablo kaj tri. Kaj Ĉokolin ne estas por Dornjo, neniel! Unue staleto, poste bovineto! kaj la butiko de Ĉokolin vere ne estas staleto sed, kun via permeso, stalo. Spioni la riĉaĵon de pli aĝaj, signifas: peti ilian morton. Bona kapo, pli bona koro kaj du sanaj brakoj — estas nesecaj. Kaj Ĉokolin estas dibocanto, kubojn-ĵetanto, interbatiĝanto, kaj kiel oni parolaĉas — helpu nin Dio kaj sa Blaĵ — ankaŭ nigra studento.[1] Ĉe li unu groŝo engrampas la domon, kaj tri groŝoj elglitas el la domo. Ian tagon — merkredon — tagiĝe malfermis la urba pordisto Nova-vrata'n. Kaj kion li rimarkis? Grga ebria kuŝas antaŭ pordo kaj ronkas. De blankaj remetaj monaĥoj estis li ŝarĝita per vino el Bukovac kaj sub la hela ĉielo traronkas la tutan nokton. Do tiu — ke Doran — Dio pardonu miajn pekojn! Li ne estas por Dora, tute ne!"

Tion kaj pli da tio parolis Magda al Krupiĉ, sed la oraĵisto proprajuĝe ne konfidus sian favoratan kaj unikan al la dibocanto kaj ventokapulo.

Tiel do malpaciĝis la razisto kaj piprajistino.

La razisto ĉagreniĝis, ke lia galo tute bolis, kaj trinkis, ke lia nazo komenciĝis flori kiel peonio. Samtempe li saĝumis kaj cerbumis, kiamaniere prepari la kaĉon al la piprajistino.

En drinkejo al „nigra Janko" apud Kamenita-vrata enŝoviĝus, alie societema razisto, en la plej malluman angulon, kie li medite ĉe la kruĉo da vino solaĉis la tutan tagon.

„Jes, jes", ridante li ekmurmuris, „Grga estas vinamanto kaj diabla frato! Dora, delikata Dora de l' oraĵisto, ne estas por li! Kaj oni forrifuzis min, honte forkomplimentis, kvazaŭ mi estas cigano! Atendu, pipra fido! Fariĝu falĉileto de mia

[1] La homoj, kiuj havas rilaton kun la diablo. N. d. t.

razilo, se mi fine ne derazos vian haraĵan verukon! Jes, jes, mi Grga Ĉokolin —"

Kaj ne pasis longa tempo, kaj la razisto fakte sin venĝis.

La respektinda magistrato tambure sciigis ĉie kaj ĉiujn, ke estonte estas malpermesite al la vendistinoj vendadi malpli ol dek vakskandelojn pofunte, kaj ke ili pagos por ĉiu troa kandelo punon de unu hungara floreno.

Ĉokolin, sciante, ke maljuna Magda havis de antaŭ dekunu vakskandelojn pofunte, ekiris al la budo de l' maljunulino, ke ŝi donu al li de tiuj malpli grandaj kandeloj. Magda longe ŝanceliĝis, sed la razisto diris al ŝi:

„Ne malsaĝumu, fratino! Mi ja certe vin ne perfidos. Cetere tiuj restis al vi de malnovaj, vi do certe ne volas, ke ilin musoj formanĝu!"

La maljunulino ne divenante malbonon, ekstaris sur maldikan glacion, dum fripono Ĉokolin plendis ŝin antaŭ la urba juĝisto, ke ŝi malobeis la magistratan ordonon vendante pli malgrandajn kandelojn.

Do Magda devis aperi antaŭ juĝejo. Antaŭ juĝejon! Kvazaŭ venena sago traboris la koron de l' maljunulino. Dum tuta sia vivo ŝi estis neniam antaŭ juĝisto, al neniu ŝi eĉ peceton estis kulpa aŭ ŝulda, kaj nun en sia altaĝo ŝi devis elatendi tian hontaĵon!

„Mi estimas leĝojn kaj estrojn, kaj de ĉiu honestulo estas sankta devo atenti, ke la ordonoj de respektinda magistrato estu obeataj!", ekparolis antaŭ la juĝisto hipokrite Ĉokolin.

„Dio gardu, ke ĉiu estimu tiel estrojn, kiel vi, majstro Ĉokolin! Ĉi tiu ciganaĵo ne premu vian animon, tamen tiu dekunua kandelo ne lumigos al vi la vojon al paradizo!", diris Magda.

Per tremanta mano elvolvis la maljunulino el angulo de sia naztuko florenon, metis ĝin sur la tablon, kaj du larmoj kiel pizo aperis en la okuloj! Kaj reveninte sian budon, estis al ŝi kvazaŭ renversiĝis sur sia maljuna koro ĉiuj ŝtonaj sanktuloj de super la preĝejpordo.

Al la razisto estis per tiu venĝo iom pli facile, sed lia animo ne kvietiĝis. Pli forte oni devis sin venĝi al la kialo de liaj ĉagrenoj, oni devis sin venĝi al la maljuna oraĵisto kaj lia solfilino, nedestinitino de Grga.

II.

Estis post tagmezo la kvaran tagon depost s[a] Triunuo, en jaro de Sinjoro 1574. Super zagrebaj monto kaj kampo kliniĝis nigra nubo, kliniĝis kaj superŝutis la teron per densa pluvego, kvazaŭ vi estus ĝin tranĉile tratranĉinta. Sed post kelke da tempo la pluvego ĉesis, la nubo malaperis al oriento; la blueta ĉielo dekoltiĝis hele kaj pure kiel kristalo, kaj en mezo de la ĉielo flugpendis la brulanta suno, etendante oran reton monten kaj valen, briletante en milo da gutetoj, kiuj tremetis sur abunda verdaĵo. Hela kaj pura estis la universo, serena ankaŭ la animo de l' homo meze de l' ĉarmega mondo.

Kvazaŭ dia mano translaciis teren parton de l' paradiza regiono, brilis Sava-ebenaĵo jen verda kiel maldiketa silko, jen flava kiel fandita oro, kaj meze de l' ebenaĵo Sava, briletante kiel arĝenta serpento. Norde de la ebenaĵo viciĝas monteto al monteto, ŝutitaj helaj vinberbranĉoj, blankaj dometoj, graciaj turoj kaj antaŭe la montetoj sin rampas al la nuboj mistera kaj malluma iomete muta zagreba monto, sed ĵus en ĉi tiu tempo viva. La paŝtista kanto de proksima altaĵo, blovsopiro, skuanta la orajn gutetojn de verdaj branĉoj, la frapado de muelila rado en la valo, la sonoraj birdoj, naĝantaj tra pura universo, kaj la brueto de preĝeja sonorilo — ĉio ĉi tiu polifonaĵo kunharmoniis sin en ĉarman nekompreneblan muzikon, ĉio ebriigis animon per nekontraŭstarebla ĉarmo.

Meze de monta selo super la gracia pinto sin reflektas de l' ombro de centjaraj kverkoj la blanka fasado de malnova Medvedgrad, staranta meze de bukeda parko. Ĝiajn malnovajn mallumetajn muregojn blankigis antaŭ ne longe la reĝa arhitekturisto:

Girolamo Arkonati. Sur malsuptilaj bastionoj briletas brilaj ĉapeloj kvazaŭ oraj pomoj en fein-ĝardeno, kaj sur altaj fenestroj ludas la radioj de la somera suno.

Sed en la kastelo, ĉirkaŭ la kastelo ĉio mutiĝis. Nur iafoje interrompas la montan silenton guto, brufrapante la ŝtonon de alta tegmento, aŭ fulmosimila hirundo, ekfluginte el sub la ĉetegmento en dian aeron.

Unu sola animo kvazaŭ estus viva en tiu kastelo — sed ankaŭ ĝi, por tiel diri, dormis.

Sur la monteto, apudega pordegon de la kastelo mem, verdiĝis nevidita fenomeno — buks-arbo „dika kiel trabo" etendante densajn, malhelajn branĉojn superŝutitajn de rosa perlo.

Sub la buksarbo sidis forta, heroa viro. Lia vizaĝkoloro estis bruneta, la haroj mallongaj, nigraj kaj la barbo longa, nigra. Supren de larĝa nedelikata nazo leviĝis la frunto larĝa, angula.

El sub la nigraj okuloj eliĝis fortaj ostoj de l' dika vizaĝo, dum la dikaj lipoj kuntiriĝis — ĉio ĉi signoj de sagaca kapo, kuraĝa animo, nevenkebla volo. El la verdeta drapvesto elrigardis la heroa brusto; la kalkanumojn de dikaj flavaj botoj enigis li en malsekan tuton, la kubutojn apogis sur la genuoj, dum la dikan kapon mallevis al la brusto. La viro enpensiĝis. Post momento li levis la kapon, kaj ekrigardis en la ĉarmegan mondon. Malforta bloveto kaj bonodorantaj floroj revivigis lin el la revo. La beleco sub liaj piedoj ĉarmigis lin, kiel rideto de belulino kvietigas la koron de tirano.

La flamo de nigra lia okulo estingiĝis, la lipoj duone malfermiĝis, la kruda vizaĝo vestis sin per ia kvieta akordo, kiel vizaĝo de malsanulo, akceptinta guteton da kvietiga kuracilo sur sian cikatregon. La muta viro rigardis, rigardante ĝuis. Liaj okuloj kvazaŭ petolema papilio vagadis monten kaj valen. Jen! okcidente super Sava oni vidas Susjedgrad'on, kiel monta aglo super abismo; antaŭ ne longe mortis en ĝi maljuna kulpulo Tahi. Jen bastionoj de Samobor! Tie loĝas belega sinjorino

Klara Grubar. Kaj antaŭen! Meze de la verda monto ruĝiĝas de l' sunardaĵo kruda Okiĉ, la nesto de Bakaĉoj, kiel rubeno en la krono smeralda. Kaj tie oriente dronas en grizeta nebulo blanka Sisak, ĉiama atestanto de kroata heroeco.

Sed subite fulmo trakuris lian frunton, la kapo rektiĝis, la vizaĝo malsereniĝis kaj furiozaj okuloj de la homo ekfiksis unu punkton.

Super la monteto Griĉ altiĝas malhelaj muregoj, kaj pli alten de la muregoj kvar fortaj gardistoj: kvar krudaj bastionoj. Ilin rigarde fiksas la viro, volante ilin rigarde kvazaŭ forbruligi. Tiu celo de lia kolero estis — Zagreb.

„Ho ke vi ne ekzistus, malbenita talpnesto! Kia malfeliĉa fatalo metis vin antaŭ miaj okuloj, por ke vi estu pereilo de mia gento, ke vi ŝajnas al ni pli terura ol la turka furiozo! Jen kiel tiuj mizeraj butikistoj sin zonigis per kruda ŝtono, por ke fortika pugno ne ruinigu la butikon, ne disŝutu la pipron. Jes! Jes! Kaj ili imagas sin kiel nobeloj, kaj se ia iom forta mano ektuŝas tiun vespejon, jen spektaklo kiel el ranejo, jen al la kortego iliaj „oraj liberoj!“ Je mia kristana sabro, mi eĉ orelon ne movus, se la turka hufo ektuŝus tiun fiinsektaron, mi eĉ okulon ne estus palpebruminta, se Gubec sufokigis ĉiun ĉi ciganidaron. Se tiuj limakoj restas almenaŭ en siaj ujoj, ke siaj sur siaĵo estas trankvilaj! Sed jes! Ili volas posedi mian Medvedgrad, por ke iliaj dorsoj estu gardataj kontraŭ urso; ili deziras Kraljev-brod'on, por ke ili povu kun sia negocaĉo veturi al Adriatiko, ankaŭ Ĉernomerec kaj Hudi-Bitek estas ilia deziro, — sed malrapide, urbaj sinjoroj! Pro ĉi tiu via vasta kaj altema volo, nigre mi vin mezuros, fortege vin forbatos — je la tombo de mia patro, mi ĝin faros, aŭ mi ne estu nomata plu „Stjepko Gregorianec“.

Longe kuradis tiaj pensoj intermiksite en la kapo de Gregorianec, atingante kaj nuligante unu la alian kvazaŭ ondoj de rapidfluo.

La suno jam kliniĝis al Okiĉ-monto, dum tra la montaj valoj ŝteliradis kvieta vespero el malluma

arbaro. Je unu fojo eksonis ĉevala hufo el la kverka densejo. Gregorianec levis la kapon. Du minutoj ne pasis, kaj sur la monta vojo aperis du tre malsamaj vojaĝistoj. En ĉifonoj kaj nuda viro, envolvita en kana mantelo kaj kovrita per larĝa kana ĉapelo, iraĉis laŭ la monto kondukante je l' brido la ĉevalaĉon, sur kiu sin balancis diketa, griza sinjoro nigre pastre vestita kaj sub nigra felĉapo — la kroata kronikisto kaj zagreba kanoniko Antun Vramec.

„Ĉu mi bone vidas? Bonan vesperon, a d m o d u m r e v e r e n d e a m i c e!“, ekkriis Gregorianec, saltinte sur la piedojn kaj rapidinte malsupren renkonte al la maljunulo. „Jen malofta feliĉo al mia peka domo! Kio do vin, honorinda sinjoro kaj amiko, igis rampi en la mallumo sur la ĉevalaĉo tra la monto kaj serĉi mian ursan neston! Jen la suno subiras, jam la roso falis, kaj la vespera malvarmo igas malbonon al via grizkapo. Plie ĉi tie troviĝas haramioj,[1] transkurintaj de la banusa armeo, kiuj facile kisus la oran krucon sed ankaŭ retenante ĝin por sankta memoraĵo!“

Vramec haltigis la ĉevalon, dume Gregorianec prenis la kondukilojn el la mano de ĉifonita kondukanto.

„P a x t e c u m!“[2] salutis la maljunulo estron de Medvedgrad sin iom klininte. Mi venas de la monaĥejo Remete, kie mi faris kanonikan viziton; ĉiaokaze mi volis vin viziti, kaj pro kio, baldaŭ vi aŭdos. La blankaj monaĥoj donis al mi ĉi tiun Jerko kiel kondukanto, tial mi ne timis al hajdukoj, ĉar kvankam estas Jerko surdmutulo, fortaj estas liaj muskoloj, kaj pli forta lia korneusa bastono. Sed prave vi diris, filo! Malvarmiĝis, kaj mi maljunulo ne estas sanega. Tial ni ne ŝpinu ĉi tie multe da vortoj — sed ni iru sub la tegmenton, ni jam havos paroli pri kio.“

Post tiuj vortoj svingis Vramec mane al Jerko,

[1] Kroata miliciano.
[2] Paco kun vi!

ŝtone ĝis nun staranta kaj kun stranga okulo rigardanta Gregorianecon. Je okulsigno de l' kanoniko li skuis sin du tri fojon kaj en minuto malaperis en avela arbetaĵo. Stjepko ektrenis la bridojn de l' ĉevalo de Vramec, kaj kondukis la honorindan ŝarĝon ĝis la kastelo mem.

Post mallonga tempo sidis la mastro kaj gasto ĉe la granda kverka tablo en granda mallumeta ĉambro de la maldekstra turo medvedgrada. Sur la tablo staris dika vakskandelo, kaj apude vitra kruĉo, plenega da orosimila vino. Gutinte du tri fojon, ŝmacis la maljunulo per lango kaj balancis grizan kapon. Oni vidis, ke li por nun estas kontenta.

„Kaj kie estas via sinjorino Marta, kie viaj junaj falkidoj Pavlo kaj Niĉjo?"

„Marta foriris en Mokricen. Oni diras, ke tie estas pli milda klimato, ĉar ŝi havas brust-malsanon. Niĉjo ekiris viziti mian bofraton Mihajlon Konjski. Mi konjektas, ke ĉe la sinjorino bofratino oni planas iajn edziĝ-festojn. Kaj pri Pavlo mi ne scius diri al vi, kie li ĵus vagas; pasis jam unu dekado, ke mi lin ne vidis."

„Ĉu ankaŭ por li oni planas edziĝ-festojn?"

„Diablon! — Li revas pri tio, kiel mi pri monaĥa supo. Li vagas tra la mondo, Dio sciu, kies ecojn ĉi tiu knabo imitas! Li estas arbitra sovaĝulo, kaj iras sian vojon."

„Lasu lin, amiko!", rediris pacige Vramec. „Juneco malsaĝeco. Ni ankaŭ estis tiaj. Kun tempo ankaŭ senbrida ĉevalviro malsovaĝiĝas. Profunde mi konas Pavlon. Ĉu mi ne estas lia baptopatro? Li estas bonkora, prudenta. Kompreneble li estas viva kvazaŭ fajrero el siliko, sed pli bona ankaŭ tia, ol ekstere sanktulo interne malbonulo. Do kiel mi vidas, ni estas solaj."

„Solaj!", rediris Stjepko.

„Sekve por ke mi diru al vi la kialon de mia alveno al via kastelo, ĉar pro ŝerco mi ne venis", almetis grave Vramec.

„Ke mi aŭdu, — admodum reverende amice!"

„Unue mi venis memvole, por spiradi arbaran aeron, por dolĉigi min per bela heleco de l' mondo; ĉar — inter nos — miaj honorindaj kolegoj en la konsistorio estas grandaj murmuruloj, kiuj precipe min „verkaĉon kaj kranikiston" rigardas okulangule, dirante: saĝulo fablojn ne skribaĉos."

„Certe la saĝo de iuj homoj staras en ventro", alflikis moke Gregorianec.

„Mi venis ankaŭ pro tio, por momente forgesi Zagrebon, jes Zagrebon, tiun neston de ĵaluzo kaj ĉagreno, babilemo kaj maliceco, kie kristanoj ĉagreniĝas kiel mutaj bestoj. Sed jam bone! En mia kroniko mi preparis por ili apartan folion, kiun ili certe ne metos sur sian fenestron."

„Vivas admodum reverende!", interrompis lin vive Stjepko; „vi parolas el mia animo!"

„Due", daŭrigis la kanoniko per grava tono, levinte maldekstran montrafigron, „due mi venis laŭ volo de alia. Min sendas honorinda sinjoro kaj fratro Niĉjo Želniĉki, preposto de Ĉazma."

„Želniĉki?" (legu: Ĵelniĉki).

„Jes, li. Vi ja konas nian banuson kaj episkopon."

„Eĉ tre bone!", rediris Gregorianec iom kolere. Ĝuro Draŝkoviĉ aŭdas, kie li eĉ ne aŭskultas, vidas, kie li ne rigardas. Laŭ opinio de la banuso vi estas fava ŝafo en la aro de sankta patrino eklezio."

„Kaj li estas" — eksplodis Stjepko.

„Trankviliĝu. La blankaj monaĥoj prezentis vin antaŭ li kiel — sit venia verbo[1] — veran satanidon: ke vi ilin rabas, ke vi ilin ŝtelas, ke vi konas nek Dion nek sanktulon. Ili diras ankaŭ tion, ke junaj virinoj el Graĉani plej bone scias, kiamaniere vi obeas la sesan ordonon kaj estas fidela al via laŭleĝa edzino, sinjorino Marta —"

„Mensogo! Ĉio infera mensogo!", eksplodis Gregorianec, ruĝiĝinte ĝis la oreloj, ke facile estis suspekteble, ke tiu „mensogo" estas diabla.

„Eble", respondis trankvile Vramec, ruze oku-

[1] Kun via permeso.

Nr .....
FILIA Nr 14
w Białymstoku

langule rigardante Stjepkon. „Sed tio koncernas vian spiritkuraciston, ĉar mi ne estas via konfesprenanto. Ĉiaokaze vi vidas, ke vi ne estas favorata de la banuso, kiu vere ne laŭdus kapitolanon manganta publike flanon kun vi. Memkompreneble, mi ne atentas ĉies malkontetecon, sed honorinda s^o Niĉjo estas timema kaj plie granda sinjoro, deziranta fariĝi ankoraŭ pli granda. Mitro estas al kanoniko same tiel dezirinda kiel juna knabino al junulo. Lia koro tre sentas por vi kaj por via gento, nur li timas publike prezenti a l v i l a m a n o n. Pro tio li sendis min ĉi tien."

„Kaj por kio?"

„Aŭskultu! La preposto de Ĉazma ricevis leteron el Wien, en kiu estas skribite ankaŭ pri vi!"

„Pri mi? El Wien? Do kio estas skribita?"

„Ĝuste bone oni ne skribas, t. e. ne parolas precipe en la imperiestra kortego."

„Kion do ili ree elpensis pri mi?"

„Ĉiospecan. P r o p r i m o: ili konjektas, ke vi konspiris kun Gubec, strange kronita antaŭ ne longe sur Mark-placo, ke vi sekrete agitis servutulojn kaj nobeluletojn kontraŭ sinjoroj eĉ helpante ilin."

„P r o p r i m o: tio estas malkuraĝa kalumnio", kolere rediris Gregorianec, „jes, kalumnio, honorinda sinjoro! Gregorianec estas mia nomo kaj nobelo. Mi estas magnato potenca kaj riĉa, servutulo estas balaaĵo, kaj sabretuloj kaj prun-nobeluloj,[1] eĉ se ili posedus cent blazonojn de l' prapatro Adam, ne estas miaj fratoj. Kelkfoje okazis, ke min ekregis kolero, kiam mi estis premata samtempe de maljuna tirano Tahi, reĝa kortumo kaj malkuraĝuloj zagrebanoj, kiel ankaŭ de sinjoroj, kaj de Zrinjskioj kaj Bakaĉoj; kelkfoje okazis ke mi kolere diris: incitu do, Stjepko, la servutulajn hundojn kontraŭ sinjoraj lupoj. Sed baldaŭ mi ektimis, kaj je mia blazono mi ne blovis en „la servutulan ribelon", tiom malpli submetis brulaĵon. Sed se mi eĉ

[1] En la originalo: „šljivari" t. e. prunistoj. Moka esprimo por nobeluloj kun malgranda bieneto. N. d. t.

faris, ĉu mi pekus: F l e c t e r e s i n e q u e o s u p e r o s, A c h e r o n t a m o v e b o.[1] Se vi estas persekutata de homoj, estas bona eĉ hundara helpo."

Gregorianec parolis pli kaj pli kolere, sorbante kelkfoje el la glasego, dum la kanoniko trankvile aŭskultis, observante lin.

„P r o s e c u n d o", almetis la maljunulo, „oni diras, ke vi protektas luteranajn predikistojn, liveritaj de mortinta Ivo Ungnad — o m e n e t n o m e n — en niajn regionojn je pereigo de justa katolika religio. Lia imperiestra moŝto ne alskribus vin tion kiel granda peko, Maksĉjo sekrete inklinas mem al malbenita novaĵo, sed tion alskribas vin kiel peko Draŝkoviĉ kaj ceteraj korteganoj, kiuj senkompate taŭzas tiun malbonodoran kardon el la kampo de Sinjoro."

„Ha, ha! Jen plena malsaĝaĵo! Mi ke estas luterano aŭ luterana protektanto? Mi zorgas pri tiuj hundaj luteranaĵoj, pri ĉiuj epistoloj, homilioj kaj psalmoj, kiuj estis proponataj al ni el Urach kaj Tübingen ĝuste tiom, kiom pri barbo de turka profeto. Kvankam pekulo, mi estas nekonvertebla kristano. Demandu vi ekzemple sinjorojn Zrinjski: kiu sin krucosignas laŭ la leĝo de zelota frato el Wirtemberg, kiu enkondukas la presitan peston el Germanujo?"

„Mi men ne kredas, ke vi sekvas luteranaĵon, ĉar alie vi min ne vidus sub ĉi tiu tegmento, fariĝinta kaverno de l' krimuloj. Sed mi ne finis. P r o t e r t i o: oni diras en Wien — kaj tio estas la plej granda via peko antaŭ ili — ke Stjepko Gregorianec, tiu glora kaj vidinda heroo tenas la glavon en la ingo, dum la vipo de Dio piedpremas la regnon, ke Stjepko Gregorianec embuske maloportunigas la vojon al lia ĉefduka moŝto Karlo, la regna komandanto nomita de lia imperiestra moŝto; ke sama Gregorianec intrigas kontraŭ generaloj de la Limo,

[1] Se mi ne fleksos diojn, mi movos inferon.

kiuj estas venintaj por defendi nin de la turka sklaveco. Tion oni diras pri vi en Wien."

„Ĉu tion?", saltis kolere Stjepko, ekkurinte sin en la ĉagrenaj vortoj: „Mi ne miras pri wiena klaĉo, nek mi estas stultulo, por fingre ne dekalkuli, ke min nek niaj nek wienaj sinjoroj ruĝe enskribis en sian koledaron. Mi ne estas rampulo, nek mi scias hispane komplimenti. Ankaŭ tio ĉi jam ne plaĉas ilin; sed mi ne intrigas, mi sidas trankvile mia sur miaĵo, kaj jen pro tio la kalumnio. Mi scias, kies butero ĝi estas! Ferko Tahi naskis ĉi tiujn satanajn plendojn en sia viper-animo, ĝi ne vidu la dian paradizon —"

„Ne blasfemu!", interrompis lin Vramec.

„Jes, li! Ankaŭ nun, kiam lian malpuran animon forprenis la diablo, ankaŭ nun mordas min la veneno, kiun li viva estis vominta sur min. Jen kuras la sesa jaro, ke li plendis min al lia imperiestra moŝto en Wien, ke oni min citis antaŭ reĝan tabulon en Poĵun,[1] kaj kial? Tial, ĉar mi defendis la rajton de mia bopatrino Urŝula, la patrinaĵon de mia edzino, sinjorino Marta Henning, ĉar mi kontraŭstaris, ke malvirta procentegulo Tahi okupu tutan Susjedgrad. Li incitis kontraŭ min eĉ zagreban butikistan hundaron, kaj ili relevis kontraŭ min la proceson asertante, ke Medvedgrad kaj tuta mia bieno estas ilia, kvankam mi havas skribe kaj sub reĝa sigelo, ke ĉion ĉi donacis la karmemora reĝo Ferdinando eterne al mia mortinta sinjoro patro Ambrozo, kaj post li al liaj posteuloj. Ke mi forgesu, kiel ili senhonorigis nian genton, abdikigis mian patron de la banuseco, ke li pro malĝojo mortis! Kiu estas kulpa al tio? Tahi. Kaj pasintan jaron, dum lia animo sidis sur la lango, kaj diablo en la ostoj, ĉu li ne piketis mian propran fraton Baltazar tiel longe, ĝis kiam tiu malfortulo ne insultis sin, min kaj tutan nobelaron de Gregorianec kalumniante min en publika kunveno de *statusetordines* de nia reĝolando en Zagreb, ke mi volas lin trompi

[1] Pozsony, Pressburg. N. d. t.

por lia patraĵa parto. Kaj kial? Tial, ke mi volis duonon de Medvedgrad garantiaĵe doni al Krsto Mikuliĉ, por rebonigi nian mastraĵon, ruinigita per grandaj elspezoj dum militiro kontraŭ turkoj kaj procesado kun civilaj kaj pastraj sinjoroj. Ĉion, ĉion elpensis kaj elplanis tiu maljuna vipero, por min frakasi, ruinigi. Mi do ke ne koleru? Ke dia fulmo trafu lian tombon!"

De kolera parolo leviĝadis lia brusto, kuntiriĝis la pugnoj; lia lango iĝis senmova kaj superregita de l' kolerego falis sur la seĝon.

„Ne blasfemu Dion!", ekparolis Vramec, levinte la manojn.

„Vi diras, ke vi estas katoliko, kaj mi diras vin, — ke vi ne estas kristano. Kial vi furiozas kontraŭ malviva nomo? Tahi mortis!"

„Ŝajne nur, *admodum reverende amice!*" — rediris maldolĉe Stjepko al Vramec, apoginte la kapon sur la mano, „ŝajne nur. Lia malvirta animo servas grandajn sinjorojn — kaj precipe al Ĝuro Draŝkoviĉ, kaj ili singarde surverŝas la venenigan arbon de miaj ĉagrenoj, plantita de Tahi. Tio estas la fonto de l' wiena parolo."

„Montru do vin al la publiko; ĉe vi estas energio, forto, saĝo. Nekontesteble pruvu ilin, ke ili kalumniante vin mensogas, ĉar oni diras: Kiu silentas, tiu malklaras."

„Mi ne volas. Ilia ĉagreno ne koncernas min, sed se mi eĉ zorgas pri ĝi, kia utilo? Mensogu pri honestulo: „Homon li mortigis!" Kaj la honestulo sin pravigu, kaj eliru senmakula el la juĝejo, tamen la kalumnio ĉiam resonos: „Mortigis!"

„Sekve, ĉu vin nenio instigas al la laboro, kaj puŝas de mallaboro?"

„Nenio. Ĉio stimulas min, ke mi delasu min de la homoj. Jam mian sinjoron patron Ambroz ili premegis kaj sufokadis, forigis de l' vicbanuseco, kaj sufokadis ankaŭ min, kiel mi vin antaŭe klarigis. Ĉu estas inde per glavo haki fremdajn leonojn, dume dum vin mangas enlandaj muŝoj kaj kuloj? Ĉu estas inde riski la kapon por tiuj, kiuj intertempe renver-

sos la tegmenton al vi? Ne estas. Plie ankaŭ la mizero en la domo. Sinjorino Marta konsumiĝas de tago al tago kiel neĝo sub la suno. Ŝi estas malafablema kaj sentema; fastas kaj preĝas, preĝas kaj fastas. Niĉjo, la favorato de l' patrino kun la trajtoj de l' patrino — estas inertiĝulo — promenanta de l' kameno ĝis la patrina antaŭtuko. Dum Pavlo — pli aĝa branĉo de la trunko de Gregorianecoj — estas ŝanĝanimulo, arbitrulo, opstinulo, kaj varmega sango. Li grimpus ĝis la luno, se vi apogus por li la ŝtuparon.

„Varmega sango, vi diras", interrompis lin Vramec, „vera ido de sia patro".

„Via moŝto eraras. Pavlo ne estas, kio mi estas, t. e. kio mi estis. Se mi estas varmegsanga kaj opstina, mi vane, sencele ne eluzadis mian penon. Ĉiujn miajn fortojn, ĉiujn klopodojn mi alceligis al la sola celo: — al la gloro kaj utilo de mia gento. Nian bienon mi per glavo savis el la ungoj de l' avaraj najbaroj, kaj kion kolektis mi kaj mia mortinta sinjoro patro, mi opiniis, ke miaj filoj gardos kaj dislarĝigos. Sed bedaŭride malviviĝas mia malnova trunko. Pavlo senkape vagas tra la mondo, rigardante ĉiam en la nubojn devojiĝas, kaj pri edziĝo eĉ aŭdi ne volas. Falas mia domo, falas. Krom tio ankaŭ la mizero ekster la domo."

„Kiel pensas tion via moŝto?", scivole ekdemandis la kanoniko.

„Kiel? La aferoj ne fluas tiel kiel mi deziras. Kio okazas en nia regno, ne min plaĉas. Vidu ja Draŝkoviĉon! Li estas saĝa kiel libro, glata kiel venecia vitro, dolĉa kiel cipra vino, kiu facile trompos vian prudenton. Li estas al ĉio gluanta, ĉiengrimpanta hedero, sed ne estas kverko, staranta je si mem, por haltigi la ventegon, minacanta Kroatujon. Li estas tro komplezema al la korteganoj, troe skribas en Wienon. Mi, — mi lin ne konfidas, la banuseco estas por li nur ŝtupo por levi sin pli kaj pli alten. Ĉu pasintan jaron ne farigis li de zagreba ĝura[1] episkopo? Pro kio tio? Ĉu li zorgas pri

[1] Györ, Raab. N. d. t.

utilo kaj privilegioj de kroataj kaj slavonaj sinjoroj? Mi ne kredas. Dum kune kun li banusadis Frano Frankopan, mi kredis, ĉar la princo de Modruŝ estis animo kiel vitro, kaj senkompara heroo. Jes, tiam ankaŭ mi estis flugila draketo, kaj kie ajn flugetis la standardo de l' banuso, tie dufoje la turko ne aperigis al mi sian kapon. Frano pelis la turkojn el la lando, kiel ĉefanĝelo la diablojn el la ĉielo, kaj oni lin vane ne epitetis „kroata ŝildo". Kaj al kelkaj kaj kelkaj li ne plaĉis. Ĉu vi opinias, ke lia morto estas pura afero? Ĉar lia kapo pro malgranda ulcero malantaŭ la orelo ŝveliĝis, kaj li heroo mizere finis en Zagreb, en lito! Oni diras, ke la kuracisto estas kulpa al tio! Dio sciu. Kiu do envere nun banusas? Draŝkoviĉ? Ne. La ĉefduko Karlo kaj germanaj generaloj. Kaj pro kio Karlo, dum la banuso estas nia laŭleĝa militestro? Pro kio ĉiuj tiuj Pappendorfoj, Hallekoj kaj Teuffenbachoj kiam la kroataj sinjoroj scias gvidi siajn trupojn mem? Por ke ili kaj ilia armeo el Stirio estu al ni je helpo? Dankon al ili. Post la muregoj, sub la kiraso, sub fera poto jen herooj, ke la tero tute tremas de tiuj ranuloj kaj danduloj, sed se aperetas post la arbetaĵo turbano, tiam Dio helpu! La turko vidas nur la dorsojn de tiuj muskeduloj kaj arkebusistoj, dume vi kroatoj pereu la kapojn, dum la kirasuloj satiĝos brulante viajn vilaĝojn, kaj manĝante vian brutaron, dum pecon post peco de nia banuslando ne metos sub sian komandon. Sed jen mi ekbabiliĝis. Unuvorte mi enuiĝis, ekkoleriĝis, kaj forklinis min de la mondo restinte en mia monta kaŝejo; mi ne volas danci en tiu rondo."

„Vi do estu nia!", gaje interrompis lin la kanoniko, kiu ĝis nun spione atentegis ĉiun vorton de l' medvedgrada estro.

„Via? Kies? Antaŭ mi nur vin mi vidas!", ekdemandis Stjepko, levinte la kapon kaj mire rigardante, la kanonikon.

„Jes, nia"; rediris rezolucie Vramec, ekstariĝinte sur la piedojn. „Estas multe da kroataj kaj slavonaj sinjoroj, laikoj kaj pastroj, konjektantaj

same kiel vi, kiuj la kalumnion de l' korteganoj kontraŭ vi ne konsideras peko. Bienojn kaj potencon oni forprenas el la manoj de kroataj s t a t u s e t o r d i n e s,[1] fremdaj generaloj estas repuŝontaj la magnatojn, vilaĝanigontaj nian regnon, dum aliloke la turka torento ne lasas nin despiri. La afero brulas. Lasu senlaborecon. Estu nia!"

„Ne tentu min, honorinda patro! Mi estas hejme defendonta la miaĵon, do ĉiu agu same kiel mi", decide rediris Gregorianec.

„Mi kredis vin pli saĝa. Atendu, ĝis kiam la flamo atingu la domon najbaran, kaj tiam estingu la vian! Ĉu por utilo kaj gloro de via gento vi agas? Bela agado de malagado. Bela gloro, dum via sabro rustiĝas. Ankaŭ muta besto eniĝas en sian kavon pensante: „Mi gardas la domon!" Se la ŝipo eknaĝis malĝustan fluon, la timono estas turnota, sed por tio oni bezonas fortan volon, kaj de forta volo estas vi.. Ke ni provu inklinigi la imperiestran moŝton, ke li forigu la stirian komandon, por ke ne aperu la alia Kacianer! Ke ni provu gvidi solaj la armeon, kaj la armeestro ke fariĝu vi al ni!"

„Lasu min!", rediris hezite Gregorianec.

„Ankoraŭ ion. La zagrebanoj levis kontraŭ vi proceson por uzurpi de vi Medvedgradon kaj Kraljevbrodon. Baldaŭ aperos la sentenco. Oni diras, ke la juĝistoj de reĝa tabulo folias molnovajn zagrebajn dokumentojn. Dio sciu, se la zagrebanoj ne posedas t i t u l u m j u r i s?

„Neniam!", ekkriis Gregorianec saltinte sur la piedoj; „mia rajto estas klara kiel la suno sur la ĉielo."

„La juĝistoj scias, kio estas prava. Kaj ni havas sufiĉe da amikoj niaj ĉe la reĝa tabulo. Estu nia!" stimulis Vramec prezentinte sian dekstran al Stjepko.

„Via mi estas!", rediris post minuto Gregorianec prenante la manon de l' maljunulo.

„Amen", aldonis la kanoniko.

[1] Klasoj kaj ordenoj. N. d. t.

Dume jam noktiĝis. Baldaŭ estingis eĉ la lasta lumo en Medvedgrad. La kanoniko soñĝis gajajn soñĝojn en sia kuŝejo. Dum Stjepko staris longe ĉe la kastela fenestro, fiksante la malluman noktan ĉielon por elatendi sian stelon feliĉigan . . .

III.

Post la renkontiĝo sur Medvedgrad eĉ unu jaro ne estis ankoraŭ pasinta. Georga tago aperis hela. Kampoj sin vestis per abunda herbaĵo, dum arboj kaj plektobariloj blankiĝis plenflore. Tie kaj tie ĉi flugetis tra la ĉielo ruĝetaj nuboj, kiel strangaj birdoj el nekonataj landoj; hirundo sidanta sur tegmento turnadis la kapeton salutante per pepado sian patrujon de l' pasinta jaro. Sava trankvile laŭruliĝis sian kuŝujon, tuŝante de tempo al tempo densan salikaron sur sableca malprofundaĵo, aŭ plaŭdante fundamenton de mizeraj fiŝistaj kajutoj. Nek ponto nek strato estis tiam apud Sava. Vojaĝante de Sisak al Zagreb oni bezonis transiri la akvon per „Kraljev-brod" (reĝa ŝipo) staranta proksime de urba vilaĝo Trnje. Tiu pramo apartenis al Gregorianecoj; pli malproksime troviĝis ankaŭ pli malgranda transportilo, nomita „Grguriĉev-brod" sed oni preferis ĉiam la grandan, ĉar Sava estas trompanta akvo jam de longe. Georgatage matene algalopis al Kraljevbrod griza ĉevalo portanta sur si junan heroon. Tiel ĉevalo kiel rajdisto estas lacaj pro vojaĝo. La ĉevalo mallevinte la kapon inercie metis unu piedon antaŭ la alian, kvankam ne ŝajnis ciganĉevalaĉo, dum meditanta rajdisto lasis ke la ĉevalo lin portu propravole, kvankam li posedis akrajn kaj grandajn ŝpronojn.

La junulo apenaŭ estis dudekjara. La vizaĝo paleta, nobla, la haroj longaj, nigretaj; la lipharetoj malgrandaj, la frunto alta kun bluetaj okuloj sub malhelaj palpebroj briletantaj kiel du vivaj steloj se ilin ia ĉagreno ne malheligadis. La junulo estis bela, vidinda, pli bela ankoraŭ pro nezorgo kaj

ĉagreno. Sian blankan mustelĉapon altiris al la orelo kaj malantaŭ la ĉapo flugetis agla plumo. Bluetdrapan jakon laĉis arĝentaj butonegoj, kaj griotkolora pantalono ĉirkaŭumis la fortajn tibiojn. Malsupren de lia larĝa dorso pendis peza, nigra mantelo, ligita ĉe la gorĝo per orkrampo. Ĉe lia flanko balanciĝis kurba sabro kaj en la zono el venecia flavsilko kuŝis pistolo, arĝente ladita. Tia estis la junulo.

Algalopinte ĝis la ŝipo li haltis, rektiĝis sur la selo, kaj ekkriis sonore: „Ho pramistoj depuŝu!“

Tuj saltis du viroj el la kajuto sur alia bordo kaj rapidis en la ŝipon. Oni eĉ ne havus tempon trapreĝi dufoje la „Patron nian“, kiam jam ŝipo enpuŝis sin en sablon antaŭ la junulo.

„Dio helpu!, viroj“, alkriis ilin la junulo kaj galope fulmobate saltis sur sia grizulo en la ŝipon.

„Dio helpu! Ĉu estas via moŝto?“, resalutis pli juna ŝipisto ekreminte. Kelkaj minutoj pasis en silento kaj la junulo troviĝis sur zagreba Savbordo. Tie li iom haltis, karesante kolharojn de l' grizulo, kaj fine li diris al la ŝipistoj kliniĝantaj profunde kaj — mire — eĉ unu denaron ne postulantaj por la transveturo:

„Kaj kiel vi fartas, viroj?“

„Ni dankas la pridemandon, via moŝto!“, rediris la pli juna, fortikegulo. „Oni vivas“.

„Kaj kiel vi, maljunulo Mijo?“ turnis sin la junulo, al maljuna, sendenta idioto kun grizaj haroj kaj grizaj okuloj. „Kiel via reto?“

„He, he!“, rediris la maljunulaĉo malsaĝe ridante, siluron nek por festotago, gobion apenaŭ por fastotago.

„Sava estis ĝis nun — kun via permeso, juna sinjoro — malklara kaj granda. En Karniolio certe pluvegis kaj fiŝoj forestas.“

„Kiel estas sur la kastelo? Kion agas sinjoro patro kaj kion sinjorino patrino?“

„Estas neniu en la kastelo. La maljuna sinjoro jam de dimanĉo iris trans la montaron al edziĝfesto, kaj ŝia sinjorina moŝto sidas ankoraŭ en Karniolio“ rediris la pli juna remisto.

En ĉi tiu momento eksonegis tra l' aero malrapide tondranta sonorilego. Granda sonorilo de sankta Stefano resonadis.

Ĉiuj tri turnis la kapojn kontraŭ Zagreb.

„Kio ĝi estas?“, miregite ekdemandis la junulo. „Ĉu hodiaŭ estas ia festotago?“

„Ia stranga festo!“, aldonis la malsaĝeta maljunulo. Pri ĝi parolis min Jana Pokopĉeva el Trnje, kaj al ŝia kuzo bienzorganto de sinjoro preposto. Ian turkan pastron oni bruligas sur la kapitolo. Nur min mirigas ke por lia animo oni sonoras per sonorilego — se li ne estis eble turka kanoniko!“, aldonis la maljunulo.

„Estos tiel! Adiaŭ viroj!“, ekridis la junulo. ŝpronpikis la grizulon kaj forajdis kotraŭ Zagreb pli frue ol la remistoj povis lin resaluti.

La pli juna el ili reiris domon, dum la pli maljuna longete rigardaĉis post la junulo, sed fine iris ankaŭ li balanciĝante al la dometo, ĉiam meditante pri turka kanoniko.

La junulo fulme preterflugis preter la ĝardenoj en Petrinjska-strato, alflugis al „Harmica“, kaj de tie tra kapitolpordo sur kapitolan placon. Sed tie estis io vidinda. Tie estis da homoj kiel da fazeolo, de l' episkopaj turoj ĝis la kapucenoj. Tie svarmis kiel formikoj junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj, sinjoroj kaj servutuloj, ĉevale kaj piede, pli kaj pli kriantaj, gestantaj, klaĉantaj kaj sin puŝantaj. Tie sur ĉevalo balancis sin kripla kaj ĝiba krombanuso, Gaŝo Alapiĉ kaj apud li vicbanuso Ivan Forĉiĉ, protonotaro Mirko Peteo kaj multaj kroataj kaj slavonaj sinjoroj ĉiuj ĉevale, ĉiuj kun kalpako[1] kaj inter ili kiel blanka korvo estis sub larĝa ĉapelo kun nigroflava plumo germana generalo Heribet Auersperg, s c i v o l e m e turnante siajn okulojn al ferpordego de la maldekstra turo de l' episkopejo. Ankaŭ estis venintaj la urbaj sinjoroj; precipe distingis sin inter la urbanoj de l' nobela urbo Ivan Blaĵekoviĉ, dika homego, laŭ metio forĝisto kaj laŭ

[1] Kalpako, festa nobelula kaj militista kapkovrilo. N. d. t.

honoro urba juĝisto. La aliaj piege aŭskultis liajn gravegajn vortojn, akompanatajn de nekutimaj gestoj, ĉiam montrante la domon, staranta apud episkopejo, kie staris iam paroĥa preĝejo de sa Mirko, kaj nun „episkopa teologejo".

Pli malproksime de l' episkopejo sub tilio ĉe la kapitola konsilejo amuziĝis aro da homoj tre vigle.

„Jes! mi diras al vi, tiel estas", ekparolis hometo staranta sur malplena barelo. „Kredu al mi! Pri tiuj aferoj mi estas tute informita, tiom pli ĉar razis mi ne nur vin zagrebajn butikistojn. Mi estas instruita homo, kaj mi servis sub la standardo de l' banuso Petro Bakaĉ. Jen, rigardu la cikatron! Ĉe Ivaniĉ-grad —"

„Ni jam aŭdis ĝin, jam aŭdis!", interrompis lin dika Blaĵ Ŝtakor, la estro de la ĉarpentista korporacio.

„Parolu nur, parolu, amiko Grga", aldonis maldika bakistino Tihodiĉ el Popovska-strato; la tutan tagon mi vin aŭskultus malsatante kaj soifante."

„Ergo"[1] daŭrigis Grga Ĉokolin, tiu hereza antikristo, loĝinta en tiu domo, metis sanktan Evangelion sub la piedojn, razigis sian pekan kapon — ĉar la herezuloj razas siajn kapojn, mi ĝin scias, — kaj fariĝis turko."

„Gardu nin Dio de ĉiuj malbonoj!", ekspiris dika ruĝnaza bucistino Barinkinka, se mia Mato ekdezirus razi la kapon, mi elpikus liajn okulojn!"

„Vidu, vidu!", aldonis flegme balancante la kapon la straba tamburisto Ĝurĉjo Garuc aŭ „episkopa bastono."

„Oni diras", rediris Ĉokolin, „ke Franjo Filipoviĉ estas —"

Post tiu nomo krucosignis sin ĉiuj maljunulinoj.

„Ke Franjo Filipoviĉ", rekomencis la razisto, „kiel kanoniko kaj kapitano estis kaptonta per kapitola armeo la turkojn ĉe Ivaniĉ."

„Ni jam aŭdis ĝin, jam aŭdis", enfalis Ŝtakor.

[1] Do.

„Vidu, vidu!", oscedis la tamburisto.

„Kapti la turkojn kiel musojn en kaptilo. Sed jes! Malfacila laboro! Ili ne iris al lian lardon sed li al la ilian. La kapitolan armeon ili kolbase hakis, kaj ŝatindan „reverendissimus" prenis sur ĉevalon kaj rekte al turka caro. La caro donis al li cent kvintojn da pura oro, ducent ĉenojn da tero, belan domon kaj postdomteron kaj tricent virinojn, ĉar al turko unu ne sufiĉas.

„Kaj al ni estas eĉ unu troa", aldonis flegme Ŝtakor.

„Helpu nin sankta sinjorino de Remete!", krucosignis sin maldika Tihodiĉeva.

„Se mia maljunulo havus tian turkan apetiton, mi lin prudentigus per kulerego", almetis la dika bucistino.

„Vidu, vidu", balancis la kapon la tamburisto. „Kaj li neis Dion kaj ĉiujn sanktulojn fariĝinte turko", diris Ĉokolin. Kaj hodiaŭ oni lin juĝos, ĉar, por ke vi sciu, tiu herezulo estas eĉ oficiro kaj ĉe Sisak kaj Krijevci palisumis li centon da niaj. Hodiaŭ oni lin juĝos — tiun friponon. Nur se oni lin havus! Sed tiu diablo ne estas kaptebla. Se ili min estus sendintaj ĝis Sisak", — subite tie haltis babilema lango de la razisto. Lia okulo trafis palan junulon, trankvile sidantan sur griza ĉevalo.

„Vidu, vidu!", daŭrigis razisto, „kia miro! Ankaŭ sinjorido Pavlo Gregorianec alrajdis ĉi tien sur griza ĉevalo, por amuziĝi per tiu komedio. Kian diablon li fikse rigardas? Aj, aj! Ĉu vi vidas, Doran Krupiĉ. Ankaŭ tiu dandino venis kune kun maljuna sorĉistino Magda. Kiel tiu knabino pufigiĝis, sed tempo pasas, kaj ŝi estos eĉ por unu denaro ricevebla! Jes, ŝi estos —"

„Fakte, ho amiko Grga, ĉu vi volas min kiel ĉefsvatanton?", ekdemandis ride Ŝtakor.

La razisteto kankre ruĝiĝis kaj preparis sin por forte repagi al la forĝisto, sed bedaŭrinde li restis sola sur la barelo, ĉar la popolaĉo ekiris aliflanken.

Pezaj paŝoj ekbruis de la kapitola pordo. Trupo de fortaj junuloj kun feraj kapkovriloj, nigre-flavaj

manikoj, havantaj sur siaj ŝultroj pezajn ferajn pafilojn alproksimiĝadis al la domo de Filipoviĉ. Ĝi estis trupo de imperiestraj germanaj muskeduloj sub komando de kapitano Blaĵ Pernhart.

Veninte la trupo ĝis la domo plilarĝigis la popolamason kaj spaco antaŭ la domo restis senhoma. Sed en unu minuto meze de tiu malplenaĵo oni eklevigis lignaron kaj malproksimete de ĝi lignan predikseĝon.

Trian fojon eksonoris la sonorilego de sª Stefano per malsonora malgaja tono. La popolamaso eksilentegis. Samtempe malfermiĝis la fera pordo de l' episkopa turo, kaj tra ĝi ektorentis stranga procesio. Antaŭ kvar kapitolaj trumpetistoj en bluetaj dolmanoj, post ili blankaj remetaj monaĥoj de sª Pavlo, Franciskanoj kaj Dominikanoj, poste honorindaj zagrebaj kapitolanoj kaj tiuj de Ĉazma, portantaj antaŭ si krucifikson envualita en nigra vualo kaj tenantaj rompitajn vakskandelojn. Kaj fine en nigra sutano kun blankarĝenta mitro eliris kun longa nigra barbo, malgrandeta staturo, la princo Ĝuro Draŝkoviĉ, zagreba episkopo kaj kroata banuso. — La procesanoj moviĝis, mallevinte la kapojn, malrapidpaŝe ĉirkaŭ la kapitola placo, kantante sonorege: „M i s e r e r e!"

Fine la procesio haltis antaŭ la domo de la kanoniko-perfidulo. Trifoje la trumpetoj eksonis. Tiam supreniris la predikseĝon honorinda sinjoro Blaĵ Ŝiprak, kanoniko de zagreba ĉefpreĝejo, kaj dum silentego eklegis grandan leteron jene:

„Ni Ĝuro Draŝkoviĉ princo de Trakoŝĉan laŭ favoro de Dio kaj apostola seĝo kiel episkopo de ĝura kaj zagreba preĝejoj, ĉambelano de Lia reĝa kaj imperiestra Moŝto Maksimiliano II., roma, imperiestro kaj reĝo hungara, bohema k. t. p. ankaŭ kiel banuso de reĝolandoj: Dalmatujo, Kroatujo kaj Slavonujo — salutas kaj benas ĉiujn fidelajn, kies tiu nia letero indas kaj antaŭ kies vizaĝoj tiu ĉi malfermita nia letero aperas. La plej unua nia paŝtista zorgo estas defendi de eterna malbono la animojn, fidelajn al nia sª katolika religio, por forigi favajn

ŝafojn el pura ŝafaro por taŭzi la kardon inter fruktodona tritiko. Kaj tial nian patran koron profunde malĝojigis la sciiĝo, ke Franjo Filipoviĉ, ekskanoniko zagreba kaj batalanto pro sankta eklezio ne plaĉas al Dio sed al la diablo. Li estinte kaptita ĉe Ivaniĉgrad de malfidelaj turkoj, ĵetinte sub siajn piedojn la leĝon homan kaj de Dio, neinte la Triunuan Dion kaj Liajn sakramentojn, perfidis sanktan Eklezion, kiu lin ordenigis, kaj patrolandon, kiu lin naskis; li defalis de sankta nia kredo kaj subigis sin sub jugo de eterna kondamno, preninte la turkan nekredon kaj igante al si idolan nomon: Meĥmed, li kondukas per krimmano la herezajn bandojn en ĉi tiujn reĝolandojn, kaj kun infera maliceco ruinigas sian genton kaj sian patrujon. Sekvante ni tial la eternan justecon, kiu bonulon rekompencas kaj malbonulon punas, sekvante ni sanktajn „kanonojn", ni la diritan Franjo Filipoviĉ laŭ nia apostola povo forpelas for de la sankta Eklezio, for de komunumo de ĉi tiuj reĝolandoj, ni demetas de li la sanktan ordenigon; anatemo al li kaj al lia gento; anatemo al lia nutranto kaj defendanto; anatemo al lia nomo kaj idaro, lin nutru mizero kaj malsato, akompanu lin malĝojo kaj pesto; akvo lin dronigu, tero lin manĝegu, tombo elĵetu liajn ostojn, kaj vento disportu lian cindron. Kaj kiel kondamniga animo brulegas en la infero kune kun Juda Iŝkarioto tiel la ekzekutisto forbrulu kaj pereigu liajn bienon kaj domojn; kiel lia malfidela animo defalis de Eternula vinberejo, tiel pereigu justa kolero ĉiujn liajn vinberejojn kampojn kaj herbejojn. Estu malbenita por ĉiam!"

Teruro trakuris la popolamason. Teruriga kanto „Miserere" reresonis, kaj de supro de la sankt-Stefano preĝejo ekĝemis malgranda sonorilo, kiel malesperaj ĝemadoj de malbenita animo.

Sur podion ekstaris la episkopo por beni la popolon. Momente ĉiuj ekgenuiĝis.

Kaj la trompetoj ree ekludis. Kaj jen el la amaso eliris la zagreba ekzekutisto kun kvar helpantoj. Ili ekbruligis la lignaron.

Dora tremante rigardis tiun teruran scenon, dum Magda staranta apude murmuretis litanion, ŝirmante la okulojn. Sed Pavlo Gregorianec, klininte sin sur la kolon de sia grizulo, vidis nek episkopon, nek ekzekutiston, aŭdis nek sonorilojn nek funebran psalmon. Tuta lia animo kuniĝis en liaj okuloj, ridagardantaj fikse Doran de l' oraĵisto.

Nun la ekzekutisto hakile disrompis la pordon de la domo de Filipoviĉ, kaj ekrapidis en la domon, dum liaj helpantoj komencis ŝmiri la domon per nigra kalko. La amaso timeme atendis la okazontaĵon.

Oni malfermis fenestron sur la unua etaĵo. Jen la ekzekutisto montranta la bildon de l' perdifulo al la amaso.

„Jen estas Juda Iŝkarioto!", ekkriaĉis la ekzekutisto, traborante per tranĉilo sur la bildo la koron de Filipoviĉ.

„Disŝiru ĝin, forbrulu perfidulon", ekkriegis furioza popolaĉo levante la manojn, kvazaŭ ekkaptonte la malbenitan bildon.

La ekzekutisto suprenlevis la bildon kaj ĵetis ĝin sur la lignaron, flagranta sub la fenestro, ke mil fajreroj ekfajretis aeren.

„Malbenita estu la perfidulo!", freneze ekkriegis la popolamaso. Kontraŭ la domo de Filipoviĉ rapidegis la popolaĉo kiel torento, insultante, blasfemante, kriegante, kiel kiam hienoj eksaltas al la kaptaĵo. Vane repuŝadis imperiestraj muskeduloj per siaj pezaj pafiloj la furiozan atakon. Post momento ili estis atake repuŝitaj; la popolaĉo forgargaris ilin kiel rapidfluo velkitan branĉon.

La popolaĉo penetris en la domon, renversis, dispremis kaj ruinigis ĉion ĝis plej etaj pecetoj kion ĝiaj pugnoj tuŝis. Ĝi frakasis fenestrojn kaj pordojn, kaj furioze rikanante kaj ĉevale blekante ĵetis sur la lignaron tra la fenestro ĉian eksposedaĵon de Filipoviĉ.

En la placo ĉirkaŭ la lignaro regis kriado kaj bruado. Freneze ebriigita popolaĉo saltis puŝante sin kaj kriante. Ankaŭ ĉifonvestita mutulo J e r k o

sin turnadis unupiede kiel frenezulo, tordante sur la bastono kanonikan ĉapon.

Ĉio svarmis, bolis — kvazaŭ ekaperis la lasta tago.

Aŭdu! Io protime ekkriis. La hom-amaso densiĝis. „Flanken! Ni pereos!" De la lignaro supren eksaltegis brulanta peco kaj falis sur ĉevalon de Alapiĉ. Alapiĉ falis teren. La ĉevalo leviĝis galope, brulas ĝiaj kolharoj. Ĝ i a n a g o n s e k v i s aliaj ĉevaloj spite al la bridoj. La popolo sin dislarĝigas. Maldensejo aperis sur la placo. En ĝi kuregas aro da inferaj ĉevaloj, kaj antaŭ ili nigra ĉevalo kun ekflamantaj kolharoj. Antaŭ la aro kuras juna kaj bela knabino. Ŝi falis teren. Nun antigos ŝin la infera kurĉaso, nun ŝin piedpremegos.

„Ve" oni sonis tra la popolo; „la mizerulino jen pereos!"

Sed kiel fulmo algalopis de unu flanko juna heroo sur griza ĉevalo, kliniĝis al la knabino, ekkaptis ŝin je la zono kaj levinte ŝin sur la selon, forgalopis kontraŭ la kapitola pordo.

„Vivu, ho heroo!" aklamis post li la popolaĉo, sed li malaperis. La kurĉaso kvietiĝis, procesio disiris, kaj la popolo ekiris siajn domojn. Voje oni parolis, ke la ĉelavoj dispremegis ian mutulon, helponta al la knabino. Oni diris, ke li restis tuje morta.

Sur la kapitola placo la lignaro finbrulis, dum la domo de Filipoviĉ, senhoma, ŝmirita nigraĵe, faŭkumis kiel stranga monstro — terura avertaĵo al ĉiuj perfiduloj de l' kredo kaj de l' sia gento; kaj nigran memoraĵon de perfideco kaj de justa venĝo ankaŭ hodiaŭ rememorigas la vorteto: „nigra lernejo".

Pavlo venis kun sia savitino ĝis la fonto Manduŝevec sur „Harmica".[1] Li haltigis la ĉevalon, ne sciante, kien li estas rajdonta kun la knabino. Nek pri ŝia domo nek nomo li sciis. Senkonscie, pala

[1] Harmica (forum tricesimale), tridekonplaco, nuna Jelačić-trg. Manduŝevec la plej malnova puto de Zagreb staranta sur supra parto de ĉi tiu placo. N. d. t.

kuŝis la junulino en liaj brakoj. Apenaŭ ŝi spiris, nur la spasma tremado de la palpebroj certigis, ke ankoraŭ estas da vivo en la knabino.

„Je mia paradizo, ŝi estas bela — viva tipo de dormanta anĝelo“, murmuretis la junulo observante la mizeran belulinon. „Sed kies ŝi estas, kaj de kies domo?“

Tiumomente preteriris kelko da burĝoj, babilantaj pri la hodiaŭa juĝo.

„He estimata majstro!“, alvokis Pavlo unu el ili, ĉu vi povus min klarigi, kies estas ĉi tiu malfeliĉa junulino?“

„Kiel ne! Ŝi estas Dora Krupiĉeva, via sinjora moŝto!“, rediris la burĝo.

„Filino de maljuna orafisto apud Kamenita-vrata, via moŝto!“, aldonis la dua.

La estimataj majstroj jam intencis laŭdi la junan nekonatan heroon, sed ĝin malhelpis Pavlo per mallonga: „Dankas kaj adiaŭ!“ Kaj forgalopis kun sia bela ŝarĝo kontraŭ Kamenita-vrata. En Kamenita-strato post la pordego flugpendis antaŭ malalta brika domo meze de la ĝardeno granda bronca ringo. Pavlo haltis.

„Oj, kie estas majstro Krupiĉ?“, ekvokas la junulo. En pordo aperis subite maljunulo. Li paliĝis. Martelo falis el lia mano.

„Je nomo de Dio! Dornjo! Kio estas!“, time ekkriis la maljunulo.

„Trankviliĝu, majstro! Mi alportis vian filinon! Malbono povis okazi, sed, dank' al Dio, estas bone. Ŝi senkonsciiĝis. Frotu ŝiajn tempiojn per vinagro.“

Post tiuj ĉi vortoj Pavlo mallevis delikate filinon en la brakojn de la patro. La junulino ekĝemis, malfermis la okulojn, ŝia rigardo trafis Pavlon; kaj ree fermis la okulojn.

„Sed moŝ“ — kun miro komencis la maljunulo, tenante la filinon.

„Adiaŭ, majstro!“, adiaŭis lin la junulo kaj forrajdis senpostsigne.

Li eliris tra Nova vrata kaj direktis sin al la montaro. Ĉe la mueliloj kie la vojo kurbiĝas al sa

Miĥaelo,[1] li renkontis sur arbarvojeto kvar homojn. Ili portis sur branĉoj duonmortan vunditon.

„Kien, ho viroj?“

„Remete'n!“ rediris unu, „ni portas mutulon Jerko. Hodiaŭ matene li volis savi la junulinon el sub la ĉevalo.“

„Kaj li malsaĝulo metis sin mem sub la hufon,“ aldonis la dua „kiu lin senkompate frapis, apenaŭ supozeble ke li resaniĝos! ĉar lia kapo estas tute en sango. Ke li ne enmiksiĝus.“

„Portu lin nur kiel eble plej rapide Remeten,“ almetis Pavlo, „kaj salutu de mi, Pavlo Gregorianec, plej bele sinjoron abaton. Por ke ili flegu Jerkon, laŭ ilia plej bona opinio. Ilia zorgo, mia ŝuldo!“

Kaj rapide sin direktis al la montaro. Li mallevis la kapon. Li meditis kaj meditis, sed ĉiu lia penso estis — Dora.

Estis nokto post la Georga tago. En malgrandeta ĉambreto kuŝis Dora kviete kaj trankvile. Kelkfoje ŝi movis la kapon. Kelkfoje ŝi eltiris la manojn. Apud ŝi kaŭris Magda kun postlarmaj okuloj, fiksante malgrandan lucernon kaj preĝante. De momento al momento ŝi turnis sin al Dora kaj karesis ŝiajn malligitajn harojn. Kaj la maljunulino ekripoĉis sin mem.

„Kie do estis mia malsaĝa kapo? Se mi aŭskultus la baptanon por ne konduki Doran inter tiom da popolo. Ve, kiam ŝin la premego malkunigis de mi, — mian karulinon, kiam ŝi falis antaŭ la ĉevalon“, la maljunulino fermis la okulojn — „kvazaŭ mia koro kuŝis sub la hufo! Ne, mi ne resuferus plu tian timon eĉ por banusejo. Sed dank' al Dio, ke estas tiel, ke Dipatrino sendis sian anĝelon, ĉar mortulo li ne estis. Ke nur Dora resaniĝu! Al la remeta Dipatrino mi ŝin solene promesis. Ke nur ŝi resaniĝu, tiam ni kune iros ĝin plenumi.“

„Baptopanjo! Kara baptopanjo!“, ekparolis mallaŭte Dora.

[1] Sankta Mihael estas vilaĝo Graĉani en Zagreba montaro (Sljeme). N. d. t.

„Kion vi deziras, animo?“

„Akvon, baptopanjo!“

„Kiel do vi fartas, animo?“, ekdemandis la maljunulino alproksimiginte la glason al la lipoj de Dora.

„Mi mem ne scias, kiel, baptopanjo! Mi fartas bone kaj malbone! Io min ekposedis. Io kuntiras mian gorĝon, kaj se mi ion ajn tuŝas, mia sango malcirkulas. Mia kapo brulas — jen ekpalpu — ĝi brulas kiel viva fajro dum la koro volas salti el la brusto. Sed kiam mi la okulojn fermas, ho kara baptopatrino, al mi estas agrablege kaj dolĉege, kvazaŭ mi estas lulata de anĝeloj Diaj; kviete cirkulas tra la vejnoj varma sango — kviete, la koro frapas malrapide, malrapidete, kaj al mi dormetanta ridetas la vizaĝo —“

Forte ekĝemis pala junulino, forte ĉirkaŭprenis la kolon de Magda kaj torenton da larmoj verŝis sur la bruston de l' maljunulino.

„Dio min helpu, baptopanjo. Mi freneziĝos.“

La maljunulino mutiĝis. Grandajn larmojn ŝi verŝis malsupren de l' vizaĝo. Ŝi ekkaresis Doran per tremanta mano, kisis ŝin sur la frunto.

„Trankviliĝu, infano, ĝi estas febro“. Jes, febro, kiun eksentas ĉiu el ni dum nia vivo — nur unufoje — la amo.

IV.

Malnova reĝ-urbo Zagreb, aŭ kiel ĝin nomis la burĝoj mem: „Libera, nobela zagreba urbo sur Griĉ-monteto“, — havis en deksesa jarcento tute alian aspekton ol en sekvintaj jarcentoj. Zagreb estis fortikaĵo, en Zagreb eĉ — kiel ĝi sin hodiaŭ prezentas — ekzistis multe da fortikaĵoj. La tuta teritorio kuŝanta inter la riveretoj Ĉernomerec kaj Medvednica apartenis al la reĝa urbo, kaj meze de tiu fruktoporta kaj larĝa teritorio grimpis la antaŭposteno de zagreba montaro, monteto nomata Griĉ. Sur ĉi tiu monteto staris, zonita per fortaj muregoj, — malnova Zagreb aŭ „supra urbo“, ĝusta loĝejo de l'

Griĉ-burĝoj. Sub Griĉ t. e. en posta malsupra urbo domoj tute eĉ ne ekzistis — sed nur kampo, ĝardenoj kaj vergaro. Nur ĉirkaŭ paroĥa preĝejo de s[a] Margareto[1] estis la kolonio Ilica[2] vilaĝeto de kelko da mizeraj lignaj domoj. Eĉ la posta placo Tridekona aŭ „Harmica“, kie oni kutimis forbruligi sorĉistinojn, estis nura marĉherbejo, nur ĉe la fonto Manduŝevec oni blankiĝis kelko da brikdomoj, konataj tiamtempe sub nomo: „Njemŝka ves“.[3]

La urbo mem estis triangule konstruita. Ĝia suda murego t. e. kontraŭ Ilica, sin etendis de la orienta montaturo laŭ malnova reĝa kortego aŭ posta jezuita lernejo, kaj laŭ la dominika monaĥejo ĝis la okcidenta parto, kie ree grimpis turo; de tie ĉi malleviĝis la murego malsupren ĝis Mesniĉka-strato, kie staris Mesniĉka-vrata, ŝirmata de forta pafilejo kaj de du feraj kanonoj. En la mezo de l' suda murego elstaris gardturo, kaj en ĝi malbasa sonorilo „Habernik“, kiu sciigis al la urbaj pordistoj, kiam estas la pordoj malfermotaj kaj kiam fermotaj, aŭ ĝi en danĝera momento alarmis la zagrebajn burĝojn. Apud la turo oni venadis sur la muregon el la urbo tra la pordeto, nomata „Dverce“, kiun du rondturoj apudiĝis. Tie estis la urba pafilarejo t. e. tie la burĝoj deponadis „grandajn ezokojn, pafilegojn, ferajn pafilojn kun lipharoj“ kaj arkebusojn.

Tuta la monteto sub la suda murego estis surŝutita per vinberbranĉoj, nur de „Dverce“ malleviĝis abrupta vojeto al la fundo de l' monteto. De Mesniĉka-vrata leviĝis murego ĝis la fortikaĵeto aŭ defendejo de s[a] Blaĵ, kaj de tie laŭlonge de alta strato tute ĝis „Nova“ poste „Opatiĉka-vrata“. Ankaŭ tiuflanke estis la urbo ŝirmita per alta turo kaj per ligna defendejo, nomita „Arĉel“. Tie estis la urba „praharnica“ t. e. pulvejo. De tie sin etendis

---

[1] Sa Margareto nuna serba preĝejo.

[2] En malnovaj dokumentoj havas ĝi jenan nomon: „colonia Ilicza in suburbio civitatis.“ Nun estas Ilica la plej vizitata, ĉefa strato, tiel nomata Korso. N. d. t.

[3] Germana parto de l' urbo.

la murego laŭ, „Biskupska“ posta „Opatiĉka vrata“ tute ĝis la turo apud „Kamenita-vrata“ kaj de tie ĝis jezuita turo. La tuta monteto de la okcidenta murego ĝis Medvednica estis dezerta, kovrita per vergaro, sole la malbona vojo serpentumis de Harmica al „Kamenita vrata“ kiun pranepoj de malnovaj Griĉ-anoj nomigis „Duga ulica“.[1] Sed eĉ tiu rondeto ne estis plenplena da domoj, ĉar la burĝoj havis tie ankaŭ siajn ĝardenojn. El la ligna dometaro elstaris nur tie kaj tie ĉi ĉu preĝejo ĉu ŝtonkonstruaĵo, ĉar eĉ eta brikdomo ĉe burĝo, estis videbla signo de riĉeco. Sed kiel ne, kiam la urba paroĥestro loĝis mem en ligna domo. Tia estis la malnova reĝurbo. Ĉion ceteran oni ne kalkulis je zagreba kalkulo. Ĉar la loĝantoj de „Opatiĉka strato“ en kapitola fortikaĵo kaj la loĝantaro de „Nova ves“ estis la liberuloj de zagreba kapitolo, havante siajn poprajn estrojn kaj liberojn, kaj al la domanoj de „Laŝka strato“ sub fortika episkopa kastelo juĝis juĝisto en nomo de la episkopo.

La sceptro[2] de la urbjuĝisto atingis nur ĝis „Krvavi most“, ĉar se iu fripono sukcesus transsalti la rivereton, devis bluevestitaj urbgardistoj reveni malplenmane, por ne ricevi bluajn dorsojn de kapitolaj liberuloj, kiuj preferis forkurigi friponon, ol lasi tuŝeti sian posedaĵon per la piedoj de l' urbgardistoj, ĉar tio estis ilia „libero“ („pravica“).

Sed inter siaj „muregoj kaj defendejoj“ estis zagrebaj burĝoj tute sendependaj — kaj ilia komunumo kvazaŭ memstara.

La ora bullo de Bela IV.[4] estis Sª Skribo de

[1] Longa strato.

[2] La mezepokaj juĝistoj posedis lignan, metalan laditan sceptron kiel signo de ilia potenco. Ĉe la bohemoj estas ĝi ankaŭ nun nomata „pravo“. La lasta sceptro de Zagreba urba juĝisto el tempo de Leopold II. troviĝas en nacia muzeo en Zagreb.

[3] Sanga ponto.

[4] Ora bullo (bulla aurea) dokumento de la reĝo Bela IV., kiu Zagrebon en j. 1242. altigis kiel libera urbo. En la bullo troviĝas plena statuto pri Zagreba autonomio; ĝi estas konservata en Zagreba urbarĥivo. N. d. t.

ilia urba libereco, krudŝtono de ilia rajto. Dum jarcentoj ili ĝin po centfoje puŝis memfide sub la nazon de fieregaj magnatoj kaj avaraj ekleziuloj.

Propravole elektadis la zagrebano sian juĝiston kaj aliajn estrojn. Vane lin citis kontraŭ sia tablo la komitatestro, vane la banuso. Kies domo staris sur Griĉ-monteto, kies nomo estis registrita en grandan burĝo-libregon per la mano de zagreba notaro, tiu staris nur sub sceptra povo de l' urba juĝisto aŭ sub la justeco de l' reĝa moŝto mem, ĉar la zagrebano estis reĝa subulo. Liaj impostoj estis malgrandaj, ĉar li donis al si la leĝon mem, li mezuris mem sian mezurilon kaj pesilon. Fremda komercisto devis pagi sur zagreba bazaro dikan „subŝtofon“ („postava“) — tiel oni nomis la urbimposton — dum zagrebano tra la tuta reĝolando libere portis sian komercaĵon, li devis montri nur trituran sigelon — kaj jam ĉiuj limpostistoj profunde klinis la kapojn. La zagrebano nekonis alian pastron krom paroĥestron de sª Marko kaj lian kapelanon, kaj al la paroĥestro estis ege malpermesite doni al episkopo „cathedraticum“ tio estas preĝejimposton. Je nenia kosto estis permesite al kapitola pastro en festa vestaĵo transpaŝi la urblimojn ĉar unu fojon la urbanoj preskaŭ eksigis la juĝiston, permesinta kanti al episkopaj teologoj en la preĝejo de sª Marko. La burĝoj „de nobela urbo“, kvankam fieraj kaj prudentaj, ne estis Dio sciu kiaj saĝuloj aŭ dandoj — sed simplaj tajloroj, botistoj, forĝistoj, buĉistoj kaj similaj — ĉiuj sana kaj ĝusta korporacia radiko.

La skribon sciantajn vi povus facile inter ili je fingroj elnombri, ĉar ofte okazis, ke la urba juĝisto mem — estante seruristo aŭ forĝisto — ne povis subskribi eĉ sian honestan nomon. Je feliĉo tiam oni skribis malmulte, kaj se oni devis skribi, la urba notaro estis kompetenta por belige skribi sur foliego protestojn kontraŭ ĉiaeblaj sinjoroj, eĉ kontraŭ la reĝo mem.

Lia reĝa moŝto estis ĝissate aŭskultinta plendojn kaj ĝemadojn de la nobelaj burĝoj, ke ili estaj

malriĉuloj, mizeruloj, ke ili pendas sur lastaj brandĉoj kaj multe da tiaspecaj litanioj. Sed ĝustadire, ili estis nudaĵo nek mizeraĵo, kontraŭe, vera sinjoraĵo. Ĉiuj ĉi ĝemkantoj celis tiun malnovan: „Frapu kaj al vi estos malfermite!“ kaj ju pli multe, des pli bone.

La spaco de l' urba posedaĵo estis granda, frunktohava ĉu vine, ĉu furaĝe, ĉu arbare, kaj krom la urba posedaĵo apartenis al zagreba regado ankaŭ Graĉani, Zapruĝe, Hraŝĉe kaj Petrovina. Sufiĉe da abundaĵo, malmulte da urbanoj, kaj preskaŭ da neniaj elspezoj. Memkompreneble ne ĉiuj urbaj musoj egale mordetis tiun lardegon, ĉar — n o t a b e n e — la urbaj sinjoroj kalkulis, kaj al ni ne citas la urba kroniko, ĉu ia senatano, kun jara salajro da dudek taleroj kaj du paroj da komunumaj botoj, pereis pro malsato aŭ nudpiede tra la urbo iradis. Sed magistratanoj, konstatinde estas, estis akuratuloj. La urba juĝisto akurate registris, kiom li elspezis da bovaĵo, pano kaj vino, kiam li je urba kosto preparis festenon al ia komisiita kanoniko aŭ al alia sinjoro. Tiaj festenoj dum jaro okazadis eĉ troe; feliĉe por komununa kaso kostis tiam tiaspeca festeno ne pli ol 60 denarojn. Same tiel precizege enskribis la juĝisto, kiom kostis nova forno por la loĝejo de sinjoro banuso, aŭ kaprido, kiun la zagrebanoj kutimis donaci al grandaj sinjoroj kiel signo de estimo; ankaŭ estas enskribite ĝis lasta guteto, kiom da mezlitroj ricevis honestaj fratoj dominikanoj el la urba kelo, kondukintaj je Eŭkaristia festo la urban procesion. La plej grandan truon al urba kaso faris la deputatoj, senditaj al kroata aŭ poĵuna (hungara) parlamento. Kiom oni elspezis je tiu kalkulo da komununa nutraĵo, furaĝo kaj vino! Pro pli mallonga kalkulo elektigis la magistratanoj memkompreneble por parlamento sin mem, kaj la zagrebanoj konsolis sin almenaŭ tiome, ke ili ne plenigas poŝojn al fremdulo.[1]

[1] Lau la urbaj kalkuloj el j. 1577. estis mona kompensaĵo de ambau deputatoj: literatoro Jakopoviĉ kaj N. Kaptoloviĉ 30 florenojn (60 Kronojn, 24 Sm) potage; tiutempe granda sumo. N. d. t.

Sed kiel ajn estis, kiel ajn oni plendadis je malbona tempo oni vivis, kaj eĉ bonege vivis en Zagreb. Malgranda tiu kolonio kreskis kaj disvolviĝis en ŝatintan urbon, kaj kiam la banusoj estis konstruintaj siajn blankajn ejojn sur Griĉ-monteto, kiam la kroataj sinjoroj estis translokigintaj sian parlamenton en Zagrebon, la urbo ekagitigis siajn junajn flugilojn, kaj superis rapide ĉiujn kroatajn urbojn glore, fortece kaj florade. Eĉ pli! Dume dum la fremda forto premadis ceterajn kroatajn urbojn kaj vilaĝojn, restis la kapo de l' reĝolando harda kaj tuta, kaj neniam super Zagreb flugpendis ekster la kroata alia standardo.

Sed tiu florado kaj ŝateco naskis al la zagrebanoj malamon kaj ĵaluzon. Perforta bienularo, potenca pastraro rigardis okulangule kun kia forto kreskegas la burĝaro, konjektinte en tiuj hardaj komunumoj la esencon de tiu libera armeo, antaŭ kiu en sekvintaj jarcentoj devis malcedi fieregaj sinjoraj kasteloj. Super ĉio estis al ili abomena Zagreb, la koro de tiuj komunumoj. La malnovaj Gricanoj, silikuloj, ne mallevis rigardon teren antaŭ la sinjoroj — sed direktis ĝin rekte en sinjoran vizaĝon. Tial ankaŭ naskis sennombraj bataloj. Magnatoj mordis kaj pinĉis la burĝojn ĉu mem ĉu per siaj homoj, kie ajn ilin hazardo renkontigis, ili eĉ ĉirkaŭiris ĉirkaŭ reĝa kortego „kolorigante“ la zagrebanojn kiel ĝustan inferidaron.

Episkopo kaj kapitolo, la plej proksimaj najbaroj estis al la urbo la plej malamikemaj sangverŝantoj. Ilian malafablan perforton eĉ libro ne povus priskribi. Oni okazadis, ke la burĝoj kaj episkopo reciproke salutis sin tondrantan „bonan matenon“ el feraj pafilegoj. Oni okazadis, ke zagreba episkopo ordonis apud urba banejo sur la rivereto kapti kaj ĝismorte elbati urban juĝiston kaj notaron. Alie fama episkopo kaj banuso Berislaviĉ tiel inside rabadis zagrebajn komercistojn, ke la reĝo mem skribis al li ke li pli similas rabiston ol episkopon. Honorinda kapitolo kutimis multan fojon malbeni la tutan urbon, kaj ke ĝi dum tri jarcentoj ne orde-

nigos zagrebidon kiel pastro, kaj ofte oni okazis, ke kapitolanoj forrabis al urbaj servutuloj tutan aron da bovoj dum hela tago sur reĝa foiro. Tiel ofte sango malsekigis liberan terspacon inter la urba kaj kapitola murego, ke germanaj arkebusistoj kaj hispanaj dragonoj diable klopodis por disigi furiozantajn najbarojn. Unuvorte — najbare oni vivis, kaj najbare interbatiĝis.

Kaj kiel agis episkopo kaj kapitolo, tiel sekvis ilin ceteraj sinjoroj magnatoj kaj iliaj subuloj. Kastelmastroj de Medvedgrad estis jam de longe famaj kiel malpiaj bonfarantoj kaj diabloj de Zagreburbo, kaj eĉ nun kelkfoje ili atakis urbajn servutulojn kaj junajn virinojn el Graĉani kiel lupo ŝafidaron. Sinjoroj Heningidoj, mastroj de S u s j e d g r a d, priŝtelis ofte ĝisnude zagrebajn komercistojn, vojaĝantaj al foiro en Optuj. Zrinjidoj ŝtopadis en zagreba montaro al zagrebanoj or — kaj arĝentminejojn, kaj forbrulis vinkelojn en Bukovac. Alapiĉidoj, estroj de Vukovina foje apud s[a] Klara inside atendis urbajn sinjorojn, hajdukmaniere, kaj kiam la juĝisto kaj senatanoj venis en boato fiŝkapti, Alapiĉ'oj surŝutis ilin per brulanta peĉo, kaj ĝismorte vundinte la juĝiston, ili forrabis de urbanoj la kaptaĵon kaj boaton kontraŭ ĉia justeco. La bienojn Hraŝĉe kaj Petrovina devis zagrebanoj kontraŭrabadi, de tempo depost Šišman luksenburga ĝis Rudolfo II. habsburga, kontraŭ sia bienularo de reĝolando Slavonio.

Tial estis da procesoj eĉ troe. Sed kia utilo! La ĉielo alte kaj la reĝo malproksime, glavo kaj bastonego tiutempe: leĝo kaj juĝo.

Pro tio do estis kelkfoje eĉ la maljunaj Griĉanoj devigataj pugnigi la manon, elbati kojnon per kojno. Kvankam ili estis simplaj, estis por si sufiĉe saĝaj, kaj klopodis ĉiamaniere por defendi sin kontraŭ malbono. Antaŭ ĉio ili atentegis, ke ilia urbo estu forta kaj fortika, kaj tiam ili rapide utiligis sin per reciprokaj bataloj inter la nobelaro, aliĝante al malamikoj de siaj sangverŝantoj, kaj fine klopodegis ili aligi al si tiujn gravajn lokojn proksime de Zagreb, per kiuj povis ilia fortikaĵo plifortikiĝi. Fortaj ŝtonmuregoj, altaj turoj, profundaj kavoj kaj feraj pafilegoj ĉirkaŭ Zagreb estis ne tiom ŝirmilo kontraŭ turka timo, kiom kontraŭ magnata perforto, ĉar post tiu kaŝejo la urbidoj kelkfoje ekvipis entrudemajn gastojn ĝissange. Sed en deksesa jarcento fortaj frapoj ekskuis Griĉ-fortikaĵon. Per dikaj pafilaĵoj ekskuis zagrebajn muregojn episkopo Ŝ i m e E r d ö d i* kaj Zapoljidoj, ĉar zagrebanoj per ĉefdiakono Petar Kiepaĥ riverencis antaŭ la imperiestro Ferdinando, kaj eĉ gastopremis generalon Don Pedro Lazo de Castila kaj liajn hispanajn regimentojn. Pro tio ankaŭ la urbaj turoj kurbiĝis kaj muregoj ĉi tie kaj tie faŭkiĝis. Por ke fidelaj Griĉanoj iamaniere restarigu kaj kiel eble plej bone reŝtopu siajn muregojn kaj kastelojn, lia reĝa moŝto donacis ilin tutan enspezon de zagreba „trideset-nica“ (limimpostejo). La magistratanoj tre skrupule enkasigis tiun enspezon, sed ne ŝajnas, ke ili tre ŝtopis siajn muregojn. Almenaŭ la reĝo Maksĉjo II. ankoraŭ en la jaro 1573. estis skribinta al Vid Hallek, generalo de slavona Limo, ĝuste kroate, por ke li komprenu, „ke tiu urbo Zagreb en Slavonujo kaj tiu fortikaĵo estas nebone restarigitaj, kaj precipe du turoj kaj murego estas tute nudaj kaj malkovritaj, kaj ke multloke mankas la ŝtuparo sur murego, por ke oni povu rapide supreniri la muregon kaj ĝustatempe igi sin kontraŭ malamiko kaj sin defendi. Kaj de tiuj burĝoj depost la morto de mortinta Lenkoviĉ nenia kalkulo estas aldonita.“ Pro tio dirigas ilin la reĝo per la generalo „ke por ili lia koro neniel batas“, kaj ke dirita Hallek estu dironta „al diritaj burĝoj je fideleco kaj ĉaĝreno de l' reĝo, ke ili aldonu la postulitajn kalkulojn, por ke estu videbla ĉu ili la denaron bone elspezis kaj ke ili restarigu la muregon por prospero de la urbo.“

Ĝuste oni ne scias, ĉu la ĉagreno reĝa unuamomente devigis urbajn sinjorojn, ke ili faru klarajn kalkulojn kaj plibonigu muregojn kaj turojn, nur

[1] Legu Erdedi.

oni legas, ke urba juĝisto multan fojon sendis al Hallek Varaĵdinon po dek duonlitrojn da vino. Sed fine ekbruliĝis jam iliaj ungoj, ilin ekregis timo de armeo de Gubec, kaj oni ĉarpentadis, konstruadis, ĉiamaniere ŝtopadis, memkompreneble laŭ la strategia racio de urbaj sinjoroj. Ĉar la „vilaĝanan armeon“ („mužadija“) de Gubec helpadis sekrete estro de Medvedgrad, Stjepko Gregorianec, malamiko de zagrebanoj, pro ĉagreno kontraŭ Franjo Tahi de Susjedgrad, amiko de Griĉ-burĝoj. Pro tio ilia timo, pro tio rapidegaj laboroj ĉirkaŭ fortikaĵo, ke la vilaĝana reĝo ne forbrulu Zagrebon.

Kiel kun potenca Tahi, iama vicbanuso, tiel kun Griĉ-burĝoj malpaciĝis Gregorianec ĝismorte pro granda proceso. Tahi kaj Heningidoj tenis Susjedgradon duige, sed avara nehomo Tahi, estinte vicbanuso, klopodis depuŝi Heningidojn kaj preskaŭ lia misago sukcesis, sed ĵus la heroo kaj riĉulo Stjepko Gregorianec edziĝis kun Marta Hening, kaj furiozulo Tahi devis delasi de sia avarema intenco. Depost tiu tago furiozis la sangsuĉanto de Susjedgrad kontraŭ potenca familio Gregorianec en parlamento, ĉe reĝa kortego, kaj inter kroata magnataro, por iamaniere frakasi la potencan genton de sia kontraŭulo, kies unu, tio estas Pavlo, famiĝis kiel zagreba episkopo kaj leĝdonanto, kaj la dua — Ambroz, patro de Stjepko —kiel kroata vicbanuso, riĉulo kaj heroo, kiu tamen pro sanga proceso kun banuso Bakaĉ devis abdiki la vicbanusecon. Tiel malamegante estro susjedgrada Gregorianecojn, ribelante publike kontraŭ ili kun tuta sia forto, honoro kaj respekto, kaj intrigante kaŝe per grandaj monsumoj, li per malofta rapideco spionadis ĉiun okazon, por ke ĝi estu al Gregorianecoj akcidento, li spionadis ĉiun nobelulon, por ke tiu estu helpanto kontraŭ liaj malbenitaj malamikoj.

Tia okazo baldaŭ okaziĝis. Maljuna Ambroz estis farinta kontrakton kun Petar Erdödi kaj Nikola Zrinjski, laŭ kiu tiuj du familioj interŝanĝis unu parton de siaj bienoj. Gregorianec donis al Bakaĉoj sian kastelon Rakovec kune kun sep apartenantaj

vilaĝoj, dum li kompense ricevis de ili Kraljevbrodon apud Sava, Medvedgradon kaj ĝiajn apartenantajn vilaĝojn: Kraljevac, Botinec, Novaki, Hudibitek kaj pli da tio.

Samtempe saltis Tahi uzrupante Medvedgradon je l' nomo de sia edzino Jelena de Zrinjski. Sed vane. La reĝo Ferdinando aprobis en jaro 1561. ĉi tiun interŝanĝon kaj sekvintan jaron je Kata-festo enkondukis Mato Raŝkaj, nobela juĝisto de zagreba komitato, literatoron Ambroz Gregorianec mastre en posedaĵon medvedgradan.

Sed eĉ nun ne kvietiĝis Tahi. Nun li turnis la okulojn al siaj amikoj, kaj malamikoj de Heningidoj, al zagrebaj burĝoj. Kaj Tahi sin ne trompis.

De nememorebla tempo klopodis sagacaj burĝoj, ke ilia urbo kaj ĝia posedaĵo estu bone ŝirmataj, de pratempo ili planis, por ekakiri ĉirkaŭ malnova Griĉ tiujn lokojn, per kiuj povus zagreba fortikaĵo pli fortikiĝi, ke ili disspacumu sian posedaĵon, por povi per pli granda forteco kaj riĉeco pli forte repuŝi la perfortan bienularon.

Kaj tiu loko, kiun unue celis la deziremaj okuloj de zagrebanoj, estis falknesto — fortika Medvedgrad, tre grava pramo ĉe Kraljevbrod kaj ĉiuj fruktoportaj sesioj de la medvedgrada bieno ĉirkaŭanta urban posedaĵon. Inter ĉiuj dolorigaj ĉagrenoj, kiujn la reĝurbo dum jarcentoj de sia estado spertis, estis plej grandaj la perfortaj atakoj de mastroj kaj kastelmastroj de Medvedgrad. Kun teruro memorigis la zagrebaj patrinoj al siaj geidoj la misagojn de „nigra reĝino“ kaj de ŝia amanto, germano: Vilim Stamm.

Tial ilin ĉiam ekregadis la unua penso, ke ili ekokupu fortikajn turojn de Medvedgrad, kaj malsukcesinte perforte, ili provis juĝe. Tiu proceso — oni ne scias kiarajte — estis levita jam sub Matija Korvin, amiko de l' zagrebanoj, sed lia mano ne havis potencon super kroata reĝolando; proceson pro Medvedgrad renovigis la zagrebanoj dum la regado de Vladislav, banusado de Ivan Ernuŝt kaj poste de Petar Berislaviĉ. Vane! Malĉastiga mark-

grafo Ĝuro brandenburga ruzece estis fine la venkinto antaŭ juĝistaro en la proceso kontraŭ Griĉ-burĝoj. Sed nun, kiam ekregis Medvedgradon Ambroz, kiu post la morto de Ferdinand ne ĝuis eksterordinaran protekton ĉe la imperiestra kortego, — nun Tahi intencis embarasigi la malamikon, ekincitante la zagrebanojn, ke ili postulu sian ĵaman rajton, ĉar, diris li, ke multaj potenculoj ĉe la kortego kaj ĉe la reĝa tabulo estas al li inklinaj, kiuj per lia protekto turnos la juĝan sentencon al zagreba flanko.

Envere. Jam en jaro 1571. en dimanĉo Epiphaniae la urba juĝisto, forĝisto Ivan Blaĵekoviĉ, eklevis plendon antaŭ la banusoj Ĝuro Draŝkoviĉ kaj Franjo Frankopan kontraŭ Ambrozo pro Medvedgrad, kaj tial ke maljuna Ambroz mortis, eklevis sin la zagrebanoj tiom pli forte kontraŭ lia filo Stjepko. Duonmorta pro malsanego, ekkolerigita, kaj malforta kontraŭ la torento de vilaĝana ribelo, malamata de ĉiuj, eklevis sin maljuna Tahi, por frakasi genton de Gregorianecoj intrigante kaj insultante antaŭ la reĝa kortumo, por forrabi ĝian belan bienon profite al siaj zagrebaj amikoj.

Baldaŭ estas aperonta la sentenco de la reĝa kurio[1] — baldaŭ estis zagrebanoj la venkon festenontaj en la malnova ursonesto — sed malĝustatempe falis en tombon poplej forta fosto de l' Griĉurbo — mortis Tahi. Ankaŭ Gubec kliniĝis, terurilo de zagrebanoj, sub la fera krono sur Marka placo; sed restis viva Stjepko — pli terura ol Gubec, neplaĉata al la kortego — sed riĉa, fama kaj respektega inter la kroata nobelularo — ĉie konata karakterulo.

Li do kaj zagrebanoj atendis la sentencon, kiu estus aŭ Stjepkon enabismigonta kaj Zagrebon je forto altigonta, aŭ Stjepkon gigantigonta, kaj Zagrebon ĵetonta kiel viktimo al la venĝo de l' fiera bienulo.

[1] Kurio, tribunalo, tabulo, kortumo. N. d. t.

V.

Estis unua dimanĉo depost la Simeona tago en jaro 1576. Ĉe sa Stefano ĵus finiĝis la vespera Diservo; sinjoroj kanonikoj rapidpaŝe disiĝadis al siaj domoj, ĉar tre pluvegis. Du el ili haltis antaŭ malgranda domo, kies frontonon estis kovrinta vinberbranĉaro. Dumvoje eĉ unu vorteton ili ne parolis, ili eĉ ne povis pro la pluvo. Ĝi defluegis de iliaj longsutanoj, dum iliaj larĝaj ĉapeloj estis kvazaŭ defluiloj.

— „Dank' al Dio!", almetis pli dika el ili, Antun Vramec, nun ni estos sur sekaĵo. Eniru, honorinda frato, dummomente sub mian tegmenton. Mi estas al vi du, tri murmuretonta „in camera charitatis".

„Mi ne povas, frato", rediris la alia, malgrasa, kurbita homo, kun akra vizaĝo kaj penetrantaj grizaj okuloj, kies bruston ornamis ora kruco; „mi ne povas. Mi atendas Franjon Bornemissa Stolnikoviĉ el Wieno. Li skribis al mi, ke li kvazaŭe hodiaŭ venos, se lin envoje ia malfeliĉo ne renkontos. Vi tre scias, ke li estas ĉiam mia gasto; mi deziras ankaŭ ekscii la novaĵojn, kaj li kiel kroata deputato certe ilin alportos."

„Ĉu sinjoro Stolnikoviĉ estas fidinda?", ekparoletis Vramec.

„Li estas nia", rediris mezavoĉe preposto Niko Želniĉki; „lin ankaŭ tedas germanaj generaloj."

„Des pli bone!", diris Vramec, „mi sendos la knabon al via domo, ke Stolnikoviĉ ekpenu ĉi tien, se li venos. Eniru ni la domon."

Kaj preninte preposton je mano ektiris lin Vramec kiel eble plej rapide en sian domon.

Tra kruta balanciĝanta ŝtuparo ili venis sur nekvoritan koridoron kaj de tie en la salonon.

Malferminte pordon de la salono, ekmiris Želniĉki. En ĝi ĉeestis ankaŭ aliaj gastoj. Ĉe granda nuksa tablo sidis malafabla Stjepko Gregorianec kaj ĝiba krombanuso Gaŝpar Alapiĉ de Vukovina — unua enpensiĝa apogante la kubuton sur la ta-

blo, la dua balancante sin sur ledseĝo kaj klaĉante laŭ sia kutimo.

Iom pli malproksime staris ĉe la fenestro juna Pavlo Gregorianec, premante la frunton al la malseka vitro kaj fiksante la grizan, nuboplenan ĉielon.

Preskaŭ mallumo regis en malalta salono. Antikva krucifikso super ligna genuiĝilo, malpuraj bildoj de sanktuloj, dikaj libregoj kaj polvoplenaj geografiaj kartoj ĉio maldistingiĝis kaŭze de malforta lumo de malklara ĉielo.

Sur la sojlo sin haltigis Želnički. Tiajn gastojn li ne atendis. Banuso Alapiĉ kaj Stjepko Gregorianec, tiuj du potenculoj, antaŭ ne longe la plej furiozaj malamikoj, — ĉe sama tablo! Ĝi ŝajnis al la ruza ekleziulo malpura aŭ almenaŭ suspektinda afero.

Ĉiuj tri ekiris saluti la preposton.

„Mian komplimenton al via ŝatindeco!“ rekonte saltis la banuso-ĝibulo al Nikola. „Je mia animo mi vin bedaŭras, vi malsekiĝis kiel garbo meze de l' ebenkampo. Sed tamen mi ĝin ne bedaŭras, ĉar vin ĝuste la malbona vetero kun ni renkontigis. Kial vi do ŝanceliĝas eniri en tiun agrablan anguleton de mia amiko? Kio vin ekokupis? Vidu ja mian kaj vian amikon Stjepko — jes, ankaŭ mian! Ridinde estas al vi, ĉu ne? Filo de mortinta vicbanuso Ambroz kaj bofrato de mortinta banuso Petar, kiuj sin en la parlamento furioze reciproke atakis, nun prezentas manon unu al la alia. Vi ne miru eĉ malmulte. Stjepko estas homo tute laŭ mia koro, kaj forto ŝanĝas malnovan leĝon,“ almetis ruze Alapiĉ palpebruminte al la kanoniko, staranta sendecide apud la pordo, kaj ludanta kun orkruco sur la brusto.

Post la lastaj vortoj de la vukovina estro iĝis li iom pli facila kaj ekpaŝinte du tri paŝojn antaŭen, prezentis sian dekstran al la banuso.

„Pax vobiscum[1] — magnificenca banuso, kaj vi, sinjoro Stjepko.“

[1] Paco kun vi.

„Ha, ha! „Banuso“ vi diris?“, ekridis moke Alapiĉ skuante la manon de Nikola. „Mi ne sciis, ke via pastra moŝto estas kapabla moki mizerulon. Banuso! Jes! Bela vorto! Bela honoro! Nota bene, kiam oni envere banusadas. Sed mi — mi estas kvina rado en la reĝolando, kaj pli frue mi kredus, ke mi estas gracistatura kaj belkreska kiel jen sinjorido Pavlo, ol ke mi estas banuso kroata!“

„Via moŝto estas hodiaŭ aparte bonhumora, spite al si“, ekridis Želnički.

La dika dommastro aŭskultis tiun parolon de l' banuso, ridetante ĝissate kaj tordante la dikajn fingrojn sur sia ventrego. Fine li ekis:

„Ĝi estas malnova afero, ke sinjoro banuso estas la plej granda ĝojiganto inter Drava kaj Sava. Ĉu vi ja scias, kiel lin la turkoj apud Siget kaptis kiel ordinara soldato; kaj kiel li reaĉetinte sin je 500 mizeraj florenoj, diris al la paŝao, ke li lin tre bedaŭras, ĉar havanta en sia povo dikegan kokviron, li ne sciis ĝin senplumigi, kiel oni devas.“

„Sinjoro, vi eraras!“, ekbaris lian parolon Alapiĉ, karesante sian vilan barbon, „tiun fojon Gaŝo ne ŝercas, sed per maldolĉa ŝerco, parolas pli maldolĉan veron. Eble mi iam alimaniere parolis, sed nun mia koro estas plena, kaj la galo penetras mian buŝon.“

La vizaĝo de Gregorianec vestis sin per forta ruĝo, dum ankaŭ Želnički pli libere sin rektigis.

„La vero estas kiel vulkano,“ aldonis Gregorianec; „ĝi longe dormetas, sed fine flamo penetras ĝian supron kaj surŝutas per la ardo la tutan mondon.“

La vero stas akra glavo,“ almetis poiome kuraĝe la preposto, sed la glavo bezonas fortan manon, kiu ankaŭ ekhakos, kien ĝi svingos.“

„Amen reverendissime!“, ekkriis Alapiĉ. „Via saĝeco estas prava. Do tiun manon ni estas serĉontaj!“

„Ke ĝin dia favoro fortigu!“, finis Vramec.

„Sinjoroj, sidiĝu!“, daŭrigis la banuso, malleviinte sin sur la seĝon. „Aŭskultu min! Kiomaj ni

jen sub tiu ĉi inda tegmento estas, ĉiu maturiĝis per peno kaj batalo por forta viro, ĉiu el ni spertis bonon kaj malbonon, malpli da bono ol da malbono. Ankaŭ vi sinjorideto, aŭskultu!", turnis sin la banuso al Pavlo. „Vi estas ankoraŭ junaĝa, sed vi bonege pruvis en la batalo ĉe Hrastovica, ke vi ne estas degenerajo de via gento, ke la via dekstra taŭgas. Sed al la heroa dekstra estas dezirinda ankaŭ saĝa kapo. Tial vi nin aŭskultu! Depost nememorebla tempo, sinjoroj, ni vidas sangon, ni vidas pereon, ni rigardas kiel la tero, kiu nin naskis, estas rabata, dezertigata kaj pecetigata de malafabla mano de la nekristano; kiel malpia diablo rabas sulkon post sulko de l' nia malnova reĝolando, kiel li branĉon post branĉo deŝiras de nia trunko. Ni vadas ĝisgorĝe en nia propra sango.

Konsumiĝas la gento, konsumiĝas la idaro, niaj kasteloj en flamoj. Nutru vin, defendu vin samtempe! Kiamaniere do kontraŭstari la diablon. Solaj? Vermo kontraŭ formikaro! Certe ni laboras kaj konstruas, sed kion tago konstruas, tion nokto malkonstruas. Malbono por ni! Al ni helpas la aliaj kristanaj sinjoroj, eĉ el roma imperio. Jes, nin ili helpas, sed kiel? Ni elspezas por ili. Du panetojn por la imperiestra armeo. Ke ili almenaŭ estus veraj herooj, tiam fariĝu! Tiam estus ankaŭ tia elspezo suferebla. Sed jes! Kvazaŭ la sankta roma imperio forbalais tutan sian grenŝelaron, kaj ŝarĝis nian dorson per ĝi. Ĉu ne estas tiel? Kiam oni forte ekdancas heroan rondon, tiam vi, kroatego, frapu kaj tenu, kaj la helpantoj saltu trans la plektobarilo, ĉar al ili, kun via permeso, la pulvo malbondoras. Eĉ tiun ŝercon pardonus mi al ili, prenu ilin la diablo! Ankaŭ tion ni tratolerus; la korpo facile suferas, dum sidas en ĝi la tuta animo. Kaj kio estas la animo al la lando? Ĝiaj privilegioj, ĝiaj rajtoj. Mi demendas vin do, kie estas la rajtoj kaj privilegioj de nia nobelularo, de niaj urboj? Jen ilin tenas en sanga farmo la generaloj Auerspergoj, Teufenbaĥoj, Globiceroj, kiuj mastrumas, jugas, kolektas tributon tra nia reĝolando sen banuso,

sen banusa juĝo kaj spite al la decidoj de la kroataj korporacioj. Kaj se oni ilin vivege ekskuas ili respondas ridante: „Ĝi estas la volo de lia ĉefduka moŝto Karlo!" Kaj tiel estas ne nur ĉe ni, sed ankaŭ en Poĵuno, Ljubljana, kaj Graz.[1] Mia kolego, ekselenco Draŝkoviĉ estas duvizaĝa viro. Ĉiaokaze oni ŝpinas ion ĉirkaŭ ni. Estas malbono, kaj se min ne trompas mia konjekto, estos ankoraŭ pli da ĝi. Tial kunigu la saĝon, sinjoroj! La nobelaro devas esti en unu rondo, tio estas la plej bona mano por la glavo de l' vero. In hoc signo vinces. Post kelka monato mi kunvokos la regnan parlamenton. Tie mi diros humile sed kroate al lia reĝa moŝto, kio nin premas, kaj al la komisarioj ni honeste elpagos. Ĝis tiam fervore laboru, kaj la venko nia!"

„Vivat banus!", ekkriis ĉiuj unuvoĉe.

Sed la kriado rapide kvietiĝis. De la ŝtuparo aŭdiĝis pezaj paŝoj, ke la tuta domo skuiĝis. La pordo plene malfermiĝis, kaj sur la sojlon ekpaŝis virego pli alta ol la pordo. Li estis nigra, maldika, kun nigraj lipharegoj kaj vivecaj okuloj. Peza mantelo, feljako, forta glavo kaj sur la kapo blanka felĉapo nedisputeble pruvis, ke la viro revenas de vojaĝo.

„Bonan tagon kaj bonan sanon!", salutis la herkulesa alveninto la gastojn, iom sin klininte por ne frapi frunte la pordujon.

„Ave, Stolnikoviĉ!", resalutis lin la sinjoroj, saltinte sur la piedojn.

Ĉu vi portas al ni la olivbranĉon de l' paco?", ekdemandas vivece la preposto.

„Mi ne forkuris el Noemarkeo!", rediris ride la alveninto, montrante siajn blankajn dentojn kaj ĵetinte la mantelon; „nek kolombo mi estas", almetas li ironie, „preskaŭ mi eĉ metamorfoziĝis en sovaĝbeston pro tiuj hipokritaĵoj kaj dusencaĵoj."

Kaj li sidiĝis, kaj ĉiuj ceteraj ĉirkaŭ lin.

„Ergo!", diris la ĝiba banuso, „elŝutu antaŭ nia moŝto la sakon da novaĵoj!"

[1] Legu: Grac.

„La reĝo Maksimiliano“ — almetis grave Bornemissa.

„Kio okazis?“, ekdemandis ĉiuj unuvoĉe.

„Mortis“, finis Stolnikoviĉ. Silento ekregis.

„Requiescat in pace!“, ekparolis Želniĉki.

„Kaj Rudolf?“, ekdemandis Vramec.

„Li serĉas la felicon en la steloj“, rediris Bornemissa. „Sed mi timas, ke de tio malmulte da felicо estos por ni. Rudolf estas hispano kaj en hispanaj manoj. La bohemajn pikardojn li pelas, al aŭstria luterana nobelularo li minacas, dum la novsektanoj en roma imperio folie vekiĝas. Kiam jam la mortinta Maksĉjo — tiu sekreta bofrato de luterana sekto — ne kuraĝis pro germanoj kunmetaĉi la helpon kontraŭ turkoj, eĉ Rudolf ne kuraĝos, tiel farante. Mi vizitis sinjorojn, kiome min servis miaj piedoj. Sufiĉe da dolĉvortoj, kaj da mono nek por ŝargi la pafilon!“

„Kaj nia reĝolando?“, interrompis Alapiĉ la alveninton.

„Draŝkoviĉ intencas deiri de banuseco.“

„Kaj anstaŭ li?“, ripetis la ĝiba krombanuso pikita.

„Mi ne scias“, respondis Stolnikoviĉ, „neniu — mi kredas. Lia ĉefduka moŝto Karlo plej bone scias, kiu regos en Kroatujo. Pli multe mi ne povis eldemandi. Sed“, turnis sin Stolnikoviĉ al Stjepko, „jen estas ankaŭ lia estra moŝto de Medvedgrad. Bone, ke mi vin vidas. Gajan sciigon mi vin portas. La reĝa tabulo juĝis.“

„Kaj la sentenco?“, ekdemandis timete Stjepko, eklevinte sin de la seĝo.

„La zagrebanoj malgajnis la proceson pri Medvedgrad.“

„Jen vi vidas“, aldonis ruze Vramec, „ankaŭ la justeco havas siajn favoratojn“.

„Ha, ree mi estas viro“, rektiĝis Stjepko, dum liaj okuloj ekbrilis de sovaĝa ĝojo, „jes, miaj sinjoroj, mi estas plena estro de Medvedgrad, ankaŭ via mi estas tuta. Mia kapo, mia brako, mia monujo: ĉio estas via. La inkubo malpremas mian bruston, mi spiras kun la tuta forto de mia vivo. Vi ne bedaŭros, kė la sentenco falis al mia flanko. Vi aŭdis, kiel sinjoro Stolnikoviĉ per vivaj vortoj de sia buŝo metis la veraĵsigelon sur tion, kion antaŭmomente la sagaca Vukovinestro antaŭdiris. Ke ni laboru, ke relevigu la privilegiojn de nia nobelaro. Cent kapoj unu penso, cent brakoj unu glavo. Pavĉjo rapidu, sursidu ĉevalon, sciigu vian onklon Mihajlo Konjski pri ĉio, ĵusaŭdita. Li venu, li venu rapide ĉi tien al konsiliĝo. „Ĉar“, daŭrigis Stjepko al la sinjoroj, „mia bofrato estas viro kiel akvo ĉienpenetranta. Per unu vorto li elektis la ekirotan vojon. Ne malgrandan helpon mi esperas de li. Mi konas lin depost la batalo kun Tahi, kaj — depost Gubec-ribelo. Iru, filĉjo!“

La vizaĝo de Pavlo sereniĝis. Klininte sin al la sinjoroj li ekserĉis sian ĉevalon. La ĉielo ekheliĝis. La aero estis pura, brilanta. Kun flama okulo kaj fiera kapo flugis la junulo sur la rapidrajdato kontraŭ Kamenita vrata, kvazaŭ lin feinoj portus. Kio do flugiligis lian animon? Ĉu gravega parolo de la sinjoroj? Ne, lin portis lia koro.

La domo de Mihajlo Konjski, la trezoristo de la reĝolando Slavonio, staris en la urbo ne malproksime de Kamenita vrata, kaj apudege ĝi staris la brikdomo de l' oraĵisto Krupiĉ meze de la ĝardeno, ĉirkaŭbarita per ligna barilo. Per kelkaj vortoj sciigis Pavlo sian onklon pri ĉio dirita en la domo de Vramec, kaj estis ekironta. La onklino Anka lin altenadis, sed la junulo ne volis, ĉar diris, ke li ankoraŭ ĉivespere estas alvenonta al Medvedgrad al sia malsana patrino, kiun jam de longe ne estis vidinta.

Strange, Pavlo ne direktis kontraŭ „Nova vrata“, de kie oni eliradis el Zagreb al la monto. Irinte malantaŭ la angulo de la onkla domo, li haltigis la ĉevalon antaŭ la barilo de l' Krupiĉ-ĝardeno. Alliginte la grizan ĉevalon al la barilo, li ekrapidis

tra la ĝardeno al la domo de l' oraĵisto. La ĝardeno estis senhoma, kaj antaŭ la domo ne troviĝis eĉ unu animo. La junulo ekmeditis.

„Ah, jen lin, baptopanjo!“, subite ekkriis dolĉa voĉo kvazaŭ ekkrio de savita animo. Sur la sojlo aperis pala kiel marmoranĝelo — Dora. Sed tuj ŝi malaperis.

Al la junulo ekflamis la okuloj, ekflamis la vizaĝo. En du saltoj li penetris tra ŝtonŝtuparo en la magazenon de l' oraĵisto. Li ekvidis Doran, kaj haltis muta kaj feliĉega. La junulino sidiĝis sur grandan seĝon de sia patro. Sango ludis sur ŝia vizaĝo, la lipoj tremetis, dum la brilokuloj feliĉege enfiksis sin en junan belulon. Sed subite mallevis ŝi honteme la okulojn teren; krucinte la manojn sur la brusto kvazaŭ ŝi premadis la maltrankvilegan koron, ŝi tremetis tute kiel vergo, apenaŭ ŝi spiris, la raviĝo rabis al ŝi la vorton.

Post ŝi staris Magda. Strange aliformiĝis ŝia maljuna vizaĝo ĉu pro timo ĉu pro ĝojo. La gejunuloj silentis, fine erupciis la babilema maljunulino:

„Dia helpo al vi, juna sinjorido, savinto de mia Dornjo! La eterna justeco rekompencu vin pro tio. Dio kaj Dipatrino nur scias, kiom mi suferis da timo tiun tagon. Se vi ne estus, kie mia Dornjo troviĝ—?“ — ekploris Magda. „Ĝi ne estas pensebla, mia animo frostiĝas. Sed vin jam longe Zagreb ne vidis, certe vi vojaĝis, aŭ estis priokupita? Jes, jes, la manoj de grandaj sinjoroj estas plenaj da laboro.“

„Ne prenu malbone, virgulino Dora“, ekbaris la junulo per dolĉa voĉo la vorton al la babilema baptopatrino, „ne prenu malbone, ke mi kontraŭ ordo kaj moro invadis en la domon ektimiginte vin malfortan. Mi venis en urĝa afero serĉi la mastron Krupiĉ“ — kaj tie Pavlo certe mensogis, „mi venis demandi ankaŭ pri via bonfarto, ĉar la zagrebanoj sciigis min dum la milito, ke vin faligis forta malsanego.“

„Preni malbone vian alvenon, moŝto sinjorido“, ekkuraĝiĝis la junulino, „estus peko. Mi ĝojas vidi vin; nun mi almenaŭ povas danki vin por mia vivo;

ĝis nun mi ne havis kiam, la malsano min malhelpis dum vi estis en Zagreb, kaj poste longe — longe vi ne estis ĉi tie. Sed min tamen ĝojigas, ke vi kelkfoje meze de l' batalo memoris mian nomon. Dio redonu al via bela animo, kion vi pro mi faris, mi mizerulino — ne povas.“

Ŝiaj blankaj manoj falis sur la genuojn, larmo aperis en ŝia okulo kaj ŝi ekridetis al la junulo per milda rideto, kiel ridas la stelo tra subtila nubo.

„Pri mastro Krupiĉ vi estas demandinta?“, enmiksiĝis Magda. „Li bedaŭros. Li ne estas hejme. Efektive li estus ĝojinta. Li foriris Remeten por ripari la kronon de mirakla Sinjorino, ion tiel.“

„Kaj via sano?“, delikate ekdemandis Pavlo la junulinon.

„Dank' al Dio, ĝi restariĝas. Sed estis malbone — tre malbone“, rediris la junulino.

„Ĝi restariĝas, ĝi restariĝas, vi diras?“, ekbabilis la baptopatrino, „mi dankas tian restariĝon. Kaj la infano ankoraŭ ŝajnigas, kvazaŭ nenio estis. Kaj dume, la tuta monduma mizero rompis sin je ŝi. Por ke mi ĝin diru al vi, sinjorido!“

„Rakontu, rakontu, bona maljunulino“, diris ŝin Pavlo, sidiĝinte sur la seĝon apud Dora.

„Ĉion mi rakontos. Kiam vi ŝin tiam estis ĉi tien alportinta, ŝin ekregis tremfrosto, skuadis la febro. Nu, gardu nin Dio, oni dirus: ŝi estas malviva. Mi estis apenaŭ altreninta min al la domo de la interpuŝiĝo, kaj reveninte domen, ho ve, jen senkonscian mizerulinon. Oni devis varmigi kaj ŝprucigi, kaj la mizerulino dumnokte apenaŭ iom dormetaĉis. Sed ŝin tamen faligis la dormego. Kaj kiel mi zorgumis, ploradis kaj preĝadis kvazaŭ ĝi koncernus du sanojn, la patro malafabla kaj malĝoja, kaj kiel ne! Malĝojo rigardis el liaj okuloj. La apotekisto Globicer kuiradis la sanigilojn, kaj mi ilin transdonadis al la junulino, sed malmulte da utilo. Dora ekdeliris dum la sonĝoj kaj eĉ tagon post tago. Ŝi parolis pri ĉio; mia maljuna cerbo ĝin ne memoris, ĉar estis diverskolora. Ŝi deliris pri monaĥoj, pri turkoj, pri fajro — kaj kriis helpon, ke

mian koron tute trancĉiloj trapasadis. Ha efektive — ankaŭ pri juna sinjoro, belega heroo ŝi parolis —"

„Baptopanjo!", riproĉis ŝin Dora ruĝiĝinte ĝis-supre de la frunto.

„Lasu, lasu! Ĉion mi estas rakontonta. Jes, pri juna heroo kaj pli de tio. Tiam vi venis, sinjorido, demandi pri ŝia sano."

Pavlo kapjesis.

„Kaj mi diris, malbone estas. La patro kaj mi malesperadis. Post kiam vi estis ekirinta kontraŭ turkoj, iom post iom la junulino rekonsciiĝis. Sed ŝi ne estis forta eĉ por kapeton sian eklevi, des malpli por ekpaŝi; ŝi estis tute malforta kaj kaduka. Tiel estis dum daŭro de kelkkvar eĉ pli da monatoj. Sufiĉe da penado, sed dank' al Dio ankaŭ da espero, ke la junulino resaniĝos. Daŭre de longaj tiuj noktoj, maldormitaj apud ŝi, oni parolis ankaŭ pri vi. Fine ŝi iom post iom leviĝadis. Bone estos, mi diris. Sed estis malbone. Trofrue ŝi ekkuraĝiĝis, malvarmumiĝis en la preĝejo, la malsano returnis sin kaj centoble pli malbone. Ŝi komsumiĝadis kvazaŭ ŝin aspidoj sucus. Ve, mi pensis, frua tombo estas fosota. Mia koro kvazaŭ krevonta, kaj same al la patro. Ĉiuj sanigiloj kvazaŭ estis akvo. Feliĉe, ke mi trafis mian malnovan konatulinon, kiu scias diversmaniere sorĉi, kaj ke ni kuiru la herbon „simfiton"[1] en la lakto, kaj ke Dora ĝin trinku. Kaj ĝi helpis, dank' al Dio kaj al ĉiela korto! La karulino trapuŝis la doloron. Poste ŝi estis en vilaĝo, ĉar tie oni pli sane spiras, ŝi fortiĝis, kiel vi vidas, kvankam eĉ nun ne estas ŝerco. Kaj nun ke ŝi plenumu ankoraŭ la solenpromeson ĉe la remeta Sinjorino, kaj tiam estos ĉio bona!", finis la maljunulino, delikate ekkaresinte kun tremanta mano la kapon de Dora.

Atente aŭskultadis la junulo la diradon de l' baptopatrino, jen mediteme fiksante la teron, jen rigardante karan junulinon, kiu muta sidis, senvorte ĝuis la feliĉegajn momentojn de lia ĉeesto. Kaj kiam la simpla maljunulino diradis, kiajn doloroj Dora

[1] Sympfytum officinale, skorzonero. N. d. t.

suferis, tiam la bela okulo de l' junulo malheliĝis, kvazaŭ ankaŭ li ĵus ĉiujn dolorojn de Dora trasuferis.

„Mi dankas vin centfoje dankas, bona maljunulino, ke vi al la mizera Dora dum gravaj momentoj de l' doloro anstataŭis ŝian patrinon", ekparolis la junulo per kortuŝanta voĉo al Magda. „Min ekokupis granda zorgego pri ŝia juna vivo, ĉar mi timis, ke ŝi ne povos la molbonon elsuferi. Mi pridemandis pri ŝi, kaj vi diris al mi, estas malbone, ĉar la malsano rabis ŝian konscion. Kaj poste oni devis foriri de tie ĉi, virgulino Dora!", turnis sin la junulo kun afabla vorto al la mizerulino, kiu la kapeton estis mallevinta ĝis la apogilo de l' seĝo ne deprenante siajn okulojn de Pavlo: „jes, mi devis foriri batali kontraŭ turkoj. La perforto herezula invadis, honto do estus ne eltiri la glavon, dum la gento kaj konatuloj pereas. Kontraŭvole mi ekiris, sed mi devis. Sed kial mi tie ĉi rakontas, mi ja vidas, ke vi laciĝis, ho virgulino."

„Ho diradu pluen, vi ja vidas, mi estas forta por ĉion aŭskulti", ekpetis la knabino iom rektiginte sin. „Diradu, sinjoro Pavlo, ĉar mi vin volonteme de tuta mia koro aŭskultas."

„Jes, jes, sinjoro moŝto", aldonis la maljunulino, „ŝi aŭskultus vin ĝis la tagiĝo, ĉar vi scias multon, — multon da tio. Pri kio ni mizerulinoj scias, ne antaŭen de la nazo, kvazaŭ vi nin al la domo alligis."

„Mi longe forestis", daŭrigis la junulo, „kaj preskaŭ ke mi neniam jam revenis."

„Neniam?", demandis timeme Dora.

„Jes, neniam. Aŭdu. La pasintan someron, ĵus kiam ekregis la varmego, kaj vi dolorojn suferadis, venis la sciigo, ke la turkoj marŝas kontraŭ kroata maro. Tuta la nobelaro ekprenis la armilojn. Ankaŭ mi saltis. Mi adiaŭis la gepatrojn kaj foriris batali. Nia armeo formoviĝis for de Rakovac kontraŭ apudmaraj regionoj. Estis urĝo atingi la armeon. Sed fine mi ĝin atingis. Belaĵo de la armeo, nur elektitaj soldatoj. Oni devis ŝirmi la fortikaĵon Hra-

stovica; ĝin celis Ferhat, la bosnia paŝao. Oni marŝis nokte kaj tage. Niaj facilpiedaj kroatoj, kaj vlahaj (serbaj) trupoj moviĝis sufiĉe bone, sed stirianoj sub siaj feraj kaskoj kaj pezaj pafiloj ekgenufleksis ne nur unu fojon. Nin kondukis Auersperg kaj Ivan Vojkoviĉ. Ian tagon ni malsupreniris de ia monteto en valon. La tero sufiĉe ŝtonhava, nur sur la maldekstra flanko kovris la monton arbaro. Ni haltis. Pro varmego nenien antaŭen. Iel ĉirkaŭ tagmezo alkuris paŝtistoj trans la monto. Ferhat, ili diris, marŝas kontraŭ ni. Ke li estas malproksime de ni unu horon kaj duono. Oni ne povis deturni, oni devis batali. En la valo la armeo envicigis sin. Antaŭe la pafilegoj, en la mezo la kroataj piedistoj, vlahaj haramioj kaj flavaj karniolaj muskeduloj. Maldekstre staris stiriaj feraj rajdistoj, en la valo du standardoj, kaj unu sur maldekstra monteto. La dekstran flankon tenis kroata banderio ĉevale kun standardo banusa. Sur la montetoj staris arkebusistoj. Sinjoro Pavlo", alkriis min Vojkoviĉ algalopinte sur blankulo de Aŭersperg, „ĉu vi vidas tiun arbaron sur la dekstra monto? Tie trancas la montaron la kavo. Oni devas atenti, por ke nin la turkoj ne surprizu de dekstra flanko. Jen al vi centon da kapitolaj ĉevaloj kaj ducent da vlahaj[1]) pafiloj. Okupu la montaron kaj ne lasu la hundojn tra la kavo!" Mi kaj vlaha vojevodo Steva Radmiloviĉ ekiris okupinte la kavon kaj arbaron.

Cento da pafiloj kaj kvindeko da ĉevaloj lokis sin en la kavo trans la vojeto. Aliaj pafiloj dekstre kaj maldekstre sur apudvoja monto, dum en la montdeklivo, proksime de la valenfluo mi kun kvindek ĉevaloj. Haramioj ŝargis la pafilojn, kaj la turkoj venu. Mi kuŝis kviete en arbara ombro apud la ĉevalo.

En unu momento skuiĝis la aero. Komenciĝis furioza kriego. Mi supreniris la supron por vidi. La turkoj marŝas kontraŭ ĉefarmeo. Ekfulmas, ektondras niaj pafilegoj treege. La turka atako marŝas returnen. Kaj la turkoj reatakas, sed ĉi tiun fojon

[1] Serbaj.

furiozege. Grandaj pafiloj krakadis, feraj viroj ekkuris kaj la banusa standardo flankumis la turkojn dekstre. La niaj kvazaŭ venkos. La banusa standardo alte flirtadis, la trompeto laŭte sonadis: antaŭen. Per unu fojo superŝutiĝis la maldekstra supro per nova turkaro. Feraj viroj falis de turkaj pafiloj kaj kiel rapidfluo ruliĝis la herezulaj trupoj malsupren kontraŭ nia maldekstra flanko. Mi vidis, kiel pafilaĵo forigis la kapon de generalo Aŭersperg. Flavaj muskeduloj komencis kuri, post ili la ceteraj, kontraŭ unu nia staris deko da turkoj. Mi koleris, ke mi devas tie atendi. Sed ne por longe. El la kavo eksonegis furioza krio: „Alaĥ!" Mi ekrapidis al la armeo. La turkoj estas atakontaj el la kavo. Unu, du, tri fojon repuŝis ilin niaj pafiloj post la arbetaĵo, dornaro, ŝtonaro, de ĉie. Tra la valo fluis rivereto klarakva, nun ĝi fluis per sango. Kaj ree atakas la nigruloj. Sesoble estis pli da ili ol da niaj. Al ili estis facile perdi la kapojn. Multaj niaj ĉevaloj estis mortpafitaj, kaj al haramioj ekmankis la pulvo. „Pafilojn dorsen! Je trancĉiloj, infanoj!" ektondris Radmiloviĉ staranta sur alta ŝtono. Sed apenaŭ li eldiras, ekŝanceliĝis, falis — la sago enpikis sin en lia koro. „Je nomo de sankta kruco, ekfrapu infanoj!" mi ekkriis, kaj kiel fulmo frapas mi kun mia trupo la turkan flankon. Post ĉiu manlarĝo kelkdeko da turkaj kapoj. Ĉiun arbetaĵon, ĉiun ŝtonon pagis ili per la vivo. La sabro frapis mian frunton, mi pro sango ne vidis. Mia ĉevalo furioze galope rektiĝis, la sago trapikis ĝian okulon. Mi falis, dum la miaj formoviĝis. Por stariĝi sur la piedojn mi estis tro malforta. Ĉirkaŭ mi korpo al korpo. Mi genufleksis por treniĝi pluen ĝis la rivereto: mia ĝorĝo brulis. Sed de proksima arbetaĵo aperis nigra kapo. Blekeginte li kiel besto jetis sin sur min. Mi falis dorsen. La furiozulo genufleksis sur mian bruston. eltiris trancĉilon, eksvingis ..."

„Je diaj vundoj!", ekkriis de l' teruro la knabino, kaj klininte sin disetendis la manojn kontraŭ la kapo de Pavlo, kvazaŭ ĝin ŝirmonte. Kaj en angulo la maljunulino tri fojon sin krucosignis.

„Ne timu, virgulino Dora! Mia kapo estas ankoraŭ viva“, rediris dolĉavoĉe Pavlo, kaj la fingroj ektuŝetis la manon de Dora. La junulino ektremis, sango penetris en ŝiaj vangoj, sed la manon ŝi ne retiris. Malrapide fermiĝadis ŝiaj lipoj, kaj en la okuloj briletis ia stranga flamo, sed ŝi ne deturnis la pupilojn for de Pavlo.

„Eksvingis la nigrulo“, daŭrigis Pavlo, „— sed ne enhakis. Terurega mano ekprenis lian brakon, ekkaptis lian ĝorĝon, kaj levinte alten la krimulon, frapas lin je ŝtonego, ke liaj ostoj diseriĝis. „Mortaĉu, diablido!“, ekmurmuretis griza homego, apud mi staranta.

Li estis Miloŝ Radak, vlaha piedisto de Aŭersperga trupo. „Ni kuru, sinjoro!“, li diris. „En la valo ĉiujn niajn ili elhakis.“ Radak ŝargis min sur sian dorson. Ni feliĉe formoviĝis tra la arbaro, sed super la arbaro altiĝadis ŝtoniga monto, nura ŝtonamaso. Por ni nun pli malbone. Post ni kugloj zumadis, Radak laciĝis. El la valo li elportis sangantan ŝultron. Ni treniĝis post la roko, kiu nin momenton ŝirmadis. La vundojn ni ĉirkaŭligis, kaj mi glutetis el la bareleto de Radak. Kaj kuru! La idolanoj nin spionadis. Ni trapasis feliĉe la pinton, kaj kuru tra seka akvoelŝirajĵujo malsupren kontraŭ arbaro. Sed sur la pinton suprenrampis la turkoj, unu antaŭe, kaj tri iom malproksime de li. „Haltu, sinjoro!“, ekridis Radak depreninte min momenton de sia dorso. „Jen arbaro! La folio nin ŝirmos. Ke ni montru al la friponoj ke nia domo ne forbrulis“. Li kaŭris, alcelis kaj „cak!“ malŝargis la muskedon. Kiel vundita kato ĵetis sin la unua turko aeren kaj falis. Ni direktis sin transverse al la arbaro tra plej granda densejo. Radak okulmezuris la arbojn. „Tie ĉi estas nia domo!“, li diris haltiginte sin antaŭ malnova branĉiga kverko. „La bestidoj ne ripozos.“ Per la zono li alligis min al si kaj surgrimpis sur la arbon. Sur la kverko ni pasigis unu tagon kaj duono. La turkoj nin serĉis krucige. Ili perdis la postsignon. Ili estis for de la kverko en interspaco de unu pafo, sed ili ĝin preterpasis. Trankviliĝis;

ni deglitis. Proksime nenia dometo, tiom malpli da vilaĝo, kaj kie ĝi antaŭe estis, ĝin la turkoj forbrulis tute. La trian tagon ni renkontis du stiriajn kirasulojn, forkurintoj de Hrastovica. Ili prenis nin sur la ĉevalojn. Tiel ni venis Samobor'on, mi kaj mia Radak, por kuraci la vundojn. Mi resaniĝis dank' al Dio, kaj jen min viva kaj sana.“

„Dankon kaj gloron vin ĉiela Dio!“, kunplektis Dora malfortajn manojn, „ke vi savis mian savinton. Preskaŭ mi mizerulino mortis pro viaj vortoj, kaj kiel ne vi en fajro viva! Se ili vin atingis, faris al vi malbonon — vin mortigis! Sed ne, ne! Mi vin vidas, vi estas viva, sana, dank' al Dio do!“, finis la junulino kaj bolanta larmo aperis en ŝia brilokulo.

„Nur duone“, almetis la junulo per sufokanta voĉo mallevinte la kapon por ŝin ne rigardi „sed mi estos tute sana, se vi ekvolos, virgulino Dora! Aŭdu min! Mi estos sana kaj viva, se vi donos la balzamon, ĉar“ — la junulo pasie saltis — „mia vivo vi estas, mia sano vi estas. Ne parolu, ho ne parolu antaŭ ol mi ne diros ĝin kio mian koron sufokas. Depost tiu tago, kiam mi vin duonvivan eligis el sub la hufo de l' furioza ĉevalo, kiam vin ĉi tiuj manoj portis en la gepatran domon, mia koro resonas per via nomo, en mia animo respegulas via kara vizaĝo! Dum la mortapero, dum batalego, dum febrego, kiam la vundo min brulis — mia memoro nur vin memoris. Dora estis nokta sonĝaĵo, matena aperaĵo. Ne juĝu min, ke mi parolas neordinare kaj nekutime al vi inda virgulino. Jen mia frunto brulas, mia cerbo frapas, dum mia sango bolas kiel fandanta fero. Ne alvoku sobran prudenton, juĝu koro al koro. Dora, mi savis vian vivon, Dora, redonu afablaĵon por afablaĵo, vi savu mian vivon, diru, junulino, vorteton, diru ke mi estas kara al via koro!“ Kaj laciĝe klinis la junulo sian kapon antaŭ Doran.

La junulino saltis. Paliĝis kaj ekflamis. Kvazaŭ ŝi revas. La sango kvazaŭ diskrevigonta la nervojn, la koro saltonta el la brusto. Per necerta flamo ekbrilegis ŝiaj okuloj; ŝi malfermis la tremantajn manojn kaj mallevinte sian kapeton post la kapo de Pavlo, ekploris kaj per ploro kaj rido:

„Ho ve Pavlo, kion vi faris de mi, Pavlo!“

Sur la pordo ĵus aperis hometo — la ebrieta razisto.

„Help' Dio! Ĉu estas hejme majstro Krupiĉ“?, ekdemandis li per malica rido.

„Ne estas!“, pene ekdiris la mortpala Dora, ĉar la maljunulino de l' ektimigo mutiĝis.

„Ne estas?“, rediris la hometo. „Ne prenu malbone. Mi vidis la grizulon antaŭ la domo. Mi opiniis, ke estas gastoj ĉe li. Mi volis demandi lin pri lia trezoro, sed je malalta prezo! Ne prenu malbone, virgulino estiminda! Dolĉan nokton!“ Kaj foriris.

Post kelko galopis sinjorido Gregorianec kontraŭ „Mala vrata“. Ĉe angulo de l' episkopa strato staris Ĉokolin. La kapon li forklinis. Li rigardis post la junulo kaj ekridegis:

„Ĉu tiel, virgulino Dora? Je tia prezo estas via kroneto? B e n e. Nun estas mia vico!“

VI.

De turo de sankta Marko estis soninta la naŭa matene. La geburĝoj revenadis de foiro, inter ili ankaŭ Barbara, edzino de najlisto Ivan Frey. Freyova, kurbebuŝa, ruĝeta klaĉulino, estis aĉetinta da holanda drapo, lubljana oleo, gorica bulko, iranĉante kun tiu ŝarĝo al sia domo, staranta ne malproksime de la paroĥejo. Sekve kiel sin najbarinoj tre amas, se ili unu al alia ne elpikas la okulojn tiel amis ankaŭ sinjorino Frey sian najbarinon, negocistinon Ŝafraniĉ, virino tre malpura kaj melankolia, kiu iam estis tre delikata virgulino, sed nun ŝi estis korpulenta, sekanta avinaĉo kun aŭrorsimila nazo, kiu ĉiusabate ulne liniis sian karan Andrija, ke la musoj en ŝia negocaĉo pro tiu spektaklo tuj forlasis la fromaĝon. Stranga ligo ligis la najlistinon kaj negocistinon, ilia amo koheris en prun-brando, kaj ĉe Ŝafraniĉeva troviĝis ĉiam da bona prunbrando. Tial ankaŭ hodiaŭ estis al Freyova malfacile ne eniri al sinjorino Ŝafraniĉ.

La butikistino jam ne havis malplenan stomakon, ŝiaj okuloj tre malheliĝadis. Por pasigi la

tempon — ĉar ŝi ne estis ĝuste diligenta mastrino — ŝanceliĝis ŝi tra la butiko, frapante kun pantoflo la muŝojn.

Ŝi tre ekĝojiĝis ekvidinte sian aminjon najlistinon. „Sidiĝu kaj nu prenu kara najbarino; kaj pri kio vi sonĝis, kion do vi aĉetis, kaj kiom kostas bulko, ĉu pluvos, kaj ĉu levis la nazon la nova urba juĝistedzino Teletiĉ“, kaj klaĉu kaj babilaĉu la avinoj kiel en muelejo, sidante sur ŝtonbenko antaŭ la butiko, kaj trinketu kiom plej eble.

„Mĥa!“ ŝmacis najlistino „dankon, ke vi min iom varmigis; ĉiumatene estas al mi ĉi tie iel malplene, sed via medicino ĉiam helpas.“

„Kredu, same estas ankaŭ al mi,“ rediris la butikistino, kaj se mi antaŭ dua meso forgesas mian glaseton, mi ne havas apetiton por la supo. Mirinde estas, kiel sama afero faras al unu bone kaj al alia malbone. Min, vi vidas ĝi varmigas kaj fortigas, sed mia malfeliĉa Andrija apenaŭ ekflaras, jam ligniĝas kaj ligniĝas. Kiam oni lin lastan fojon alportis de la korporacio domen, mi kredis, lia amino sidas sur lia lango. Kuveton da akvo mi verŝis sur lin, kaj la razisto skariĝis lin — sed Andrija ligno. Tihodiĉeva donis al mi ian grason, kian mi metis sur liaj plandoj, kaj ĝi iel eltiris la varmon.“

„A! a!“, ekmiris Freyova, skuante la kapon, „jen, kiu dirus ĝin, kara najbarino. Sed por ke mi vin rakontu. Mi havis strangan sonĝon.“

„Diru, kian?“, ekdemandis la butikistino.

„En sonĝo mi vidis katon kontraŭ mi irantan.“

„Helpu vin ĉiela korto! Ĝi estas malbono, najbarino! Maljuna kato vi diris? Malica animo ĉagrenas je vi!“, aldonis grave la butikistino.

„Vidu, vidu! Jen Grga Ĉokolin!“, ekkriis Freyova „la urba kribrilo! Ke ni lin alvoku!“

„Ke ni lin alvoku!“, ripetis melankolie Ŝafraniĉeva.

„Majstro Grga! Majstro Grga! Ĉu vi ne irus ion ĉi tien?“, laŭtege ekkriis la najlistino.

La urba razisto envere iris tra Markplaco. Sur

sin li estis ĵetinta malhelan mantelon kun mallongaj manikoj, sin apogante sur forta korneusa bastono kvazaŭ ekvojaĝonte. Je alvoko de sinjorino Frey li haltis kaj direktis sin kontraŭ la butiko.

„Aj, aj! Bonan tagon, karaj sinjorinoj! Kune, kiel mi vidas!“, salutis la razisto la avinojn. „Kun plezuro. Iomete mi kuniĝos al vi. Mi estas vojaĝonta. Por ke mi iom ripozu.“

„Vojaĝonta? Kien?“, ekdemandis scivole la najlistino.

„Ŝt!“, ekmurmuris Ĉokolin metinte fingron antaŭ la buŝo kaj turnante sin singarde.

„Ne timu!“, ekkuraĝigis lin sinjorino Šafraniĉ. „Neniu estas.“

„Kaj tiu?“, aldonis la razisto, montrante per la fingro Jerkon, sidantan en koto ne malproksime de la butiko.

„Nu tiun vi ne devas timi. Ĉu vi lin ne konas? Tio estas Jerko mutulo. Jen vidu, li vendas, matkorbojn por bagatelaj moneroj. Li estas surdmutulo, kaj fikse ridargas ĉiun plezure, konsolis Freyova la majstron.

„Estas fino al la mondo!“, rediris mediteme la razisto.

„A! ĉu vere?“, ekdemandis la avinoj.

„Je mia animo, jes. Okuloj vidas, kaj oreloj aŭdas pri kio cerbo eĉ ne sonĝas,“ daŭrigis Grga „kaj en nia nobela urbo!“

„Nu elbaku do!“, atakis la najlistino.

„Mi ne volas“, ekskuis sin la razisto, „mi ne volas, ĉar min naŭzas. Sed mi ĝin faros sur kompetenta loko —!“

Šafraniĉeva versis da brando en la glaseton kaj prezentis ĝin al la falsdoktoro.

„Ni ja ne estas infanoj, ni estas hejmulinoj! Rakontu!“, instigis lin la kurbobuŝulino, preninte lian brakon.

Grga eltrinkis la glaseton, sidiĝis sur la benkon inter la avinoj, tre ektusis, kaj desegnante en la koto per la korneusa bastono latinajn literon, daŭrigis li jene:

„Se vi havus, karaj najbarinoj, idojn tio estas filinojn, mi dirus: enterigu ilin vivantajn, por ke ili Zagrebon ne vidu plu. Ne miru eĉ malmulte. Mi parolas serioze. Profunde ni koton enigis, certe, je mia razilo! Kie estas niaj malnovaj tempoj, kiam estis ĉiuj ĉastaj kaj honestaj, kie? Serĉu ilin kun lanterno. Hodiaŭ? Ĉio sulfure malodoras; ekstere „hi“, malekstere fi!“

„Hodiaŭ portas multaj virgulinan kapkovrilon, kaj kian kufon ili bezonus, por kovri etajn — pekojn. Jes, jes, tiel estas. Certe vi konas la saĝulinon de l' oraĵisto, ĉu ne? Ŝton-sanktulino, ĉu ne? Vere, se ŝian mortan pekon demetos lia sankta moŝto papo!“

„Ĉu estas eble?“, ekbalbutis la butikistino.

„Ĉu danda Dora?“, ekdemandis scivoleme Freyova.

„Jes Dora, Dora, Dora Krupiĉeva. Min kaj mian malriĉaĵon ŝi rifuzis. Ŝi estas tro juna, li diris. Nature, ŝi revas pri sinjoraĵo. Kiel majstrino ŝi gratus sian delikatan haŭteton. Nun? — Nun estas bone, nun ŝi havigis al si la sinjoraĵon, nun mi timas, ke ŝi baldaŭ estos eĉ tro maljuna. Mi malriĉulo, kiel mi estas honesta kaj rigardas tian ĉiun dian kreitaĵon, diris, kiam ŝi antaŭ mia nazo brufermis la pordon: Kion vi volas Grĉjo, ŝi ne estas por vi destinita, certe post la monto ruliĝas ia majstrido. Plie ŝi estis malsaneta depost tia morta timo sur la kapitolo, kaj ne estis tempo pensi pri edziĝo. Tiel mi bonulo pripensis. Sed jes. Oni bezonas nur vidi, kaj mi vidis per miaj propraj okuloj, Dio estu mia atestanto.“

„Kion do?“, ekscitiĝis Barbara.

„Mi hontas eĉ diri tiun hontaĵon antaŭ honesta virinkapo“, kolere frapis la razisto per la korneusa bastono je tero. „Sed ke ĝin oni sciu.“ Ian tagon, ĵus dimanĉon, mi iras en la urbon tra Kamenita vrata. Mi vidas grizulon antaŭ la barilo de Krupiĉ. Al la diablo! mi ekpensis, de kiam sinjoraj ĉevaloj mangas la „burĝan“ herbon. Ke mi vidu. Mi volis ĉe Krupiĉ monerigi la cekinon. Mi en la do-

mon, kaj „bonan tagon“. He miaj najbarinoj, tie estis io vidinda. Ĉasta Dora sur seĝo, ĉirkaŭ la zono ŝin tenas — la juna Gregorianec, kaj kaŭrú kaj kveru, kiel kato printempe, dum Magda, sanktulino Magda sidas kaj ĉion ĉi rigardas. Nu? Kion vi diras! Fi! Honto! Nun vi aŭdis! Sed mi estos ilia edziĝa baptano. Adiaŭ!“ Post tiuj vortoj saltis Ĉokolin kaj ekiris rapidpaŝe kontraŭ la monto.

La avinoj ŝtoniĝis. Eĉ ne readiaŭis la raziston. Fine la manoj kuniĝadis.

„Tio do?“

„Ĉe ni!“

„Kaj Dora!“

„Tiu pura tritiko!“

„Kaj Magda!“

„Tiu sankta kandelo!“

„Kaj maljuna Krupiĉ!“

„Tiu dandulo, kiu diris al mia Andrija en la magistrato, ke lian cerbon korvo eltrinkis.“

„Kiu en la korporacio al junaj majstroj ĉiam prodikas.“

„Terure!“

„Gardu nin Dio kontraŭ mortpeko!“

„Adiaŭ, aminjo Ŝafraniĉ. Mi iras al la bakistino.“

„Adiaŭ, aminjo najlistino. Mi ekserĉos mian maljunulon!“

La avinoj diskuris monden por akrigi la langojn.

Post la razisto ekrapidis paŝon post paŝo la mutulo Jerko. Li atentis, ke lin la razisto ne vidu, sed li mem ne deturnis sian okulon de li. Ĉokolin direktis sin al Medvedgrad. Jerko lin sekvis. Ĉokolin iris s u r la arbarvojeto, Jerko kaŝite en densaĵo apud li. Ĉokolin iradis tra valo, Jerko tra supro. La razisto eĉ ne divenis, ke li havas fidelan akompananton. Ili eliris sur maldensejon, sur plugitan kampon. La razisto iris tra la kampo. Jerko laŭiris kratagan barilon, kvazaŭ li estis alliĝinta al la animo de l' razisto.

Ĉe ekstremo de la maldensejo sub la deklivo

staris branĉiga karpeno. Sub ĝi io nigriĝis. Senzorge marŝis la razisto al la karpeno. Apud ĝi devis turni mallaŭmonten en arbaron. Li venis ĝis la arbo. Haltis — paliĝis. Lin ekregis tremfrosto — sed en momento saltis kvazaŭ lin mordis serpento, ekrapidinte kiel fulmo antaŭen en arbaron. Post arbetaĵo de rozoj sovaĝaj aperis Jerko. Li levis scivoleme la kapon; ĵetis sin surventren ĉe la karpeno, por vidi kio estas. Sub la karpeno ronkis homego, grizeta lipharega, kaj densbrova malafablulo. Post arĝentaj butonegoj elstariĝis la vila brusto. Apud li kuŝis sur la herbo nigreta krutdrapa mantelo borderita per ruga drapo, alta senranda ĉapelo, trikita valizo, pafilaĵoj sur la rimeno kaj peza muskedo. Laŭ la vesto oni diras, ke li estas piedisto de la kroata milicio aŭ haramio. La mutulo ekrigardis la herkuleson kaj iom ekridis. Tian li klinis la kapon teren kaj kiel vulpo ĵetis sin en la arbaron kaj deglitis malsupren laŭ la akvodeŝiraĵujo. Post iom li revidis la raziston. La razisto sin direktis kontraŭ Medvedgrad. Li sidiĝis sur kaŝtanŝtipon por respiri. Eĉ nun estis sur li videbla promorta timo. El la arbaro de l' medvedgrada flanko ĵus penetris ĉevalo, kaj sur ĝi la estro Stjepko.

„Ho razilulo! Kia diablo vin igas ĉi tien?“, ekdemandis Stjepko la raziston.

„Mi ekiris al vi, via moŝto?“, kliniĝis Grga ĝis la tero.

„Por suflori al mi, kiel fartas miaj amikoj zagrebanoj? Ili krevas de ĉagreno? Ĉu ne?“, ekridis Gregorianec. „Aŭ vi venis preni (arhon) la antaŭpagon por novaj novaĵoj, kaŝite sciigitajn al mi pri diversaj sinjoroj.“

„Ne por unu nek por alia“, rediris la razisto, „vin koncernas“.

„Min? Ke ni aŭdu!“

„Sinjorido Pavlo perdis la kapon.“

„Al la diablo! Kaj kiel?“

„En la magazeno de l' oraĵisto li lasis sian kapon, ĉe bela Dora.“

„Ĉe zagrebanino. Ĉu vi freneziĝis?“

„Mi estas malplenstomaka, via moŝto.“

„Aŭ vin soifantan igis iu trans la riveron?“

„Mi estas akravida.“

„Vi do ke vidis —“

„Per miaj propraj okuloj!“

„Fulmotondro! — Kion do?“

„Kiel sinjoro Pavlo dum taglumo estis ĉirkaŭprenanta kaj kisanta la saman junulinon, al kiu li la pasintan jaron estis savinta la vivon!“

„Ho ke la ĉevaloj estus frakasintaj ŝian kapon! Ĉu vi ĝin efektive vidis?“

„Tiel, kiel vin nun.“

La frunto al Stjepko malsereniĝis, kolere altiris li la kondukilojn. Lia tuta korpo tremadis.

„Bone!“ fine li koncizis. „Iru en Medvedgradon; ĝissate manĝu kaj trinku. Baldaŭ mi revenos. Ankoraŭ hodiaŭ vi kunportos la leteron al sinjorino Grubar en Samobor; vi eĉ povos ŝin rakonti, la viditaĵon. Kaj postmorgaŭ ke vi estu ĉi tie. Nun iru, kaj atendu!“ Spronuminte la ĉevalripon, ekrapidis Stjepko post la monton, kaj Ĉokolin al Medvedgrad. Post ili eliris el arbetaĵo Jerko sur la vojon. Iel li estis serena. Li sin direktis orienten — al remeta monaĥejo, al sia loĝejo.

Ĉirkaŭ la dua post la tagmezo la razisto jam rapidpaŝis kontraŭ Samobor. Li portis la leteron por sinjorino Klara Grubar, bela vidvino kaj mastrino de la samobora kastelo. La estro Stjepko kun mallevita kapo promenis tra sia dormoĉambro tien kaj reen. Li estis meditema, tre meditema. Iafoje li haltis ĉe la gotika fenestro kaj rigardis eksteren, kaj tiam repromenis.

„Lacko!“ li ekkriis. La servisto eniris.

„Ĉu estas hejme juna sinjoro Pavlo?“

„Via sinjora Moŝto estas servita!“ rediris la servisto.

„Li venu ĉi tien! Tuj!“

„Via sinjora Moŝto estos servita!“ kaj la servisto foriris.

Senmova staris Stjepko ĉe la fenestro. Li fu-

riozis. Ĉiu lia nervo vibradis. Kvazaŭ li volis pisti Zagrebon kaj filon. Du, tri fojon li karesis la frunton kaj komencis mordi sian barbon.

„En tia marĉo ke disfluu la rivero de nia gento. La knabo freneziĝis! — Freneziĝis! Fulmo trondo — mi sufokus lin! —“

Tiam li komencis mediti ĉiam karesante sian longan barbon.

„Ne, ne tiel mi faros! Ĉi tiun fojon oni ne devas kojnon per kojno. La knabo estas furioza — mia sango, kiel diras Vramec. Ne estas necese ke ekfurioziĝu la malsaĝa kapo, ĝi eniĝus pli profunden en furiozo. Kontraŭ tia veneno helpas nur kontraŭveneno — kaj ĝi estos Klara. Ŝi estas juna, bela kaj riĉa — plie vidvino — rapidvidvino, kiu gustumadis la arbon de sciado (pri bono kaj malbono), ŝi ne estas timema nek malsaĝa kiel knabinoj, kiel Pavlo. Bona hoko. La fiŝo devas ĝin ekmordi.“ Tiun momenton la pordego senbrue malferniĝis. Timeta kaj iom konfuzita eniris Pavlo.

„Ordonu, sinjoro patro!“ humile almetis li.

„Ĉu vi estas?“ rediris Stjepko turninte iom la kapon. „Venu ĉi tien pli proksimen!“

Pavlo ekpaŝis al la patro. Stjepko staris antaŭ la filo kaj lin fikse okulmezuris.

„Pavlo!“ diris li kviete „via cerbo staras kurbe. Oni parolas ĉiaspecon pri vi. Vian cerbon formentis burĝa knabino. Ĉu ne vere? Ha! Vi paliĝis. Vero do.“

„Sinjoro patro —“ ekparolis la junulo.

„Silentu, aŭskultu! Vi ne bone agas. Vi estas senkapa muŝo. Mi cerbumas kaj klopodas, ke nia gento estu granda kaj forta, dum vi sensence vagas — vi lunatikulo. Ĉu vi ne hontas malpurigi sin per plebeja balaaĵo? Vi unuanaskito de l' glora gento, kaj tie la knabino sen nomo. Se vi aĝe maturiĝis por edzino, — edziĝu! Min ĝin ne baras. Je unu okulsigno vi havas centon da belaj kaj nobelaj — eĉ pli belaj, ol tiu floro de zagreba balaaĵujo. Eĉ devojiĝojn mi vin pardonus, se estus aliloke. Ĉu Gregorianecoj ne havas sufiĉe da servutuloj, ĉu

la servutuloj ne havas sufiĉe da edzinoj? Sed ĝuste en Zagreb! Dume dum mi luktas kun burĝa mizeraĉo, mia filo karesas kaj lulas zagreban knabinaĉon. Bele vi nobeligos vian genton! Kio do de tio? La oraĵist-bastardoj portos la vizaĝon tra la mondo. Fi! Honto!"

„Haltu, sinjoro patro!", fiere la junulo rektiĝis la kapon kaj lia pala vizaĝo ruĝiĝis. „Via postesigno ne estas prava. Min ne instigas pekema sango. Je Dio mi ne makulus mian nomon per ia trompiĝo. Ne tuŝu la helan vizaĝon, similan al la ĉiela heleco. La filo kliniĝegas antaŭ sia patro, sed la nobelulo devas forpuŝi ĉian makulon, kiun oni ne prave ĵetas sur alia honesto, precipe, kiam la honesto ne estas defendebla glave. „Aŭskultu min favore, ho patro! Mi vidas, ke vin la spionoj pri ĉio sciigis, kaj mi diros al vi ankaŭ plion kaj pli bone. Mi ne scias simuli nek ceremonie sufoki mian koron. Kian min la patrino naskis, tia mi estas, kaj dank' al Dio. Kian animon Dio min enspiris, tian mi publike prezentas. Kion mia okulo montras, ĝin mi vidas, kien la animo inklinas, tien mi cedas. Mi ne estas la monaĥino, ŝelanta la sanktan rozarion kaj pensanta pri la diablo. Kion vi volas? Mia animo forskuis sin de la sinjoraĵa fablo. Mi iras tra la mondo, la mondo estas mia leĝo. Kaj tiu mia okulo montris al mi Doran de Krupiĉ, tiu mia animo inklinis al Dora. Kiam mi ŝin savis el certa morto, kiam ĉi tiuj miaj manoj ektuŝis ŝin duonvivantan, mia koro ekbolis kiel flama ĉevaleto. Kaj la animo min diris: Vidu, ĉu ĉi tiu frunto ne estas glata kaj blanka kiel tiu en aristokrataj kasteloj? Ĉu ne estas ĉi tiuj harligoj silkaj, tiuj ĉi lipoj luksaj kaj molaj, tiuj ĉi fingretoj maldikaj kaj rondaj, kiel ĉe fieregaj fraŭlinoj, kiun vi renkontas en la patra kastelo. Jes kaj centfoje jes! diris mia animo. Jes kaj centfoje jes, batis la koro. Kaj mi inkliniĝis al la virgulino kore kaj anime — sed al virgulino, ĉar mian ardantan koron ĉirkaŭas la harda kiraso — honoro kaj honesto."

En la vizaĝon de Stjepko sango penetris.

„Ho sinjorido, via lango alten eksvingis! Kaj kia ebria monaĥo instruis vin pri ĉi tiu prediko?", ekridis dumĉagrena Gregorianec.

„La koro, patro — la koro!"

„Kaj vi ke estas mia filo, — mia sango — Gregorianec? La parenco de tiu Gregorianec, kiu glorigis la zagreban mitron? Efektive, se via nobela vizaĝo ne montrus, el kies branĉo vi elkreskis, mi suspektus, ke via patrino, gravediĝinte per vi, perfidis geedzan kuŝejon de sia leĝa edzo."

„Patro, ne blasfemu!"

„Aŭ ĉu vi, malsaĝulo, fakte volas intermiksiĝi en la negocaĉa korporacio? Jes, mi jam vidas vin ĉirkaŭfosanta per la sabro la ĝardenon de via inda bopatro, aŭ vin sur la grizulo portanta la brokantaĵon al la foiro kriante: „Aĉetu, aĉetu da nobela komercaĵo por unu, por du groŝoj. Sed tiel vi ne faros, je mia animo, ne. Pavlo, vi scias, kia estas via patro. Harda fero. Pavlo, ne igu tiun feron fandiĝi, ne ŝiru la kondukaĵon, per kiu vin patra mano kondukas, ĉar je kredo al Dio, se vi ne delasas la malsaĝan vagadon, se vi ĉiame vizitos tiun oraĵistan knabinaĉon, mi hundojn kontraŭ vi incitos."

„Ne ĵuru, sinjoro patro! La amo subite invadis mian koron. Ĝi ekokupis min, min eksorĉis. Se mi taŭzus el mia animo la amarbon, mi taŭzus ankaŭ la radikon — la koron."

„Malaperu for de miaj okuloj, vi degeneraĵo de l' mia gento!", ekkriaĉis furioze Stjepko, saltinte por depreni la buzdovanon[1] de l' muro.

Pavlo ektremis. Malbono povus okazi. Kaj li ekiris al la pordo.

En momento Stjepko mallevis manon. Li rememoriĝis, ke li ne intencis ekkoleriĝi je filo, ke lin trompis la sango.

„Haltu!", pli kviete li ekparolis. Kaj la junulo haltiĝis.

„Pro servutuloj de Samobor mi havas ian kalkulon kun sinjorino Grubar. Antaŭ ne longe mi skri-

[1] Buzdovano, bastonego kun sespinta kapo. N. d. t.

bis al ŝi. Selu tuj la ĉevalon, kaj al Samobor! Klarigu la aferon, ĉar alie ne revenu. Iru!"

„Mi iras. Adiaŭ, patro!" rediris la junulo kaj foriris.

Ebriigita ekrapidis Pavlo al la arbaro. Liaj okuloj bruladis, la cerbo frapadis je kranio, kaj kvazaŭ monto kuŝis sur lia brusto. Al li estis, kvazaŭ li viva enabismiĝos. En la apuda arbusto komencis najtigalo belkanteti; Pavlo aŭdis nur kriaĉadon. Li ĵetis sin ekster si teren. Li volis pensi. Vane. Antaŭ liaj okuloj fulmadis, sub la gorĝo io sufokadis lin, kaj la kapo krevonta. La frunton li eniĝis en malvarman teron. Vane. Li saltas, ekrapidas al la kastelo.

„Selu la ĉevalon!", li ekriis. Li sursidis la grizulon kaj ekrapidis al la arbaro, kvazaŭ de inferaj fantomoj persekutata. — Kvieta estis la vespero; eĉ zumeto ne estis aŭdebla. Super densa branĉaro ekfulmis la stelo post la stelo. En malluna arbaro silentego. Nur la mueleja rivereto frapas la branĉaron, nur la piedfrapado de la ĉevalo de Pavlo eĥas en la silentego. Pavlo eliris el la arbaro sur la vojon. Oriente de Posavina*) paliĝadis flava ĉielo, kaj sur la ĉielo suriris la flamsanga luno. Sed en momento ŝovis la grizĉevalo siajn orelojn antaŭen kaj komencis tremi pro teruro. Longa ombro sternis sin transverse la vojon. Kvazaŭ el tero elkreskita, aperas grandegulo. La lunlumo rebrilis de l' brilaj butonegoj, kaj la nigraj okuloj flamis per neordinara ardo.

„Kiu dia vi estas!" ekdemandis Pavlo.

„Dia helpo al vi, juna sinjoro! Miloŝ mi estas", rediris la grandegulo, apogante sin je longa pafilo.

„Ĉu vi, mia Miloŝ! De kie dumnokte?"

„De Zagreb. La suno trompis min kaj mi irante de Komogovina malfruiĝis."

„Kiel do fartas la viaj hejme?"

„La tuta parencaro estas sana, dank' al Dio

[1] Lando apud Sava. N. d. t.

kaj sankta Nikolao! Sed io min puŝis for de la domo! Ĝi estas malplena. Mia Mara ne estas plu —"

Haramio eksilentis, klininte la kapon. Ĉu larmo estis, aŭ kio? Dio scias.

„Nu", distriĝis la heroo, „ĉiaspecon mi aŭdetis irante tra Zagreb. Tie bolas, je mia stelo. Oni ribelas kontraŭ via patro pro ia proceso — aŭ pro kio. Ĉiuj foriris al magistrato en kunvenon."

„Ĉu ĉiuj?"

„He jes!"

„Krupiĉ ankaŭ?"

„Ĉerte do."

„Aŭdu min, Miloŝo!", almetis pli mallaŭte Pavlo, „mi estas forironta Samoboron okupita per urĝa afero."

„Ĉu mi iru kune kun vi?"

„Mi sola iros. Post kelkaj tagoj mi revenos. Vi vizitadu Zagrebon. Atentu, kio tie okazas, precipe ĉirkaŭ la domo de l' oraĵisto, por ke vi sciigu min pri ĉio — pri ĉio! Adiaŭ!", kaj Pavlo fortrotis.

„Kun Dio ekiru, ho estro!", rediris Miloŝ rigardante post Pavlo. „Hm! la diablo konu mian estron. Daŭre de mia vivo tiun strangulon mi ne renkontis. Li sovaĝiĝis kiel monta lupo."

La giganto malrapide malsupreniris tra arbarvalo. Kaj li komencis plorkanti malgaje, funebre, tiradante longen, kvazaŭ ŝiriĝas guto post guto de l' sango de lia koro. En la monta profundo mallaŭtiĝis lia malgaja kanto.

Kaj pli alten suriris la sanga luno.

En zagrebaj stratoj eĉ unu animo. La pordisto dormetante malfermis al Pavlo la urban pordegon. La junulo ekrapidis tra Kamenita vrata. Ĉu al la onklino por tranokti? Jes, sed pli malfrue. En la ĝardeno de l' oraĵisto estis luksaj floroj, staris senmovaj arboj. Eĉ bloveto ne tuŝis la branĉojn. Sed de blanka stipo, kaj kronforma tilio naĝis tra la aero balzamodoro, ebriigonta vian animon. Malantaŭ la tegmento flugpendis la luno, super la folioj kaj floroj verŝiĝadis blueta lumo, kaj antaŭ la domo sterniĝadis la ombro. La junulo haltigis la ĉevalon, por

vidi kie ripozas lia deziro. Sed jen! Ĉu io ne blankiĝas post la ombro? Jes. Ĉu virino? Du virinoj. Sur la benko antaŭ la domo Dora atendas la patron, kaj sur la ŝtuparo apud ŝi sidas ŝpinanta Magda. Ĉu la patro baldaŭ venos? Dio scias. La burĝaj sinjoroj konsiliĝas iel sekrete ĉe la juĝisto. Aŭdu! Kio ĝi estis?

„Jesuo!“, ekkriis Dora, kovrinte la vizaĝon per siaj manoj.

Antaŭ ŝi staris Pavlo. La ombro malkovras lian korpon, sole ĉirkaŭ lia kapo naĝas la ora lunlumo.

„Dora! Mi estas!“ almetis la junulo mole, klininte la kapon al la knabino.

Magdan perfidis la spiro. De timo ŝi palpebrumis kaj strange kapumis.

„Vi?“ komencis mamureti la maljunulino, „sinjora moŝto! Kaj nun? Je diaj vundoj. — Kaj kiel fungo vi elkreskis antaŭ ni! — Dio, liberigu min de granda timo! — Sed ĝi ne estas bona — neniel! Iru, malbono estos. Se la baptano tiel —! Helpu min sankta Blaĵ!“

„Foriru, sinjoro Pavlo!“, ekspiris la junulino terureme, levinte la manojn.

„Dora!“, rediris vivece Pavlo, preninte la manon de junulino, „ke mi foriru? Ĉu mi povas?“

„Ve, ve, Dio, Dio!“, anserblekis la maljunulino. „Honto, hontego! Honoro kaj respekto al vi sinjora moŝto dumtage, tra la pordo, jes! Sed nokte trans la barilo, kiel ŝtelisto, pardonu, estas peko kaj honto. Tia regulo ne ekzistas en sankta Skribo eĉ por sinjoroj!“

„Baptopatrino!“, riproĉis ŝin Dora.

„Tia regulo ne ekzistas. Eniru la domon, tuj eniru la domon. Se la patro — li ja min mortigus! Dornjo, kara Dornjo, iru en la domon. Dio, Dio! — Se vin vidus la mortinta patrino!“

„Sinjoro Pavlo foriru, se vi Dion kredas!“, subparolis Dora forprenante de li sian manon.

„Mi iros. Sed aŭskultu min. Nur vorton. Mi devas. Sangtranĉilo eniĝis hodiaŭ mian koron, mi estis malbenonta la tagon, en kiu min la patrino estis

naskinta. Mallumo falis sur miajn okulojn, ŝtono sur la koron, al mi estis, por entombiĝi viva. Sed nevidebla mano ŝovis min el la malespero, ĝi portis min antaŭ vin, ho knabino. Se propra frato barus min la vojon al vi, mi estus lin mortiginta. Ripoĉu min, ke mi eniris ĉi tien kiel krimulo, ripoĉu! Ĝi estas vero. Mi deziris vidi sole vian domon, ekrigardis vin. La koro min superregis. La koro, mia Dora, — kiu gardas en si trokaran talismanon — vian nomon. Kio estas mia volo, — kio forto — kio prudento? Ĉio ĉi estas vi nur, mia knabino! Kiam mi rememoriĝis tiun feliĉegan momenton, en kiu ekfluis de vi amlarmoj malsupren de mia frunto, mi pensis, ke ĝi estis nur sonĝo — pri paradizo, pri Dio. Sed nun mi estas ĉe vi. Tio ĉi estas via mano. Nun estas bone al mi. Ho knabino, ne faru, ke ĉio ĉi estu nur sonĝo, diru, pro viva Dio, ke vi min amas. Juru, ke vi min neniam malfidos, kiel ajn oni nin malkuniĝus. Kaj jen mi ne fianĉigita prezentas mian nobelan manon, ke mi estos nenies krom via — kaj mi ne vidu vizaĝon de Dio, se mi ne estas honesta kaj ĉasta.“

„Ne parolu, ne parolu, Pavĉjo“, rediris la junulino tremante en larmoj, „jes, jes via mi estas, sed ne parolu, mi estas trofeliĉa!“

Kaj ŝi sin ĵetis en liaj brakoj, kaj repuŝas sin el liaj brakoj ekĝeminte:

„Adiaŭ, Pavlo! Jen min, baptopanjo!“

„Pardonu niajn pekojn, ho kompatema Dio!“, ekmurmuris la maljunulino kaj foriris kun Dora en la domon.

Pavlo rapidis sur la ĉevalo al sia noktejo.

La luno kaŝis sin post la nubo. Ĉe la angulo staris longulo — Ĝuro Garuc — tiun fojon kiel noktgardanto kun granda helebardo.

Kiam lin terura rajdisto preterrajdis, krucosignis sin la longulo kaj ekmurmuris:

„Vidu! vidu!“

VII.

Malantaŭ la magazeno de Krupiĉ estis vasta ĉambro. Tie li ekceptadis siajn gastojn — ĝi estis lia sanktejo. Memkompreneble ĝi ne estis aristokrata salono, sed enirinte ĝin oni laŭ ĉio rimarkis, ke oni eniris la domon de bonstata burĝo.

La ĉambro mem estis longforma, neĝe kolorigita. Lignaj plafon-bretoj estis dubenigre ŝmiritaj, kaj tra du malgrandaj, per ferkrado provizitaj fenestroj, penetris malmulte da taglumo, la ĉambro do similis al duonmalluma kapelo. Malantaŭe en angulo etendiĝis grandega argila forno, kaj sur ĝi estis lanfaskoj, semaĵo kaj granda botelo da griota vinagro. Apud la forno pendis stranga bildo, kaj sub ĝi tagon kaj nokton brulis malgranda arĝenta lucerno. Unuamomente ne estis ĝuste distingeble, kies estas ĉi tiu bildo, ĉar ĝi antikvece estis eluzita kaj per si mem sufiĉe kruda. Sed juĝante laŭ la orŝlosiloj, kiujn tenis barbhava sanktulo, ĉiu divenus — ke la pentristo probable intencis precize prezenti la vizaĝon de sankta Petro. Malantaŭ sankta Petro staris palmobranĉo depost lasta Palmofesto, por gardi la domon kontraŭ fulmo kaj tondro. Sur la muro pendis ankoraŭ latuna pladeto por sankta akvo, grandgrajna rozario kaj peza pafilo. Sur la breto brilis stanteleroj kaj pladoj — tiamtempe videbla signo de bonstato — kaj en la murkavo malantaŭ vitra kesto blankiĝadis malaltaj ventroformaj majolikaj kruĉetoj, kolorigitaj per bluetaj floroj.

Iom pli malproksime staris alta ŝranko ladita en latunfloroj, kaj sur ĝi elgravurita la nomo de l' feliĉega virgulino Maria kaj jaro 1510., kaj ĉe la ŝranko granda fera kesteto. De la meza trabo pendis vitra ujo kaj en ĝi girlando, sub kiu la mortinta majstrino Krupiĉ edziniĝis. Sur la plafonbretoj strange vidiĝis la blazono de zagreba arĝentista korporacio — arĝenta incensilo kaj ringo en blua kampo. Sed la plej bona signo, ke tie gastojn oni akceptas, estis la longa tablo meze de la ĉambro, kaj ĉirkaŭ ĝi lignaj

mallume kolorigitaj seĝoj, kies apogiloj korforme estis tranĉitaj.

Kaj hodiaŭ estis tie ĉi da gastoj kaj da brua amuzo. Unue Pavlo Arbanas el Lomnica la edziĝa baptopatro de Krupiĉ, grizeta hometo, kun malakra nazo, subtranĉitaj lipharoj, grizokuloj, dikaj brovoj, blue vestita de l' kapo ĝis kalkanoj, ridetante ĉiam ĉu sobra ĉu malsobra. Estis kuniĝinta ankaŭ la nova urba juĝisto Ivan Teletiĉ, maljunulo neĝeblanka, luneplena, libresaĝa, plumbepeza. Kun li venis ankaŭ la urba notaro Niko Kaptoloviĉ, altkreska, kurbita, maldika, ne juna nek maljuna, sed ruĝetokapa kaj ruĝetoliphara, kaj laŭ la nazo — vera talpulo. Fine altabliĝis ankaŭ la urba kapelano Petar Šalkoviĉ, viro alta kaj forta, razita kaj flegma.

La gaja rondo jam trifoje malplenigis la kruĉon sur la tablo, kaj Dora ĝin jam kvaran fojon estis pleniginta. Nenia miro, ke plenvoĉe oni priparolis ĉiaspecajn sekretojn.

„Kiu estus ĝin ekpensinta", ekfurioziĝis Kaptoloviĉ levinte kvin fingrojn kaj sian pintan nazon, „i n h i b i c i o, protesto, ĉio laŭdeve, c a u s a r e c t e e t s t r i c t e l e v a t a s e c u n d u m l e g e s p a t r i a e[1], plie miaj brilaj argumentoj! Ĉu vi scias, ke mi por ĝi elspezis rismon da papero kaj por tri denaroj da inko! Mi diris pri ĉio klarege, kion oni devas diri a d i n f o r m a n d u m c u r i a m,[2] pri ĉiuj niaj liberoj komence de Bela IV. ĝis la hodiaŭa tago. Mi kredis, ke mia akra plumo trafos sinjoron Gregorianec ĝuste en la koron. Kaj kio? Kaj kio? Kiam oni lin citis antaŭ tribunalon, li eĉ ne venis, kaj kiam oni lin juĝis, li restis prava! T r i u m p f a v i t![3] Kaj bela medvedgrada bieno „gigs" al la nobela urbo kiel glata petromizo el la mano. Mi demandas: Kiel ĝi estas ebla? Q u o j u r e?[4] ekkoleriĝis la notaro ŝovinte la kapon kaj manon al-

[1] Proceso ĝuste kaj ekzakte levita lau leĝoj de la patrujo.
[2] Por informi la reĝan tabulon.
[3] Li triumfis.
[4] Je kia rajto (kiarajte).

ten. Post tiuj vortoj li mallevis sin al la seĝo, senspire eltrinkis kruĉeton da vino kaj okulmezuris ĉiujn gastojn per glorema okulo.

„Mi ne miras pri via rismo da papero, nek pri via akra plumo, aŭ pri viaj brilaj argumentoj, kara Niĉjo“, almetis dika juĝisto tenante sian zonon, „sed pli multe mi miras, ke tiu ora argumentum ad hominem, kiun vi ricevis de mia antaŭulo el la urba kaso, por ke nia pravo estu al la juĝistoj pli klara, kiam vi estas ekirinta Poĵunon — ke tiu ora argumento ne falis sur la pezilon de l' justeco, kaj ili nin por tiel diri kuirigis.“

„He, homo diras, Dio disdonas,“ aldonis Pavlo Arbanas, levinte sian dekstran kaj mallevinte ĝin sur la dekstran genuon.

Aŭ vice versa: homo disdonas, juĝo elektas, pardonu min!“, rediris ruĝetokapa Niĉjo, iom pikita.

La kapelano sidis ĝis nun kiel vera ŝtono. La piedojn li etendis sub la tablon, kaj tamburis sur la tablo aprobante ĉies parolon per kapoklinado. Dum tiu okupado li ŝvitegis, jen strečante, jen malstrečante la dikajn brovojn, videbla signo, ke iun aferon li tre serioze pripensas. Fine li diris:

„Estote sapientes sicut serpentes“ tio estas: havu da salo en la kapo, diras sankta Skribo. Nur la eterna leĝo estas klara kaj hela kiel tiu ĉi vino sur la tablo. En ĝi ĉiu punkto kojnestaras, kaj kiu per malsaĝa spekulacio tuŝas tiun kojnon, ties animon duone aĉetis la lucifero, id est la diablo. Jus humanum, do, id est tiu ordono, skribita per malforta homa mano, estas rompebla kaj detruebla verko. Jus humanum — kvankam mi konas sole la ordonojn de sankta patrino Eklezio — jus humanum laŭ mia eble ne kompetenta juĝo estas dufina bastono, kaj kiu tenas ĝian unu finon, tiu tenas ankaŭ la duan kaj senkompate argumentas sur la dorso de sia kontraŭulo. Kaj kiam du malpaciĝas, estas nature, ke unu devas esti prava kaj alia malprava. Mi do eĉ plej malmulte dubas, ke la

reĝa tabulo devis al unu aljuĝi, kaj la alian juĝi, ĉar ankaŭ estas klara, ke, lupo sata kaj ŝafo ne manĝata, ne povas esti. Ke la nobela urbo malgajnis, estas sole nura hazardo, okazinta nur tial, ĉar sinjoro Gregorianec gajnis.

„Ĝi estas vero, vero“, jesis grave Arbanas.

„Nego, admodum reverende — nego!“, saltis la ruĝeta notaro kontraŭ kapelano, kiu mirigite malkuntiris siajn brovojn kaj larĝe malfermis la okulojn. „Mi neegas la diriton nun de vi. Mi kiel jura defendanto devas demandi: Kiel, kial kaj laŭ kio? Titulus, titulus, en tio kuŝas la leporo! Tio estas tiu anso, kiun mi firme tenas en la mano, kiel jen ĉi tiun kruĉon. Oni nin ne aljuĝis okupi Medvedgrad'on, kaj ni proceson renovigos ex radicalitate juris,[1] eĉ se ĝi centon da jaroj daŭros. Certe ni ĝin faros.“ Kaj Kaptolovič pugne brufrapis la tablon.

„Ne, ni ĝin ne faros, sinjoro notaro!“, flegme rediris la dika juĝisto, dank' al Dio, ke ni nin liberigis de ĉi tiu malfeliĉo. Aŭ vi volas, ke ni vendu urban arbaron por proceselspezoj et caetera — kaj ke ni hejtu la fornojn per pajlo! Belan dankon! La diablo nin instigis, ke ni ekklopodis tiun malfeliĉan ursan neston. La niaĵon ni gardu la fremdaĵon ne rigardu. Jes, jes! Vi ne miru, ke mi tiel parolas. Ne gratu nin, kie nin ne jukas.“

Maljuna Krupič, inda maljunulo grizhara, kun firma muskolaro, sidis iom meditanta apogante la kubuton je la tablo. Fine li levis sian serenan, ruĝan vizaĝon, ektordis blankajn lipharojn, kaj komencis:

„Pardonu, mi scias legi nek presitajn nek skribitajn librojn, aŭ scias, kiel oni juĝas laŭ skribita juro. La martelo estas mia plumo, kaj mi skribas sur la amboso. Sed dank' al Dio mi sufiĉe trairis la mondon, vidis bonon kaj malbonon, kaj laŭ mia propra prudento juĝas mi pri praveco. Eble vi ridos, ke mi senbridigas mian langon inter instruitaj

[1] El la radiko de la juro.

sinjoroj. Ne prenu malbone se mi eble de l' koro ion blekos; vi sinjoroj, komprenas ĝin pli bone, ĉar por kio utilus vin via latinaĵo? Sed mi kredas, ke la veron oni povas eĉ per simpla kroataĵo esprimi. Mi do tiel opinias pri tiu afero. En malnovaj skribaĵoj, vi diris, estas skribite, ke Medvedgrad estas nia, kaj ĉiu medvedgrada bieno ke estas nia. Povas esti; tion scios nia instruita sinjoro notaro pli bone ol mi. Sed mi vin demandas, ĉu ni iam posedis Medvedgradon. Ne. Jen vi vidas. Tio estas vera plado sen manĝaĵo, osto sen karno. Ĉiaokaze estus pli bele, ke ni ĉion ĉi havus, ankoraŭ pli bele, ke la tuta mondo estu nia. Sed bona Dio destinis, ke ne ĉio apartenu al unu valizo. Niaj sinjoroj tre heroiĝadis kontraŭ maljuna Gergorianec pro tiu proceso, ili heroiĝas ankoraŭ nun. Mi ĉiam parolis: de tio ne fariĝos kuko, ni lasu la aferon en paco!

Kaj vi estis maltrankviliĝintaj je mi, ke mi tion ne komprenas, ke nia pravo estas klara, kaj ke nin helpos maljuna Tahi; mi silentiĝis kaj en angulon. Vi diris min, ke Tahi havas multon da amikoj ĉe la reĝa tabulo. Sed mi pensis, se la juĝistoj estas tiaj, kiaj ili devus esti, ili devas laŭleĝe juĝi, kaj leĝo havas nek amikon nek malamikon. Dume la reĝa tabulo juĝis. Ni malgajnis — tiel estas, ne alie. Kaj Gregorianec estas fiera, riĉa, venĝema kaj kolerikulo. Depost kiam staras la unua ŝtono de Zagreb, la nobela urbo ne havis tian sangavidan malamikon, kia estas al ĝi la estro de Medvedgrad. Se estos okazo, li venĝos sin, kaj se ĝi ne estos, ĝin Stjepko trovos. Ni estas la dorno en lia kalkano; la tribunalo eltiris la dornon, sed restis la vundo. Ne ekscitu la vundon, estos malbone. Lasu lin en paco. Se li tuŝos la urbon, nian landon, niajn privilegiojn, ha tiam. Tiam kun martelo la kapon, tiam, kvankam mi estas maljuna kaj kaduka, ankaŭ mi saltus, ne kun plumo, ne kun papero, sed kun pugno, sinjoroj, jes kun pugno! Tial ni ne devas senokupiĝi, sed oni devas labori, por ke ni en neceso havu forton kaj amikojn. Sinjoroj Zrinski envere de antaŭe ne estis niaj grandaj

amikoj. Vi scias mem, kiel akre kontraŭ ni estis saltinta la mortinta banuso Nikola. Sed nun estas alie. Lia filo, sinjoro taverniko Ĝuro, volas al ni bonon. Vi mem konkorde konkludis, ke ni faru al li ian honoron, ke ni donacu al li je urba kosto arĝentan pokalon por lia edziĝo kun Anka Erdödi.[1] Vi ja diris al mi ke mi ĝin ellaboru. Ni haltu nin ĉirkaŭ li, lasu Gregorianecon en paco, sed ni haltu Ĝuron, kaj antaŭ ĉio ni haltu la niaĵon. Tiel mi rezonas."

„Tiel estas!", kapjesis la juĝisto Teletiĉ frapinte la oraĵiston sur la ŝultro. „Vi, majstro Petar, ne legis ja instruitajn librojn, sed tamen vi parolas kiel libro, ĉar vin Dio donis sanan kaj pravan prudenton."

„Tiel estas", kapjesis ankaŭ Pavlo Arbanas, okulangule palpebrumante al la majstro Krupiĉ.

La kapelano, kuntiriginte la brovojn, karesis sian ventregon, kaj senhalte kapjesadis por signo, ke ankaŭ li konsentas la paceman opinion de la plimulto.

„B e n e, b e n e", ekmurmuris malkontente Kaptoloviĉ, „vi estu kvietaj ŝafidoj, estu! Sed kion diros la indulgemaj burĝoj de la nobela urbo kaj korporaciaj majstroj, mi ne scias. A p e l l a t i o a d p o p u l u m,[2] ĝi estas diabla afero. Kaj pri vi, majstro Petar, mi scias, kial vi estas tiel kvieta kontraŭ Gregorianecoj. La juna Pavlo savis vian solfilinon, kaj vi ne emas malpaciĝi kun ili."

„Haltu, sinjoro notaro!", ekbaris Petar lian vorton, saltinte sur la piedojn. „Honoron kaj respekton al vi, sed kion vi diris pri Dora, estas pura mensogo. Mi kore amas mian filinon, ja kiun cetere mi amu? Mi dankas junan Gregorianec, ke li savis mian solfilinon el certa morto, kion vi certe kun via akra plumo ne estus farinta, kaj mi volonte akceptas lin en la domo, sed mi estas patro sole sub mia tegmento; ekster la domo mi estas burĝo kaj Dio ne pardonu miajn pekojn, se la ĝenerala utilo danĝe-

[1] Legu: Erdedi.
[2] Apelacio al l- popolo.

rus pro mia patreca amo. Pro tio mi tiel parolis, ĉar al mi tio mia prudento diras, kaj tial, ke mi ne volas ke oni fosu per granda monsumo nevideblan trezoron, kiu eĉ tere ne ekzistas."

„P u n c t u m!", saltas nun la dika juĝisto. „A d v o c e m la arĝentan pokalon por la edziĝfesto de sinjoro taverniko! Ĉu vi ĝin finlaboris?"

„Certe, sinjoro juĝisto", rediris la maljuna oraĵisto, iom sereniĝinte.

„Ke ni vidu vian majstraĵon!", almetis la juĝisto.

„Dora! Dornjo!", ekriis la oraĵisto ĉe la pordo alportu al mi la ŝlosilon de la kesto. Ĝi estas en la kamero!"

Post kelke da minutoj aperis Dora, forta kaj bela. La nigraj harligoj falis malsupren ŝia blueta korsaĵo, dum sur ŝia brusto blankiĝis pura antaŭtuko, kaj ĉirkaŭ kolo ruĝiĝis ses vicoj da ruĝa koralo.

„Kion vi ordonas, paĉjo", ekdemandis ŝi la patron.

„Malfermu do la keston, kaj elprenu la arĝentan pokalon por sinjoro taverniko."

La junulino tuj genufleksis antaŭ la fera kesto kaj elprenis el tolaĵa ĉifono grandan arĝentan, riĉe origitan pokalon metinte ĝin sur la tablon.

La pokalo havis la formon de granda lilio. Sur unu flanko estis tabuleto, kaj sur ĝi meze de florkorono estis engravuritaj du blazonoj: du aglaj flugiloj kaj kastelo kun turo, blazono de Zrinjski'oj, kaj en la alia cervo sur rado, blazono de Bakaĉoj. Sub la blazonoj estis ĉizitaj jenaj literoj: „G. C. a Z. et A. C. ab. D. C o m u n i t a s M o n t i s G r e c c e n s i s D. D. A. 1576." tio estas: Al Ĝuro princo de Zrinski kaj al Anka princino de Erdödi komunumo de Griĉmonteto donace prezentas. Jaro 1576." Sur la alia tabuleto estis lerte elgravurita dio Himen, kondukanta per florĉeno Amoron.

„O p t i m e, o p t i m e, e x i m i e,*) majstro Pe-

[1] Tre bone, eminente.

tar!", ekkriis ravite la juĝisto, ke lia mentono tremetis, „oni vidas, ke vi estas majstro."

„Vere tre bela, ho amiĉjo!", jesis la maljuna Arbanas.

Sinjoro Ŝalkoviĉ stariĝis super la pokalo, kaj per unu okulo ekrigardis en profundon, kvazaŭ mezuronte kiom da ora vinroso staros en tiu ĉi arĝenta lilio.

„R e v e r a!",[1] ekparolis la kapelano, levinte la kapon al majstro Krupiĉ, kiu fiere rigardis ridetante sian laboron, „r e v e r a, ĝi estas vera „p o c u l u m c h a r i t a t i s" aŭ ampokalo, kaj la ruĝaj lipoj de ŝia fraŭlina moŝto Anka de Erdödi ne malmulte dolĉiĝos, sorbante oran ambrozion el ĉi tiu arĝenta floro."

„Ĉu ankaŭ viaj lipoj, virgulino Dora, ne dolĉiĝos per ora guto el arĝenta pokalo, kiam vin alvokos dio Himen en sian templon, aŭ pli klare parolante, kiam vi edziniĝos?", turnis sin la ruĝhara notaro kun dolĉa vinrido al la filino de l' oraĵisto.

La junulino paliĝis, kvazaŭ ŝi ion rememoriĝis, sed rapide ŝi rekonsciiĝis kaj energie rediris al Kaptoloviĉ:

„Pardonu min via sinjora moŝteco, sinjoro notaro! Ni virinoj ne komprenas tiun trosaĝan anekdoton, kaj mia cerbo en via parolo nur kelkion trovis, kiel blinda kokino grajnon. Se vino ĉe mia edziĝfesto ne estos acida, miaj lipoj dolĉiĝos. Sed el arĝenta pokalo mi ĝin ne sorbos; por ni burĝaj knabinoj ankaŭ ĉi tiuj majolikaj taŭgas. Oni ne devas fieriĝi, ĉar fieriĝo estas peko antaŭ Dio. Sed kiu pri tio estus parolanta, tio estas malproksimaj kalkuloj!"

„Jen, jen! vidu vi Dornjon!", ekridis la kapelano, „de kie al vi la delikata akrigilo, ke via langeto estas tiel akra?"

„Ĉu vi scias kion!", ekkriis Teletiĉ, „benu ni la pokalon, ni ĝin aĉetis, kial ni ĝin ne benus?"

[1] Vere.

„Bene dixisti!“[1] rediris ravite la kapelano kaj kiel eble plej rapide verŝis da vino en arĝentan pokalon.

„Dio vivigu la majstron!“, levis la juĝisto la pokalon eltrinkinte ĝin tute kaj post li la kapelano. Nun estis vico de Kaptoloviĉ.

„Nu sorbetu, Dornjo!“

„Dankas, mi ne trinkas vinon.“

„Sed sorbetu nur!“

„Kiam mi perforte devas, nu trinku unue vi, sinjoro notaro. Mi trinkos post vi, kaj mi divenos viajn pensojn“, rediris sagace la junulino.

„Estu tiel!“, jesis ĉiuj. Kaptoloviĉ glutetis, kaj post li iomete Dora.

„Nu, pri kio mi pensas?“, ekdemandis la notaro.

„Jes, pri kio li pensas?“, ripetis ĉiuj.

„Via sinjoreco — sed ne ĉagrenu pro tio — via sinjoreco pensas, ke vi estas la plej saĝa kapo en tuta Zagreb.“

Dum la urbaj sinjoroj tiel amuziĝadis ĉe la majstro Petar, la baptopanjo Magda sidis laŭ kutimo en sia budo. Estis bela, hela posttagmezo, kaj la maljunulino sunumis sin kiel lacerto. Kelkfoje ŝi ekoscedis, kaj oscendinte krucigis la lipojn, kelkfoje ŝi forpelis kelkan enuigan muŝon.

Sur la placo neniu estis, la popolo ĉeestis ankoraŭ la vesperan Diservon, sole sur la suba ŝtuparo antaŭ la preĝejpordo sidis la lipharegulo Miloŝ Radak, kaj apud li kuŝis lia fidela pafilo. Jus li tiumomente ne okupis sin je heroaĵoj. Li per sia tranĉilo prilaboris grasegan pork-ripeton, po kelkan fojon mordante kukon el la forno de Magda. Dume li malmulte zorgis, kio okazas ĉirkaŭ li.

Fine la orgeno malsoniĝis. La popolamaso komencis eliri la preĝejon. Eliris ankaŭ la aminjoj Frey kaj Ŝafraniĉ. Ankaŭ la longulo Ĝuro Garuc venis.

„Nu!“ almetis Freyova, intence haltinte antaŭ la budo de Magda, „amiko Ĝurĉjo, via moŝta ma-

[1] Bone vi diris.

gistrato povus senĝene ripari tiun kolonon“. Samtempe montris la najlistino malaltan, larĝan ŝtonan kolonon antaŭ la preĝejo, duone faliĝintan kaj per herbo surkreskitan.

„Certe!“, rediris flegme la urba tamburisto serĉante en la poŝoj de sia vesto.

„Pro kio do ĝin la moŝta magistrato ne riparas? Pro kio?“, ekdemandis Ŝafraniĉeva iom ŝanceliĝante.

„Tion scias plej bone la moŝta magistrato!“, rediris Garuc.

„Kaj pro kio ĝin starigis niaj avoj? Pro kio?“, daŭrigis ĉagrenige la najlistino.

„Niaj avoj starigis ĝin pro tio, ke ĉiujn virinojn, kiuj estas senhontaj antaŭ Dio kaj homoj kaj sin al ĉiu vendadas, oni publike surmetas sur tiun kolonon, por ke ili hontu antaŭ la tuta nobela geburĝaro“, interpretis akravoĉe Garuc.

„Ha! Vidu vi! Pro tio?“, metis Freyova la manojn ĉe la koksoj. „Ĉu do vi pensas, kara amiko Ĝurĉjo, ke tia pesto ne estas plu en Zagreb, ĉu vi pensas, ke nunaj zagrebaninoj estas ĉiuj puraj kiel blankigita tolaĵo? Ĉu vi pensas?“

„Hm!“, rediris Garuc, „tion scias sole la moŝta magistrato“.

„Tion scias ankaŭ mi, kara Ĝurĉjo, ĉu vi aŭdis, ankaŭ mi! Ekzistas dandaj kaj piaj junulinoj, kies nomo odoras je incenso, dum ili estas nur putrantaj pomoj; ekzistas ankaŭ maljunulinoj, kiujn oni metus sur altaro sub la vitron, dum ilian animon kovris la diablo per sia vila vosto, ĉar ili estas malvirtaj, naŭzaj parigistinoj, ĉar kaŝe ili parigas aristokratidojn kaj burĝajn knabinaĉojn. Atentu, kara Ĝurĉjo! Estas malnova proverbo: kvieta akvo subfosas la bordojn.“

„Jes, jes, kvieta akvo subfosas la bordojn“, almetis ŝanceliĝanta Ŝafraniĉeva.

„Kaj mi konas ilin, laŭnome konas, kaj mi diras: sur la kolonon ilin, jes, sur la kolonon, por ke oni sciu, kiaj sanktulinoj ili estas. Kaj kion vi diras al tion, amikino Magda?“, turnis sin Freyova al la ma-

ljunulino, rimarkinte, ke ĉirkaŭ ili grupiĝis iom pli da popolo.

„Mi? Nenion! — Lasu min en paco!“, rediris senzorge Magda.

„Nenion? Vere nenion? ha! ha! Ke mi estu trankvila? Mi ĝuste ne volas“, frapis malice la najlistino manplaton per la pugno. „Aŭdu, gehomoj, aŭdu kaj miru! En ĉi tiu nia nobela urbo troviĝas ia maljuna sanktulino, pri kiu oni pensas, ke al ŝi estas la sankta Petro kiel baptopatro, kaj ŝi ke estas la kesto de Dia paco — dume envere la diablo mem — pardonu Dio miajn pekojn — ĉebaptas la maljunan sorĉistinon, kaj ŝi estas la kesto de l' diabla malpaco. En ĉi tiu nia nobela urbo ekzistas ankaŭ ia junulino, pri kiu oni pensas, ke ŝi estas pli blanka ol neĝo kaj kvieta kiel timiano, dum ŝi estas karbonenigra.

„Jes malodoranta kardo!“, aldonis Ŝafraniĉeva.

„Vidu, vidu!“, rimarkis Garuc.

„Jes, jes, kaj pri tio la moŝta magistrato scias nenion. Kaj tiu ĉi maljunulino instruas la junulinon, kaj tiu junulino ĉirkaŭprenas, kisas kaj — la diablo sciu kion ankoraŭ — la junan Gregorianec, la filon de tiu antikristo, kiu rabis nian belan Medvedgrad. Kaj kiu estas tiu maljunulino — kiu? kion vi pensas — nia sankta Magda, kaj tiu junulino estas Dora de Krupiĉ, jes Dora! Fi, fi, fi!“, kraĉis teren Freyova, „kaj ni ke toleru ĝin, ni honestaj burĝinoj?“

„Ne toleru!“, rediris ekscitite la aro.

„En nia urbo?“

„Kun Gregorianec!“

„Dora!“

„Tiu lilio!“

„Sur la kolonon kun ĉi tiu lilio!“

„Sur la kolonon kun Magda!“

Magda tremis de kolero, ŝia flava vizaĝo rugiĝis.

„Ho vi veneniga serpento! Centoble vi estas pli malbona de ĉiuj tiuj, kiuj iam ajn staris sur tiu ĉi kolono“, ekkrietis Magda.

„Hu fulmo —! Ĉu mi estas tia — mi burĝino,

havanta domon, kies edzo estas aniĝita en la korporacio? Kaj vi tion rigardas, kaj vi tion permesas?“, turnis sin furioza najlistino kontraŭ la aro.

„Sur la kolonon kun ŝi! Sur la kolonon!“, ekkriegis la popolaĉo.

„Kaj la aro komencis ataki la budon. Ŝtonoj, koto, sablo pluve faladis sur la budon. Preĝante kaŭris la maljunulino en la angulo, sed furioza aro iom post iom pli forte atakas, — ĝi mortigos la maljunulinon.

„Flanken, kanajloj! Aŭ mi, je mia honorinda Kristo, frakasos vian kranion per la pafilkapo,“ ektondris Radak, saltinte antaŭ la budo kaj alcelinta la pafilon kontraŭ la aro. Liaj okuloj brilis kiel de sovaĝa kato, liaj lipharoj tremis de kolero. Kaj dekoltita lia brusto forte spiregis. La aro posteniĝis de timo.

„Flanken, mi diras al vi ree. Pesto vin formanĝu! Ĉu vi estaj diaj kreitaĵoj, ĉu vi estas homoj? Brutaro vi estas, muta brutaro! Por kio vi havas kapdoloron pro ĉi tiu maljuna mizerulino, per kio ŝi kulpiĝis, ke vi furiozas mortigi ŝin kiel hundidon. Malaperu, ĉar, profundiĝu mi en la nigran teron; kiu ekpalpos la avinon, mi forskuos lian animon el la gorĝo!“

Por momento la amaso ŝtoniĝis de la terura grandegulo, sed baldaŭ ekbolis rea furiozo, post kiam la aro rimarkis, ke al ĝi kelko da bluaj gardistoj venas je helpo.

„Por kio tiu vlaho enmiksiĝas en niaj aferoj?“

„For kun li!“

„Batmortigu lin!“

Kaj plenmano da ŝtonoj falis kontraŭ Radak. Ŝtono faligis lian ĉapelon. Sed la haramio saltis kiel fulmo, kaptis el la aro la butikistinon Ŝafraniĉ ĉe la nuko, levinte ŝin alten kun la potenca dekstra kiel ŝildon kontraŭ la popolaĉo. La butikistino saltaĉis en la aero kiel rano sur hoko, dum ŝia vizaĝo estis kiel kuirita kankro.

Kaj estis da krio, kriado, rido kaj insulto inter la furioza popolaĉo.

„Bonan tagon, Ŝafraniĉeva! Nun vi povas balanciĝi sen balancilo.“

„Mortigu la vlahon!“

„Al la diablo! Dika butikistino estas plumete malpeza.“

„Ŝi pendas en la aero, kiel la ligna anĝelo super la granda altaro.“

„Frapu lin sur la frunton! Diabla bestido!“

„Kaj kio ĝi estas? Kia diablo estas al vi?“, ektondris Blaĵ Ŝtakor, granda viro, nigra kaj korpulenta, kun tordigitaj manikoj, enŝovinte sin per la kubutoj inter la aro. „Jen Magda sanganta! Ĉu vin mordis freneza hundo, malkuraĝuloj? Ĉu vi estas burĝoj, homoj? Vi estas turkoj, lupoj, vampiroj. Se la maljunulino ion ajn kulpiĝis, jen la magistratestro. Ĉu vi estas juĝistoj, ĉu la bastono kaj ŝtonoj estas leĝo? La vlahon vi do insultas! Pro kio? Ĉar li defendas la malfortan maljunulinon. La vlahon vi insultas, kaj vi ke estas kristanoj, vi? Ĉu tio estas en sankta Skribo, ĉu pri tio vi aŭdis ĉe la vespera Diservo? For de tie ĉi! Hejmen! Hontu vin! Ĉu vi ne havas okupon hejme? Prenu alojn kaj kudrilojn, kaj, vi virinoj, ĉu vi ne havas la kapstanojn kaj kulerojn! For, aŭ vin la gardistoj forkondukos. Kaj vi, maljunulo!“, turnis sin la bravulo al Radak, „lasu la maljunulinon, iru vian vojon, mi priatentos Magdan. Kaj vi, mastrino Ŝafraniĉ, foriru al via butiko kaj frapu la muŝojn. Tio vin ne malutilis. Via cerbo iom skuiĝis, vi do verŝajne malebriĝis. Prave vi ricevis! Ne ŝovu la nazon en la mondon por ke ĝin fulmo ne trafu, vi, maljuna retorino — vi!“

La haramio malprenis la butikistinon, kiu insultante foriraĉis al sia butiko kiel brogita kokino.

„Adiaŭ“, diris mallonge Radak al Blaĵ, „vi estas brava homo!“ Kaj ĵetinte la pafilon ŝultren foriris. La ceteraj disiĝis pro honto kaj timo kaj de Freyova unue perdiĝis la postesigno. Kiel la lasta forŝanceliĝis Ĝuro Garuc, palpante sian pintan nazon, kiu treege estis ŝvelinta. Ŝtono, saltante de la budo, estis senkompate falinta sur la flarilon de l' tamburisto.

La gastrondeto ĉe Krupiĉ eĉ malmulte ne konjektis, kio okazas antaŭ sankta Marko. Al la gastoj la vino malakrigis la aŭdon, kaj se ili estis eĉ aŭdintaj ian ajn bruon, kio pri tio? La popolo ĝojiĝu, se eĉ iom da sango verŝus. Al la urbaj gardistoj tiaj interpuŝoj estis amuzigaj komedioj, kiujn ili kun krucitaj manoj tre volonte sed ankaŭ tre flegme rigardis. La popolo mem juĝu al si.

Je unuĵoje malfermiĝis la pordo de l' ĉambro de Krupiĉ kaj internen penetris dikventra mallongulo kun tre dika kaj malsaĝa vizaĝo sub larĝa ĉapelo — la butikisto Ŝafraniĉ. Li estis furioza — kaj ebria — post li altreniĝis ankaŭ Grga Ĉokolin.

„Diru ja al mi, kio tie ĉi okazas? Diru ja vi, ĉu ni estas en Zagreb? Ja ĉu mi estas burĝo; kaj ĉu vi estas juĝisto? Ja ĉu Eva estas mia edzino — antaŭ Dio kaj homoj laŭ leĝa edzino? Ĉu“ — forbabilis senspire la malgranda butikisto.

La gastoj mire rigardis unu la alian, kaj la sinjoro kapelano montris per la fingro al la kapo por simboli, ke ĉe la butikisto ne estas ĉio en ordo.

„Nu, nu! Kara Andrija, ne tiel malkviete, kiel juna vino. Diradu kviete. Kio estas al vi?“, ekdemandas lin bonanime la mastro.

„Kviete! Kviete! Kompreneble! Apopleksio min frapos, kaj kviete! Kio al mi estas? Mia galo disverŝiĝis, tio estas al mi. Kaj kial? Sodomo, Gomoro, Babilon! Honto, pekego, naŭzego! Al mi, la urba asesoro, al mia edzino, la urba asesorino, tion tion — fi!“

„Sed je Dio, vi volas ke mi juĝu al vi, kaj mi ne scias, kiu kaj pro kio estas kulpa?“, ekparolis en miro la juĝisto.

„Specificatio et petitum, majstro“, intermetis trosaĝe Kaptoloviĉ.

„Amiĉjo Andrija, diru vi nur ĉion al sinjoro juĝisto!“, incitis lin la razisto, „li estas justema, kaj li la krimulon citos.“

„Bone. Aŭdu do mian specifon! Mia Eva havas kolikon, kiel serpento ŝi ringiĝas. Ŝia nova ĉapo adiaŭ! Dekkvin denarojn mi donis por ĝi sur la

reĝa foiro — dekkvin denarojn, ĉu vi aŭdis? Kaj por ĉio ĉi estas vi, majstro Petar, kulpa!"

„Mi?", ekdemandis mire la oraĵisto.

„Jes vi, jes vi!", ekkriis ĉe la pordo la razisto, metinte la manojn ĉe la koksoj.

„Mi? Ĉu vi freneziĝis?", reis Krupiĉ.

„Certe ni ne manĝis la malsaĝigajn fungojn", tamburadis pluen la butikisto, „ĉu ne estas la bela Dora ĉi tie via filino, kaj ĉu ne estas Magda ŝia baptopatrino? Kaj Magda tion aranĝis, kaj kiam la paĉjo la domon forestas, huŝ en la domon juna Gregorianec, kaj ŝmac' kun bela Dora e t c a e t e r a, ke ĉiuj najloj en la domo moviĝas. Ho mi estas malsaĝulo, malprudentulo, ĉu ne, majstro Petar? Sed tamen mi ne havos nepon antaŭe ol bofilon, kiel aliaj homoj."

„Andrija!", ekkriis la maljunulo Petar, preninte la kruĉon, sed rapide kaptis lian manon la juĝisto.

„Andrija, jes Andrija mi estas nomata. Kaj tiu Andrija diras al vi ankaŭ plion. Kiu vendis al Gregorianec nian Medvedgrad? Kiu? Vi. Ĉar la juna Gregorianec nur pretekste karesas vian filinon, dum vi al li perfidis, kiel la burĝoj agas por sia pravo. Kaj kiam hodiaŭ post vespera Diservo plenvoĉe oni tion pridiskutis, kaj kiam estis saltintaj bonaj viroj kontraŭ maljuna sorĉistino Magda, venis al ŝi je helpo ia antikristo — vlaho. Kaj tiu hotentoto kaptis mian Evon — mian malfeliĉan Evnjon, ĉe la kolo, kaj ŝin balancis, balancis, kvazaŭ ŝi estas la martelo de l' granda sonorilo, kaj disŝiris tute novan ĉapon. Kaj kiu pagos al mi por la ĉapo, kaj kiu pagos al mi la medicinon? Kiu?"

Petar ŝtoniĝis. Konvulsie li premandis la seĝon, apud kiu li staris. Liaj palaj vangoj tremadis, kaj la okuloj kvazaŭ estas saltontaj el la orbitoj.

„Vi mensongas, fripono!", ekkriis li per raŭka voĉo. „Kiu kuraĝas tiun venenon ŝuti sur mian unikan filinon, kiu povas konfirmi min pri tiu honto? Kiu?"

„Mi", ekparolis kun malvarma moko Ĉokolin, ekpaŝinte antaŭen.

„Vi?", demandis ĉiuj konsternitaj.

„Mi, moŝtaj sinjoroj", daŭrigis la razisto, krucinte dorse la manojn, „mi povas ĵuri sur sankta Evangelio kaj sur sankta hostio, ke mi sana kaj sobra per tiuj ĉi miaj propraj okuloj vidis, kiel nobela sinjorido Pavlo Gregorianec ĉirkaŭprenis kaj kisis ĉi tiun bravan virgulinon Dora, kiel ĉirkaŭprenas sin geedzoj, kaj ke Magda ĉeestis".

Ĉiuj silentiĝis. Dora kvazaŭ ne estis viva. Ŝia cerbo ŝtoniĝis, ŝiaj piedoj kvazaŭ kunkreskiĝis kun la tero, kaj la sango bolis en ŝi, kvazaŭ maro de l' brulanta fajro. Tiel iel estas en la koro de la homo, kondukata al ekzekutejo.

„Dora! — Dora! — vi?", ekmurmuris kvazaŭ furioziĝite la maljunulo, kaj la ŝvito surŝutis lian frunton.

„Ho Jesuo Dio, — kion mi kulpiĝis al vi?", ekkriis li plenĉagrene frapinte per la pugno la frunton kaj falinte kape sur la tablon.

„Patro!", ekkriis la junulino sin ĵetinte antaŭ la maljunulo — „ne faru — pardonu!"

Flame saltis la maljunulo kaj forskuinte la varmegajn larmojn de la blanka barbo, ŝovis la junulinon. Li ekrapidis al la muro por depreni la pafilon, sed fulmorapide kaptis liajn manojn la juĝisto.

„Petar!", ekkriis la juĝisto.

„Ne pekigu la animon", almetis la kapelano. „Dio sola juĝas la homajn pekojn".

„Patro, je la tombo de l' mia patrino" — eksingultis surgenue la knabino.

„Silentu, virina degenerajo, ne veku la sanktulinon el la tombo. For de tie ĉi!" Poste li iom trankviliĝis. „Amiko Pavlo", li sin turnis al Arbanas, „por unu mi vin petas. Daŭre de mia vivo, tiu ĉi pekulino ne havas permeson aperi antaŭ miaj okuloj. Mi ne volas, ke ŝi de malsato pereu, al mia mortintino mi ĵuris, ke mi ŝin ne forlasos. Post tri tagoj vi iros hejmen en Lomnica. Kunprenu ŝin. Tie ŝi estu servistino, malpuran bestaron ŝi paŝtu. Sed neniam ŝi revenu Zagrebon. Tio por la animo de mia mortintino."

„Sed amiko, amiko!", riproĉis Arbanas.

„Por tio mi vin petas. Ĉu vi volas —“ decide baris lian vorton la oraĵisto.

„Nu mi volas, mi volas!“, kapjesis Arbanas.

„Bone kaj dankon. Kaj kun vi, majstro Andrija, mi morgaŭ antaŭ tribunalo parolos. Nun adiaŭ!“, finis la oraĵisto.

La gastoj kun mallevitaj kapoj disiĝis, sole Ĉokolin ekiris kun la butikisto por festi la venkon sian ĉe Evnjo. Poste Magdan, oni alportis domen ankaŭ senkonscian. Ŝin Dora vartis. Jam krepuskiĝis; tomba silento; oni aŭdis nur singultadon en la domo de Krupiĉ: „Dipatrino, kial mi mizera naskiĝis!“

Estis ĉirkaŭ noktomezo. Tra Mark-placo sternis sin hela lunlumo. Nenie animon, nenie voĉon. Je unufoje elkuris el la butiko de Šafraniĉ iu hometo. Li ŝanceliĝadis tien reen tra la Mark-placo, liaj piedoj fulme kruciĝadis. Ion li murmuris. Meze de la placo haltiĝis. Sian ombron li ekvidis.

„Hoho! Vi — vi — vi —vi estas ĝi?“, alparolis li sian ombron. „Bonan vesperon, kara mia a l t e r e g o! Ĉu ne, hodiaŭ estis amuze? Hoho eĉ krude! Hodiaŭ mi montris al ti — ti — tiu fiera oraĵisto, kiu estas viro! Sed atendu, frateto, ankoraŭ ni ne finis. Ne, ne, ne! hoho ne! Dora devas esti mia, jes mia. Ni dividos ŝin — mi kaj sinjoro Stjepko. Hihi, Stjepko estas diabla virinemulo! Li forportu la primaĵojn, kaj ni postrikoltos. Dora devas esti mia: ĉu mi ne diris je groŝo ŝi estos havebla, ni postrikolt —“

Ĵus la sonorilo sur la turo de l' sankta Marko eksonis mallaŭte la noktomezon.

„Kaj kial vi, sankta longulo, enmiksiĝas en niaj aferoj?“, turnis sin la razisto al la turo. „Bim, bam, bum! jen estas via tuta saĝo. Ne ĉagrenu min, ho longulo, ne ĉagrenu min!“, pugne minacis Ĉokolin al la turo, „ĉar, — ĉar — ĉar ni disiĝos. Ankaŭ sen tio“, komencis li murmureti al sia ombro, „ni devas for el Zagreb, ĉar Radak — la malbenita Radak — la diablo lin alkondukis! Ni devas, ĉar ni estas — turkoj. Sed ŝt! Ke nin ne perfidu sankta Marko, kvazaŭ li scias pri tio! Hi, hi, hi, hi!“, plenvoĉe ekri-

dis Grga. Sed nun ne ankoraŭ, ne ankoraŭ! Dora devas esti mi — a — a — a, mia! Postrikolti — jes, postrikolti. Bo — nan nokton, frateto! Bonan nokton!“, kliniĝis la razisto al sia ombro kaj ruliĝaĉis en sian butikon.

VIII.

Kiel verda ĝirlando plektas sin tra la Kroatlando la grandmontaro Okiĉ, plena da beleco kaj ĉarmeco. Valo kaj monto, arbaro kaj kamparo ĉarme interŝanĝas, harmonie viciĝas kiel ondegoj de pratempa maro, ke ravigita okulo miregas pri la grandeco de la naturo. Kaj se la pupilo iom pli profunden malleviĝas al la montara belegeco, la animo ekflamas, la koro dronas en la ĉarmeco kaj senvole eliĝas de l' buŝo ekkrio: „Vi estas bela, vi estas ĉarma, ho patrino nia, ho lando Kroatujo! Aŭ vin la ĉionkreanta potenco volis lasi al la tero kiel rememoron de l' ora epoko, aŭ ĝi vin ĉarme ornamis, por ke vi estu diamantglaso, en kiu falu dum uraganaj jarcentoj la sanglarmoj de viaj gefiloj. Sed por kio spioni la tialon de via beleco? Ke vi estas belega, diras nin la okulo, ke ni amas vin, frapas nin la koro, ĉar en vi naskiĝi kaj vin ne ami, estus peko ĝis la Dio!“

Super la montaro flugpendis bela aŭtuntago. La praaj kverkoj interĉirkaŭprenas sin per densa branĉaro kvazaŭ arkoj de pratempa templo. En la ĉarma ombro, en magia arbara krepusko dormas la timiano — el la arbetaĵo elstaras ruĝa frambo, en la valo nombras la kukolanta kukolino la jarojn de via vivo, kaj la rapida sciuro saltaĉas de branĉo al branĉo. Nur kelkan fojon la sunoro eklumas tra arbara densaĵo, kaj vi vidas kiel fiera cerbo paŝetigas tra maldensejo siajn maldiketajn piedojn, aŭ kiel arĝenta fonto elfluas el sub malhela, kruda kverkaĵo. Kaj sur la montetoj rapidkreskas la ruĝa kaj ora sango de l' vinberbranĉo.

Meze de tiu ĉi monto staras la malnova kastelo de Samobor kiel ora pomo sur genuoj de bela —

junulino, kiel blanka papilio sur foliriĉa rozo — kaj sub ĝi la agrabla loko Samobor.

Fortika, larĝa kaj bela estis Samobor, bela kaj larĝa estas ĝia bieno, al kiu apartenis ankaŭ la borgo. Sekve ne estas mirinde, ke ĉiu havanta da mono kaj potenco, ĝin klopodis. En dua duono de XVI. jarcento havis la kastelo Samobor du estrojn, sed neniu estis ĝusta. De antikva tempo estis ĝiaj estroj Ungnad'oj, stiria familio, kiu duone estis kroatiĝinta. Sed Ivan Ungnad, opstinulo kaj arbitrulo, estis zelota Luterano, kaj tuta lia klopodo celis tion, ke kroata kaj slovena lando luteraniĝu ĝis la fundo de l' fundamento. Kaj li kolektis da mono, kiun li profitis de sia bieno, jes, li kolektis da mono por la kredo eĉ super siaj fortoj, por povi presigi luterajn librojn kroatlingve, kaj per la libroj ke la tuta reĝolando luteraniĝu.

La pasion de Ungnad ekhelpis la ĉefo de samoboraj kuprominejoj Leonardo Grubar, riĉulo kaj malnoblegulo, senkora butikisto kaj sangsuĉanto. De kupro faris li oron, kaj tiun ĉi oron donis li al Ungnad por novaj kroataj libroj. Li ĝin ne donis senpage aŭ riske, ĉar la lutora probatalanto devis al li doni kiel pruntgarantion la duonon de la kastelo kaj urbeto Samobor. Ivan mortis, ne repreninte la pruntgarantion, mortis ankaŭ Leonardo suĉinte la kompatindajn samoboranojn ĝissange, kaj postlasis sian belan rabaĵon al sia filo Krsto Grubar. Sed nur por mallonge. Baldaŭ la morto sursaltis ankaŭ la pli junan senkorulon, kaj la duono de Samobor restis sub la regado de lia vidvino Klara, fama belulino.

Sed ankaŭ la dua duono de Samobor ne restis al la gento de Ungnad. Krsto, la filo de Ivan Ungnad, militisto, malŝparemulo, bezonis multegon da mono. Li batalis sub ĉies standardo kontraŭ ĉiu diablo, sed ĉiam sinjore sen ia kalkulo. Malmulte da patraĵo, multe da ŝuldoj. Li do decidis imiti sian patron, kaj garantiaĵe pruntis la duan duonon de Samobor al la riĉulo Ambroz Gregorianec, kaj post la morto de Ambroz subiĝis la pruntgarantio sub la potencon de liaj filoj Baltazar kaj Stjepko.

Estis posttagmeze ian helan aŭtuntagon. Antaŭ pordego de l' kastelo Samobor kelko da brancoriĉaj tilioj sternadis abundegan ombron. Al la tilioj estis ligitaj multe da selitaj ĉevaloj, kaj en la ombro kuŝis kelkduondeko da kirasuloj. Laŭ la blankverda zono oni vidis, ke ĉi tiuj kirasuloj apartenas al iu stiria landtrupo, kiuj atendis sian estron. Verŝajne estis gastoj en la kastelo, verŝajne. La germanaj oficiroj volonte vizitadis la kastelon de sinjorino Klara, ilin ankaŭ ŝi volonte akceptadis. Ankoraŭ dum la vivo de Krsto Grubar festenadis ĉi tiuj sinjoroj en Samobor laŭ sia plaĉo; ĉar Grubar estis germano kiel ili. Ankaŭ nun ili ofte ĝin vizitadis, pli volonte vizitadis la junan belan vidvinon.

En la kastelsalonego de Samobor, mirinde, eĉ animo ne estis. Ĉio trankvila kaj muta. Sed des pli vivece estis en la ĉambro de sinjorino Klara.

Vera mirindaĵo tiu ĉi ĉambro de Klara! Ĝi staris en la kastelturo kontraŭ Sava. La fortaj arkoj estis kolorigitaj per blueta ĉielosimila koloro, kaj sur ili surŝutitaj oraj steloj. La origitaj arkripoj kuniĝadis en bele eltranĉita floro, de kiu pendis je silka ŝnuro la kupra, origita lustro en la formo de du Amoretoj, portantaj kvar torĉojn. La muroj estis ornamitaj per lerte teksitaj italaj tapiŝoj. Unu tapiŝo prezentis la ĉastan Suzana. Meze de ombroplenaj palmoj fluas arĝenta akvo. En ĝi staras belega virino, vestita en travidebla vesto, kiu falas de siaj blankaj, rondaj ŝultroj. La virino hontece krucigis antaŭe la manojn. Ŝia beleta kapo malleviĝas al la brusto; ŝiaj nigraj haroj naĝas malsupren de blanka karno; la longaj subtilaj palpebroj kovras la nigrajn okulojn, kaj sur etaj luksaj lipoj flirtas rideto. Ĉirkaŭ la neĝeblanka genuo la hela akvo turniĝas, kaj tra la akvo oni vidas du piedetojn, rondajn kaj blankajn. Sed iom pli malproksime staras densa larĝfolia herbokovro, kaj sur ĝi floras flama lotoskaliko. Tie ĉi estas embusko, post ĉi tiu arbusto elrigardas du voluptemaj maljunuloj. Iliaj senharaj kapoj, falditaj vizaĝoj, grizetaj barboj, malgrasaj manoj — ĉio ĉi kvazaŭ ŝtoniĝis, nur vivas iliaj okuloj, kaj la okuloj brulas, brilas, flamas kiel infera fajro.

Sur alia tapiŝo oni vidas oran tendon. Antaŭe staras grandegulo; li estas malafabla kaj nigra. Soldatoj ligas lin, soldatoj ridas lin. Kaj li furiozas, la piedon apogas sur la pavimon, liaj muskoloj ŝveliĝis, lia barbo malordiĝas, kaj la okuloj — ah, liaj okuloj flamas — du malbonfatalaj steloj, pretaj forbruli la ĉielon kaj teron, liaj okuloj fulmojn ĵetas al bela l u k s a virino. Sur leonfelo kuŝas la virino. Perlaĵo agrafas ŝiajn orajn buklojn, kaj ŝian rondan korpon kovras duone faldita vesto de hinda verda silko. Supre de ŝia frunto brilegas brila smeraldo, kiel terura okulo de l' bazilisko. Ĉarman sian kapon apogis ŝi sur la luksan ŝultron, el sub oraj palpebroj duonrigardas ŝi la grandegulon, kaj moko ĉirkaŭas ŝian voluptajn lipojn. Vidu, jen ŝi levas sian maldekstran manon. Ŝi per io ludas. Stranga ludilo! Ŝiaj etaj fingretoj trairas la nigrajn heroajn harojn, kiun ŝi trompe fortranĉis de la grandegulo, perfidinte lin al Filiŝtoj, la tiranoj de l' judea gento. Tio estas la ora serpento Dalila, tio estas la malsovaĝigita leono — Samson. La tuta pavimo harmoniis kun diverskoloraj ŝtonetoj stelforme. La pordegon kaŝis la kurteno ruĝvelura, kaj en la angulo ŝprucis orita drako helan akvon en grandan marmoran konkon. Ĉirkaŭ la konko floris en kristalaj vazoj rozo kaj lilio, ebriigante la cerbon per rava bonodoro. Tra la ĉambro flugetis blankaj turtinoj, kisante kaj kverante unu la alian. Kaj ĉirkaŭe staris altaj oritaj seĝoj, tegitaj per blueta damasko. Tie ĉi akceptadis Klara siajn karajn gastojn.

Tiun ĉi fojon sole duo pasigadis la tempon al la juna vidvino, sidante sur grandaj seĝoj kaj ekpensante la spritaĵojn por delogi rideton de la mastrino — la generalo Servacio Teuffenbach kaj regimentestro Mihael Rindsmaul.[1] La unua alta, forta kaj grizeta viro, kun razita kapo, hispana barbo, malalta frunto kaj longeca nazo, maldelikata inter soldataro, fera, eĉ kruda; ĉe virino malsovaĝa, enamiĝita, delikata kiel malsaĝa ŝafido. Lia kunulo estis

[1] Legu: Tajfenbaĥ, Rincmaul.

pli malgranda, sed ne malpli forta, kun dika kapo, maldensaj ruĝetaj haroj, grandaj oreloj, ruĝaj vangoj kaj plena barbo. Laŭ la malalta anguleca frunto, laŭ malakra nazo kaj senmienaj bluaj okuloj oni vidis, ke tiu ĉi batalanto ne estas escepte sentema kaj tre sagaca. Tiuj ĉi ambaŭ alvenintoj estis vestitaj en glata cervofelo, kaj la delikata mozaiko tute krevis sub la dikaj kalkanumoj de la pezaj botoj. Sole la blankaj kolumoj kaj larĝaj ĉapeloj kun plumoj videbligis, ke ili devenas de sinjoraj familioj. Sola diferencigo estis inter ili la vesto, tial ke malsupren de la ŝultroj de Teuffenbach treniĝis nigreflava zono de imperiestra generalo, dum Rindsmaulon ornamis blanke-verda signo de stiria armeo.

Ambaŭ tiuj sinjoroj malalte komplimentadis al sinjorino Klara, kompreneble ĉiu laŭ sia maniero. Sed vere estis io komplimentinda. Ĉe la alta fenestro el diverskolora vitro, antaŭ kiu etendiĝis la hedero kvazaŭ verda kurteno, sidis sur mola seĝo la dommastrino. Ŝi povas esti en sia dudeka jaro, eĉ iom pli multe, kaj estis altkreska, ronda virino; ŝiaj oraj bukloj malstaris malsupren de la nuko el sub la blankperla kufo.

La alta glata frunto malkovradis eksterordinaran talenton, kaj rekta maldika nazeto, kies rozokoloraj truoj vive moviĝadis, la grizetaj sed escepte brilaj okuloj, estis signo de granda rapideco. Kaj pri la koro kaj sento? Malfacile estas diri. Tiu ĉi glata delikata vizaĝo jen ruĝiĝis de flama entuziasmo, jen vestis sin per venena moko, jen kuniĝis de n e v e n k e b l a rideto, jen ŝtoniĝis kiel malvarma marmo, nur la plenaj, duone malfermitaj lipoj, sole maltrankvila movado de la korpo vidigis, ke en tiu ĉi virinkapo estas da sango. Kiu vidis la plenajn kaj lakte blankajn ŝultrojn, elstarantaj post sa brusela araneaĵo, kiu rigardis kiel la plena sino ŝveliĝas kaj perforte eliĝas la jugon de la blueta silkvesto, kiel la rondaj brakoj ŝteliĝas el la longaj manikoj, kiel la malgrandaj piedetoj en la broditaj ŝuetoj senpacience moviĝas sur la ursa felo — kiu ĉion ĉi vidis, tiu devis diri: ĉi tiu virino naskiĝis

por amo, ĉi tiu virino volas, devas ami. Kaj ĉu ŝi amis? Pri ĝi sciis diversaj sinjoroj, sole ne ŝia malsprita mortinto.

„Fulmo kaj tondro!“, intermetis Rindsmaul per raŭka voĉo, „sinjorino mia, via ŝtona tendo estas tre bela, kaj tiel granda, ke en ĝi povus travintri tuta armeo. Dio ne donu, ke la turkaj hundoj enpaŝu ĉi tiujn regionojn; estus malbono, malbono por via bela kastelo, ankoraŭ pli malbone por vi, bela sinjorino, ĉar sciu: tiuj ĉi nebaptitaj kanajloj scias pri nenia leĝo de Dio!“, diris li kaj tordis supren siajn ruĝetajn lipharojn.

„Ho sinjoro regimentestro!“, rediris lin Klara per moka rideto, „vi konsideras min malkuraĝulino, kiel mi vidas. Nenio pro tio. Mi kore vin pardonas. Hodiaŭ ni unuan fojon vidas unu la alian. Se vi iom pli bone estus informiĝinta ĉe via amiko generalo, vin ne okupas tia proturka timo por mi. Ĉu tiel estas, sinjoro Servacio?“

„Tiel estas, ĝuste tiel, bela sinjorino!“, kliniĝis la generalo mallerte ŝirpinĉante la randon de la blanka kolumo, „inter la bela sinjorino Klara kaj generalo, frato regimentestro, ekzistas nur tiu diferenco, ke generalo portas kirason, kaj nia dommastrino jupon.“

„Eble ekzistas ankaŭ alia diferenco“, ekridis Klara malice, „nome ke via dommastrino povus elnombri pli da venkoj ol ia via generalo. Jes, sinjoro Rindsmaul, tiel estas. Kiu ajn paŝao venu, venu eĉ la caro de Konstantinoplo mem! Mi lin krude elatendos. Ĉu vi pensas, ke la virino ne posedas volon kaj forton? Posedas, je mia kredo“, eklevis Klara fiere la kapon, „la virino posedas eĉ ion, kio vin ĉiujn virojn povas venkobati — rapidan kapon. Ĉu vi ne scias tiun fablon pri Herkuleso?“

„Hm!“, rediris konfuzite Rindsmaul, „mi ne scias. Kiu scius pri tiuj avinaj fabloj! Se Herkuleso estis generalo, li hontu, ke li lasis sin allogi de virino.“

„Mi ĝin al vi diros“, rediris Klara malestime ridetante, „Herkuleso estis la plej granda heroo ĉe

antikvaj idolanoj, pli granda heroo, ol ĉiuj vi kune. Sen pafilo, sen kiraso superregis li grandegulojn, leonojn, drakojn. Neniu povis lin venki, ne homo nek dio. Kaj kio fariĝis de li? Virino lin devigis, ke li ŝpinu je ŝpinilo, ke fendigu sian bastonegon kaj per ĝi hejtu la fajron.“

„Fulmo kaj tondro!“, saltis Rindsmaul, „tiu ĉi estis diabla virino, ho bela sinjorino! Sed se tia nur venu en miajn brakojn, mi montrus al ŝi, kio estas Rindsmaul! Fulmo kaj tondo! Heroo — kaj ŝpinilo! Tie ja oni devus friti kokidojn sur la sabro kiel sur la paliso, aŭ lasi ke la kokinoj kovu la ovojn en la kasko. Iru, iru, bela sinjorino, vi ŝercas kun ni, kaj tiun fablon pri Herkuleso certe elpensis ia pastro aŭ monaĥo“.

„Ne kuraĝiĝu troe, sinjoro regimentestro“, ekminacis lin Klara per la fingreto. „Kontraŭ la turkoj eble vi estas heroo, sed kontraŭ la virinoj?“ — daŭrigis ŝi dolĉe ridetante al la maldelikata militisto.

„Ha kio! Al la diablo la virinoj! Ĝuste indus rompi lancon kun ili! Mi estas kristano, sekvanto de sankta Skribo, kaj tie staras nigre sur blanko, pro kio Dio kreis Evon al Adamo“, abruptis vive la ruĝeta regimentestro.

La generalo Servacio el sia animo profunde bedaŭris, ke li estis kondukinta la maldelikatan regimentestron; almenaŭ li pli kaj pli furioze ŝirpinĉadis la kolumon, kaj maltrankvile frapetadis la pavimon per la boto. Li des pli bedaŭris tiun ĉi netolereblan societanon, tial ke li klopodis atingi la orajn buklojn de sinjorino Klara, aŭ pli ĝuste, ŝian kupran riĉaĵon. La lastaj tro dubesencaj vortoj de Rindsmaul malligis fine ankaŭ lian timeman langon, kaj li diris al sia kunulo:

„Sed, frato regimentestro, vi hakas tie ĉi per la lango kiel per akra sabro, kaj via vorto flugas kiel p e t o l a ĉevalo. Nia bela sinjorino ne parolas tute sen kaŭzo. Mi legis multon da mallongaj historioj, kie la virinoj superregis grandajn heroojn, ekzemple, kiel sinjorino Kleopatra ravigis fa-

man generalon Antonius kaj tiel plu. Virino, kiam atakas, similas pafilegon, kies kuglo, kiel estas al vi konata, frato regimentestro, povas faligi eĉ feran kavalerianon. Ĉu ne vere, bela sinjorino?“ komplimentis Teuffenbach per acideca rideto al Klara.

La vidvino pene haltigis la ridegon.

„Ha, ha, ha! Mi ne scias“, ekparolis ŝi balancante sin sur la seĝo, „ĉu ni virinoj estas pafilegoj. Nu, sinjoro Servacio, ne riproĉu vian kunulon, svinginta en paradizajn rakontojn. Kio pro tio? La naturo ne estas malico. La lango, per kiu vi parolas, estas nur karno kaj sango, se vi ĝin eĉ per mielo ĉirkaŭas. Parolu ĉiam per via natura lango, sinjoro regimentestro! Fine eĉ dolĉeco enuigas la buŝon. Nu“, daurigis Klara ĵetinte forte la kapeton posten, ke ŝiaj oraj bukloj ŝutiĝis sur la ŝultrojn — „se mi atakus vin, sen armeo, sen armilo, — sola, kaj vi kun grandega armeo?“

„Dio vin gardu“, ekridis la regimentestro, „mi vin kaptus kiel muson!“

„Kaj poste mi vin!“, rediris Klara, vipinte lin per sia brila okulo.

La regimentestro konsterniĝis.

„Mi vin, kaj vi min! Tricent tondroj, kiel do?“

„He vidu, ĝi estas milita sekreto“, aldonis ruze Klara. Ĝin parolante la vidvino deprenis la rozon de l' brusto, kaj komencis frapeti per ĝi la silkveston kaj fine igis fali la rozon sur la felon ursan.

Ambaŭ militistoj saltis, por levi la floron, la regimentestro eĉ ekgenuis. Sed Klara estis pli rapida. Fulme sin klininte, prenis ŝi la rozon, kaj dume la regimentestro ekrigardis la glatan brilan nukon de Klara. Li iom ruĝiĝis.

„Sinjorino, donu ĝin al mi!“, petis Rindsmaul.

„Al mi“, ripetis humile Servacio.

„Al vi kaj al vi?“, ruze ekdemandis Klara, „kaj kial?“

Ambaŭ ĝuste preparis sin por ion respondi, sed la servisto ĵus malfermis la pordon kaj anoncis:

„Nobela sinjoro Gregorianec deziras riverenci vian moŝton!“

„Ni lin korege akceptos!“, rediris Klara. Sur ŝia vizaĝo ekludis la sango, kaj en la okuloj la flamo.

„Kroata urso“, ekmurmuris la regimentestro.

„Malĝustatempe!“, aldonis kolere la generalo. La salonon eniris Pavlo pala kaj kvieta. Riverencis la sinjorinon, rivencis ankaŭ la militistojn.

„Unue“, ekparolis la junulo al la sinjorino, „saluton kaj riverencon al via moŝto de mia sinjoro patro, kiu esperas, ke mi vin trovos en bonfarto. Via moŝto estas informita, ke mi propravole ne venas, sed laŭ la ordono de mia sinjoro patro, nome pro iaj kalkuloj rilate la servutulojn de Samobor. Plie ordonis min mia patro, ke mi kun via moŝto tiun aferon reguligu laŭ bonvolo kaj amikeco sen malamo kaj senprocese. Pardonu min, via moŝto, ke mi alrajdinte tuj eniris tien ĉi, kaj tuj avizis la ordonon de mia patro“.

Klara rigardis la junulon scivole.

„Mi povas nenion pardoni vian moŝton“, rediris trankvile Klara, „ĉar oni pardonas nur pekon. Lia estra moŝto de Medvedgrad plaĉegas al mia domo, kaj lia sinjoro filo estu bonvena al mi, la plej proksima najbarino kaj duonestrino de Samobor. Ĉar por ke sciu, sinjoroj“, turnis sin Klara al la oficiroj, „la dua duonestreco staras antaŭ vi, la nobela sinjoro Pavlo Gregorianec, fama per malĝoja batalo ĉe Hrastovica, fama ankaŭ per tio, ĉar li kiel nobelulo la pasintan jaron savis la burĝan junulinon de certa morto. Ankoraŭ unu fojon estu bonvena sub tiu ĉi tegmento, kiu estas ankaŭ via. Pri la kalkuloj skribis al mi sinjoro Stjepko. Tial ne estos inter ni akuzoj kaj procesoj, kiel ne ekzistis ankaŭ ĝis nun. Sed tial ke sinjoro Stjepko deziras, ke la kalkulo estu klara, kaj tial ke la kalkulo estas longa, mi volas tiun aferon tuj komenci, sekve do viaj moŝtoj“, ekdiris ŝi ree al la oficiroj, „ne prenos ĝin malbone, se mi dankas vian viziton kaj amike vin adiaŭas, tamen petante vin, ke vi indigu mian do-

mon per baldaŭa ĉeesto kaj pardonu, se vi ne estis ĝuste regalitaj". Post tiuj vortoj riverencis Klara la oficirojn kaj subite ĵetis la rozon tra la fenestro.

La generalo kaj regimentestro adiaŭis sin iel acide, ankoraŭ pli ĉagrene riverencis Pavlon.

„Ĉu vi aŭdis, frato generalo, kalkuloj!", aldonis Rindsmaul, rajdante malsupren de la urba vojo.

„Mi aŭdis", malkontente rediris Teuffenbach; „bonaj por la senbarbulo, dum la niaj estas malbonigitaj!"

Pavlo staris sola antaŭ Klara. Ia timo premis lian bruston.

„Sidiĝu, sinjorido, sidigu vin", kuraĝigis Klara la timeman junulon per pli kvieta, dolĉa voĉo, krucinte la manjon sur siaj genuoj. „Ĝustatempe vi venis por min helpi. Vi liberigis min de la enua societo. Ili epitetas la kroatojn ursoj. Sed pardonu Dio", ekridis la vidvino malrapide, „ili mem estas glataj kiel iliaj malmolaj kirasoj. Ankoraŭ mi de ili sovaĝiĝos. Mi estas malamiko de longaj kalkuloj, sed tiun ĉi fojon ili estas al mi bonvenaj. Sed antaŭ ĉio por ke mi vin demandu: kiel via vundo de Hrastovica?"

„Mi ne sentas ĝin plu. Ĝi estis nur grataĵo, via moŝto!", rediris Pavlo.

„Dank' al Dio", daŭrigis Klara, „kiam vi tiame kuŝis en la febro en Samobor, mi iĝis tre zorgoplena pro vi, jes, jes, kredu min, tre!"

„Mi dankas vian moŝton por tiu zorgo."

„Kaj kiel fartas via sinjorino patrino?", levis Klara sian kapeton, „Marta, kara sinjorino Marta, mia dua patrino?"

„Ŝi malsanetas senintermanke."

„Mizerulino. Malbone estas al ŝi, mi ĝin scias. Kiam ŝi estis en Mokrice, mi vidis ŝin ĉiun duan tagon. Ne unu fojon larmis miaj okuloj, rigardantaj ŝian doloron. Oh sinjoro Pavlo", daŭrigis Klara kun larmaj okuloj, „vi estas feliĉa, ke vi povas nomi ŝin patrino. Ŝi ne estas virino, ŝi estas dia anĝelo. Kaj kiel la kuracistoj diras — sed lasu ni ĝin!", turnis

Klara la vizaĝon al la fenestro, por ke Pavlo ne vidu la larmojn.

La junulon kortuŝis ĉi tiuj delikataj vortoj de Klara. Kun miro li rigardis la belan virinon.

Kiel fartas via frato, la sinjoro Niĉjo?", daŭrigis Klara: „li edziĝas, mi aŭdas, fraŭlinon Ainkern, ĉu ne vere?"

„Ŝajnas, via sinjorina moŝto!"

„Vi do lasis, ke li vin antaŭiĝu! Strange. Kutime estas de la pli aĝa la unua vico. Kiel ĝi estas, sinjoro Pavlo?", ekdemandis Klara, embuske rigardante la junulon.

„Mi ne havis tempon pensi pri tio, via moŝto", respondis trankvile Pavlo.

„Vi ne havis tempon? Kiam ĝi do estas pripensota?"

„Mi estas soldato, nobela sinjorino", ekparolis iom embarasita Pavlo. Jen ĉi tie, jen tie, ĉu en la marŝo, ĉu sub la tendo, kaj tie ne kolektiĝas edziĝgastoj."

„Sed vi estas ankaŭ kroata nobelulo, vi ne estas dungato. Estas sufiĉe da tempo ankaŭ daŭre de la paco — sed pardonu, nobela sinjoro", ekridis la vidvino, „mi vin ĉi tie eldemandas kvazaŭ konfesanto, kaj mi forgesis pri niaj kalkuloj kaj ke vi estas laca de la vojaĝo. Mi ekbabiligis min. Bela mastrino, ĉu ne? Nek panon nek salon mi proponis al vi. Riproĉu min, riproĉu! Pli bonon eĉ mi ne meritis. Jen estas jam super la montaro la ruĝa vespera ruĝiĝo. Lasu ni la edziĝfestojn, sinjoro heroo! Mi tre scias, ke mi kun vi neniam finos. Sed je Dio mi vin petas, lasu ni hodiaŭ ankaŭ la kalkulojn, ĉar ni ilin ĝis noktomezo ne finus. La kapo min iomete ekdoloris — ĝi brulas — jen, sentu mem", forgesis sin Klara, etendante al li sian belan kapon, sed ŝi rapide korektiĝis: „ne prenu ĝin malbone. Mi estas malsana, malsaĝa. Mi rememoriĝas, kiel vi en la febro kuŝis. Ne unu fojon metis mi mian manon sur vian frunton. Pardonu; mi malsovaĝiĝis en ĉi tiu malsovaĝejo."

Pavlo ruĝiĝis. Vane li serĉis la vortojn.

„Anjo! Anjo!“, vokis per unu fojo Klara. „Ĉu vi konas mian Anjon, mian filinon?“

„Mi ne havis feliĉon vidi ŝin“, rediris la junulo.

„Mi prezentos al vi la anĝeleton, la solan ĝojon de mia vidveco. Anjo, venu do!“

Sur la pordo disiĝis la ruĝa kurteno, kaj en la ĉambron saltis kvarjara knabino, eta, flordelikata, bluete vestita. Ŝiaj oraj bukloj saltetis ĉirkaŭ la afabla vizaĝo, kiu estis viva portreto de la patrino. La kapeto de l' etulino estis per blua floro ĉirkaŭita.

„Ve, ho panjo, panjeto!“, ekkriis la etulino saltetante kaj ne rimarkinte la fremdulon, flanke sidantan. „Se vi vidus! La ĝardenisto Toma kaptis la talpinon, nigran kaj vilan. Sed mi ne timis de ĝi, ne. Kaj Toma diris, ke ĝi manĝas miajn rozojn. Tial Toma la talpinon mortigis, mortigis ĝin tute. Sed diru, ho panjo“ — estis la etulino demandonta, sed rimarkinte la fremdulon, silentiĝis. Alkroĉiĝis al la patrino, kaj komencis rigardi Pavlon per la grandaj helaj okuloj.

„Nu Anjo, salutu do la sinjoron“, admonis ŝin Klara, karesante la harojn de la etulino.

„Bonan tagon, sinjoro!“, salutis lin la knabineto.

„Bona tagon, kara Anjo!“, kliniĝis Pavlo al la knabineto, afable rigardante ŝin.

„Vidu, panjo“, ekmurmuris la etulino al Klara. „Li min konas, kaj mi lin ne konas. Kiu estas tiu sinjoro?“

„Kiel aminda infano“, aldonis Pavlo.

Klara ekridis. Ŝi metis la etulinon sur siajn genuojn kaj kisis ŝin sur la frunto. Ĵus eksonis ĉe la samoboraj monaĥoj la Angelusa sonado.

„Aŭdu, aŭdu, panjo!“, ekbabilis la etulino klininte sian kapeton kaj levinte la fingreton: „Ave Maria! Oni devas preĝi!“

Klara kunmetis la manetojn de l' etulino kaj kliniĝis super ŝia ora kapeto. La laŭta sonorilo resonadis el la valo. Tra la hedero penetradis la vespera ruĝiĝo, tremetante ĉirkaŭ la bela kapo de Klara kaj vizaĝeto de la preĝanta senkulpulinjo. Muta kaj kortuŝita rigardis Pavlo ĉi tiun scenon.

„Nun, mia koro!“, diris la patrino al la filino, kisante ŝian frunton kaj formetinte ŝin de la genuoj, „bonan nokton! Iru! Dormu dolĉe. Kaj diru al Ivan, ke venu ekbruli la lumon.“

„Bonan nokton, panjo, bonan nokton, sinjoro!“, riverencis la etulino kaj ŝtelforiris tra la pordo.

„Kaj ĉu vi, nobela sinjorino, ne estas feliĉa?“, ekdemandis kvietvoĉe Pavlo, „ĉu via koro ne saltetas pli forte havante tiel plaĉindan infanon ĉe si, ĉirkaŭ kiu vi metas ĉiujn viajn zorgojn?“

Per tiu kvieta voĉo de Pavlo Klara pliatentiĝis. Ŝia okulo ekflamis, la lipoj ekludis.

„Ĉu oni devas demandi patrinon, se ŝi estas kontenta ĉe sia infano?“, rediris lin Klara.

„Pardonu, nobela sinjorino, se mi ofendis vian koron. Sed nun permesu“, almetis Pavlo leviĝinte, „ke mi ne malhelpu plu vian moŝton. Noktiĝas, certe via moŝto deziras ripozi. Permesu, ke mi deziru vin bonan nokton, kaj ekiru mian loĝejon. Morgaŭ kiam ajn al via moŝto ekplaĉos, ni komencos la intencitan laboron.“

„Mia moŝto nenion permesas“, rediris Klara levinte sin vigle, „kaj por mia ripozo ne zorgu via moŝto. Vian „bonan nokton“ mi ne akceptas, „ĉar mi dumsonĝe riproĉus min mem, ke mi estis malbona mastrino, ne regalinte la karan gaston. Restu, nobela sinjoro, ho restu“, daŭrigis Klara per petanta voĉo, „ne rifuzu mian toston en tiu ĉi mia ermita dometo! Vi ĝin ne faros, ĉu ne?“, klinis Klara la kapeton, vidiginte per kvieta rideto siajn dentetojn?

„Via volo estas por mi leĝo“, gentile komplimentis Pavlo, dume lian frunton traflugis malgajeca nubo.

Post kelka tempo la servisto ekbruligis la vakskandelojn sur la origita kandelingo kaj metis sur la tablon la plej delikatajn manĝaĵojn kaj kristalan kruĉon, plena da cipra fajra vino. Altabliĝis Klara, altabliĝis ankaŭ ŝia gasto kaj ili ekmanĝis.

„Je via sano, je via feliĉo, juna kavaliro!“, levis Klara per bela maneto la arĝentan glason, „estu

glora kaj feliĉa! Tion revokas al vi la gemanta voĉo el ĉi tiu dezerto!“

„Dankon al via tosto, kaj al moŝto via, nobela sinjorino!“, rediris konfuzite Pavlo. „El la dezerto vi diris? Mi volus scii, kiele tiu lerta mano, kiu harmoniigis ĉiun ĉi belecon, kiele tiu mano prezentus la paradizon!“

„Per oro oni feliĉon ne pesas“, ekĝemis la vidvino apogante la kapeton je la blanka, brila mano. „Via juna vivo, kompreneble, estas turnovento, kiu senindulge traflugas la mondon. Sed mi! Ĉu vi scias pri la longaj malgajaj tagoj, kiuj pasas stereotipe kvazaŭ guto post guto, ĉu vi scias pri tiuj sendormaj noktoj, kiuj rampas sen ŝanĝo kvazaŭ nigra serpentego? Alforĝita mi ĉiame al la sama loko, sen defendilo sen ŝirmilo, sen — aŭroro de pli bona feliĉeco; tiel vivaĉi, tiel solaĉi, ĝi estas kuŝi viva en tombo.“ Nepriskribebla malĝojo vualis la vizaĝon de la vidvino, tamen mirinda pro ŝia beleco. Ŝia voĉo tremis kiel plendkanto de forlasita najtigalo.

La junulo konfuziĝis. Li tiris la manon tra la frunto, kvazaŭ por serĉi la pensojn, kvazaŭ por peli la nebulon for de la okuloj.

„Kaj via infano, nobela sinjorino?“, elreviĝis Pavlo.

„Jes, prave vi diris“, rektiĝis vigle Klara, „por mi estas mia infano la tuta feliĉo, la tuta ĝojo, la ora ĉeno, liganta min kun tiu ĉi mondo. Mi ĝin korege amas. Sed ĉi tiu mia karulino, se mi ŝin rigardas, logas la larmojn el mia okulo. Malĝoja pasintaĵo! Unu infano ne faras familion. Ĉu mia senkulpulinjo havas ŝirmilon? Ĉu min? Virinon? Ho!“, daŭrigis Klara mallevinte la kapon kaj rigardante antaŭ sin, „nobela sinjoro, antaŭ mi staras abismo!“

La virino silentiĝis, Pavlo mutiĝis. Por minuto ekregis silento, nur la turtino ekkveris, sidanta sur la apogilo apud Klara.

„Sed kio!“, strangvoĉe ekkriis la sinjorino ĵetinte la kapon posten. Ŝia okulo ekbrilegis kiel kiam la fulmo ekbrilas diamante, kaj la bukloj disflugis

ĉirkaŭ la blankaj ŝultroj kvazaŭ orserpentoj. „Por kio plendoj? Malsaĝa mi estas. Ĉu mi vin invitis por kanti al vi la vigiliojn kiel abatino? Kio estis pasis. Nia koro estas tombo, en ĝi trankvile ripozu la pasintaj ĉagrenoj. La estonteco? Ni estas blindaj, por kio serĉi ĝin? Kaj nuna ĝojeco? Ĝi estas ora muŝo, kiu matene naskiĝas, kaj vespere pereas. Ĝin oni devas ĝustatempe ekkapti. Heroe, sekve, sinjoro Pavlo!“, ekĝemis Klara per flama vizaĝo kaj ĵetinte la rozerojn de sia brusto en la glason de Pavlo, „heroe trinku por nuna gajeco, por feliĉa estonteco, floru al vi rozoj konstante!“

Kiel al serpento ekbrilis la okuloj de Klara. La maldika brusela kolumo derampis la blankan nukon, vigle tremetis la mallumruĝaj lipoj. Pavlo ŝtoniĝis senmove tenante la arĝentan glason.

Kaj la virino leviĝis.

„Trinku, Pavlo“, ordonis al li Klara.

„Por feliĉa estonteco!“, reis la junulo senpripense, senvoĉe, kaj eltrinkis la glason.

„Ĉu vi scias, Pavlo, kio estas nia estonteco?“, komencis Klara kun sufokanta, tremanta voĉo, ekpaŝinte al Pavlo kun spionanta okulo. Ĉu vi ĝin scias, Pavlo? Enigmo, ĉu ne? Sed mi, mia kora devas ĝin solvi. Vi mia, mi via, eĉ se Dio mem kontraŭstaros. Vi estas ankoraŭ juna, juna. Vi ankoraŭ ne konas la koron, vi ankoraŭ ne konas la amflamon. Oh, la amo ne estas ŝafido malsovaĝa, kvieta. Ne, ĝi estas furioza ĉevalo! Kiam ĝi ekfuriozas, galope rektiĝas kaj flugas kiel la ĉielfulmo, kiel norda ventego, ĉu ĝin povas bridi homa mano? Ho Pavlo, aŭdu, min!“, eksingultis Klara. „Mi ne amis mian edzon. Oni vendis min al la riĉa malspritulo, kiu aljungis min al la jungo de la doma leĝo. Mia animo estis la flugila birdo, kaj nun ĝi vivaĉis en la ora kaĝo. Oh en tiu abundo estis al mi, ke mi kunmetu la tutan mian oron, tutan perlaron kaj juvelojn por iri almozpeti tra la mondo: „Jen la trezoron al vi! Donu al mi la koron, la koron donu al mi!“ En mia koro bolegis flama maro, kaj super ĝi iĝis glacia ŝelo — la malamo, malestimo kontraŭ la edzo, kon-

traŭ la mondo, kontraŭ ĉio. Mi fariĝis patrino. Mi ĉirkaŭprenis la infanon, mi ĝin kore ekamis. Sed la infanon! Kaj mia edzo mortis. La jugo senŝargigis min, falis ankaŭ la malamo, sed tie ĉi, en la koro brulis eterna flamo. Estis al mi, ke mi ĉirkaŭprenu la ĉielon kaj teron, sed mi ĉirkaŭprenis nebulon. Tiam vi venis en ĉi tiun kastelon, vundita, malsana. Vi senkonsciiĝis, vin turmentis la febro. Dum la trankvilaj noktoj, kiam ĉiu animo kviete dormis, mi ŝteliris tra la mallumaj koridoroj al via dormoĉambro. La homoj diradis: „Fantomo rondiras!“ Kaj mi ekvidis vin junan, kiel vi kuŝis sanga kaj pala, sed bela, oh Dio, bela. Per bolantaj miaj lipoj tuŝis mi vian frunton, kaj por unua fojo en mia vivo disfluis tra miaj vejnoj la ĉiela sento de l' amo. Kaj mi ĵuris je sankta hostio, ke mi volas nur vin, kaj ke mi antaŭe en la tero malaperu, ol vin ne akiri. Oh Pavlo, mi vane serĉis, por malligi antaŭ vi la ligilojn de mia koro, sed hodiaŭ hazardiĝis. Oh Pavlo, por vi mi riskos mian animon kaj paradizon, mi fariĝos via sklavino, al vi donos mian animon kaj korpon! Ekkompatu min! Prenu min! Prenu min, ĉar mi — mi vin ne delasas.“ Kun sovaĝa entuziasmo, larmantaj okuloj falis la bela virino antaŭ Pavlon. La oraj ŝiaj bukloj tuŝetis lian vizaĝon, ke li profundkore frosttremis. Trankvile! En la ĉambro kveras la turtinoj, bonodoras la lilio kaj rozo, sed ankoraŭ pli bonodore la haroj de Klara. El la angulo bruas plaŭdo de l' ora drako, apud Pavlo bruas la silkvesto. Super lia kapo flugpendas la oraj anĝeloj de la amo. La nekonstanta flamo de la vakskandelo ĵetas palan lumon sur la brilan karnon de Klara. Ekstere pepas la grilo strangan kanton, kaj tra la fenestro rigardas malluma blueta ĉielo kun milo da diamantokuloj. Vidu, vidu Suzanon sur la muro! Ĉu ne movis blovo ŝiajn riĉajn harojn, la subtilan veston? Ĉu tiu akvo ne sprucis arĝentan ŝaŭmon? Ĉu la lotoso ne ekflamis per pli flama floro? Kaj ĉu ŝi ĉarma, belega ne emis salti antaŭ la junulon?

Lia cerbo afliktiĝis, la spiro mankas, furioza

sango trafluas liajn vejnojn. La konscio lin delasas. Sed li ekvidis ĵus leteron sur la tero. Klara ĝin perdis. Kaj Pavlo ĝin levis, lia okulo traflugis liniojn. La mano de l' patro. Li ektremis. Paliĝis kaj saltis. Kaj Klara elreviĝis, ekvidis la leteron, ekkris volante forpreni la leteron de li. Tiumomente la okulo de Pavlo haltiĝis sur la bildo de Dalila, sur la mokiga rido de l' perfidanta virino.

„Ha“, ekkris kolerege la junulo, „nobela sinjorino, profunde mi vin konas eĉ sub la anĝela vizago. La Samsono mi ne estas, sed vi estas la Dalila! Malbenita estu, paradiz-serpento! Ni kvitiĝis!“ Kaj en minuto li malaperis el la ĉambro.

„Pavlo!“, ekĝemis Klara kaj senkonscie falis teren.

La junulo flugis for de la kastelo Samobor sur la rapidĉevalo kiel fulmo. Lin preterflugis la lumoj de la kvieta loko kiel fajreroj. Ventego furiozis en lia koro. Li direktis sin al la arbaro.

„Haltu“, ektondris subite iu voĉo.

La ĉevalo galope rektiĝis. El la arbaro saltis viro, tenante la torĉon kaj ekprenis la kondukilojn.

„Haltu! Dora pereos!“, ekĝemis po dua fojo — la mutulo Jerko.

IX.

Pavlo konsterniĝis.

„Jerko, vi —?“, fine li ekkriis en miro, klinigînte, por konvikiĝi, ĉu la mutulo efektive malmutiĝis.

„Jes, Jerko!“, rediris la ĉifonvestita junulo, levinte la torĉon.

„Do vi — vi —?“, daŭrigis Pavlo.

„Mi — mi parolis“, jesis Jerko. „Ne demandu kiel, demanku kion! Ni iru!“

„Kien?“

„Post tiun monteton, en la arbetaĵon. Eĉ vulpo ne antaŭflaros nin.“

„Kial? Sed pro Dio, kion vi diris pri Dora, diradu pri Dora?“, vigle demandis lin Pavlo.

„Ni iru, mi ja diras al vi, sinjorido. Malsupreniru la ĉevalon, en la arbetaĵon! Pri Dora, jes pri Dora", daŭrigis flame la torĉportanto, „ŝin oni devas savi, ĉar — nu iru!", piedbatis li senpacience. „Oni bezonas interkonsiliĝi. Sed tie ĉi ne estas loko — meze de la vojo. Ekzistas la hajdukoj, eble eĉ la spionoj de via sinjoro patro!"

„Sed pro Dio, diru —" insistis Pavlo.

„Eĉ unu vorton ne! Ni iru!", ordonis Jerko.

Kiel vulpo ĵetis sin Jerko en la arbaron, kaj post li Pavlo kondukante la ĉevalon ĉe la kondukiloj. Ili subiris la monteton. Tie kuniĝadis la montaro. Ĝi estis kvazaŭ lupkavo. Sur la supro la arbaro, kaj en la kavo — densa arbetaro. De la monto fluis rivereto, kaj apud rivereto statis granda glata ŝtono. Pavlo ligis la ĉevalon al branĉo, dum Jerko ĵetis la torĉon en la rivereton. Ambaŭ sidiĝis sur la ŝtonon.

„Tiel!" ekdiris Jerko, observante kiel la lumilo estiniĝiĝas en la akvo „malaperu, brulanta perfidulo, por ke vi ne allogu al mi malbenitajn vespertojn — la spionojn. Sen tio mi sufiĉe suferis da timo. La tutan tagon mi vin spione atendas. Vane. Mi pensis jam, ke vin la multkolora serpento de l' kastelo allogis."

„Silentu pri tio!", kolere saltis Pavlo.

„Nenion, nenion! Dank' al Dio, ke ne! Malbone estus por vi, por mi, por Dora!", rediris Jerko.

„Parolu, ne turmentegu min, Jerko!"

„Malrapide. Nun estas bone. Oni ne bezonas timi. Jen, la luno ankoraŭ ne estas sur ĉielzenito, ĝi ankoraŭ palpebrumas tra la branĉaro; du plenaj horoj mankas ĝis noktomezo, kaj neniu danĝero minacas ĝis tagmezo!"

„Parolu, kio estas kun Dora! Pro diaj vundoj, parolu", eksplodis Pavlo, „ho knabo, vi ne havas koron!"

„Koron? Mi ke ne havas koron, sinjorido?", ekridis Jerko maldolĉe kaj malgaje, apoginte sian kapon je la mano. „Kaj kiu ĝin diris al vi? Sed jes! Certe miaj ĉifonoj. Mutulo — peralmozulo — malkuraĝulo — kaj koron? Ĉu ne? Ĉu vi scias, tra kio eniras la amo en la homon? Tra la okuloj, sinjorido, tra la okuloj! Kaj eliras tra la buŝo — ĉe vi, kiuj havas rapidan langon. Sed kiam vi estas muta, la tuta fajro restas en la koro. — Kaj mia buŝo estis ĉirkaŭbarita tombo. La amon mi gardas en la koro kiel karan mortinton, kiel patrinon, kiel patr- — ne, la patro estas morta por mi. Nu kion? Kaj kial mi babilas? Ĝuste tio vin koncernas!", ekridis larmante la malafabla junulo, vin koncernas Dora, kaj vi estas prava, ĉar ŝi estas bela, ho Dio, bela kiel sanktulino. Sed oni devas ŝin savi, ĉiaokaze oni devas — rektiĝis flame Jerko — savi aŭ perei." Kaj meditante mallevis la kapon.

„Knabo, ĉu vi volas ke malĝojo min mortigu?", ekkriis Pavlo.

„Aŭdu!", daŭrigis Jerko eĉ ne aŭskultante la junan sinjoron. „Kiam oni vin sendis al la bela sinjorino kiel muŝon al la araneaĵo, okazis en Zagreb ĉiaspecaj aferoj. Da bruegoj, kvazaŭ la mondo dispecetiĝos. Oni publikigis ke vi estas amanto de Dora kaj ke vi estas —" ĵus Jerko fikse rigardis Pavlon.

„Kio ke mi estas?", interrompis lin Pavlo.

„Nenio", rediris trankvile la junulo, „mi scias, ke vi estas honestulo, noblulo, ne nur je la nomo sed ankaŭ je via koro. Sed homa lango estas pesto. Tra Zagreb oni vin disklaĉis, kaj la koron de Dora venenis. Kaj precipe tiu favulo, ĝibulo-razisto."

„Ĉu tiu malkuraĝulo?", saltis Pavlo.

„Ĝuste tiu malkuraĝulo. Li revas pri oro kaj juna edzino. La idino de l' oraĵisto lin rifuzis, kaj li veng̃e agas kontraŭ ŝi."

„Li — — Doran!"

„Ĝuste li. Li incitis la popolaĉon kontraŭ vi ambaŭ. Estis post la vespera Diservo. Kiel malbonrikolta jaro rompiĝis la mizero super la mizerulino. Antaŭ la popolamaso — antaŭ la sinjoroj oni senhonorigis ŝin, ke ŝi pro vi makulis sian virgecon!"

„Kristo! Kaj kiu — diru, kiu ?", ekkriis Pavlo furioze ekkaptinte la sabron.

„Pro kolero la patro estis ŝin mortigonta, se tion ne malhelpis la mano de la juĝisto. Kaj post kiam la kolerego rompiĝis, diris li al la amiko Arbanas, ke ĉi tiu konduku ŝin kun si en Lomnican, por ke ŝi estu tie la paŝtista balailo, kaj ke ŝi ne aperu antaŭ la patron. Hodiaŭ estas mardo, kaj morgaŭ ĵaŭdo, morgaŭ ekiras Arbanas al Lomnica."

„Dora, ho mia Dora!", ekĝemis Pavlo, frapinte sian frunton. „Sed je Jesuo, ŝi ne iros en Lomnican, ne, mi ĝin ne permesas!"

„Trankviliĝu. Aŭdu! La duan tagon rimarkis mi en la arbaro la raziston. Li iris al Medvedgrad al via patro; li estas lia dekstra mano, li portis ankaŭ la leteron en Samobor pro vi. Kion tiu ĉi estas faronta sur Medvedgrad? Bonon ne, ĉar li estas diablo. Ankaŭ mi suprenrampis la kastelon. Por ke mi vidu, aŭdu. La razisto do eniris al sinjoro Stjepko. Tra la pordo oni ne vidas, tra la muro oni ne aŭdas, ĉu demandi la servistojn? — kiam oni estas muta. Krepuskiĝis. Mi estis certa, ke ili troviĝas en la granda turo. Mi ĝin rondiradis kiel putoro ĉirkaŭ kokinejo. Ĉio brulis en mi. Mi aŭdis murmuri; regis silento, sed la turo estas alta. Tiam flugis super mi birdo kaj sidiĝis sur la alta kverko, ne malproksime de la turo. Ankaŭ mi estas ekflugonta. Mi surgrimpis la kverkon pli kaj pli alten. Mi antigis la lokon. Mi kaptadis la branĉon, laŭ la povo de miaj muskoloj. Mi iom kliniĝis. La luno ne lumis, ĝi ne povis min perfidi, jam bone! Nun mi ĉion rigardis — kaj sufiĉe aŭdis. Ĉe la tablo sidis via sinjoro patro, kaj antaŭ li staris la ĝibhava razisto. „— Nu, kion do ŝi?", ekdemandis la sinjoro Stjepko. Ŝi kore ekridis", rediris la razisto, „kaj diris, (mi petas vian pardonon), ke vi estas diabla viro. Ŝi ne intencas allogi je sia plaĉo duan edzon, sed kiam estas via filo kaj delikata sinjorido, ŝi ne protestos. Kaj ŝi diris, ke ŝi lin konas, kaj ke ŝi estas scivolema, ĉu ŝi subtranĉos la flugilojn al tiu sovaĝa birdo." Kaj via patro: „Dank' al Dio, ke tiel estas, tiu ĉi restos en Samobor." — „He, sinjora moŝto", diris la razisto, „ne diru „hop" antaŭ la salto. Via

sinjoro filo, (mi petas vian pardonon), estas opstina kaj juna — juna. Tiaspeculoj saltas tien ĉi kaj tien; problable la sinjorino Grubar ne estas ŝerco por viro, sed la amo elvaporiĝas kvazaŭ brando sur manplato." „Nu, pri kio do vi pensas, razulo?", ekdemandis lin la estro Stjepko. — „He pri kio mi pensas, via moŝto — pri Dora. En tiu arbetaĵo kuŝas la leporo. Eĉ se Klara fariĝos la edzino de Grego-rianec, tamen Dora estos la amatino de l' juna sinjoro. Kaj tio estus malbone — malbone pro lia, pro via honto!" — „Ne malsaĝumu!", rediris lin Stjepko. „He, he, mi estas malnova birdulo, via moŝto! Mi tre scias, kio estas, kiam la virino unuan fojon ekkaptas la viron. Oni ne povas facile disiĝi. Precipe kiam tie ĉi en la malsaĝa koro fakte io brulas. Alie estas, se oni momente ebriigas junulon; la ebriiĝo pasas, kaj restas duonebriiĝo, mi petas vian pardonon. Ĉion ĉi tion kuracos sinjorino Klara", rediris la sinjoro Stjepko, „ŝiaj blankaj manoj estas fera prenilo!" „Sed p o n a m u s",[1] daŭrigis la razisto, „ke ili tiaj ne estas, ĉar ankaŭ tio estas pripensinda. Ni supozu, ke sinjoro Pavlo malebria vekiĝos en Samobor. Kion tiam, via moŝto, se la juna cerbo disŝiras la reton? Tio, tio turniĝas en mia kapo. Honto estus por via inda kapo. Tiuj zagrebaj malkuraĝuloj ankoraŭ pli ekfieriĝus super via moŝta gento. Kaj precipe depost tiu hieraŭa hontaĵo." „Post kia hontaĵo?" — ekdemandas via patro. Kaj nun komencis la razisto rakonti pri la tuta mizero okazita al Dora. Mi vidis, kiel dancas la okuloj de Stjepko pro furio, kiel li tute tremas de kolerego. „Ne, je mia Kristo", ekĝemis li „tio ne iros tiel pluen. Vi estas prava. Diru kiel eble plej rapide, kion vi scias." „He!", rediris la malgrasa fripono ridetante, „mi scius pri unu medicino, sed mi ne volas ofendi vian moŝton." „Parolu pluen", diris al li la estro. „Kiome mi scias, laŭ la famo, via moŝto ne malamas virinojn, kiam ili estas junaj kaj nespitaj — mi parolas nur laŭ la famo — kiam

[1] Ni supozu.

ili estas servutulaj aŭ burĝaj idinoj, ĉar tiaj virinoj kelkfoje eĉ fieraj estas je sia honto. Kaj Dora estas bela, tre bela. Via moŝto tre konas la junajn edzinojn el Graĉani — sed inter ili ne troviĝas tia, kia estas Dora, je mia kredo, ne troviĝas! Se do — nu via moŝto min ja komprenas. Ĉu tio do ne estus la plej bela venĝo al tiuj zagrebaj butikistoj? — Ĝi estus, ili ja krevus de la ĉagreno! — —"

„Vi mensogas, knabo, vi mensogas!", ekkriis Pavlo, saltinte furioziĝita kaj tremante kiel vergo. „Tio estas neebla!"

„Dio estas mia atestanto, tiel estis!", rediris Jerko trankvile, levinte la manon al la ĉielo.

„Ho! — Pluen do!", ekparolis Pavlo per sufokanta voĉo, sidiginte sin kvazaŭ senkonscie sur la ŝtonon.

„Via patro", daŭrigis Jerko, „post tiuj vortoj ekmeditis. „Via moŝto ankaŭ mem vidas", diris la razisto, „ke tio estas tute klara. Patro kaj filo ne povas la saman junulinon, kiel oni diras — ami. Se do venos pli frue la patro, la filo devas forlasi la batalejon". „Bone, bone", respondis la maljuna sinjoro, „sed kiel? Ja la zagrebanoj! Publika perforto!" „Facile por tio, kiam mi nur scias, ke vian moŝton la konscienco ne mordas. Post tri tagoj la maljuna Arbanas forkondukos la knabinon veturile en Lomnican. La maljunulo estas malforta, idioto. Tiu ĉi ne baros al ni la vojon. Frapetu ni iomete lian maljunan kukurbon, kaj en momento li estos senkosciigita. Plua vilaĝo post Botinec ne ekzistas. Apud la vojo estas la arbetaĵaro. Vestigu du kernecajn knabegojn kiel hispanaj rajdistoj — nepre Lackon Crnĉiĉ, li ĝin bone komprenas. La veturilo venas, la knabegoj el la embusko — kaj for la knabinon kontraŭ via kastelo Molvice aŭ pluen trans la limon — estu servita via moŝto. Kaj la zagrebanoj kriu! Kion vi volas? La hispanaj forkurantoj forprenis la mizerulinon. Dio sciu, kie estas la kompatinda junulino! Ha! ha!", ekridis la razisto. „Bravo!", diris via patro, kaj mi malsurgrimpis la

arbon por serĉi vin. Ĉu vi scias kion ni estas nun farontaj?", finis Jerko.

„Mi scias, mi scias", ekĝemis Pavlo malespere, „ho patro, patro, kion vi faris, patro, al kio vi pelas vian filon?! Kaj al vi, brava junulo, dankon, centoblan dankon; honesta vi estas, Dio vin rekompencu! Sed ni iru por antaŭiĝi la krimulojn, por forpreni ilian kaptaĵon!"

„Tute ne", rediris Jerko, kaŝante la varmegajn larmojn. „Vi ne konas min, sed mi estas via sklavo, kaj sklavo de Dora. Estu trankvila. Ni atendu la tagiĝon. Je la tagiĝo ni trovos ankaŭ Miloŝon en lia posteno."

Pavlo kvietiĝis. Ĉiu ĉi tiu rakontado malordigis lian cerbon. Li ekmeditis. Kaj nevole direktis la okulojn al Jerko.

„Jerko!", almetis li tiam, „ĉu vi ne estas muta? Kiamaniere vi do malmutiĝis? Per kia miraklo? Vi servas min, defendas Doran, kial? Kiu vi estas?"

Jerko klinis la kapon al la brusto, eĉ unu vorton ne respondante.

„Ĉu vi aŭdis, Jerko?", karese ekdemandis lin Pavlo, metinte la manon sur lian ŝultron.

„Ne pridemandu min!", rediris li malkontente. „Parolu! Je la tombo de via patrino, amiko, parolu!"

Jerko silentis. Ia maltrankvilo lin ekregis, lia brusto treege ŝveliĝadis, du trifoje rigardis Pavlon, kvazaŭ timante de li. Fine rektigis la kapon kaj laŭte eldiris: „Via frato".

Pavao saltis. Mute rigardis la junulon, sidantan trankvile sur la ŝtono.

„Ĉu vi, knabo, freneziĝis?", ekĝemis la juna Gregorianec.

„Via frato mi estas", rediris kviete Jerko.

„Vi? — Kiel?"

„Jes, tiel estas. Vidu!", diris Jerko, eltirinte el la sino saketon, pendinta ĉirkaŭ lia kolo, kaj el la sako multekostan ringon. „Ĉu vi konas ĉi tiun blazonon? Ĝi estas via. Je mia naskiĝtago pendigis ĝin ĉirkaŭ mia kolo mia patro — via patro. Mi estas

Gregorianec same kiel vi — laŭsange; laŭ lakto ne. Vin alia patrino naskis. Mi estas pliaĝa de vi — sed ne timu pro la heredaĵo: vin aperigis laŭleĝa kuŝejo, min la peko de nia patro. Vi miras? Ĉu ne? Aŭdu min! Kiam la mutulo ekparolos, vi scios, kial mi vin, kial Doran gardas. Sidiĝu ĉe mi."

Pavlo nevole malleviĝis al la ŝtono.

„Mi diros ĉion", ekis Jerko, „kion mi scias pri mi, kion mi aŭdis de aliaj, ĉar mi estas tro juna por ĉion memori. Mia patrino estis nomata Jela, ŝi estis de servutula gento. Kiam oni iras de Zagreb al Graĉani, sub la monto staris ligna muelejo. Tie ĉi vivaĉis mizera maljunulino kun sia solfilino Jela. En la tuta dia mondo ĉi tiuj du virinoj havis neniun parencon krom la sola frato de la patrino, la blanka monaĥo en monaĥejo Remete. Ili vivaĉis ĉu de muelejo, ĉu per la fosilo ĉu per la brutoj. Jen donu al la servutulestro, donu al la preĝejo, laboru, sur la sinjorida kampo kaj en la vinberejo de l' monaĥoj por solvo de la pekoj, kaj se ankoraŭ io restas en hejmo, apenaŭ sufiĉas por kvietigi la malsaton. Kion vi volas? Sa solaj virinmanoj, nek duono da virseksulo en la hejmo. Mizero — Malsatis oni dum somero, malsatis oni dumvintre. Plie venis ankaŭ la turka tento. Ĉiu kamentubo oni devis venigi po armitan knabon por la banuso armeo, kaj kie ne estis da virseksuloj oni devis pagadi kaj la nutraĵon donadi. La onklo, monaĥo, nature donis kelkan fojon pogroŝe al la maljunulino, sed li estis malriĉulo mem, kaj la aliaj monaĥoj ne permesis, ke li portu iom da vivsubtenaĵo el ilia sankta ejo. Oni rakontis al mi, ke mia patrino, tio estas Jela, estis tre bela, pia kaj prudenta. Por ĉiu domnecesaĵo ŝi sciis parkere rilatantan preĝon, por ĉiu festo-aŭ fastotago. Ŝi sciis ankaŭ labori en la domo, kiel iu ajn brava „reduŝa"[1] (mastrino). Ĉion ĉi tion diris al mi la onklo Jerolim. Venis ankaŭ la svatiĝantoj,

[1] „Reduŝa", lauvorte „viculino". Ĉe kroataj grandaj familioj ĉiu edzino devas dum unu semajno mastri la domon kiel vera ĉefmastrino. Post unu semajno estis la vico de alia. Pro tio ankau la nomo: „nedeljka", semajnulino. N. d. t.

sed ŝi ne povis forlasi sian patrinon, kaj muelejon. Kia feliĉo se ŝi ĝin farus, estus pli bone por ŝi. Sed kion vi volas! Eĉ mizero estas feliĉa, kiam ĝi ne konas pli bonan feliĉon, la virinoj do en la muelejo diradis: Dank' al Dio ankaŭ tiele. Tiam la servutuloj de Medvedgrad ricevis la alian estron. Sinjoroj Erdödi estis venditaj la bienon al via avo Ambroz. La servutularo ĝojis, esperante, ke estos pli bone. La administristoj de l' Erdödoj malplenigis la servutulan valizon ĝisfunde tiel, ke la najbaroj ne povis profitigi unu la alian eĉ per kokinovo. Ke estos pli bone, jes! Bela plibono! La maljuna estro Ambroz sidis konstante en la kastelo. Tiam ve, tiel al la administristo kiel al la servutulo! La maljunulo kiel tiela, sed la filoj, puraj diabloj! Ĉe Baltazar Gregorianec iel ne estis ĉiuj radoj en ordo. Kiam lin la malsano atakis, ĉion ĉirkaŭan li dispecetigis. Kaj la pli juna Stjepko estis vere serioza, sed fierega, perfortema. „Pardonu, sinjorido", aldonis nun Jerko „se mi tiel krude parolas pri nia patro, sed mi nur reparolas tion, kion al mi rakontis la onklo Jerolim. Kiam li revenis de la turka milito — ĉar li ofte militis kontraŭ la turkoj, estinte juna — kiam li revenis de la turka milito — ve kaj rea ve al la ĉirkaŭaĵo! Li rabis la monaĥojn, embuske atakadis la burĝojn, turmentadis la servutulojn, kaj perforte malĉastigis iliajn edzinojn kaj filinojn. Gregorianecoj devigis la servutulojn, por ke iru konstruadi la fortikaĵojn Koprivnica, Ivaniĉ kaj multon tiuspecan. Multego da homoj pereis. Plie venis ankoraŭ la pesto, helpu Dio! La homoj ekfalis kiel muŝoj, ĉiu dua domo senhomiĝis. La pesto ekkaptis ankaŭ la maljunulinon en la muelejo. Ŝi pereis. Je miro restis sana la junulino. La blankaj monaĥoj diris, ke Dipatrino faris miraklon al ili. Sed la muelejo ke estas pestiĝita, ĝi estu forbrulota. Kaj ĝin forbrulis ili. Nun malbono al Jela. Kien do? La onklo volis, ke ŝi servu en la monaĥejo. Sed ne. Sinjoroj Gregorianecoj, ĉiam koleremaj kontraŭ la monaĥoj, ĝin ne permesis, sed ke ŝi devu servi en la kastelo. Pli bone ankaŭ tiel ol nenion, kaj la servutulo devas. Jela estis bel-

kreska kaj lerta, kaj pro tio kun afabla mieno akceptata en la kastelo. Ian aŭtunan tagon — jes, jes, jus je Madono de Septembro ĉiuj pilgrimis. En la kastelo restis la maljuna pordisto kaj mia patrino, por ke ŝi mizera gardu la domon. Jus revenis Stjepko el Mokrice. Li unuan fojon ekvidis Jelan. Ŝi estis ekiranta pririgardi ion en la ĝardeno. Stjepko ŝin sekvis. Li parolis pri ĉiospeco, jes proponis al ŝi la orĉenon. Ŝi nek aŭdi. Ŝi lin forrifuzegis mallonge. Sed li ekfurioziĝis. Malbono okazis. Per forto li trompis la junulinon —".

Jerko nun momente paŭzis, liaj okuloj ekbrilis per sovaĝa brilo. Poste daŭrigis:

„Jes, per forto! Ŝi alvokis Dion je helpo, sed forto Dion ne preĝas. Ĉu akuzi lin? Al kiu? Ĉu al la patro? ĉar lia filo iomete ŝercis? Estus ridindege. Honto al la junulino! Ĉu servutulo povus havi honton? Estis, pasis, sed ne restis sensigne. Mi mizerulo naskiĝis — sed ne en la kastelo. La juna sinjorido ne estis hejme, kaj la maljuna sinjoro forpelis la junulinon el la kastelo, ĉar, diris li, ke ŝi estas malhonesta. Mi mizera naskiĝis en paŝtista groto, sur harda tero, kovrita per pajlo. — Stjepko estis ankoraŭ fraŭlo. Reveninte hejmen, ekaŭdis pri la okazintaĵo, ke li havas filon de ia servutulino — sed lia sango. Li nin vizitis. Li min kisadis, luladis kaj de l' ĝojo pendigis je mia kolo ĉi tiun ringon. Li lasis nutradi min de iu maljuna avino en la monto. Oni imagus, ke li havas koron, sed estis nur ŝerco. Li edziĝis kun sinjorino Marta de Susjedgrad, ĵaluzema eĉ je pasintaj pekoj. Ŝin klopodis ankaŭ iu juna Bakaĉ. Li minacis aperigi la pekojn de Stjepko. Li subaĉetadis ankaŭ mian patrinon, ke ŝi portu min al la juna sinjorino en la kastelo. La patrino ĝin rifuzis. Pri tio aŭdis Stjepko. Li furiozis. Plie la patrino naskis Pavlon — vin. Unuenaskito, kia ĝojigaĵo en la hejmo! Ĉar la servutulan bastardon oni ne kalkulas al la homoj. Nun oni la avinon atakis, ke ni kiel ajn malaperu, estas ja malagrablaĵo, ĉar kion dirus sinjorino Marta? La maljunulino ne volis. Ŝi estis pia, kaj pri ĉio

sciigis la onklon Jerolim. Ian tagon invadis la armitaj viroj en la kabanon de la maljunulino serĉante la patrinon — servutulinon, — la infanon, sed la kabano estis senhoma. La onklo kompatis al ni. La patrinon lokigis li iom pli malproksime en la montaro post Granešine sur la kapitola bieno ĉe vilaĝano, kaj min, la viktimon de Gregorianec, oni prenis en la monaĥejon pro dia amo, sed ankaŭ pro la venĝo kontraŭ la estro de Medvedgrad. Gregorianecoj traserĉis la montaron. Vane. La monaĥoj estas saĝaj homoj. Mi kreskis, ekgrandiĝis. La patrinon mi ne vizitadis. Pro timo mi el la monaĥejo nenien, kaj ŝi pro timemo nek proksimen. Sole la onklo rakontis al mi, ke la patrino malsanas. Mi estis proksimume sep-jara. Ian nokton subite vekis min la onklo. Surĉevale ni direktis al la montaro. Ne malmulte mi miris. Jerolim kunportis la broditan saketon da sanktigitaj hostioj. En la daŭro de du horoj kaj duono ni alvenis al la dometo, staranta en montara solejo. Ni eniris. Sur la lito kuŝis virino pala, kaduka, kun fermitaj okuloj, krucitaj manoj. Mi ŝin ne konis. „Jen via patrino!", diris la monaĥo. Mi ne scias, kiel estis en mia koro, io min sufokadis. Mi sentis, ke al mi estas iel malbone. Sed io min altiradis al la pala virino. Mi ĵetis min sur ŝin kriante dum ploro: „Panjo, kara panjo!" Mi memoras pri tio tre. La virino malfermetis la okulojn, karesis mian frunton per la malvarma mano, alpremis min al la brusto; kvazaŭ por sufoki min. Ŝi ploregis, mia ĉemizeto tute malsekiĝis de la larmoj. Kaj ree ŝi min malpremis. Ŝi havis spirmalaperon, kaj sentis sin malbone. Fine ŝi svingis per la mano al la onklo. La monaĥo ekgenuis, parolis kelkon da latinaj vortoj kaj donis la hostion el la saketo al la patrino. Ankaŭ mi ekgenuis, kaj preĝis. Kial? Mi ĝin ne sciis. La patrino levetis sin. Ŝi apogis sin je la kubuto, kaj klinis la kapon al la ŝultro. Ŝiaj fingroj maltrankvile karesis la litkovrilon, fiksante siajn okulojn sur min. „Filo!", ekparolis ŝi per malforta voĉo „mia filo! Vidu, al la patrino estas malbone, tre malbone. Ŝi forlasos vin por longe —

longe. Ĉiutage preĝu por la patrino „Patron Nian“ aŭdu, ĉiutage. Sed aŭskultu“, daŭrigis ŝi esotere, dum ŝiaj okuloj ekbrilis per stranga flamo, kiu min timigis, „la homoj estas malbonaj! Tre malbonaj! Ili vin mortigos! Gardu vin. Ne diru, kiu vi estas. Jes, ne parolu.“ Tiam ŝi palpebrumis al sia frato: „Venu ĉi tien, kara frato. Pardonu min pekintan. Mi ĝin ne faris propravole. Por unu mi vin petas. Ĵuru al mi, ke vi estos al ĉi tiu infano patro kaj patrino! Ĵuru al mi, ke vi lin sciigos, post kiam li grandiĝos, pri lia patro, sed ne por ke li serĉu sian patron, sed por gardi sin de li. Ĵuru al mi, ke vi lin tenos kvazaŭ mutulon, por ke lia lango ne perfidu la sekreton, kiu povus alporti al li morton, kaj ke li ne ekparolos homan langon antaŭ ol lin ne renkontos ekstrema danĝero. Ĵuru al mi por ĉi tiu infano, tial ke li mem ne scias, kion mi ĵen parolas.“ — „Fratino!“, ekparolis la monaĥo. „Ĵuru!“, reis ŝi. „Mi ĵuras, mi ĝin faros“, ĵuris la monaĥo metinte la manon sur mian kapon, „mi ellernos lin silentegi!“ „Benu vin Dio kaj ĉiuj sanktuloj, ho filo!“, la patrino kisis min sur la frunton. Ŝiaj lipoj estis glacie malvarmaj. Ŝi falis posten; ne parolis plu. La monaĥo preĝis ankoraŭ, kaj mi — mi ploris. Mia patrino estis malviva.“

Jerko klinis la kapon, kovrinte sian vizaĝon per la manoj, ĉu por rememoriĝi pri tiu terura sceno, ĉu por defendi sin de la larmoj.

„Jerko!“, konsolis lin Pavlo mildvoĉe.

„Mi revenis en la monaĥejon“, daŭrigis la junulo. „De tiu tago komenciĝis mia nova vivado. La hajdukoj nin enfalis en la arbaro, diris la onklo al la monaĥoj, de la teruro li perdis la parolon. Nek unu vorton mi devis paroli publike, ĉar la homoj mortigos min, diris mia onklo. Mia buŝo estis tombesilenta. Ĉiujn ĉagrenojn mi entombigis en mia koro; mi aŭskultadis, kiel oni min bedaŭras, mokas, mi aŭskultadis, kaj silentis, mi estis kvazaŭ-mutulo. Jes, mutulo mi ankaŭ restis pluen. La timo de la homoj, la ĵuro antaŭ la patrino perforte fermis mian buŝon. Ĉion mi aŭdis, ĉion vidis, kio okazas ĉirkaŭ mi,

sed ĉion, ĉu ĝojon, ĉu malĝojon, ĉion mi devis enfermi en mia koro — ĉion. Mi ne devis rideti, aŭdante kian agrablan kanton, mi ne devis singulti, sentante kian doloregon. Ĉiujn vivecajn ekkriojn de la juneca animo devis mi reteni interne; mia vivo estis fluanta akvo — sed sub glacio. Krom mia onklo, sola la abato sciis, kiu mi estas, kaj de kies gento. La ceteraj monaĥoj kaj alia popolo rigardis min kiel ian malsovaĝan degeneraĵon de l' homaro, portanta sian ŝarĝon pro ia pekego. Ili nomis min Jerko — muta Jerko — jes, malsaĝa Jerko. La onklo vestadis min en la ĉifonojn, por ke ne estu suspekteblo. Gregorianecoj opiniis, ke ilia degeneraĵo ie vagas, eĉ en la soñĝo ili ne soñĝis, ke ĝi vivas proksime ilin sub la ordinara drapaĵo. Mi havis malmulte da okupado. Mi ornamis per la floroj la sanktulojn, portis la standardon en la procesio, piedpremadis la orgensakon kaj, purigadis la ĝardenon. Mi lernis plekti la matvalizojn, kanĉapelojn kaj ĉarpenti la trogojn, kaj tion mi vendadis al la popolo. Tial ke min neniu konis je gento, estis nenia danĝero, kaj mi iradis ĉirkaŭen tra la vilaĝoj. Tiam la hundoj alkuris al mi, la homoj mokis min, ke mi estas dia timo, la avinoj parolis pri mi, ke mi estas pura pesto, dum la infanoj alĵetis min per la koto. Hu! kelkfoje mi estis ekfuriozonta, ekkrionta kiel muta besto, malbenonta laŭte la mondon kaj ĉion sur ĝi. Mi ĝin ne faris. Ĉiufoje mi rememoris pri la volo de la patrino. Sed mi ne restis malspritulo. Dum kvietaj vesperoj, en malgranda ĉelo instruis min la onklo pri ĉiaspecaj utilaĵoj. Mi ellernis legi, skribi kaj preĝi, mi ellernis koni la herboin kaj bestojn, kaj kiel la suno moviĝas, kaj kiel la steloj rondiras. Nokte mi estis saĝulo, tage malspritulo. Kelkan fojon ŝteliris mi en la arbaron, montaron, kie oni eĉ homan voĉon ne aŭdas. Tie estis al mi agrablege, bone. Mi sciis ĵeti min teren kaj pripensi, kiaj ni homoj estas kaj, kia estas ĉi tiu nia mondo. Kaj kiam mi estis tiel sola kvazaŭ guto sur folio, — sed tamen timante rompi la solenpromeson de la patrino, mi ekimitis per la

voĉo la najtigalon, ranon, vulpon, kukolon. Kaj al mi estis iom pli facile. Oni ofte miris, kiel somere kriegas vulpo, kiel dumtage uĥas gufo. Sed tio estis nek vulpo nek gufo — mi estis tio. La onklo mortis. Antaŭ la morto mi devis ree doni tiun teruran ĵuron, kaj li donis al mi faskon da paperoj, en kiuj estis ĉio enskribita, kiel estis kun mi. Post lia enterigo, mi forkuris en la „lupkavon“ en la montaro, kaj tralegis la leterojn de la maljunulo. La tutan nokton mi ploregis. Mi restis plu en la monaĥejo, sed mi multe vagadis tra la montaro. Kaj kion fari en la monaĥejo? Mi ja perdis tie solan koron, kiu plaĉis al mi inter ĉi tiuj muroj. Sola — tute sola staris mi en dia mondo. Mi rememoriĝis, ke mi havas la patron, ke mi havas la fratojn. Kelkfoje mi altreniĝis al Medvedgrad, por ke mi vidu ĉi tiujn miajn nedistinitajn parencojn. Mi rigardis la malafablan patron en la arĝento kaj oro, mi rigardis ankaŭ vin, sinjoreto, la belan kaj afablan knabon. Ĉu vi memoras ĝin, kiam vi min renkontis tiame sur la arbara vojo — vi kaj via patrino?“ —

„Mi memoras!“, rediris Pavlo.

„Patrino“, vi diris, „jen mizerulon, li estas muta, donu al li denaron!“

Kaj sinjorino Marta donis al mi denaron, kredante, ke mi estas almozulo. Kaj mi saltis post la arbetaĵon freneza de la ĝojo kaj komencis briligi tiun arĝentan krajceron. Mi ĝin enkudris kaj kiel amuleton mi ĝin portas ĉirkaŭ la kolo, kiel solan ligilon, kiu min ligas kun mia familio, pri kiu mi kredis, ke estas senkora. Depost tiu tago ekamis vin mia koro. Se vi scius, kiel saltetis mia koro, kiam oni alportis al vi tiame unuajn fragojn, kiam mi kaptis al vi la sciuron aŭ elĉarpentis tiun lignan sabron. Mi estis feliĉa, tro feliĉa. Sed nun aŭdu, kio okazis kun mi. Ĝi estas sekreto. Ĝis ĉi tiu momento scias neniu pri ĝi ekster Dio, kaj mia koro. Ne priridu min!“, turnis sin Jerko flanken, eble ĝi estas malsaĝaĵo. Sed kion vi volas? Dio donis eĉ al la mizerulo la okulojn por vidi, la koron por senti. Estis antaŭ kvar jaroj. Ĵus estis Pentekosto. En Remete estis granda pre-

ĝejfesto, granda meso. La popolo ariĝis de ĉiuj flankoj; eĉ de Zagreb estis da ĝi. Mi ree piedpremadis la orgensakon al la orgenisto. Je unu fojo ekvidis mi junan knabinon, belan kaj delikatan, genuiĝantan kun kunplektitaj manoj kaj apud ŝi ian maljunulon. Tra la alta fenestro verŝadis la suno siajn radiojn kaj ĉirkaŭ la kapo de la junulino tremetis la sunoro. Mi ŝtoniĝis, forgesis mizera eĉ mian orgensakon, kaj la orgeno momente mutiĝis, ke min la frato maldelikate puŝis. La tuta mia sango kuris al la koro, la tuta mia animo skuiĝis. Sed por kio pluen rakonti? Ĉu vi scias kio estas, kiam junula okulo interfrapiĝas kun junulino? Kaj kiel estis nur al mi mizerulo, kiu ne havis animon! Mi freneziĝis. Mi kredis, ke la febro disŝiros mian kranion. Mi sekvis la junulinon. En la arbaro ŝi rompis branĉeton — kaj forĵetis ĝin. Kaj mi ĝin levis, levis kvazaŭ mi trovis diamanton, ĝin kisadis kaj ĉe la koro metis. La junulino estis zagrebanino. Mi elspionis ŝian domon: mi nokte ŝteliris ĝis ŝia ĝardeno kaj fikse rigardis la fenestron, kie brulis ŝia lampo. La tutajn noktojn maldormis mi kaŭrante ĉe la barilo kaj fikse rigardante la domon. Kaj ĉu vi scias la nomon de la junulino? — Dora, Dora de Krupiĉ!“

„Dora!“, ekkriis Pavlo malespere.

„Jes, ŝi. Mi sciis pri ĉiu ŝia movo, pri ĉiu irado. Kompreneble ŝi ĝin ne konjektis. Kiel ja, ke ŝi ekvidu min, min — mizerulon!“ Kaj Jerko ekploregis. „Pri ĉiu moveto“, mi diris. Venis ankaŭ tiu terura tago sur la kapitola placo. Vi ja scias. Mi estis savonta ŝin. Vi estis pli feliĉa. Min piedpremis la ĉevaloj. Ho se min la morto atingis! Per via zorgo mi resaniĝis. Miaj vundoj cikatriĝis, la koro neniam. Tiam mi prispionis, ke vi, sinjoro Pavlo, amas la knabinon. Mi estis mortiginta min; sed la koro malhelpis al mi ĝin. Ili amu unu la alian, ekkriis mia koro. Tiu duo, la plej kara al via koro en ĉi tiu mondo, tiu duo trovis unu la alian kaj amas sin. Suferu trankvile, malsaĝa koro, rigardu ilian feliĉon, post kelke da tempo, fariĝos ankaŭ vi feliĉa per ilia feliĉo. Pavlo, ho frato, tie ĉi en la noktso-

leco, kie nin neniu vidas, neniu aŭdas, tie ĉi mi ĵuras al vi, ke mi ambaŭ vin gardos, ke mi estas feliĉega sub ĉi tiuj ĉifonoj, se vi estos feliĉa kun Dora!“ La larmoj penetris la okulojn de la junulo, en kiuj reflektis sin la brilanta lunlumo; mortpaleco vestis lian vizaĝon, li ĵetis sin sur la malvarman ŝtonon, kaj ploris, ploregis tutkore.

„Jerko, frato je Dio kaj je sango!“, ekkriis Pavlo levinte la junulon al sia ĉirkaŭpreno. „Leviĝu, venu sur mian bruston, mi trovis la amikon, mi trovis la fraton, dankon al vi, ho ĉiela Dio!“

„Kaj ĉu vi min vokas per tiu dolĉa nomo, ĉu vi min ne rifuzas for?“, ekdemandis lin Jerko timeme.

„Forrifuzi? En mian rondon mi vin kondukos.“

„Mi dankas vin“, rediris malgaje Jerko, „mi estas feliĉa trovinte per Dio la animon, por raporti al ĝi kion mi sentas, sed via rondo ne estas por mi, mi iros mian vojon. Sed aŭdu min pluen. Mi eksciis pri infera intrigo kontraŭ vi kaj la junulino. Mi eksciis pri la intertrakto. Oni devas helpi, mi diris. Mi ekrapidis ĉi tien, pensante, ke via animo abismiĝis ĉe la bela perfidulino. Mi spionis, sed ne povis vin elspioni. Sed fine vi ekkuris el la kastelo. Li forkuros de mi, mi pensis. Mi estis ekfuriozonta. Tiam mi ekpensis pri la ĵuro farita antaŭ mia patrino. Danĝero minacas al mi, kiam oni volas frakasi, kio estas al mi la plej kara sur la mondo. Kaj mi kunigis la tutan mian voĉon ektondrante post tiom da jaroj unuan fojon per homa voĉo: „Haltu! Dora pereos!“

„Ho, dankon al vi, nobla animo, dankon!“, ĉirkaŭprenis lin Pavlo.

„Ĉirkaŭprenante la fratoj unu la alian sidis sur la ŝtono. Ili parolis nenion. Kiu ja povas paroli ĉirkaŭprenante tiele?“

Sed je unu fojo Jerko salte leviĝis.

„Aŭdu!“, ekkriis li, „de Samobor resonas la dua kokokrio. Estas la horo! Ni iru — savi Doran!“

X.

Estis ĉirkaŭ la dekunua matene. La ĉielo malhela, kaj super la arbetaĵo apud Sava flugpendis ĉi tie kaj tie subtila nebulo. La aero malseka kaj sufiĉe malvarma, ĵus perfekta aŭtuno. Antaŭ la kabano ĉe la pramo sidis la dentmanka maljunulo Mijo, skrapante per malakra tranĉilo la ŝelojn de la fiŝeto. Li estis en sia laboro tiel enpensiĝinta, ke li eĉ ne rimarkis, kiel lia pli juna kamarado estis ekpuŝinta sin de la Savbordo kontraŭ alia bordo. Je unu fojo ekvekigis lin ĉevalhufoj. Li levis la kapon, kaj komencis rigardaĉi tenante senmove la tranĉilon kaj fiŝon. Li tre ekmiris. Kontraŭ la kabano trotis sur la ĉevaloj du ĝendarmoj en ruĝaj jakoj, grandaj flavoj botoj, nigraj manteloj, mallevinte la vizierojn, ke oni ne distingu ilian vizaĝon; super ĉio ili havis strangan glavon, longan kvazaŭ rostostango eĉ pli longan. La ĝendarmoj turnis sin apud la kabano kontraŭ la ŝoseo de Sisak. La pli juna ŝipisto, Ŝimun, metis kviete la remilon sub la subtegmentaĵon kaj intencis eniri la kabanon. La maljunulo palpebrumis kontraŭ li per unu okulo, kvazaŭ demandonte lin: kiu estas ĉi tiuj homoj.

„Hm“, rediris Ŝimun levinte la ŝultrojn, „Dio sciu men, kiaj gastoj ili estas. Verŝajne iaj hispanaj ordonitoj; almenaŭ laŭ la longaj stangoj mi ĝin d i r u s. Tamen ili por la veturado honeste pagis.“

„Ĉu pagis“, ekmiris la maljunulo „mirinde kaj mirindege! Ili pagis la veturadkoston. Tiel neniam agas tiuj hispanaj rabistoj.“

„Rapidiĝu, Mijo, rapidiĝu!“, almetis Ŝimun pli severe.

„Skrapu! Ha jes!“, li frapis sian frunton. „Lasu, Mijo, la fiŝon. Iru Zaprudjen.[1] Jen estas la denaro, prenu la kruĉeton kaj alportu da prunbrando. Malvarme estas hodiaŭ. La frosto mordas ĝis la ostoj. Ĉu ne, Mijo?“

„Hu jes, jes!“, skuis sin Mijo tre ridinde pripen-

[1] Legu Zapruĝe, vilaĝo apartenanta al Zagreb, nune nomata Otok. N. d. t.

sante pri frosto sed pli multe pri la brando. Li prenis la denaron, prenis la kruĉeton, prenis la ĉapelon kaj transen trans la arbetaĵo kontraŭ Zaprudje.

„Ho dank' al Dio!", ekmurmuris Ŝimun rimarkinte, ke la maljunulo malaperis en la salikaro. „Mi liberigis min de tiu ĉi stultulo kiel lupo de la hundo. Por kio ja taŭgus tiu stulta kapo en tia entrepreno? Li babilas; li ne scias, kiam oni devas ligi la langon, kiam ĝin malligi. Mi scias, ke li survoje la duonon de l' brando eltrinkos, ĝis kiam li ne falos kiel mortpafita leporo. Sed Grga! Al la diablo, ankoraŭ li ne venas. Mirinde!" Post tio metis Ŝimun la brakon super la okuloj rigardante la alian bordon. Fine li sidiĝis por purigi la fiŝon kaj kanteti tra la dentoj: „Lijepa ti je ptica kos!"[1]

Je unu fojo resonis de malproksime „kvar! kvar!" kaj post momento iom pli proksime „kvar, kvar!" Ŝimĉjo atente levis la kapon.

„Kio estas tio? Grga diris, ke li imitos koturnon, kaj jen mi aŭdas korvon. Sed tio ne estas de Zagreb, ĝi estas de ĉi tie. Korvoj. Ha, ha! Eble ili konjektas ke estos da kadavraĵo. Ha, ha!" Kaj rea silento.

Sed reresonis la voĉo, tiun fojon per „puĉpuriĉ!" Aha!", saltis Ŝimĉjo, „jen mian koturnon! Nun estas la horo!"

Li ekrapidis al la bordo, malligis la boateton kaj ekremis en Savan. Baldaŭ revenis kaj kun li ankaŭ Grga Ĉokolin.

„Nu, ĉu la knaboj estas en siaj postenoj?", demandis lin la razisto.

„Estas."

„Kaj tie ĉi estas neniu proksime?"

„Neniu, krom jen kelko da korvoj en arbetaro."

„N o m e n e t o m e n. Tiuj nin ne ĝenos. Kaj la maljunulo Mijo?"

„Ne zorgu pri li, majstro Grga. Lian cerbon mi subhejtis iomete kaj sendis lin en alian vilaĝon. La prunbrando estos lia akompananto, malproksimaj

[1] Bela estas birdo merlo. N. d. t.

vojoj, profundaj kavoj, kaj sur la sabro oni dormas mole. Ha, ha! Mijo kaptos kankrojn, ne havu vi kapdoloron pro li."

„B e n e! Ĉio estas pura! Ŝimĉjo, vi estas saĝa kapo."

„Nature! Mi ja ne bakis dum la tuta mia vivo pirojn sur tiu ĉi malbenita gruzo."

„Mi scias ĝin, amiko Ŝimĉjo, mi scias!", rediris ruze la razisto. „Al vi estas kiel al mi. Ĉu mi ne devas ĉiutage razi la kukurbojn, centoble pli malsaĝajn ol mi, ĉu mi ne devas? Se vi nur provus, ĝi estas diablaĵo. Oni ne demandas vin, ĉu vi havas da salo en la kapo, sed kies vi estas kaj kia estas via monujo. Mizero, mizero estas nuntempe al saĝa kapo! Ĝi devas vendi sin al Dio kaj al la diablo, kaj kia profito? — Nenia."

„Vi estas prava! Nenia!", respondis malkontente Ŝimun. „Mi scias, kio estas bono, kio estas bonvivo. Sed tio estas malnova kanto. La miaj malzorgis pri mi, ĉar ili diris, ke mi estas malŝparemulo, rabisto, ili malzorgis pri mi forĵetinte min kvazaŭ ian ŝelaĵon. Se iu vivanto estus dirinta al mi, ke sinjorideto Ŝimĉjo iam transĵetados per la ŝipo kiun ajn malgravulon trans Savan, ke li travintrados kaj trasomerados sub pajla tegmento, mi dankus al mia patrino por mia eliro en la mondon."

„Trankviliĝu, Ŝimĉjo!", konsolis lin la razisto, „alie ne povas esti. Kien vi volas? Vi tre scias, ke oni intencis vin pendigi, tial ke vi sur publika vojo priŝtelis kaj mortigis la pastron. Kaj se vin ne estis la estro Stjepko liberiginta per la oro el la malliberejo, vin balancus aŭtuna vento apud la zagreba ŝoseo."

„Mi scias, mi scias", rediris Ŝimĉjo, „sed Gregorianec sciis pro kio li min liberigis. Min oni pendigus, sur selo ili estus batantaj, eĉ ne demandante pri azeno. Sed se ili estus „akre" ekdemandintaj, se ili estus montrintaj al mi „la instrumentojn", Dio scius, ĉu mi sur „la rado" ne estus blekinta, kiu estis tiu ĝusta, kiu tenis al la pastro la lastan kandelon. Tio jukis Gregorianecon, tio! Sed lasu ni la

fablojn. Tiel estas. Nur pri unu mi vin demandas, kiam mi jam estas en tia rondo. Kion volas la estro Stjepko kun juna knabino?“

„Kion?“, ekridis la razisto. „Kiel vi estas stulta, Ŝimĉjo? Jam dek jarojn vi servas al nuna via estro, kaj kion li volas kun juna knabino? Kaj pro kio estas junaj knabinoj?“

„Certe ja ne —?“, rigardis en miro Simun la raziston.

„Kaj kial ne?“

„Mi dankas! Vere estas proverbo: la lupo ŝanĝas la felon, sed ne la karakteron. Do ankoraŭ virinamanto. Mi konas lin, kaj kiel ne? Kiom da fojoj mi iris kun li ĉasi jen tiun, jen ĉi tiun junulinon? Kelkfoje oni ricevadis eĉ bastonojn. Foje ni traserĉis la tutan monton serĉante iun servutulinon kaj ŝian idon, junan knabon — sed jes. Ili forkuris. Kun malplenaj manoj ni devis returnen. Dio sciu, kien ili perdiĝis.“

„Ha efektive? Jen! Ĉu junan Gregorianec? Nu rakontu!“, ekdemandis scivole la razisto.

„Ŝt!“, saltis Ŝimĉjo. „Ili iras. Vidu! Jen de Zagreb tordiĝas la polvo tra la ŝoseo. Ĝi estas la veturilo. Ili estos, estos ili!“

„Fakte ili iras“, levis la razisto la kapon kiel vulpo. „Nun atenton! Rapide diru al mi, kie mi kaŝu min por vidi ĉion kaj min neniu.“

„Eniru en la kabanon. En la kuirejo iras ŝtuparo al la subtegmento. Supreniru sub la tegmenton. Estas tie unu truo kontraŭ la ŝoseo kaj vi povas laŭvole rigardi.“

„Bone. Vi do agu, laŭ via plej bona maniero. Serveme, humile, por ke ili nenion ne rimarku.“

„Estu senzorga. Mi scias kiel oni devas. Tio ne estas por unua fojo“, ekridis Ŝimĉjo. „Nu, foriru nun jam, vidu! La veturilo estas proksime la bordon.“

„Mi iras, mi iras!“, almetis la razisto kaj ŝterilis rapide en la kabanon, dum Ŝime sidiĝis kvazaŭ senzorge antaŭ la dometo.

Ĵus resonis rea „kvar! kvar!“, ankaŭ pli malproksime en la arbetaĵo resonis rea „kvar! kvar!“

„Al la diablo! Kio ĝi estas?“, ektremis Ŝimĉjo, „kial ĉi tiuj diablaj korvoj grakas hodiaŭ ĉirkaŭ la dometo?“

Dume alveturis la veturilo sur la alia flanko ĝis la bordon, simpla vilaĝana veturilo, kaj en ĝi maljunulo kaj knabino.

„Ho pramisto, nu!“, ekkriis la maljuna Arbanas. Ŝimĉjo leviĝis inercie kaj kun malrapida paŝo malsupreniris al la ŝipo.

„Mi iras, iras! Nu!“, rediris la maljunulo.

Samtempe io ekbruis en la salikaro, kaj estis videbla, ke io tra la arbetaro moviĝas iom post iom pli antaŭen. Ĉu besto, aŭ kio? Dio sciu.

Sur la veturilo sidis apud la maljunulo knabino — Dora.

Ŝian kapon ŝirmis mulkolora tuko. La vizaĝo estis malmulte videbla. La knabino estis neĝepala. Sole ĉirkaŭ la okuloj videbliĝis ruĝaj signoj de la larmoj, kaj tiuj ĉi belaj okuloj, aliokaze viglaj kaj brilaj, rigidiĝis, senbrile, senvive fiksantaj antaŭ sin. La knabino krucigis la manojn sur la genuoj kaj sidis apud la maljuna Pavlo tiel kvieta kaj muta, nur kelkfoje, kvazaŭ ŝi rememoriĝis pri ia ĉagreno, eksopiris kaj reaj larmoj aperis en ŝiaj okuloj. La maljunulo Arbanas, veturigante mem, okulangule observadis la junulinon. Li palpebrumis kaj repalpebrumis, dum liaj lipharoj movis sin de la dekstra flanko al la maldekstra kaj de la maldekstra al la dekstra. Li koleris, bedaŭris la junulinon. La veturilo suriris la ŝipon. La junulino ektimiĝis kaj ekprenis pro la timo la brakon de la maljunulo.

„Nu, Dorĉjo, ne estu timanta! Nenio estas, nenio estas! Iom krute, sed vi ne timu. Ho grizulo! Dorĉjo —“ daŭrigis Arbanas, post kiam jam la ŝipo eknaĝis en Savan.

„Kion vi volas, avĉjo?“, ekdemandis mezavoĉe la knabino.

„Dorĉjo, kial do vi ploras? La okuloj al vi estas plenaj da roso, kiel la herbo post Ave Maria.“

„Mi devas, avĉjo. Tia estas mia koro.“

„Nu, nu koro, mizerulino, mi scias, ke vin korprofunden ofendis la malbonaj homoj. Sed mi donus mian nobelecon, ke ĉio tio ĉi estas mensogo. Ĉu ne ke estas?“

„Dio estas mia atestanto, ke estas.“

Tion mi tuj opiniis. Ja la envio! Kion vi volas, kiam tiele estas! Sed pli bone, ke vi iras kun mi. Via patro koleras, tre koleras.“

„Ho! li min ekirintan eĉ ne ekrigardis!“, ekploregis la junulino.

„Ne ploru! Lasu, lasu. Ĝi elvaporiĝos, se Dio donos. Mi ĉion klarigos al li, kaj li devas kredi al mi. Arbanas mensogas neniam. Tiam vi hejmen revenos. Vi revenos, je mia honesta parolo! Kaj dume vi estos bele ĉe mi, ĉu ne? Certe vi ne paŝtos la meleagrojn, ne. Brave, ĝi necesus, ke vi paŝtu la meleagrojn! Vi manĝos ilin, vi manĝos. Tiele jes —“

Dume la ŝipo albordiĝis sur la alia flanko de Sava. La maljunulo elpelis la ĉevalojn sur la gruzon.

„Jen, Doro, tenu la kondukilojn, ĝis kiam mi trovos la transveturpagon“. La junulino prenis la kondukilojn, dum la maljunulo eltiris la saketon, por pagi la ŝipiston, kiu estis apoginta sin sur la veturilo.

„Nu Ŝimĉjo, kiaj novaĵoj estas ĉi tie?“, ekdemandis Arbanas la ŝipiston.

„Multe da malbono, malmulte da bono“, respondis Ŝimĉjo flegme okulaĉante Doran.

„Donu Dio, ke estu pli bone! Nun ne estas bona jarrikolto, ne. Nebulo, pluvo, malbono! Ĉu iu ajn veturis antaŭ mi, Ŝimĉjo?“

„Apenaŭ mi scius ĝin. Sed jes. Nun mi rememoras. Ia monaĥo iris almozpeti. Du Karniolanoj, vitristoj, kaj kelke da soldatoj, neniom plu. Kaj kiel en Zagreb, amiko Pavlo?“

„Tie la aferoj bolas, intermiksas. Unu ĉi tiel, la alia tiel. Strangaj homoj! Oni ne povas al ĉiu fari juste. Jen la transveturpagon, kaj adiaŭ, Ŝimĉjo!“, diris la maljunulo kaj ekvipis la ĉevalojn.

„Ekiru kun Dio; feliĉan vojaĝon!“, rediris lin la

ŝipisto kaj eniris la kabanon — sub la tegmenton al la razisto.

„Ili estas perditaj, majstro Grga“, alkriis li al la ĝibulo, kiu atente spionis tra la truo.

„Bone, jam bone!“ rediris kolere Grga, „lasu min en paco, nun nur estos, kio estas okazonta.“

„Do bone!“, diris Ŝimĉjo, „mi. lasos vin en paco.“ Kaj foriris en la kuirejon baki la fiŝojn.

La razisto estis apoginta la kubutojn sur la genuoj, kaj tiel kaŭrante li rigardis tra la truo. Li tremis, kaj la okuloj brilis al li kiel fulmo post la nubo.

La veturilo moviĝetis sur la gruzo kaj sabro antaŭen. Arbanas ĝuste ne tre pelis la ĉevalojn, ĉar ne estis urĝo, kaj se ĝi eĉ estus, la ĉevaloj estis alkutimigitaj nur al unu paŝo, nek pli rapide nek pli malrapide, se vi ilin eĉ per bastonego baptus. Nun la veturilo ekveturis sur la ŝoseon. Oni veturadis, kaj veturadis, kiel oni jam veturas sur malbona vojo. Dekstre kaj maldekstre estis arbusto kaj arbetaro. Pluen post kelke da paŝoj sterniĝis arbareto. Ankaŭ la veturilo alveturis al ĝi. La razisto komencis pli vigle spiradi.

„Nu, ĉu estos?“, ekmurmuris li kolere.

Oni aŭdis ĵus fajfon. La ĉevaloj movis antaŭen la orelojn, la ĉevaloj haltiĝis. La maljunulo eksvingis per la vipo. Sed kvazaŭ fulmo el hela ĉielo, penetris el la arbareto sur la vojon du ruĝaj rajdantoj.

„Brave!“, saltis la razisto. „Ili estas kaptitaj, ili estas niaj. Je kioma prezo estas ni nun, Dorĉjo?“

Fulmobate alflugis unu rajdanto al la veturilo, kaj enigis longan glavon en la ripon al la grizulo de Arbanas. La ĉevalo faletis. La knabino ekkriis kaj falis posten en la veturilon, dum la maljunulo saltis por levi la hakilon. Sed de malantaŭe alflugis la alia rajdanto, ekprenis la nukon de la maljunulo kaj per forta mano ĵetis lin teren.

„La knabinon prenu!“, ekkriis la unua rajdanto kroate, kvankam lia vesto estis hispana.

La dua do etendis la manon al la knabino. Sed

jen, — tiumomente, saltis el la arbareto juna heroo sur ĉevalo.

„Jen al vi knabinon, kanajlo“, ekkriis kolere la junulo kaj senkompate faligis la bastonegon sur la kapon del' uzurpulo, ke li senkonscie falis de la ĉevalo en la polvon. Sed tiuminute alkuris la unua rajdanto al la junulo kaj direktis la longan glavon al lia brusto. La junulo pereos: longa glavo, mallonga bastonego.

„Nu, frapu lin!“, ekkriis el la kaŝejo furioza Grga. Tiam io ekflamis en la arbetaro, pafilo ekpafis kaj niveligis la ĉevalon de l' unua rajdanto kun la tero.

„Al la diablo!“, ekrincigis la dentojn la razisto. „Ŝimĉjo, Ŝimĉjo, estas malbono, la diablo venigis la junan Pavlon, ĉio estas perdita!“

„Ha vere!“, ekmiris flegme Ŝimĉjo, turnadante siajn fiŝetojn.

El la arbetaro eliĝis Miloŝ.

La razisto paliĝis, ektremetante kiel vergo sur akvo.

„Miloŝo“, ekkriis Pavlo, „vidu nu, kiu estas ĉi tiuj friponoj!“

Trankvile alpaŝis la haramio kaj per la pafilkapo forigis la vizieron al la sveninta rajdanto.

„Do je sankta Nikolao! Tio estas, ho estro, mem Laĉjo Crnĉiĉ, la servisto de via sinjoro patro. Jen la kanajlon! Li ŝirmis sin per la hispana parado kaj fera kasko, por povi laŭvole rabadi. Sed ĝi estis neglutebla al li, je mia sanktulo, jes. Via sespinta bastonego lin tre kisis, ke lia kapo zumados ĝis la malluma tombo. Sed kiu estas vi, nigra malbona filo?“, turnis sin Radak al la alia rajdanto, liberonta sin el sub la vundita ĉevalo, „forprenu la maskon, ke mi vidu vian nigran vizaĝon, vi fripono!“

Tremante la malfeliĉulo levis la vizieron kaj rigardis la haramion kun aspekto, kvazaŭ lin konvulsio ekregus.

„Ivĉjo Pervan!“, ekridis Radak, „ĉu vi, malkuraĝulo? Nigra estu al vi vendredo kaj dimanĉo! Vi do estas entrepreninta la krimon. Nu atendu, vi ricevos vian laborenspezon, kvankam ne estas hodiaŭ sabato!“

„Pardonu, sinjoro“, balbutis la malfeliĉulo, „kion mi ja povas — mi estas mizerulo — mi devis — mi devis!“

Pavlo alproksimiĝis al la veturilo. Dora superregita per la timego kuŝis senkonscie pala — kvazaŭ morta. La junulo starigis sin super ŝia vizaĝo, mute observante la belan junulinon. „Dolĉa anĝelo!“, ekmurmuris li kun malgaja aspekto, „kioma mizero falis sur vin, malfortan virgulinon! La maliceco kaj stulteco konspiris kontraŭ vi, ho pura animo, por ke vi estu kaptaĵo de la pekema volo. Kaj pro kio, ho koro? Pro mi, pro mia amo. Sed dank' al Dio, mi vin resavis de la malbono, malfeliĉulino mia, kien vin ĵetis la homa maliceco kaj kalumnio. Pardonu, animo, kiu suferas pro mi, pardonu, mi vin venĝos, je mia kredo, mi ĝin faros!“

Dum la junulo ravigite observadis la knabinon, inferaj turmentoj turmentadis la raziston sub la fiŝista tegmento. Ĉiuj liaj planoj kaj projektoj nuligitaj! Dora savita, pri kiu li konsideris, ke ŝi estos lia, almenaŭ duone lia. Lia cerbo turniĝadis kvazaŭ de svenado, li volis ekkrii de kolerego, volis sufoki Pavlon, sed li ne kuraĝis pro timo.

Je unu fojo oni aŭdis sur Savadigo ĉevalan piedfrapadon venantan de Grguriĉevbrod. La razisto turnis la kapon al tiu flanko. Pro la arbetaro kaj arbaro li povis nenion rimarki. Malantaŭ la arbareto rajdis kelkdeko da imperiestraj kirasuloj. Antaŭ ili marŝis Jerko, laca de longa vojaĝo, de rapida irado. Ĝuste en Zagreb li estis, por porti la leteron de la frato Pavlo, per kiu tiu ĉi petis helpon ĉe la kapitano Blaĵ Pernhart. Per la ŝipo de Grguriĉ transveturis la mutulo la kirasulojn trans Savan. Aproksimiĝinte li al Kraljevbrod palpebrumis al la ĝendarmoj, ke ili daŭrigu la vojon, dum li malaperis en la arbaro. La koro de l' razisto terure ekfrapis, ekvidinte brilajn kaskojn de la rajdistoj, kiuj nun eliris sur la vojon. Pavlo levinte la kapon,

deprenis sian mantelon kaj kovris la senkonscian malfeliĉulinon.

Antaŭ lin haltiĝis la kirasulestro, lipharega homego.

„Via moŝto, ŝajnas al mi“, ekparolis li, „estas la nobela sinjoro Pavlo Gregorianec, leŭtenanto de la kroata milico?“

„Jes“, rediris Pavlo.

„Min sendis, je servo al via moŝto, sinjoro Blaĵ Pernhart, kapitano de lia imperiestra moŝto — kun deko da ĉevaloj. Mi estas dekestro Ĝuro Mencinger kaj mi atendas ordonojn de via moŝto.“

„Vi venis iom malfrue, sed tamen vi estas bonvenintaj“, respondis Pavlo. „Dekestro! Jen, mi Pavlo de Gregorianec, la milica leŭtenanto, ĉi tiujn du krimulojn mi trovis kiam ili kun armitaj manoj kaj laŭ rabista maniero estis atakintaj publike ĉi tiun maljunulon kaj knabinon por fari malbonon al ilia animo kaj korpo. Estos da tiaspecaj krimuloj pli multe en la arbaro, vi do serĉu ilin laŭ via plej bona kono, kaj ĉi tiujn du, kiuj evidente ofendis la landleĝojn kaj kristanan pacon, mi transdonas al vi, por ke vi faru laŭjuste.“ [1]

Mi komprenas vian moŝton“, rediris la dekestro, kaj turninte sin al la kirasuloj: „Kvin soldatoj antaŭen en la arbaron, kvin soldatoj glavon en glavingon kaj de la ĉevaloj malsupren“, kaj montris al ili per la fingro Crnĉiĉon kaj Pervanon.

La razisto mortpaliĝis, jen mallarĝe, jen larĝe malfermis la okulojn por vidi, kio okazos.

„Miloŝo!“, almetis Pavlo, „malligu do la senvivan ĉevalon kaj per la alia veturu ĉi tiun knabinon Zagrebon al la oraĵisto Krupiĉ. Ankaŭ vi, bona maljunulo, sidiĝu“, aldonis li al Arbanas, „kaj revenu en la urbon; diru al Krupiĉ, kion vi vidis ĉi tie. Mi jam sekvos vin!“

‚Mi volas, mi volas!“, rediris time la maljunulo,

[1] Dum la milito kun turkoj estis en Kroatujo tagtagaj atakoj de rabistoj, nomataj hajdukoj. Pro tio la kroata parlamento kreis drakonajn leĝojn. N. d. t.

„mi ne irus hodiaŭ domen eĉ por brikdomo. Tiuj ĉi krimuloj, Dio pardonu iliajn pekojn! Nu maljuna Krupiĉ, li estos — sed li estas kulpa sola — sola.“

Kvin kirasuloj desaltis la ĉevalojn. Ili ligis la falshispanojn kaj kondukis ilin antaŭen en la arbaron. La haramio, maljunulo kaj knabino ekveturis al Kraljevbrod. Pavlo post ili.

„Hoho!“, alkriis Ŝimĉjo al sia gasto sur la subtegmento, „ĉu vi aŭdis, majstro Grga, ankaŭ ĉi tiun fojon estis da bastonado kaj sangantaj kapoj; dank' al Dio, ke mi ne estis en ĉi tiu kaĉo! Ivĉjo kaj Laĉjo adiaŭ! Mizeruloj! Dio kompatu iliajn animojn. Sed ĉi tiuj feraj diabloj povus veni ankoraŭ ĉi tien. Se vin trovus la juna sinjoro, li ne demandus vin: po kiom vi aĉetas la kanabon. Oni trovas da tia komercaĵo eĉ po nenioma prezo. Jes, jes, mi trasuferis ankaŭ tiaspecan timon — tiame pro la pastro. Mi sentas kompaton al vi! Tiel viva kaj sana kaj „huj“ en ĉielan paradizon!“

„Silentu, serpento!“, ekgrincis la dentojn Grga de supre, furioza, sed rapide komencis li petadi: „Ŝimĉjo, ho Ŝimĉjo, se vi Dion konas, kaŝu min, ĉar tiuj ĉi rabistoj povus min ankaŭ tie ĉi —“

„Nu, nu, mi ankaŭ estas kristano — en bezono. Jen la fumaĵejon por la fiŝoj. Entreniĝu tie tra la truo, eĉ la diablido vin ne kaptos tie. Iom da malbonodoro, iom da fumo, sed kion — kiam la kapo estas en danĝero!“

Kun malrapida paŝo entreniĝis la razisto en la kamentubon. La fumo penetris en liajn okulojn, en la nazon. Li ekternis.

„Dio Helpu, ho majstro!“, kriis Ŝimĉjo de malsupre. „Ĉu kataro, aŭ io alia? He jes. Estas aŭtuno. Nu mi iras, ĵus venos la diabloj, oni devos do ekremi.“

„Ho ŝipisto, ho inertulo!“, ektondris ekstere la voĉo de Miloŝ, „eksteren, al la ŝipo, aŭ mi vin per fajro pelos de la kuŝejo kvazaŭ vulpon el la kavo!“

Al la razisto estis malvarme ĉirkaŭ la koro.

„Mi iras, mi iras, ho heroo!“, ekrapidis Ŝimĉjo el la kabano. „Sed kiel? Vi, amiko Arbanas, retur-

nen kune kun la junulino? Kio do estis? Verŝajne malbona vojo?“

„Mizero“, rediris survoje al la ŝipo la maljunulo, „kanajloj, antikristoj, trapikis la ĉevalon, ĵetis min en la koton, forrabonte la junulinon!“

„A, a!“, ekmiris Ŝimĉjo balancante la kapon — „vidu vi pekan aĵon! Malbonaj estas nun la homoj, malbonaj, gardu nin de malbono la ĉiela korto. Kiel do tiam?“

„Ni ilin honeste, honeste!“ — ekridis la maljunulo kaj li certe pluen babilus, se Pavlo ne estus alkurinta al la ŝipo. Ŝimĉjo kurbiĝis, ekremis kaj transĵetis la societon sur alian bordon.

Ĉokolin pli facile ekspiris; nun li sciis, ke Radak foriris. Li eliris el la kamentubo kaj skuis la fulgon for de si.

„Kiu do, kiu diablulo fortranĉis subite mian delikatan fadenon, kiu la sekreton malsekretigis? Ho se mi lin havus!“, ekĝemis la razisto, kunpreminte la pugnojn, „la ungojn mi enigus en lian gorĝon!“

Tiun momenton oni aŭdis bruon. La razisto ektremis. Li ekrigardetis tra la truo. La kabanon pretergalopis la kirasuloj, post ili tordiĝis la polvo.

„Dank' al Dio!“, ekĝemis Ĉokolin, „nun mi estas for de la danĝero“. Li do malsupreniris de la subtegmento. Ankaŭ Ŝime alvenis.

„Do, do! Vi estas nigra, ho majstro. Kvazaŭ vi kisus la antikriston. Estis malvaste. Sed por kio sinjoro Pavlo intermiksas sin en ĉi tiuj aferoj?“

„Malsaĝulo!“, rediris la razisto, „la sinjorido estas enamiĝinta la junulinon!“

„Tiel do? Do la patro kaj filo? Mi gratulas.“

„Nun mi devas foriri“, finis malkontente la razisto. „Al la diablo! Kun malplenaj manoj. Belan akcepton de la estro Stjepko! Hodiaŭ ni maltrafis. Sed bone, jam bone! Troviĝos alia okazo. Kaj vi silentu pri mi. Adiaŭ!“

„Kiel formiko! Adiaŭ!“, resalutis la ŝipisto, „nu ĉu vi ne volas per la ŝipo transen?“

„Ne! Lasu min en paco.“

Ĉokolin ekiris de la kabano. Haltis. Ion li pri-

pensis. Fine ekmarŝis kun malrapida paŝo, mallevita kapo al la ŝoseo de Sisak. La ĉevalkadavron li survenis.

„Tie ĉi estis“, ekmurmuris li, „tie ĉi oni forrabis ŝin de miaj ungegoj. Jen ankaŭ la kaskon de Crnĉiĉ“, daŭrigis li levinte la hispanan kaskon. „Fulmo kaj tondro!“, ekkriis kolerege kaj frapis la kaskon je la tero. Li volis returnen al la ŝipo. Io lin retenis. Li ree eniris la arbaron timema kaj scivolema. Tie paŝtiĝis ĉevalo. La ĉevalo de Pervan. Kaj antaŭen, jen — Ĉokolin komenciĝis tremadi — jen, pli antaŭen pendis sur unu arbo la du ruĝaj ĝendarmoj. La razisto metis la manon antaŭ la okulojn. Ĉio kvieta kaj trankvila. Je unu fojo eksonegis ridego. Al la razisto la haŭto strečiĝis, mezokule li ekrigardis. Sub la arbo, sub la pendigitoj kuŝis la maljunulo Mijo ebriigita de la flamiĝa guteto, ronkante kiel en sonĝo.

Ĉokolin ekkuris. Ĉapo falis de lia kapo, glacia ŝvito kovris lian frunton. Pli kaj pli profunden li trenis sin en la arbaron. Sed kvazaŭ lin pelas inferaj fantomoj, lin postsonegis la korva kanto: „kvar! kvar!“ La razisto kuras senspire, kuras sen turni sin. Per la frunto frapis trunkon, ekfluis la sango, sed li ne zorgas pri ĝi! Li kuras, ĉar post li grakas la korvo: „kvar, kvar!“ Salikaron li atingis. Dank' al Dio, Sava estas proksime. Ankoraŭ dekon da paŝoj kaj jen la akvon! Jen, ĝin! Sed kie estas la ŝipo? Tie malproksime sur la bordo oni vidas fiŝistan kabanon. Kien? Laŭ la bordon!

„Sur pendingon, Grga, sur pendingon!“, ektondris malantaŭ lia dorso nekonata voĉo el la arbetaro. Sango alfluis la kapon de la razisto, li disetendis la manojn kaj furioziĝita ĵetis sin — en Savan.

Post la arbetaro elstariĝis homo — Jerko.

„Naĝu, naĝu, razulo“, ekridis la junulo, „feliĉan vojon!“

XI.

Ĉe la amboso sidis majstro Krupiĉ en sia magazeno. Li batadis kaj batadis per sia martelo pli fervore ol iam, kvazaŭ li forĝus imperiestran kronon. Vane! La laboro ne prosperis al li. Kelkan fojon li paŭzis, ekĝemis, iom enpensiĝis kaj ree pluforĝis. Io mordis lian koron. Kaj kiel ne? Alie eĥadis tra la domo la gaja voĉo de Dora kiel alaŭdo en mateniĝo. Hodiaŭ? — Ĉio malplena, ĉio muta, kvazaŭ ia mortinto kuŝas en la domo. Larmo saltis sur la okulon de la maljunulo. Li mallevis la martelon, enpensiĝis. Dio sciu pri kio li pensas? Pri kio ja — pri la filino, pri solfilino sia. Malrapide — malrapidete ruliĝis la larmo malsupren lia ruĝa vizaĝo, sur la blankan barbon. La maljunulo pensadis, pensadis, enpensiĝis je pli junaj aĝoj. Kiel li edziĝis, kaj amis la edzinon, kiel ŝi naskis al li la filinon! Kaj kiel li malsaĝumadis, luladis kaj balancadis la ideton! Kiel bele estis tiame! Kaj kiel la infaneto poste ekpaŝetis, kiel ekparolis je plezuro de la gepatroj! Kaj li memoris, kiel lia edzino kadukis, kiel lin la koro premadis kaj kiel la malfeliĉulino mortis! Kia doloro! Sed ŝi postlasis al li dolĉan kaj karan heredon — ŝi postlasis al li la solfilinon. Kaj kiel la knabino kreskadis korpe kaj anime — bonodora floreto en la patra domo! Kaj kiel la homoj, miris, kaj la patro estis fiera je sia gloro! Kaj kiel la maljunulo penadis! Por kiu? Do por Dora, por la doto, se Dio donos indan edzon. Kaj hodiaŭ? Oh hodiaŭ! Ĉio ĉi tio pereis, ĉio aerdisiĝis, kiel neĝo sur la suno.

Post momento levis la kapon la maljunulo kaj deviŝis la larmojn per la maniko.

„Ah kio?“, ekmurmuris li. „Ŝi pekigis la animon, hontigis min antaŭ Dio kaj la popolo — mian domon — mian nomon! Sentaŭgulino! Kaj oni suspektetis pri mi, ke miaj agoj ne estas klaraj — ĉe mi! Ĉe Krupiĉ! Hu! Ke la diablo — pardonu Dio, la mian pekon! Kie estas ilia prudento? Mi ke intrigas, kaj forĝas sekretajn intrigojn kontraŭ la

urbo, mi? — Ĉu ne estas evidentaj kiel sur manplato ĉiuj miaj agoj, ĉu ne estas mia animo vitrepura? Venu kiu ajn, li pruvu, ke Krupiĉ estas perfidulo — trompanto! Ni ĉiuj estas pekuloj, de reĝo ĝis mizerulo — sed mi perfidulo! Mi ja antaŭe min vivan —! Ho tiu envio, tiu malbenita homa envio! Kiam vi estas honesta, ĉio grincas je vi kiel malsata lupo je ŝafo. Sed ŝi! — Dora! Ho Dio, kion mi kulpiĝis. Mia gloro — mia filino makulis puran nomon! Ve, ve, ho filino, kion vi faris de mi? Mi donus antaŭe mian dekstran manon. Sed ĉu tio estas ankaŭ vera, ĉu estas? Ŝi pura kiel roso, anĝelepia, kaj trompis sian patron! Ne, ne, ili mensogas! Mi konas ilin profunden, la serpentojn. Ili mensogas. Sed la atestantoj! Evidentaj atestantoj! Tiu razisto, tiu razisto! Ĉu mi ne diris, ke li estos malfeliĉo por mia domo? Ĉu ne estas venĝemo de li? Mi lin forrifuzis. Sed kial ŝi ne defendis sin, kial? Kaj Magda, tiu maljuna hipokritulino, ankaŭ ŝi. Ve, ve ho Petar, maljuna kapo, pli volonte en la tombon, estos pli bone por vi, ol vidi kaj aŭdi la honton!“

Tiel meditante sidis majstro Krupiĉ, eĉ ne rimarkinte, ke en la domon eniris lia amiko Blaĵ Ŝtakor. Malpeze metis la seruristo sian manon sur lian ŝultron.

„Frato Petar!“

„A, ĉu vi, frato Blaĵ?“, rediris la maljunulo movinte iom la kapon.

„Enpensiĝa, malgaja! Kia doloro vin premas?“

„Ankoraŭ vi min demandas?“

„Jes mi demandas.“

„Ankoraŭ! Patro sen infano. Malĝojo. Honto antaŭ la popolo, publike.“

„Publike, publike. Dio mia! Kelkfoje oni estas blinda eĉ ĉe sanaj okuloj.“

„Ne konsolu min. Konsolo estas malbona kuracilo al koro vundita. Tiel estas. La mano de Dio min atingis, min atingis treege.“

„Tiel ne estas brave, frato Petar!“, ekparolis decide Blaĵ, sidiĝinte apud la orajisto, „ne estas

brave. Oni diras: ĝi estas la mano de Dio, dum fakte estas homa maliceco; ne distingu bestojn laŭ la haroj. Vidu, frato Peĉjo, vi estas kolerika, viaj okuloj estas malhelaj. Viŝu ilin iomete. Al mi ne estas por konsolo, al mi estas por vero. Ekrigardu iomete."

„Mi vidis ĉion."

„Ha jes! Diablon vi vidis. Kion vi vidis? Ke fiinsektaro bojas tra la stratoj. Kaj kiu? Ebria Ŝafraniĉeva, la monda trompeto — butikisto Andrija kaj tiu antikristo Grga? Ĉu tiuj ĉi estas viaj atestantoj? Oni ne devis abrupte eksplodi, oni ne devis obei la koron. Oni devis aŭskulti, pridemandi, kaj tiam juĝi. Sed tiel forpeli la knabinon — la solfilinon! Tiele ne agas kristano, ne agas, je mia animo."

„Vane! Molanimulo vi estas."

„Molanimulo! Mi? Al la diablo? Seruristo, la fero — kaj mola! Iru for! Ne malsaĝumu! Nu, demandu miajn lernknabojn, ĉu tiu ĉi brako estas mola? Ve kaj porhelpvokado! Sed mi amas justecon. Mi estas flegmulo, mi ne estas eksplodulo. Mi rigardas —"

„Nu, kaj kion vi vidis?"

„Multon, dank' al Dio, pro Dio vi estas oraĵisto, kaj kia! Se cigano alportas al vi flavan butonon kaj diras: „Jen, majstro, cekinon!" Ĉu vi diros: Ĝi estas, cigano, cekino?"

„Ne!"

„Kion do?"

„Mi esploros ĝin unue per fajro, ĉu estas ĝi oro."

„Ha jen, saĝa homo! La homoj estas kiel falsa kaj malfalsa mono. Esploru ilin, jes, esploru ilin. La oron oni esploras en fajro."

„Sekve por kio ĉio ĉi-tio?"

„Por tio, ke vi sciiĝu, ĉu ĉio ĉi estas envera veraĵo, pri kio oni fablas. Kiam mi aŭdis kion diras la popolaĉo pri Dora, mi demandis, kiu ŝin kul-

pigas. Ĉokolin. Al la diablo! mi diris, ĉu tio ne estas satankuirejo? Oni scias, ke vi lin malakceptis."

„Estas vero."

„Do vidu! Tio estas tiu anso. Mi rigardas tiun raziston jam longtempe. Li ŝajnas al mi suspektinda. Kies li kaj de kie estas, sciu la diablo mem! Sed oni scias, ke li estas malbonema, maliceca. Kie ajn li povis publike kritikaĵi vin, li kritikaĵis. Hodiaŭ ĉi tion, morgaŭ alion, kaj nu, jen fosu jen subfosu — kaj la diablo estas preta!"

Sed li diris, ke li povas ĵuri, ke li vidis per propraj okuloj — mi ĝin eĉ diri ne devas!"

„Li — kaj ĵuro! Ĉu tiu homo kredas al Dio? Ĵuro! Ternu, tosu, ĵuru, tio estas al li egale. Kion do li vidis? Nu kion? Ke juna Gregorianec estis ĉe Dora? Ĉu li ne savis ŝian vivon?"

„Sed sen la patro!"

„Sen la patro, sed apude maljuna Magda."

„Apude maljuna —"

„Ne pekigu la animon. Mi konas ŝin. Ŝi estas honesta, ŝi estas pia, ŝi ne toleras pekon. Kaj ke la sinjorido amas la knabinon?"

„Amas? Kio de tio? Ĉu sinjoroj amas burĝajn knabinojn por edziĝi ilin?"

„Jen vidu lin! Mi scias, ke sinjoroj kaj burĝoj malofte kunligas sin per stolo. Koro, ho frato, la malsaĝa koro diras al ni frap', frap', kaj vi estingu, se vi scias. Ĝi estas malfeliĉo, certe, sed ankoraŭ ne honto."

„Kaj kiu diras al vi, ke la juna Gregorianec estas pli bona ol lia patro?"

„Mi. Mi tre konas la patron kaj la filon. Fajro kaj akvo. La junulo estas elgravurita sia patrino, kaj lia patrino estas bonkora sinjorino. Li ne pekigus tiele sian animon. Kredu, frato. Sed, ĉu vi demandis la maljunulinon, kio estis?"

„Ne!"

„Demandu! La maljunulino ne mensogas. Mi ŝin alvokos. Supre en kamero sia sidas ŝi kiel ŝtono. Ŝiaj vundoj cikatriĝas. Voku ŝin!"

„Fariĝu ankaŭ tio! Sed kia helpo?"

Blaĵ iris al la ŝtuparo kaj vokis la maljunulinon.

„Kiu vokas?“, ekdemandis Magda aperinte en la supra ŝtupo kun ĉirkaŭligita kapo.

„La baptano. Malsupreniru, Magda, la majstro estas interparolonta kun vi!“

„Jen min, jen!“, ekparolis la maljunulino kaj paŝon post paŝo malsupreniris la ŝtuparon ĝis la magazenon. „Kio estas, baptano?“

„Magda!“, almetis Krupiĉ per sufokanta voĉo, „maljuna vi estas, vi staras apud la tombo, parolu nun al mi la veron!“

„Tion Dio scias, ke mi ĉiam parolas la veron“, rediris la maljunulino, „demandu“.

„Magda, ĉu iam ĉi tie estis la juna Gregorianec, kiam mi ne estis hejme?“

„Jes.“

„Ĉu multan fojon?“

„Du fojon.“

„Kiam?“

„La unuan fojon, kiam li revenis de la milito. Li serĉis vin, demandis pri sano de la junulino, rakontis pri batalo ĉe Hrastovica.“

„Kaj la duan fojon?“

„La duan fojon en krepusko, kiam vi estis tiame en la magistrato en la kunveno pro la maljuna Gregorianec.“

„Vi do ĉeestis?“

„Jes.“

„Kaj ĉu li parolis pri kio?“

„Jes, ke ŝi estas al lia koro aminda kaj kara. Kaj ŝi diris al li agrablaĵon por agrablaĵo.“

„Kaj kion pluan?“

„Kion pluan? Baptano, mi vin ne komprenas“, rediris la maljunulino.

„Ke vi ne komprenas? Ne turmentu min! Parolu! Vi ja ankaŭ havis edzon!“, ekdemandis febre Krupiĉ.

„Ho baptano! Dio ne aŭskultu tiun ĉi vian pekon! Do ĝi estas tio? Ĉu vi ne hontas kredi pri io tia, tiom malpli paroli? — Dora ke pekis kaj mi

ke helpadis! Kie estas via koro, kie la animo, baptano? Dora tiu blanka rozeto, tiu kolombino kiu havas koron, ke per ŝi eĉ diaj anĝeloj fieriĝus, al kiu en Zagreb ne egzistas komparo en ŝia ĉasteco kaj boneco, al kiu mi estas baptopatrino! Mi do, ŝia baptopatrino antaŭ Dio, ŝia dua patrino, mi ke ŝin parigis. Ĉu vi do pensas, baptano Petar, ke maljuna Magda, kiu devas respondi antaŭ Dio por sia baptofilino, kiu baldaŭ alpaŝos al sia tombo, ke Magda en sia maljunaĝo ĵetus la ordonon dian sub siajn piedojn kaj venenus la junan koron? Bele vin informis viaj konsilantoj! Ĉu vere la konsilantoj? La diablo mem — ne estu ĝi al mi peko — flustris al vi dum sonĝo ĉi tiun inferan fablon, kaj vi kredas al simpla vorto! Ho baptano Petar, ĝi ne premu vian animon, vi faris malbone, tre malbone! Doran vi forpelis kiel ian pekulinon de la gepatra domo, dum al mi maljuna pikis venenan tranĉilon en la koron. Ĉu vi kredas, ke tio estas ŝerco?“, ekploris Magda, „tio estos mia morto. Bele, bele! Tio estas danko al mi, ke mi gardis la knabinon, gardis kiel okulon en la kapo? Kaj kial? Ĉar la duo amas sin reciproke. Kion vi volas? Ili estas junaj. Iliaj koroj interkonsentiĝis, la okuloj ilin erarigis. Kaj tiaokaze oni ne demandas, mia baptano, kies gento, kies sango vi estas. Dio decidis ke tiel estis. Sed venu kiu ajn, kaj diru al mi, ke de la amo restis sur la animo de Dora makulo eĉ kiel ero de papavo, mi diros al li, ke li mensogas, ke li estas pli malbona ol turko. Dio estu mia atestanto, ho baptano Petar, Dora estas pura kiel vitro! Sed mi scias, kies estas tiu kuirejo, mi scias. Tiu Ĉokolin, li estas tiu mistifikanto. Sed bone, jam bone! Mi scias, kion mi faros. Dora foriris. Mi pensis, ke ŝi fermos miajn okulojn sub tiu ĉi tegmento, kie mi travivis tiom da ĝojoj kaj malĝojoj. Dio tiel ne volis, gloron al Dio; oni devas obei. Miaj kalkuloj estas finitaj, baptano Petar. Permesu ankoraŭ hodiaŭ tradormi al mi sub via tegmento. Morgaŭ mi iras. Mian malriĉaĵon mi kolektis, morgaŭ mi iras el la hejmo. Kaj al vi Dio donu feliĉon kaj sanon!“ — Larmoj mal-

helpis al la maljunulino pluen; ŝi turnis sin por reveni sian kameron.

„Jen, frato Petar“, aldonis mezavoĉe Blaĵ, „ne estas bone demandi nur la orelon, sed ankaŭ la prudenton. Nu diru do ion al maljunulino, ŝi parolas puran veron, je mia kapo!“

„Magdo!“, ekparolis maljuna Petar iom moliĝa.

„Kio estas, ho baptano?“, turnis sin Magda.

Oni aŭdis ĵus iam bruon antaŭ la domo kvazaŭ de veturilo. Blaĵ rapidis al la pordo.

„Kio estas tio?“, ekkriis la seruristo.

Ĉiuj elreviĝis.

Post momento eniris la magazenon juna heroo — Pavlo Gregorianec, post li portis grandegulo Miloŝ senkonscian Doran, kaj fine altrenis sin maljuna Arbanas.

Krupiĉ ŝtoniĝadis, Magda komencis tremegi.

„Sinjoro, — Gregorianec — Dora — je diaj vundoj — kio ĝi estas?“, balbutis timiĝe kaj mire Krupiĉ.

„Ha, ha, ha“, ekridis la maljunulino larmante kaj ĵetis sin sur la junulinon: „Dornjo, mia Dornjo! Jen vin, jen vin reen al mi. Sed vi ne iros pli for de la hejmo, ne vi iros, nek mi, ĉu vi baptano aŭdas, nek mi. Venu nur iu tien ĉi! Per kulerego mi lin. Dankon kaj gloron al ĉiela kortego, nun estas ĉio bona. Dornjo, mia Dornjo! Sed, ho Dio, kio estas al ŝi? Pala, malsana? Venu ĉi tien, bona homo, tien sur la seĝon metu ŝin, tiel!“ — prenis ŝi Miloŝon je la maniko kaj altiris lin al la seĝo. La grandegulo obeis la maljunulinon kaj metis la palan junulinon sur la seĝon.

„Kio do estis ĉio tio ĉi?“, ekdemandis Petar miregita.

„Kio? Kio?“, ekbalbulis la maljunaĉjo Arbanas, „la diablo kaj tri! Bela kaĉo! Dankon, amiko Petar, por ĉi tiu tubero sur mia kapo! Vi estas kulpa, vi. Mi plu ne irus kun via Dora. Vi gardu ŝin mem al si. Mia animo estis sur la lango, kaj ŝin preskaŭ oni fortrenis. Bela ŝerco, estu al vi plendinda!“

„Ĉesu, amiko Pavlo“, ekparolis la juna Gregorianec, paŝinte unu paŝon antaŭen, „por ke ankaŭ mi du tri diru. Ho majstro Petar, jen mi jam duan fojon alportas vian filinon en la domon. Duan fojon mi savis ŝin, sed ĉi tiun fojon el pli granda danĝero. Tiun ĉi fojon ili intencis difekti al la junulino la animon kaj la korpon. Sur publika vojo ili volis forpreni ŝin.“

„Kiu do?“, ekdemandis Krupiĉ.

„La homoj de mia patro, kaj por mia patro“, flustris Gregorianec al la oraĵisto mezavoĉe.

„Ni savis ŝin“, daŭriĝis li laŭte, „mi kaj miaj amikoj el akraj ungegoj, kaj la uzurpuloj pagis la pekon per siaj kapoj. Sed ni parolu klare; mi pri ĉio scias. Mi scias, pro kio vi forpelis la solfilinon el la domo. Pro mi. Vi pekis. Malbonaj homoj malbone vin informis, blindigis. Estas vero, mi amas vian filinon, pro kio kaŝi ĝin? Mi ne ŝteliris en vian domon kiel ŝtelisto. Stranga okazo renkontis min kun Dora tiame sur la Kapitolo. Senintence mi ŝin ĉirkaŭprenis, kaj kien la manoj, tien ankaŭ la koro. Mi amas ŝin, jes, sed kiel amas la okulo oran stelon, kiu al ĝi afable ridetas de la ĉielo. Mi estas soldato kaj nobelulo, honesta homo mi estas kaj jen“, daŭrigis la junulo metinte sian dekstran sur la kapon de Dora, „jen mi ĵuras per tiu ĉi karega kapo, per la koro de mia patrino kaj per sankta Triunuo, ke mi mian animon ne makulis, aŭ tuŝetis la estimon de via nomo. Dio estas mia atestanto, ke ĉi tiu junulino restis pura de mi kiel dia suno, kaj mi ĉion kaj ĉiujn saldos, kiuj eĉ per rideto dubus pri tio, kion mi diris al vi, kaj mi mortigos ĉiun, ĉu nobelulon, ĉu burĝon, kiu per malica lango kuraĝas ofendi ĉi tiun ŝatindan virgulinon. Kontraŭ la moroj mi ankaŭ agis. Mi venis en la domon, kiam vi forestis. Pardonu mian malkorektaĵon. La koro min premadis. Eble mi vin ekkolerigis per mia konduto, ĉar vin ekkolerigis mia patro per la proceso. Sed la agoj de la patro estas patra kalkulo, kaj la mia estas alia. Pardonu, mi ne pekos plu. Permesu, ke mi kelkfoje ĝissate rigardadu ĉi tiun ĉarman vizaĝon, ne kaŝite, sed antaŭ viaj

okuloj, por ke ne fariĝu eraroj kaj elpensaĵoj. Permesu al mi tion, kaj se mi iam staros sur proprajn piedojn, atestu Dio kaj Lia servisto, ke mi junulo kaj aristokrato ne pli bonan feliĉon serĉas ol Doran, eĉ se la tuta mondo kontraŭstarus."

Kun miro aŭskultadis la oraĵisto la junan aristokraton.

„Sinjorido", fine li diris, „je ĉio ĉi mi ne povas vin tuje respondi. Sed mi vidas, ke ĉe vi estas fido, mi do akceptas ĉi tiun fidon. Du fojon vi savis mian solfilinon, vi savis min el erarigo, kien min metis malbonaj langoj kaj pli malbonaj homoj. Tutkore mi bedaŭras, ke mi ofendis profunden mian karulinon. Mi dankas vin, sinjorido, ĉar mi ŝuldas vin du vivojn kaj mian honeston. Tial estu al vi mia malriĉa domo, kio estas al vi via domo. Venu laŭvole, rigardetu la knabinon, sed — nur antaŭ mi, ĉar kiel vi, sinjoroj, gardas vian genton kvazaŭ maloftan floron, tiel ankaŭ ni burĝoj malpermesas, ke eniĝu vermo en sanan nian arbon."

Dum la maljunulo parolis ĉi tiujn vortojn, malfermetadis la junulino siajn okulojn kaj tiris la manon trans la frunton kvazaŭ post dormo. Sed vidinte, ke ŝi denove estas en gepatra hejmo, aŭdante dolĉajn vortojn de la patro, la junulino levis sin, saltis, falis antaŭ la patron.

„Patro mia! Patro mia! oh ree mi estas via, ree vi zorgas pri Dora. Oh mi estos bona al vi, mi estos kvieta al vi! Prenu min sur vian koron, ĉar estas al mi agrable ĉe vi kaj ĉe —" per honta okulo rigardis ŝi Pavlon dum sur ŝiaj vangoj ekfloris rozetoj, kvazaŭ ŝia koro deziras sciigi, ke krom la patro ankaŭ la alia dolĉa nomo ripozas en ĝi.

Forte ĉirkaŭprenis la maljunulo la filinon, kaj alpremis al la maljuna brusto ŝian belan kapeton, dum sur la brilajn harojn ekgutis bolantaj larmoj de la maljunulo.

„Vi ne iros, infano, for de mi, vi ne iros! Kion mi ja maljunulo farus sen vi?"

„Kien ja povas larmo, se ne sur okulon!", ekridis la seruristo.

„Amiko Arbanas!", ekbabilis Magda, „ĉu vere hispanaj friponoj — nian malfeliĉulinon? Gardu nin ĉiela korto! Mian Dornjon — antikristoj! Sed kial mi babilas? Verŝajne ŝi malsatas. Oni devas ion ajn kiel eble plej rapide prepari por ŝi, ankaŭ por vi."

„Bone, bone", rediris Arbanas, „nun denove estas ĉio en malnova stato, dank' al Dio por mia tubero sur la kapo, ĉar se ĝi ne estus, Dora ankaŭ ne estus en la domo."

Sinjorido Pavlo adiaŭis la oraĵiston.

„Adiaŭ, sinjoro Pavlo!", diris lin Dora ekirantan — tri vortojn, sed tuta animo en ili.

Jam noktiĝis. Ĉio estis senmova, ĉio ripozadis ĉirkaŭ kaj en Medvedgrad. Sole de unu fenestro tremetis lumo. Ĝi estis la dormoĉambro de la estro Stjepko. Tie li sola dormis. Iam ankaŭ sinjorino Marta noktadis tie, sed nun ŝi malsanis, nun ŝi estis pia, nun estis ŝia dormoĉambro en alia flanko de la koridoro. Stjepko elportadis virinajn kapricojn nek pastrajn litaniojn. La dormoĉambro de la sinjoro ne estis vasta, sed alta. La muroj estis kovritaj per tapetoj de nigreta felo, kaj sur ili vi vidis enstampitajn oritajn ornamaĵojn en formo de bestaj kapoj. En la angulo staris larĝa forta kverklito, kies randoj estis arte eltranĉitaj. Super la lito sur la muro estis disetendita larĝa ursa felo, kaj sur ĝi pendis orita kasko, turkaj kurvaj ŝildoj, oblikvaj sabroj kaj larĝaj glavoj, arĝente enkadrigitaj pafiloj, ĉaskornoj, hakiloj, bastonegoj kaj multaj tiaspecaj armiloj. Kontraŭ la fenestro flamis fajro en la kameno el nigra marmoro. Ruĝa flamo strange tremetis sur la brila armilaro, verŝante sian nekonstantan lumon ankaŭ sur la liton de la estro. Duone vestita kuŝis Stjepko en ĝi. Per dekstra kubuto apogis la kapon kaj senmove fiksadis la fajron, kvazaŭ vidas en ĝi rebrilon de sia animo. Lia korpo ripozadis, dum lia animo bruladis. Ekdormi eĉ por momento ne. Kelkfoje li nur subite levis la kapon rigardante al la pordo, kvazaŭ iun aten-

dante, kaj poste ree fiksadis la fajron. Liaj vizaĝmuskoloj tremetis. Kio estis al li, pri kio li pensadis? Ĉu per unu vorto estas sciigeblaj centoj da pensoj kaj sentoj, kiuj fermentis en tiu perfortema, gloravidema animo? Malpaco en la lando, disharmonio en la familio, espero je la gloro, volupto je la juna knabino, venĝo kontraŭ zagrebanoj — ĉio, ĉio ĉi volvadis sin en lia animo, kvazaŭ kiam en kampo interfrapiĝas perfortaj ventoj tordante sin en furioza rondo. Prudento silentas, sango furiozas. Kaj tra la fenestro elrigardadis malluna nokto, kvazaŭ nigra monstro, mokante la maltrankvilon de la estro Stjepko.

„Al la diablo!“, ekmurmuris li kolere, „tempo iras malrapide kiel kripla avino, kaj li ankoraŭ ne venas. Se mi almenaŭ scius, ĉu lia ago sukcesis, ĉu la junulino mia estas, ĉar bela estas ĉi tiu knabino de l' oraĵisto! En mi ĉio dancis, kiam mi ŝin ekvidis en Zagreb laŭ la informo de Ĉokolin. Jes, ŝi devas esti mia, eĉ se kostus dek da servutuloj. Pavlo ne estas malsaĝa. Sed tiu ĉerizoj ne estas por li, ĉar povus esti pli ŝerce, kiel li estas ruzema. Ha! Aŭdu! Jen Grga!“, ekkriis Stjepko, saltinte kvazaŭ lin fulmo ekpalpis.

Tri fojon resonis la raŭka korno de la pordisto por signo, ke iu proksimiĝas al la kastelo. Stjepko kvazaŭ reviviĝis. Sango estis ludanta en lia vizaĝo, kaj la okuloj brilegis fulme. Kaj li komencis aŭskultadi sidante sur la lito. Aŭdu! nun malleviĝas la ponto, nun iras iu ĉevale trans ĝin. Nun leviĝas la ponto. Jes, sendube: Ivĉjo aŭ Laĉjo portas al li sciigon, ke ĉio feliĉe okazis. Nun oni avizos lin, ĉar la sinjoro ordonis: kiu ajn venos eniru tuj la dormoĉambron.

En la koridoro ektintis spronoj. Ho, jen ia kuriero! La pordo ekgrincis, la pordkurtenoj disiĝis.

„Diru, kio estas?“, saltis Stjepko pasie kontraŭ la pordo, sed la kurteno disiĝis kaj antaŭ la estro aperis lia filo Pavlo.

Stjepko ektremis kaj miregis.

„Mi estas, sinjoro patro! Bonan vesperon!“, trankvile salutis la filo sian patron.

„Vi?“

„Mi mem.“

„Kio do vin ĉi tien kondukas? Kio estas en Samobor? Kalkuloj? Sinjorino Klara?“

„La kalkuloj kun sinjorino Klara estas finitaj“, rediris iom akre Pavlo. „Ĉiaokaze ili rezultis pli bone por mi, ol por sinjorino Klara.“

„Junulo, kiel vi opinias pri tio?“

„Mi opinias, sinjoro patro, ke mi estas viro, ke mi estas nobelo, kaj Klara estas — mi hontas karakterizi ŝin per ĝusta nomo.“

„Knabo, ĉu vi freneziĝis?“

„Ne, via moŝto! Vi sendis min, ke mi faru kalkulon. Oni volis miajn kalkulojn malklarigi, ora serpento ĉirkaŭplektis mian koron, sed mi prenis ĝin per forta mia dekstra, ĵetinte ĝin for de mi; nun estas klara la kalkulo.“

„Malfeliĉa lango, ĉu vi ke nobelan sinjorinon.“

„Pardonu min via moŝto. El la letero, kiun vi estis skribinta pri mi al sinjorino Klara, mi komprenis, ke ŝin via moŝto tre ŝatas. Nu certe la okuloj erarigis mian sinjoron patron. Kio servas al la germanaj dungatoj kiel tagmanĝo, tio ne povas esti al kroata magnato por vespermanĝo.“

„Fulmo kaj tondro!“, piedfrapis Stjepko kolerege, „knabo, mi elŝiros vian aspidlangon.“

„Ne koleru, sinjoro patro. Pardonu. Honesto estis mia regulilo. Sed dank' al Dio, ke mi ĝustatempe forlasis sinjorinon Klara, ĉar mi grandan malbonon malhelpis, kaj ŝirmis nian nomon.“

„Nian nomon? Vi? Kiele?“

Tiun ĉi momenton kvazaŭ la pordkurteno ekmoviĝis.

„Jes, sinjoro patro. Sur publika vojo, dum hela tagmezo atencis viaj homoj la junulinon, por forpreni ŝin rabistmaniere.“

Stjepko paliĝis de koleregо kaj vipis okule sian filon kiel serpento sian rabaĵon.

„Miaj homoj! — junulinon? — — kion do“, elpremis li furioza.

„Ivĉjo kaj Laĉjo — atencis Doran Krupiĉeva.“

„Vi — vi — do?“

„Mi savis la knabinon, kaj lasis la uzurpulojn laŭ la lego de la reĝolando pendigi.“

„Ho!“, ekkriegis Stjepko kaj saltis, levinte la pugnojn kontraŭ la filo.

„Patro!“, rediris Pavlo kore, „patro! Per la nomo de Dio, haltu! Mi devis, mi devis; ĉar se min la amo ne estus instiginta per sia superforto, stimulis min la honoro de nia domo, kiun oni ĵetus en koton, ĉar oni dirus: knabinon forprenis —“

„Degeneraĵo“, ekgrincigis Stjepko ekscitece la dentojn. Li saltis al la lito, prenis la pafilon — pafilo ekflamis — pafis —

„Jesuo Kristo!“, ekkris virina voĉo, la kurteno disiĝis kaj la ĉambron enkuris mortpala virino, kun malligitaj nigraj haroj en nokta blankvesto; ŝiaj nigraj okuloj brulis de teruro, la lipoj tremetis kaj etendinte ŝi la senfortajn brakojn alkuris al Pavlo kaj ekkriis: „Filo! Filo! Kie vi estas, ve, kie vi estas?“

Kaj ŝi ekvidis post la fumo la filon, staranta apud la marmor-kameno. Li estis pala, kaj de lia frunto fluis ruĝa sango. La patrino ĵetis sin sur la filon kvazaŭ senkonscia, ĉirkaŭprenante lin kun ama frenezo.

„Jen mi estas, patrino, kara patrino“, ekspiris Pavlo kaj pasie alkroĉigis la manojn ĉirkaŭ la nuko de l' patrino.

„Sango! Ho Dio! Diru, kie vi sentas vin malbone? Helpu, sankta Dipatrino!“, eksingultis la senforta virino.

„Trankviliĝu, dolĉa patrino! Estas nenio. La kuglo rompis la marmoron, kaj la ero vundis mian frunton“, rediris Pavlo.

„Kio do vin venigis, Marta! Forlasu min!“, or-

donis Stjepko, kiu ĝis nun kun malafabla mieno staris ekster si.

Malrapide movis Marta la kapon, ŝiaj larmantaj okuloj fulme ekbrilis, dum sur la vizaĝo aperis fatala ruĝo.

„Kio min venigis, sinjoro Stjepko? Vidu, tiu ĉi estas mia filo. Rigardu lian heroan frunton, la sango ĝin surversis. Ĉu turka sabro lin atingis? Ne, ne estis malbenita malamiko, la patro, propra patro estis levinta mortigeman manon kontraŭ sia naskito, por lin en furiozo frakasi. Kio min venigis? Eĉ la vulpino defendas siajn idojn, mi do malforta virino alkuris por alpremi min al la brusto de mia filo, ke mi iĝu ŝirmilo al li kontraŭ voluptama frenezo de lia patro. Jes, jes, mortigi lin vi volis. Kaj pro kio, mia sinjoro? Ĉar li malhelpis, ke lia patro rompu la fidelecon al la patrino —“

„Marta!“ — ekkriegis Stjepko.

„Jes, jes, post la pordo mi ĉion aŭdis, ĉion. Ĉar li malhelpis, ke virga knabino ne fariĝu viktimo de via pekema volupteco, ĉar li ŝirmis, ke la nomo de Gregorianec estu brulstampita per la rabo —“

„Marta, silentu, ĉar Dio —“

„Ne, mi ne silentos“, levis Marta fiere la kapon. „Sufiĉe mi silentis, sufiĉe toleris la suferadojn. Tago post tago estis al mi jararo post jararo da infera turmentego. La dolorego venenis mian animon, detruadis mian korpon, dum mia koro estis aspidkovejo. Ho kiom da noktoj mi maldormis genuiĝanta antaŭ krucifikso, kiom da sanglarmoj rosigis mian kapkusenon! Mi preĝadis tage, mi preĝadis nokte por miaj karaj infanoj, por mia malfidela edzo. Sed miaj preĝoj kvazaŭ falis sur senfruktan ŝtonon. Kaj nun, kiam eniĝis mortigema vermo en mian koron, kiam mia spirito ŝiriĝas de la korpo, kiam antaŭ mi faŭkas nigra tombo, nun, ho Dio, la propra patro preparas la morton al la filo, ĉar tiu ĉi ne permesis, ke li pekemakulu la dormejon de la patrino. Ho Stjepko — Stjepko — pekulo, — la mano de Dio —“

„Edzino — edzino — mi sufokos vin“, saltis

Stjepko furioza kontraŭ Marta kaj preninte ŝin ĉe la brusto skuegis ŝin fortege.

„For! Patro! Vi mortigos la patrinon!“, ektondris Pavlo kaj elŝiris la mizerulinon el la brakoj de l' furiozanto.

„Filo — filo —“ ekĝemis Marta, etendis la manojn, ekŝanceliĝis, tra la buŝo penetris multo da sango kaj ŝi falis sen animo.

La patro kaj filo mutiĝis. Sed post momento ekgenuis Pavlo kaj ĵetis sin sur malvivan mizerulinon.

„Patrino, ho mia patrino! Kial vi forlasis sian filon?“, kaj li ploris, ploradis kiel virino.

Fine li leviĝis. Li prenis malvivan patrinon kaj turnis sin al la patro: —

„Sinjoro patro!“, almetis li serioze: „Ĝis nun vivis du koroj en ĉi tiu kastelo por mi, la patro kaj patrino. Kaj denun vivas sole malamo al la patro kaj malĝojega memoro al la patrino. Mi estas ekironta por ĉiam, patro! Adiaŭ!“

„Iru!“, respondis malafable Stjepko.

Kaj Pavlo kunportis la karajn restaĵojn, por maldormi en tiu ĉi kastelo la lastan nokton apud mortinta patrino.

Kaj Stjepko? — La fajro finbruletadis, dum li staris muta kaj rigardegis en la fajron. Je unu fojo li saltis, kvazaŭ lin mordus serpento, kaj ĵetinte sin sur la liton ekkriis: „Malbenita mi!“

XII.

Por Kroatujo ektagiĝis la jaro 1577. Sed kia? Malĝoja kaj nigra. Unu guto en la rivero de heroa sango, senĉese fluanta, senespere tra la lando Kroatujo. Facile estas sufereblaj turmentegoj, kiam estas espereble, ke ankaŭ tio finiĝos, facile elporteblaj ventegoj, kiam vi scias, ke vi elatendos la sunon. Sed senhalte plendplori, senespere rigardi tiun malklaran ĉielon, ĝi estas malfacile eĉ tro malfacile! El kelkcentoj da tranĉvundoj fluadis heroa

sango, kelkcentoj da indaj kapoj falis en la tombon; malesperaj laboremaj manoj forlasis la plugilon por levi fortikaĵojn kontraŭ la turka furiozo. La kampoj senkulturiĝitaj, la vilaĝoj en flamo, la kasteloj rabakiro de la besta idaro. Sed spite tio donu da sango, por kontraŭstari la diablon, donu da pano, por nutradi la malsatan armeon, donu da denaroj por pagadi fremdajn helpantojn nehelpantaj, donu, donu, donu! Terure! Terurege! Tiu ĉi malgranda lando, la areto da homoj elturmentigitaj, eluzitaj, staris kiel fera muro sur la sojlo de kristanaro kontraŭ nehomo, kiel Davido kontraŭ Golijato. Ho kiom da bravegaj koroj pereis, ilin prilaŭdante eĉ la acerguzloj laciĝus. Kaj kiel? kaj kial? Ĉu vi konas tiun sanktan flamon flamanta en la koro de honestulo, ĉu vi scias, kio estas al vi la lulilo, kio la infanoj, kio la patrujkanto? Ĝi estas tio, kio infanon gigantigas, ĝi estas la amo al la patrujo. En pasintaj jarcentoj estis perfortaj tiuj feraj homoj, sed kiam signalis la laŭta trompeto: „Jen la diablon kontraŭ ni!“, ĉio saltas sub unu standardon kaj frapu je la mono de Dio por la patrolando. Ankoraŭ ne estis cikatriĝintaj la vundoj de Hrastovica, tra la Hungarujo rabadis la turko, jam falis Zrinj, Kladuŝ kaj aliaj kroataj fortikaĵoj, eĉ al Koprivnica, forta bastiono, minacis danĝero, dum la imperiestro Rudolfo nombradis la stelojn en Praha, kaj la germana parlamento ŝanceliĝadis ĉu ekhelpi la katolikan imperiestron aŭ ne, dume Kroatujo eniĝis en la sango. Helpu imperiestro, helpu kristanoj! Kaj la helpo venis. Sed kia? Du onkloj de la imperiestro: Ernesto kaj Karlo. Unua por regadi Hungarujon, la alia por komandi super Kroatujo. Jam de longe oni intrigadis ĉirkaŭ Kroatujo, distrikto post distrikto defaladis de la banusa potenco, regiono post regiono iradis sub la komandon de germanaj generaloj. Kaj la banuso? La banuso devis obei la ĉefdukon Karlo, kaj la sceptro de la banuso estis vergo en malforta mano de la kaduka maljunulo. Kaj kroata parlamento? Kroata deputataro estis kunvokita en Zagreb, por voĉdoni sol-

datojn, monon, kaj — kvieta Limo.[1] Timo ekregis la kroatan nobelularon. Kien per tia maniero? Kie estas justeco kaj kie la malnovaj privilegioj? Por kio fremdaj dukoj? Por kio la kroata mono? Por ke ni estu sole tio kio estas Stirio? Sen rajto, sen voĉo, sole je komando? Jes, ĝin oni ankaŭ volis. Kroatujon estris Ĝuro Draŝkoviĉ, kroata banuso kaj episkopo, kaj lin krombanusadis glave sinjoro Gaŝpar Alapiĉ. Fama estis Draŝkoviĉ en la tuta kristana mondo, depost kiam lia glorinda parolado kontraŭstaris la elokventecon de la ekleziaj patroj en Trenta koncilo,[2] instruita estis Draŝkoviĉ, ĉu ja liaj saĝaj libroj ne estas atestantoj al tio; sed Draŝkoviĉ estis pli kortegano ol kroata banuso, kaj lia gloramo venigis lin en la rondon de la du potenculoj, kiuj planadis pri tio — ke Kroatlando, la malnova reĝolando, fariĝu milita kolonio, germana provinco. Pro tio ankaŭ la ĉefduko Karlo ne havis pli bonan helpanton ol kroata banuso. Draŝkoviĉ evidentece ne agadis. Li estis delikata, ruza. En malklara akvo li etendadis sian reton por allogi ĉu magnaton, ĉu ekleziulon, ĉu militiston ĉu burĝon, ĉar Draŝkoviĉ konis ĉiujn profundegen. Kaj Gaŝo Alapiĉ? Li estis militisto, honestulo, prudentulo — brava animo en kripla korpo. Kio saĝumado? Kio rapideco? Sabro, nur sabro estis lia unua, estis lia lasta vorto. Kaj li kvazaŭ tra mallumo konjektis pri kio oni intencas, sed: „mi min ne enmiksas!", diris li, „la sinjoroj purigu sin antaŭ Dio!" Draŝkoviĉ agadis, agadis, skribante, ordonante, pridemandante, konsolante, promesante kvazaŭ li ne kuŝiĝos en la tombon antaŭ ol dum estos eĉ unu turka kapo inter Sava kaj Drava. Sed je unu fojo kiel fulmo el hela ĉielo disvastiĝas famo tra la reĝlando: la princo Ĝuro Draŝkoviĉ ke ne estas plu kroata banuso, ke ne estas plu zagreba episkopo, la princo Ĝuro Draŝkoviĉ ke estas ĉefepiskopo de Kaloĉa, ke estas reĝa kanceliero! Kaj kial? demandis sin ribeliĝanta nobelularo. Ĉu ne necesas nun laŭleĝa estro al la reĝolando, dum de ĉie premas la mizero? Kial do Draŝkoviĉ eksbanusiĝis? Kaj kiu estos la banuso al ni? Neniu. Ĉu lia ĉefduka moŝto Karlo ne estas ja gubernatoro de la tuta reĝolando? Ĉu la saĝa episkopo ne devis eksiĝi pro li, por ke liaj manoj estu liberaj? Por kio do la parlamento? Por kio cento da kapoj, cento da voloj? Laŭ unu volo, laŭ unu ordono oni agas pli facile.

[1] Finita afero, sufiĉe. N. d. t.

[2] Trento (itale), Tridentum (latine). N. d. t.

La lando ekribeliĝis. Ankoraŭ ĉi tio mankis! Al tioma mizero — malordo en la domo, brutaro sen estro. Ĝi ne estos, ĝi ne devas esti! Estis kompreneble da flatuloj kaj Draŝkoviĉ'anoj, kiuj ĉie antaŭ la popolo aliigis ĉion je belo kaj bono, kiuj per glata lango blankigis, kio estis nigra. Sed vane estas paroli delikate, kiam oni iras ĝis la animo. Oni tre bone sciis, kio estas. La kroatoj kvankam ne estis diplomatoj, estis homoj da sana prudento, kaj kvankam la vicbanuso sinjoro Laĉjo Bukovaĉki ĉion al ili plibeligis, laŭ lia plej bona scio, oni respondis lin: „Tute ne! Ne tiel ni volas. Ni scias kio ruliĝas post la monto!" Kaj ekoftiĝis la kunvenoj tra la kasteloj, kaj kvankam estis alta neĝo kaj malbonaj vojoj, la sinjoroj, veturadis unu al la alia, ĵuradis kaj ĵurpetadis inter si, varbadis kaj solene promesadis sin reciproke, konkorde agadi laŭ la malnova rajto.

La famo pri la abdiko de Draŝkoviĉ trovis Gaŝon Alapiĉ en Vukovina ĉe tagmanĝo. „Ha, ha, ĉu tiel, d o m i n e c o l l e g a?", ekridis la ĝibulo, viŝinte per la buŝtuko siajn grasigitajn lipharojn, „b e n e". Tio signifus, iru ankaŭ vi kun Dio kara, amiko Gaŝo! Rezignu vian duonbanusecon, por ne bari la vojon al lia ĉefduka moŝto Karlo. Mi iros, mi jam iros. Sed antaŭe por ke mi iomete ekba-

[1] Ĉi tiu priskribo estas lauhistoria. La glorama Draŝkoviĉ abdikis la banusecon, dum Alapiĉ estis nur „pictus masculus", „banus sine banderio". Vidu Krĉeliĉ Hist. eccies. Zagrabiensae, paĝo 266.N. d. t.

nusadu. Jes, mi montros al tiuj sinjoroj, ke mi estas ankoraŭ kroata banuso, je mia sabro, mi ĝin faros. Ni do vidu!"

Kaj Gaŝo estas skribinta la leteron al Ivan Petriĉeviĉ, la protonotaro de la reĝolando, ke kunvenigu la sinjoroj s t a t u s e t o r d i n e s de la regno Zagrebon en ŝtatkunvenejon dimanĉon K a n t a t e 1577., por konsiliĝi pri gravegaj aferoj de la patrujo.

Estis dimanĉo Kantate, estis antaŭ tagmezo post solena meso. En la ĉambrego de zagreba episkopejo promenadis malgrandeta nigrebarba homo en silka episkopa vesto kaj sub ruĝa ĉapeto — Ĝuro Draŝkoviĉ. La manojn li tenis en la poŝoj maltrankvile balancante sin. Sur lia frunto estis videbla malkontento. Apud la fenestro staris maljuneta, vastkorpeta viro en blua velura dolmano kun arĝentaj butonegoj — la vicbanuso Bukovaĉki.

„Nu, kaj kiel estas la aferoj, s p e c t a b i l i s?", ekdemandis la ĉefepiskopo. „Nenion mi scias. Mi sidas jam du tagojn en Zagreb, sed neniu venas al mi. La kroataj sinjoroj verŝajne forgesis kio estas princo Ĝuro Draŝkoviĉ. Nu, sinjoro vicbanuso, ĉu vi estis bona apostolo, ĉu vi kaptis da fiŝoj?"

„Via moŝto!", rediris per acida mieno la vicbanuso, „miavice mi laboris tagon kaj nokton, jes, mi uzis eĉ mian vicbanusan indecon por havigi al nia afero kiel eble pli da voĉoj inter la nobelularo, sed vane!"

„Do malbone, kiel do tiel?"

„Mi ne scias, sed ĉiuj estas kiel ŝtono, kaj se oni nur ekpalpas ilian pulson, tuj ili krias:

„Jen, ankaŭ ĉi tiu volas fariĝi germano!"

„Malsaĝuloj. Ili ne scias, kion bezonas la ŝtato por fariĝi potenca. Ĉu ni solaj kontraŭstaros la diablon? Ĉu ne estis sufiĉe da sangantaj kapoj? Malsaĝuloj!"

„Argumentoj malmulte utilas ĉi tie, via moŝto", rediris la vicbanuso. „Io ekokupis iliajn kapojn de post tiu tago, kiam via moŝto estas abdikinta la

banusan honoron. La parlamento diru la sian, krias ili, la parlamento."

„La parlamento! Ho, tion mi al sinjoro de Vukovina dum la tuta mia vivo ne forgesos", kolere levis la episkopo la pugnon, „ke li trompe kunvokis s t a t u s e t o r d i n e s. Ĉu oni povas diri ne, kiam ankoraŭ valoras tia leĝo. Estonte estos ankaŭ por tio rimedo, sed nun? Ĉu vi almenaŭ vilaĝan nobelaron estas varbinta?"

„Ĝuste ĝin plej malmulte. Kelkon da Turopoljaj nobeloj, ĉar ili estas malamikemaj al Gregorianec, sed ankaŭ da ili malmulton. Sed la ceteraj kvazaŭ freneziĝis. Ilin estas varbinta ĉu sinjoro Alapiĉ, ĉu tiujn nobelojn el Moravĉe sinjoro Bornemissa."

„Ankaŭ tiu?"

„Jes, ankaŭ tiu. La nobeloj plendas pri germana armeo, kiu ilin rabas" —

„Ankaŭ tio estis bezona. Al la diablo! Ke tiuj germanaj sinjoroj ne scias moderigi siajn trupojn! Tion mi diris al ili malkaŝe antaŭ la reĝo moŝto mem."

„Ekster ĉiuj furiozas Gregorianec de Medvedgrad. Post kiam li gajnis la proceson kontraŭ zagrebanoj, li intrigas kaj ribelas kontraŭ via moŝto."

„Mi ĝin scias; nu", daŭrigis la ĉefepiskopo stariĝinte antaŭ la vicbanuso kaj preninte lin ĉe unu arĝenta butono „ĉu vi tute konas Stjepkon? Se ni lin havus, ni havus la plimuton por ni."

„Mi kredas, ke mi lin tre konas."

„Ĉu oni povus lin per io varbi?"

„Mi kredas, ke ne."

„Kaj mi opinias, ke jes. Ĉu li ne estas avida, glorama? Sed lasu ni tion. Ĝin mi mem pripensos. Eble tamen —"

„Sed nur du horoj mankas ĝis la kunveno, via moŝto!"

„Estas bezonaj nur du vortoj!"

„Mi ne kredas. Li estas ŝtalharda."

„Lasu vi ĝin. Mi scias, ke vi du ne estas amikoj, ĉar vi lian patron rezignigis la vicbanuse-

con. Sed nun mi petas vin, sinjoro moŝto, alvokigu la imperiestrajn komisariojn: Teuffenbach kaj Hallek. En alia flanko de la kurio ili estas."

Post nelonga tempo revenis la vicbanuso kune kun konata Servacio Teuffenbach kaj Vido Hallek, generalo de slavonuja limo, alta, malafabla en kiraso vestita viro.

„Sidiĝu, generaloj moŝtoj", almetis la ekleziulo, post kio ambaŭ sidigis sin. „Antaŭ ne longe mi komprenis laŭ vortoj de lia sinjora moŝto vicbanuso, ke niaj aferoj staras nebone. La parlamento estos kontraŭ ni. La sinjoroj kroataj kaj slavonaj malzorgas pri la imperiestra favoro, kaj ili bruribelas pri siaj rajtoj.

„Oni devas do montri al ili ĉi tion," frapis Teuffenbach sur sia glavo.

„Ĝi ne estas ĝusta vojo", rediris la ruza ekleziulo, „sinjoro generalo havas troviglan sangon. Ju pli forte oni premas, des pli forte oni saltas, ĝi estas malnova proverbo. Ni devas atendi. Se ni dirigos al ili, pro kio ni estas venintaj, ke la tuta Kroatujo fariĝu generalujo de la roma imperio, ĉiuj ili saltus sur la piedojn kaj ĉio pereus. Ni bezonas ankaŭ da mono por Koprivnica, ni postulu dume ĝin. Tion ili ne povas rifuzi al ni. Kelkan tempon pretekse banusadu Alapiĉ, ni jam liberigos nin de li, li ja krom tio estas nur krombanuso kaj li antaŭ la parlamento ne faris ĵurpromeson."

„Sed al lia ĉefduka moŝto ĝi estos iom trolonga vojo," aldonis Hallek.

„Vi ne zorgu pri tio ĉi, mi portos la respondecon por tio;" rediris la ĉefepiskopo, „malrapide, certe, ĝi estu nia leĝo."

„Malrapide, certe!", reis la vicbanuso.

„Kion ni do havas de tiu ĉi rondirado, via moŝto!", komencis kontraŭstari Teuffenbach. „Mi finus tiun laboron pli rapide. Donu al mi du tri trupojn, kaj mia kulpo, se mi en unu monato ĉiun ĉi tiujn ribelantojn ne kvietigos."

„Vi eraras, generalo!", levis Draŝkoviĉ fiere la kapon, „vi eraras. Scias mi, kia estas tiu ĉi sango. Ankaŭ mi el tiu ĉi sango elĝermis. Se nia nobelaro estas rapidsanga, tiuj ne estas malkuraĝuloj, mia generalo. Ili scias, kio estas sabro kaj pafilo. Per tio vi ilin ne kvietigos. Tiamaniere vi ĉion malbonigus. Sabro renkontus akrigilon. Kaj nia popolo estas ŝanĝema. Jen ekflamas, kaj tiam ree dormetas. Lasu ni, ke ĝi ekflamu, kaj kiam ĝi estos dormetanta, ni subite ataku ĝin. Por nun nur la monon."

„Mi obeas la saĝecon de via moŝto," rediris Teuffenbach, „ĉar mi mem vidas, ke alie la kalkulo ne taŭgas. Alapiĉ restu, kio li estas, t. e. banuso aŭ por pli bone diri nenio. Se la parlamento disiĝos, se tiuj ribelantaj sinjoroj estos denove disĵetitaj tra siaj lignaj kurioj,[1] scios ankaŭ lia ĉefduka moŝto montri al ili, kiu estas la sinjoro, kies ordono estas obeota, se eĉ venus naŭ banusoj. Ke oni iam devas ordigi tiun babilonan konfuzon, ke tiuj antikvaj misuzoj, kiujn ili nomas siaj liberoj, ĝisfunde taŭzi devas, tion ĉi komprenas ĉiu kristano. Unu kapo, unu penso, unu volo, kaj la ceteraj obeu. Mi scias, ke nin oni flanke rigardas, tial ke ni ne parolas per ilia lingvo, ĉar ni ne portas iliajn kostumojn. Sed se la sinjoroj estus saĝaj, ili dankus Dion, pro nia alveno por ke ni purigu kaj ĝentiligu tiun ĉi mizeran landon, kiu sen ni jam de longe estus rabakiro de la turka caro."

„Ho malrapide, sinjoro generalo!", rediris ofendita Draŝkoviĉ. „Vi diras: ordo. Bele! Mi ankaŭ estas por ordo, mi ankaŭ agas laŭ la deziro de lia ĉefduka moŝto ĉie ĝin apogante, ne malpli ol vi, sinjoroj. Sed ke ni estas lernontaj de vi ordon, ŝajnas al mi tre mirinde. Ne ofendiĝu, sed mi diros al vi la veron. En la lando vi faras plej multe da senordo, al la intencoj de lia ĉefduka moŝto konstruas vi la plej grandajn malhelpojn."

„Ĉu ni?", saltis Hallek.

„Jes", rediris Draŝkoviĉ, „ĉar viaj homoj estas senbridigitaj; ili rabas, brulas kiel la turkoj, ankoraŭ

[1] Domoj.

pli malbone ol la turkoj, kaj la kroatoj rigardas vin ne kiel amikojn sed male."

„Via moŝto!" — levis sin Teuffenbach, „kie? kiam?"

„Mi ĵus nun eksciis, ke viaj soldatoj en Moravĉe prirabis kaj turmentis la nobelojn."

„Pura vero", aldonis la vicbanuso.

„Tio estas kalumnio!", eksplodis Teuffenbach. Tiun momenton la pordo malfermiĝis. En la ĉambron eniris Rindsmaul.

„Moŝtoj sinjoroj", ekparolis li, „sinjoro Gaŝpar Alapiĉ rezignis ĵus antaŭ la parlamento la banusan honoron."

„Tondro — pardonu Dio, miajn pekojn!", piedfrapis Draŝkoviĉ, „sinjoroj komisarioj, ni iru la parlamenton!"

XIII.

Je Kantata dimanĉo, tio estas la okan tagon de la monato Majo en jaro 1577., ĉio formike svarmadis en alie kvieta nobela urbo sur Griĉ-monteto. Eĉ la primtempa suno ridis, rigardante, kiom da heroaj, saĝaj kaj nobelaj kapoj puŝas sin kontraŭ malnova Griĉ ĉu ĉevale, ĉu piede ĉiuj sub pluma kasko, ĉiuj kun fidela sabro. Sufiĉegis da piedfrapado, babilado, tintado, salutoj kaj insultoj. Jen haltigus la ĉevalon ia magnato arĝente vestita kliniĝinte, por prezenti amikan manon al kanoniko dikulo, jen ia lipharhava rajdanto de la servistaro de ies princo insultis la zagrebajn sinjorojn, ĉar lia ĉevalo jam tri foje genufleksis sur pintŝtono de zagrebaj stratoj. Tie staris aro da vilaĝnobeloj, tenante la mallongajn sabretojn, balancante la kapon kaj cerbumante, kio tio estos, dum la graciaj zagrebaninoj metinte la manojn ĉe la koksoj rigardaĉis de siaj hejmoj kiel eble plej larĝe. Ankaŭ estis da kriado kaj bruado pli ol dum preĝejfesto mem, sed kriado kaj bruado ĉiam plaĉis al la indulgemaj burĝoj. La primtempa suno ridetis, la burĝoj ĝojiĝis, sed la sinjoroj ne ridetis, ili per malafabla rigardo rigardis antaŭ sin. „La socio de la sinjoroj,

nobeloj kaj de aliaj s t a t u s e t o r d i n e s de la regno Dalmatujo, Kroatujo kaj Slavonujo", ariĝadis en la ĉefparlamento en reĝa urbo Zagreb, por konsiliĝi kaj pridiskuti pri la savo de la patrujo.

Kun stranga koro venadis la sinjoroj Zagrebon. Kiel do ne? Oni tre sciis, ke la ĉefdukoj Ernest kaj Karlo planas kaj klopodas renversi la malnovan ordon kaj malnovajn liberojn en Kroatujo. Oni sciis, ke ili intencis tute ekstermi la banusan honoron, forpreni al la banuso la rajton kunvokadi la parlamenton kaj kondukadi la landarmeon. Oni sciis, ke la fakta banuso rezignis la honoron, kaj ke tiu, kiu portis tian nomon nur por la bezono, t. e. Gaŝo Alapiĉ, ne havis banusan plenrajtigon. Jes, oni paroladetis ankoraŭ pli tra la kaŝejoj, oni paroladis krude kaj akre. Malgranda Gaŝo, en kiu ĉio bolis, trompis ruzan iaman kamaradon sian Draŝkoviĉ, kunvokinte la deputataron en Zagreb, post kiam li vidis, ke en la nobelaro tute bolegas, kaj ke tiu ĉi parlamento tute ne estos aro da kvietaj ŝafidoj. La sinjoroj moŝtoj Ernest kaj Karlo ekkoleriĝis pro tio, ĉar Maksimiliano II. jam malkonsentis laŭ pramalnova rajto kunvokadi la parlamenton, kaj ĉar tiuj du guberniestroj volis tute ricevi en siajn manojn la kroatajn sinjorojn. Ernest precipe ekkoleriĝis, sidante en Graz, kaj volante per forta pugno rompi la projekton de la malgranda krombanuso. Sed saĝa Draŝkoviĉ, konante tre bone flamiĝeman kaj ŝanĝeman karakteron de siaj kroatoj, kvietigis la koleran guberniestron, inkliniginte lin, ke la kunvokon de la kroata parlamento li iel aprobis, por ke fariĝu al neniu maljuste. Tute alie kompreneble juĝis pri tio la reĝa ĉambro en Poĵun, ĉar tiuj, kiuj estas okupataj je mono kaj kalkulas, havas ordinare pli malvarman karakteron. En la poĵuna trezorejo vi povis la cekinojn facile elnombri. Duono ja da Hungarujo ĝemadis sub turka jugo, tial ne estis da pagantoj de la reĝaj impostoj. Estas vero ke la kroatoj mem porskribadis kaj kolektadis la imposton, mem kolektadis kaj pagadis la landarmeon, sed kiel brulis kaj ardis la turka mizero: nu-

ligante havaĵon en la lando, ofte okazis, ke la kasisto de la tuta regno Slavonujo ne havis en sia monujo eĉ truan denaron, tiam devis ekhelpi ankaŭ la poĵuna ĉambro, kaj fordoni la monon, kiam ĝi mankas, estas vere granda embaraso. Timante tion la saĝa ĉambro, skribis ĝi ankoraŭ en la monato Februaro en jaro 1577. al lia sinjoro moŝto ĉefduko Ernest, ke ĝi aŭdis, kiel li konsentis la kunvokon de la parlamento en la reĝolando Slavonujo, ke ĝi objektive bone esploris tutan ĉi tiun aferon kaj ŝajnas al ĝi, ke ekzistas granda kontraŭaĵo, kiu povus malhelpi parlamentagadon. „Ĉar sen banuso", diris la ĉambro, „ne povas agadi la parlamento en Kroatujo, kaj se la ĉefduka moŝto intencas ĉi tiun honoron anstataŭi bonvole eĉ per io alia, tamen estas en Kroatujo antikva moro, ke la ĉefa parlamento kolektiĝas per alvoko de l' banuso; sekve la ĉambro tre dubas, ĉu la s t a t u s estos obeemaj al iu anstataŭanto. Sekve la plej urĝa bezono estus, ke la reĝa moŝto enkonduku laŭleĝan banuson. Sed tial ke honorinda sinjoro ĉefepiskopo de Kaloĉa kaj Zagreb estas jam nomita kiel kortega komisario, tial ke fortikigo de Koprivnica kaj aliaj gravegaj aferoj en Kroatujo estas neprokrasteblaj, tial ke estas alvokitaj ankaŭ la kroataj sinjoroj al la kunveno, opinias plejhumile la ĉambro, ke tiu ĉi kunveno de la komisario kaj nobelaro estu nur interkonsento, ĝis kiam oni banuson ne starigos kaj kunvenos laŭleĝa kroata parlamento."[1]

„Legu, honorinda sinjoro, kion skribas al mi la saĝa ĉambro", diris en Graz kolere la ĉefduko Ernest, prezentante al Draŝkoviĉ la leteron.

La ruza ekleziulo komencis kompreni la plejhumilan sed ankaŭ timeman epistolon de poĵunaj bankieroj. Traleginte ĝin, metis la ĉefepiskopo la epistolon sur la tablon ridetante kaj diris al Ernest:

„Tiuj ĉi malriĉaj Krezoj, sinjoro moŝto, ŝajnas al mi, aliiĝis en saĝegaj Papinianoj, ĉar per pura advokateca retoriko pedantas pri la leĝo, kvankam

[1] Autentika. Vidu Kukuljević: „Jura Regnorum Dalm. Croat. Slav. I. paĝ. 282." N. d. t.

ili devus plej bone scii tiun malnovan vorton: „La bezono estas plej forta ordono."

„Nu, kion do ni faru, episkopo?", ekdemandis lin la gubernatoro.

„A d a c t a, sinjoro moŝto, a d a c t a", ekridis Draŝkoviĉ, „la ĉambro restu en ĉambro."

„Kaj nia projekto?"

„La tuta projekto ne estas ankoraŭ matura. Oni devas atendi. „C h i v a p i a n o, v a l o n t a n o",[1] diras italo. La pomo maturiĝos post unu jaro. Ĉi tiuj miaj kroatoj jen estas leonoj, jen ŝafidoj. Dume ili nun leonumu kontraŭ turkoj; ni elatendos, kiam ili estos por ni kvietaj. Nun ni bezonas la monon por la fortikaĵoj, por soldatoj. Oni devas doni al ni la monon."

„Sed se ili agus pedante kiel la ĉambro?"

„Se tiel estos" — enpensiĝis Draŝkoviĉ, „ha, ha nun mi rememoriĝas pri mia kara kamarado Gaŝparo. Li kaptu sin mem en sia propra kaptilo. Estas vero, ke li estas nur duono de banuso kaj eĉ nur nome. Sed li aspektigas sin kiel la tuta. Ĉu li ja ne kunvokis la parlamenton? Li estu pretekste banuso, tiel do ankaŭ la parlamento estas leĝa. Vidu, sinjoro moŝto, la ĉambro evidente eraras i n p u n c t o j u r i s!", ekridis Draŝkoviĉ. „Ankaŭ Laĉjo Bukovaĉki agas por mi, mi esperas gajni la plimulton", ekridis Draŝkoviĉ.

„Brave", saltas gaje Ernest, „al vi, r e v e r e n d i s s i m e, neniam mankas la salo. Nu se vi estas certa pri plimulto, kial ni pli antaŭen ne irus?"

„Konsentite, sinjoro moŝto!", respondis Draŝkoviĉ. Post kelke da monatoj ekvojaĝis la episkopo al Zagreb.

Gaŝo Alapiĉ eksciis, ke Zagrebon alvenis la reĝaj komisarioj Draŝkoviĉ, Hallek kaj Teuffenbach ne malmulte ekmirinte, ke ili lin rigardas kiel leĝa banuso. „Kio estas tio ĉi?", diris li, „mi esperis kontraŭstaron, dum dume ĉio bona kaj kvieta!"

La tagon antaŭ la parlamento estis Gaŝo longe en la domo de prepoŝto Nikola Želniĉki, kie ankaŭ

[1] Kiu iras malrapide, venas malproksimen.

ĉeestis Vramec. Revenante hejmen estis la ĝibulo neordinare gaja.

En la korto de la regnikolara domo en la reĝurbo Zagreb regis neordinara vigleco. Ĉirkaŭ la longa verda tablo, sur kiu kuŝis dikaj libregoj, papero, inko kaj multkolora kesto entenanta la privilegiojn de la regno, svarmis multego da deputatoj ĉiuj en riĉaj dolmanoj, ornamitaj arĝente kaj ore, ĉiuj en kalpakoj, sur kiuj brilegis perloj kaj juveloj, kaj ĉe la flanko sabroj enkadrigitaj. La trezoristo Mijo Konjski ŝercis kun malgrandeta sinjoro juĝisto Mato Crnkoviĉ el Crnkovac, tordante konstante siajn grandajn blondajn lipharojn. Kaŝpar Druškoci kaj Ivan Zaboki, deputatoj el Varaĵdin, ĉirkaŭis sinjoron Petar Ratkaj de Veliki Tabor, rakontante al li per tre maldelikata maniero, kiel sinjoro Mato Keglevič perforte forkaptas kaj mortigas la servutulojn. Sinjoro Ratkaj, karesinte sian nigran barbon, miras pri tiu perforto kaj avertas preterfluge, ke Mato Keglevič estas granda amiko de la eksbanuso Draŝkoviĉ. Sinjoro Niko Alapiĉ de Kalnik, la frato de la banuso, kolektis ĉirkaŭ si aron da kalnikaj vilaĝnobeloj kaj laŭdegas ĝis la steloj sian fraton, la banuson. Honorinda preposto Niko Želnički ĝentile riverencas al juna sinjoro Stjepko Tahi, la blonda junulo, dum kaŝite palpebrumas al Franjo Stolnikoviĉ, kiu serenege ĵuras al la vilaĝnobeloj el Moravĉe, ke li defendos ilin antaŭ s t a t u s pro tiranaĵoj de la soldatoj de Hallek. Iom pli malproksime staras kerna maljunulo 60 aĝa, kun nigraj brilokuloj kaj kun malgrandaj lipharoj, en blueta dolmano — Blaĵ Pogledič la ĵupanestro[1] de Turopolje, interparolante vigle kun viro alta, malgrasa, vestita en nigraj vestoj — kun literatoro Ivan Jakopoviĉ — la deputato de la nobela urbo Zagreb. Dume sola en angulo sidis malafabla kaj meditema sinjoro Gregorianec de Medvedgrad, apogante sin je sia larĝa sabro. Kaj la nobelaro pli kaj pli enpuŝiĝis interparolante, kriante, tintante, kaj inter la nobelaro nur po-ie oni vidis honorindan sinjoron en nigra longa sutano.

[1] komitatestro.

Meze de tiu tumulto kaj krio sidis ĉe la tablo sinjoro Ivan Petriĉeviĉ de Miketinec, la vicprotonotaro de la reĝolando, ordigante la leterojn kun sigelegoj, intermiksante la leĝajn artikolojn kaj pintigante sian plumon, nur iafoje levis li sian kalvan kapon palpebrumante al la pordego per brilantaj bluokuloj, kvazaŭ iun atendante. Kiu rigardis ĉiun ĉi malkvietegan maron, kiu rigardis la malafablajn silentajn vizaĝojn de la vilaĝnobeloj, kiu ekvidis kiel la okuloj kelkan fojon rekontas sin reciproke kun flamfulmo, tiu povis ankaŭ suspekti, ke en la profundo de ĉi tiu maro preparigas ventego.

Pasis duono da horo, pasis unu horo, kaj la sonorilo de sankta Marko batis jam la dekunuan. Kaj ĉiam pli kaj pli granda bruo regis.

„La banuso. Kie estas la banuso?“, oni aŭdis ĉi tie.

„Oni devas venigi la banuson“, ekeĥis tie.

Per malrapida paŝo alpaŝis Želnički al Petriĉeviĉ.

„Kie estas sinjoro vicbanuso?“, ekdemandis la prepósto la vicprotonotaron.

„Ĉe la komisario, via pastra moŝto!“, ekridis duonvoĉe Petriĉeviĉ.

La ekleziulo flustris ion al sinjoro Petriĉeviĉ, kaj ĉi tiu kapjesis.

La preposto do suriris la estradon.

„Aŭdu, aŭdu ni!“, rekriis en unu momento cento da voĉoj.

Kaj la bruo eksilentiĝis.

„Ŝatindaj, honorindaj, magnificencaj, nobelaj, altaj, saĝaj kaj indulgaj sinjoroj s t a t u s e t o r d i n e s de la reĝolandoj Dalmatujo, Kroatujo kaj Slavonujo“, komencis la preposto. „Tial ke magnificenca kaj ŝatinda sinjoro Gaŝpar Alapiĉ de Vukovina kaj Kalnik, la banuso kaj ĉefa kapitano de ĉi tiuj reĝolandoj, kun aprobo de plej serena princo Ernest, la aŭstria ĉefduko, tirola grafo kaj reganto

de lia sanktigita reĝa moŝto kunvokis en la hodiaŭan tagon la komunumon de la sinjoroj (magnatoj), nobelaro kaj aliaj s t a t u s e t o r d i n e s de ĉi tiu regno al la ĉefan parlamenton en ĉi tiun reĝurbon, ke ili aŭdinte de la buŝoj la dezirojn de sinjoroj komisarioj de lia reĝa moŝto konsiliĝu kaj konkludu pri bono de la patrujo, kaj tial ke estas en tiuj ĉi reĝolandoj de nememorebla tempo ordo kaj leĝo, ke la ĉefparlamenton ĉefu la banuso, mi humile proponas, ke deputacio el ĉiuj kvar s t a t u s tio estas el la magnata, nobela, pastra kaj burĝa iru antaŭ lian banusan moŝton kaj ke la diritan sinjoron banuson akompanu en la kunvenejon de la reĝolandoj."

— „Al la banuso! V i v a t b a n u s!", ektondris cento voĉoj.

Dum Želniĉki tiele parolis al la nobelaro, eniris la korton juna nobelo, Mihajlo Vojkoviĉ kaj rapidis al Petriĉeviĉ, enmanigante al li la leteron.

„Malfermu ĝin! Legu, alta sinjoro! Ĝi estas la ordono de la banuso!", rediris la junulo.

La vicprotonotaro malfermis la leteron. Li komencis legi, paliĝetis kaj konsterniĝis. Sed apenaŭ la preposto finis, saltis Petriĉeviĉ kontraŭ ordo kaj moro, eksplodinte per plena voĉo:

„Sinjoroj s t a t u s e t o r d i n e s, atendon!"

„Kio estas, kio estas?", oni de ĉie kriadis.

„La banuso ne ekzistas plu!", ekkriis Petriĉeviĉ per tremanta voĉo.

La korto, koridoroj kaj la domo pro la frenetiko ektremis. Kriadego malaŭdebligis ĉiun vorton, rido kaj miro, tinto kaj insulto miksis sin reciproke en ĉi tiu frenetika kunveno, kaj la nobelaro are ekrapidis kontraŭ Petriĉeviĉ, kiu staris kvazaŭ ŝtoniĝinta, tenante en la mano la fatalan leteron.

„Oni legu ĝin", ekkriis Ratkaj.

„Aŭdu ni, aŭdu ni!", ekkrietis Ivan Zaboki.

„Ha la pafilo pafis!", gojiĝis Bornemissa.

„Kio, kio estas?", ekscitiĝis la nobelaro.

„A b d i c a v i t. Li rezignis la honoron!", rediris Petriĉeviĉ.

„Kial?", ekkriis laŭte Blaj Pogledić, alpuŝiĝinte ĝis la verda tablo. Petriĉeviĉ levetis la ŝultrojn, dum Niĉjo Alapiĉ malice ekridis, vidinte tian tumulton. Sola Stjepko Gregorianec ne movis sin de sia loko, li trankvile rigardis ĉi tiun volvaĵon da flirtantaj plumoj, ĉirkaŭplektinta Petriĉeviĉon. Lin kvazaŭ ne surprizigis ĉi tiu sciigo. Želniĉki staranta sur la estrado iom kliniĝis, pretekste por aŭdi: kio estas, kaj kiam li fakte eksciis, ke Alapiĉ rezignis la banusan honoron, li kapbalancis kvazaŭ mirigita kaj malsupreniris al Petriĉeviĉ, sed tiumomente rekontis liaj okuloj la okulojn de Gregorianec kaj ĉirkaŭ buŝo de l' rapidema kanoniko aperis eta rideto. Nun estis malligitaj en la kunvenejo ĉiuj bridoj de ordo kaj paco. Oni kriadis kaj insultadis sen la indulgo, la nobelaro miris: kial tiu tondro el hela ĉielo. Kaj multaj amikoj de Alapiĉ, al kiuj Draŝkoviĉ estis dorno en kalkano, komencis bruinsulti la estron de Vukovina, ke li nun en maloportuna tempo lasis la nobelaron en la embaraso. La rapidema ĝibuio diris nur al kelko da kamaradoj kien li celas kaj pri kio oni agas, pro tio la kunvenintoj tiel miradis. Sed je unu fojo la bruo silentiĝis, la nobelaro elreviĝis. Laŭta trumpetsono antaŭ la domo maldormigis la deputataron de la miro.

La imperiestraj komisarioj!", ekkriis Petriĉeviĉ, kaj kvazaŭ je okulsigno revenis la sinjoroj nobeloj al siajn lokojn.

Vere granda vitra veturilo haltis antaŭ la domo, kaj ĉirkaŭ ĝi staris sur ĉevaloj kelkdeko da germanaj kirasuloj.

En la kunvenejon eniris la ĉefepiskopo Draŝkoviĉ, en silka vesto, kaj sur lia brusto brilegis smeraldkruco. Li estis pala, malafabla kaj li neniel povis serenigi almenaŭ ŝajne sian aspekton. Post li paŝis Servacio Teuffenbach sub larĝa plumĉapelo, prenante obstinece sian longan glavon, kaj Vid Hallek, generalo de slavona Limo, sub brilanta kiraso, zonita per blanka kaj ruĝa rubando de la limarmeo. Fine altreniĝis ankaŭ la vicbanuso Bukovaĉki tre kuntiriĝinta.

Draŝkoviĉ riverencis la kunvenintojn, dum la nobelaro, kiu ĝin tiom da fojon frenetike estis salutinta kriante, opiniante en li la plej fortan kolonon de la hejma rajto, ĉi tiu nobelaro nun silentegis. Silente ekiris la komisarioj al siaj lokoj kaj fine komencis la arĥiepiskopo per sufokanta voĉo, laŭ kiu estis videbla, ke ĉio bolas en li:

„Honorindaj, ŝatindaj, eminentaj, ekselencaj, saĝaj kaj indulgaj sinjoroj s t a t u s e t o r d i n e s de la reĝolando Dalmatujo, Kroatujo kaj Slavonujo! Lia princa kaj sinjora moŝto Ernest, la ĉefduko aŭstria, reganto de lia sanktigita imperiestra reĝa moŝto, ordonis letere kaj sigele al la ekselenco sinjoro Gaŝpar Alapiĉ de Vukovina, la banuso de ĉi tiuj reĝolandoj, por ke kuniĝu la komunumo de la sinjoroj kaj nobelaro en ĝia ĉefparlamento por interkonsiliĝi pri la bezonoj de ĉi tiu malgaja patrujo. Por ke al moŝtoj s t a t u s e t o r d i n e s estu klara, kien celas la favora deziro de lia princo moŝto, jen li min sendis kune kun moŝtoj sinjoroj kaj generaloj Servacio Teuffenbach kaj Vid Hallek, kiel komisarioj, por sciigi al viaj moŝtoj per vivanta voĉo de niaj buŝoj la volon kaj ordonon de princo moŝto, kaj ke ni per saĝa kaj klarigema parolo trovu la rimedon, kiamaniere konserviĝus tiuj ĉi mizeraj reĝolandoj al la glora sceptro, kaj kontraŭstarus al la sangmalamiko de la tuta kristanaro Moŝtoj s t a t u s e t o r d i n e s[1] —“

„Pardonu min via pastra moŝto kiel ankaŭ moŝtoj s t a t u s e t o r d i n e s“, saltas kolere Stolnikoviĉ, „ke mi interrompas la parolon de la sinjoro reĝa komisario.“

„Aŭdu ni! Aŭdu ni!“, malkvietiĝis la nobelaro.

„La reĝa komisario parolu!“, ekkriis Niĉjo Tahi ekruĝiĝinte pro kolero.

„Ne, parolu Stonikoviĉ!“, komencis kriegi la nobeloj el Moravĉe.

„Stonikoviĉ!“, ekresonis la parlamento. Draŝkoviĉ kolere kunpremis la lipojn kaj sidiĝis.

[1] status et ordines, klasoj kaj ordenoj.

„Moŝtoj s t a t u s e t o r d i n e s“, daŭrigis Stolnikoviĉ, „eĉ se mia simpla vizaĝo ne indas, se mi eĉ malobeis ordon, aroginte al moŝtoj o r d i n e s montri la ĝustan vojon, tamen mi opinias, ke ĉiu kroata nobelo estas gardanto de la hejma rajto. Kaj pro tio instigas min la koro, ke mi demandu, kie estas nia estro, kie estas nia banuso?“

„Kie estas nia banuso?“, ektondris la nobelaro.

„Moŝtoj s t a t u s e t o r d i n e s!“, ekparolis la vicbanuso Bukovaĉki time.

„Ni ne demandas pri vicbanuso, kie estas nia banuso?“, brufrapis per la pugno Petar Ratkaj la verdan tablon.

„Moŝtoj sinjoroj!“, almetis Petriĉeviĉ, „lia sinjora moŝto Gaŝpar Alapiĉ sciigas per tiu ĉi letero la moŝton kunvenon de la sinjoroj kaj nobeloj, ke li rezignis la banusan honoron sendinte la demision al lia reĝa moŝto en Praha.“

„Honto!“, eksplodis Mato Keglevi ĉ. Sed en tiu ĉi momento saltis Stjepo Gregorianec, kolere preninte sian sabron, kaj Keglevi ĉ tuje eksilentiĝis.

„Moŝtoj sinjoroj!“, eksonis penetranta voĉo el la aro da nobeloj kaj la estradon suriris, ĝis nun ne rimarkita, ĝibulo.

„V i v a t Alapiĉ, v i v a t!“, ektondris la nobelaro.

„Moŝtoj s t a t u s e t o r d i n e s!“, daŭrigis Alapiĉ. „Kore mi bedaŭras, ke ĉi tiu elektita kunveno ekscitiĝis per mia letero, sed ankoraŭ mi pli bedaŭras, ke kelkaj eminentaj sinjoroj riproĉe ĵetis al mi, ke mi estas malkuraĝulo. Malkuraĝulo mi ne estas, pri tio scias ne sole la tuta reĝolando — ĉar mi ne nur batadis tra la Zagorje la ribelantajn servutulojn, sed ankaŭ la antikristo sentis mian sabron multfoje. Do pro kio mi ne estas plu banuso, pro kio mi redonis antaŭ la piedojn de lia reĝa moŝto la estrecon de ĉi tiuj reĝolandoj, mi klarigos poste al moŝtoj kunvenintoj, kaj mi pravigos min antaŭ la nobelaro. Sed, se mia nepotenca vorto renkontos ĉe viaj moŝtoj eĉ eron da respekto kaj amo, mi ĵurpetas vin, moŝtoj sinjoroj, aŭskultu antaŭ ĉio la

saĝajn vortojn de la honorindaj kaj sinjoraj moŝtoj komisarioj, ĉar mi estas certa, ke ili portas la sanigilon por grandegaj niaj vundoj.“ Kun malica rideto riverencis Alapiĉ al Draŝkoviĉ, kaj tiu ĉi ektremis, kvazaŭ lin serpento mordis.

„Vivat Alapiĉ!“, ekkriis la nobelaro, „aŭdu ni la komisariojn!“

Subite levis sin Draŝkoviĉ, liaj okuloj ekbrilis kaj, ridetante komencis li jene:

‚Konkordo, — moŝtoj status et ordines de tiu ĉi glorinda reĝlando — malgrandaĵon kreskigas, malkonkordo grandaĵon ruinigas. Se iam, tiam ĵus tiumomente, moŝtoj sinjoroj, instigas min treege zorgigita mia koro, por ke mi recitu al vi ĉi tiujn malnovajn tre konitajn vortojn. Estas vero, mi je mia nomo ne venas; lia sinjoro moŝto gubernatoro sendis min ĉi tien, sed kiel ajn ordonas al mi la senditaĵo, ke mi estu sola interpretanto de la moŝta volo, tiel mia koro ne lasas, ke mi ne parolu laŭ mia sento, laŭ mia penso. Kaj kiel ne? Ĉu mi ne naskiĝis inter vi, ĉu mi ne estas filo de tiu ĉi patrujo? Ĉu mi dum uraganaj tempoj de ĉi tiu mizera reĝolando ne staris fronte kun kruco kaj sceptro? Ĉu mi kune kun vi ne maldormadis noktojn, prizorgante, por repuŝi la peston malfidulan de ĉi tiu lando, ĉu mi ne pasigadis kun vi tagojn, fervorante, por ke besta batalanto kontraŭ Kristanoj ne ekspluatu la justulojn de la praepokoj en ĉi tiu regno? Vi ja memoras tiun tagon, kiam mi per plejalta favoro eniris ĉi tien inter vin kiel banuso, kiam mi metis mian dekstran sur s^an evangelion, ke mi defendos la regnon, kiel frenetike eksaltis viaj koroj, kiel laŭte ĝojiĝadis viaj voĉoj, kiel heroe ektintis viaj sabroj! Per Dio, se vin tiam ekvidus la turka forto, ĝi estus disiĝinta pro timo kiel Filiŝtoj antaŭ Gedeono. Kiome bele, kiome glorinde famiĝis la nomo de kroata nobelaro inter Kristanaro, dum vi konkorde sub karmemora Franjo Sluniski kiel ankaŭ sub ĉi tie ĉeestanta ekselenco sinjoro Gaŝpar Alapiĉ hakadis la turkojn, dum vi staris kiel feraj ŝtonegoj kontraŭ infera uragano. Neniam ĝisvivis

la banusa standardo tiom da gloro! Kaj nun, ho ve, kiam plaĉis al la eterna Providenco provi vin per pli granda turmento, ĉu vi estas ĝustaj probatalantoj de la Jesusango; nun kiam la forto de sankta Spirito devus flirtadi super viaj kapoj fortigante viajn korojn, nun eksemis la malamiko de la Homfilo kardon de malkonkordo en viajn korojn. Kaj se Dikompato ne revenigos konkordon en ĉi tiu malgaja tero, ĝin faligos la idola glavo, vin enĉenigos la infera forto. Kial do malkonkordo? Kia maljustaĵo estas farita al la lando? Ĉu lia moŝto gubernatoro ne plenumas favore viajn dezirojn? Ĉu li trudas al vi la impostojn? Ne, li tion ĉi ne faras. Li ordonis al la sinjoro banuso, ke li alvoku la parlamenton, kaj sinjoroj klasoj kaj ordenoj agadu laŭ sia volo pri la patrujsavo. Ĉu li de ĉie ne kolektas fremdan armeon, por ke ĝi estu al helpo al la reĝolando? Jes, ankoraŭ pli! Ĉu lia princa moŝto Karlo ne konstruas la fortikaĵon: Karlovac apud Dubovac per siaj kostoj kaj por via defendo? Pri banuso vi demandas? Kiu lin al vi sinjoroj moŝtoj, forprenis? Ĉu mi? Ĉu lia moŝto gubernatoro? Ne. Ĉiu estas sinjoro de sia volo, ĉiu scias plejbone, kiamaniere li pravigos siajn agojn antaŭ dia trono. Tiel scias ankaŭ la ekselenca estro de Vukovina. Profundkore mi bedaŭras, ke laŭ la malnova moro ne prezidas tiun ĉi glorindan kunvenon laŭleĝa estro. Mi nek vi estas ŝuldaj por tio. Aŭ viaj moŝtoj volas atendi, ĝis kiam lia reĝa moŝto starigos el Praha la alian banuson? Ĉu atendi, ĝis kiam viaj senditoj trapasos montojn kaj valojn, dum jen jam la turko aperas? Ĉu atendi, ke la turko al vi — kion Dio repuŝigu de tiu ĉi lando — altrudu sian banuson? Ho moŝtoj sinjoroj, malfermu la okulojn, okule rondiru vian ĉirkaŭaĵon! Terura vidaĵo! Tra Hungarujo rivere fluas la kristana sango, sur la Budim-kastelo briletas la duonluno. Bosnio ĝemas sub turka hufo. Malsupra Slavonujo sklaviĝas forŝirita de sia patrinlando, la idolanoj enpaŝas jam Likon kaj Krbavon, Karniolion, ili estas sur via lando, ili estas antaŭ tiu ĉi sojlo. Ĉu Cetin ne ekflamis; ĉu Velika,

Kladuŝ kaj Zrinj ne falis? Ĉu la sanga tago de Hrastovica ne flugpendas en viaj animoj? Vi do intermarĉandas pri formuloj de la praveco, vi traserĉas la polvigitajn librojn! Sub viaj piedoj la ŝipo rompiĝas, dum vi flikas la velojn! S a l u s r e i p u b l i c a e s u p r e m a l e x e s t o![1] Por Dio, por reĝo, por hejmo! Aŭ ĉu tute mortis la heroa animo de viaj avoj kaj la fervoro por sankta kristana kredo? Mi diras: Ne! Leviĝu iu, li diru, ke jes, kaj mi diros al li, ke li mensogas. Malafablaj estas viaj vizaĝoj, koleraj estas viaj okuloj, sed la koron vi demandu, la koron! Mi scias, ke en ĝi vivas la malnova heroeco, preta ĵeti sin al la pereanto de la sankta kredo! Elreviĝu, ho moŝtoj sinjoroj, al malnova nekontraŭstarebla forto, kunordigu la saĝecon kaj heroecon kun la deziroj de lia princa moŝto, kaj je Kristo, aŭskultu min!"

„Aŭdu ni, aŭdu ni!", ekmurmuris la nobelaro.

„Kvar fortikaĵoj defendas nin oriente de la turko", daŭrigis Draŝkoviĉ per pli modera voĉo, „kvar fortikaĵoj inter Sava kaj Drava, tio estas: Sisak, Ivaniĉ, Koprivnica kaj Legrad. Je tiu ĉi ŝtonzono ne por unu fojon rompiĝis la osmana furio. Kroata mano levis tiujn ĉi fortajn defendejojn, kroata sango sanktigis ilin kiel eternaj altaroj de Jesugloro. Ve, se unu falos, se unu la turko almilitos, breĉiĝus la firma remparo, la idolanaj trupoj superakvigus Zagorje'n kaj ĉi tiun ĉirkaŭaĵon, torente disfluiĝus la idolana armeo de la sudo trans Kupa, kaj Zagreb, la tronurbo glora de la tuta Slavonujo devus kliniĝi al la duonluno. Kaj koro de tiu defendo estas Koprivnica, la plej forta nia fortikaĵo. Se ĝin la turko superregos, falos ankaŭ Sisak. Al Koprivnica fiksas la turkoj siajn okulojn, ĝin intencas ili per ĉia forto eksalti. Tion certigas la kredindaj sciigoj. Sed Koprivnica multe suferis, ĝi estas malbone preta; oni bezonas da remparoj. La remparoj estas bezonaj ankaŭ al ĉ e k u p a j fortikaĵoj. Ankaŭ la armeo malpliiĝas. Longa estas la limo, kiun ni estas

[1] La savo de la respubliko estu plej alta leĝo.

defendontaj, dum la turka forto estas granda. Tial avizas lia princo moŝto Ernest, regante en ĉi tiuj partoj per reĝa potenco, al la komunumo da sinjoroj kaj nobelaro de la tuta reĝolando, ke ili ne preterlasu en sia kunveno ordoni, ke oni sendu tuj la homojn por fortikigado de Koprivnica, Ivaniĉ kaj ĉekupaj partoj, ke oni regule varbu armeon laŭ kamentuboj, ke oni aprobu novan imposton por militkostoj, kaj ke reĝurboj liverigu nutraĵon, municion kaj ĉevalojn por imperiestraj pafilegoj. Tio estas la volo de lia princo moŝto, mi do esperegas, ke la saĝeco da altaj s t a t u s plenumos tiun ĉi volon kun humila obeo, por savi ĉi tiujn reĝolandojn de sklaveco."

Silente sidadis la nobelaro, kaj Draŝkoviĉ malleviĝinte al la seĝo akre okulmezuris la kunvenintojn, esperante, ke li kvietigis la flamantajn korojn de la kroata nobelaro.

Malvigle levis sin la malgranda Alapiĉ, akre mezurante per la okuloj la arĥiepiskopon.

„Sinjoroj moŝtoj", komencis li per penetranta voĉo, „ne pensu, ke mi vian koron vigligos kaj vin instigos al la heroaĵoj per figuraj vortoj, kiel lia pastra moŝto la kaloĉa arĥiepiskopo. Mi tre scias, ke vi estas herooj, ke via kuraĵo ne bezonas akrajn spronojn kiel inerta ĉevalo. Mi scias nek figure paroli, mi scias nek per delikata plumo lerte knari, mia metio estas sabro. Tial, moŝtoj klasoj kaj ordenoj, mi parolos mallonge. Mi devas min pravigi antaŭ vi. Lia pastra moŝto, sinjoro ĉefepiskopo, diris, ke ĉiu devas respondadi antaŭ Dio por siaj agoj, tiel ankaŭ mi, kiu subite delasis de banuseca honoro kaj kvazaŭe lasis la regnon en embaraso. Ĉu ja tiel ne faris ankaŭ lia pastra moŝto sinjoro ĉefepiskopo, eble ankaŭ en pli malbona tempo? Mi ne scias, kiele li pravigos sin antaŭ Dio. Mi do, moŝtoj sinjoroj, ne rezignis la banusan potencon por fariĝi ĉefepiskopo, sed por esti simpla nobelo, preta ĉiam deingigi la sabron por savo de ĉi tiu reĝolando."

„V i v a t Alapiĉ!", salutis lin la nobelaro.

„Kaj rezigni la banusecon mi devis“, daŭrigis la eksbanuso, „mi devis laŭ mia konscienco. Ĉar, moŝtoj sinjoroj, unue mi estis banuso nur sabre, sed ne ankaŭ sceptre, militestro, sed ne juĝisto kaj reganto. Due, estas malnova afero, ke sub unu tegmento ne povas estri du mastroj. Kaj en tiu ĉi reĝolando estas tuta armeo da mastroj. En malnova tempo ordonis al la armeo sole la banuso, kaj nun ĉiu fremda generalo. Kaj kiam mi demandis tiujn sinjorojn, kiel ili kuraĝas agadi sen mia scio, kontraŭ mia ordono, ili ĉiam prezentadis iajn dekretojn, ke tiel deziras lia ĉefduka moŝto Karlo. Banuso esti kaj ne banusestri, esti pictus masculus, ĝin, ho sinjoroj moŝtoj, mi ne volis. Pro tio do mi delasis de mia duonbanuseco, por ke ni ricevu kompletan leĝan banuson. Nun scias moŝtoj klasoj kaj ordenoj, ĉu mi estas pura. Dixi.“

Kaj Alapiĉ sidiĝis! Liaj simplaj vortoj ekvigligis la tutan kunvenon kaj la nobelaro komencis bruaprobe kriadi.

„Sinjoroj klasoj kaj ordenoj!“, levis sin malŝate Mato Keglevič frapante per la sabro la pavimon. „Deliberante Roma Suguntum periit. Mi ne povas sufiĉe primiri la sinjorojn, kiuj serĉas ĉiuspecajn malhelpaĵon kaj malfaciligojn, ke ni tie ĉi paroletante perdas la tempon. Ĉu ni venis tien ĉi por levadi procesojn? Kiam la malamiko frapas per la sabro la pordon, ne estas tempo por pedantadi pri leĝaj doktrinoj. Oni bezonas labori. Tio estu nia leĝo. La turko nin ne demandos, ĉu la armeon kondukas banuso aŭ iu alia. Lin oni devas venĝi, kaj por ke ni venĝu lin, oni devas obei la volon de lia princa moŝto — —“

„Banuson ni bezonas, sen banuso ne povas la parlamento esti!“, ekkoleriĝis Petar Ratkaj.

„Sufiĉe, sinjoroj!“, ekflamiĝis Teuffenbach, prenante kolere sian glavom. „Mi ne estas leĝosciencisto, soldato mi estas. Mi ne demandas pri malnovaj paperoj, sed mi demandas pri pulvo-provizaĵo. Mi ne estas ĉi tie por aŭskulti pri viaj artikoloj, mi havas pli oportunan okupon. Armeon ni bezonas,

monon ni bezonas; ĝin vi donu al ni, kaj tiam projektu pri liberaj artikoloj. Kaj tio devas esti, ĉar tiel ordonas lia gubernatora moŝto.“ Kaj furioza li frapis per la mano la sabron.

Kiel per fulmo tuŝita saltis supren la nobelaro.

„Kio do ni estas?“

„Pro kio la parlamento?“

„For!“

„Ĉu tiel oni respektas la leĝon?“

Kiel malkvietiĝinta maro furiozis la kunveno. Nun post nun atencos la nobeloj la mallertan komisarion. Draŝkovič prenis sinjoron Servacio je la maniko kaj alpremis lin al la seĝo.

„Moŝtoj sinjoroj“, ektondris tremante de kolero Gregorianec, „la kalkulo devas esti klara. Prave diras sinjoroj komisarioj, ne estas tempo perdebla. Mi aŭdis multon da vortoj, sed mi ne aŭdis kion ni estas laborontaj. Permesu, moŝtoj klasoj kaj ordenoj, ke mi esprimu al vi mian simplan opinion. La via estas por decidi. Ĉu vi iam estis en templo de la blankaj monaĥoj en Remete? Tie ripozas la cindro de gloraj niaj banusoj. Super ilia tombo staras standardo kaj sceptro. Per la standardo kondukas ili la nobelaron al la batalo, per la sceptro ili regas kaj disdonas justecon. Tiel estis de nememorebla tempo, tiel devas esti ankaŭ nun. Lia reĝa moŝto estrigas al ni banuson, ke li estu al ni anstataŭ reĝo. Banuso estas reĝa substituto, banuso staras fronte la armeo, banuso sidas fronte la parlamento. Per vigla, flamiĝa vorto pruvis al ni lia pastra moŝto sinjoro episkopo de Kaloĉa, kia malfeliĉo atendas la mizerajn restaĵojn de ĉi tiuj famaj reĝolandoj, li riproĉis nin, ke ni estas malkonkordaj, ke ni ne zorgas pri sankta kredo kaj liberoj de la nobelaro. Sed pli forte sentas ni tiun ĉi mizeron, ni sentas ĝin de post multaj jarcentoj. Heroe repuŝadis niaj avoj la nekristanan forton, kiam ankoraŭ ne ekzistis sinjoroj Terffenbachoj kaj Hallekoj. Ĉu ni ja solaj ne eltenadis akrajn batalojn por nia reĝa lando sub la standardoj de Frankopan kaj Alapiĉ? Ĉu karmemora banuso Nikola Zrinjski ne kaŭzadis

ĉagrenojn al konstantinopola caro, falinte glore sub Siget? Ni de hieraŭ ne deingigas la sabrojn, nin ne instruadis sinjoroj generaloj svingadi per hakarmilo. Ĉu ni ne fordonadis la lastan denaron, la lastan guton de la sango por nia reĝolando? Sed kvankam ni elkreskis sur batalkampo, ĉiam estis sankta por ni la leĝo, ĉar sen leĝo ne ekzistas heroeco, sen ordo ne ekzistas venko. Por kio do ni batalis, moŝtoj sinjoroj? Ĉu nur por bulo da tero? Ne, por niaj liberoj, por heredaĵo sankta de niaj prapatroj. Por tio ni repuŝas la turkojn, pro tio ni pereos ĝis la lasta guto de la sango, tial ke ni ne volas fariĝi sklavoj de la pseŭda profeto. Alte estimataj sinjoroj komisarioj serĉas s u b s i d i a, serĉas porlaborajn manojn, homojn por la armeo. Lia reĝa moŝto tre bone scias, ke tiuj ĉi ĉiam fidelaj reĝolandoj plenumadis sian devon al la moŝto krono, sed plenumadis tiam, kiam ĝin postulis ordo kaj leĝo. Kiu do donas helpojn por armeo? La kunveno de sinjoroj kaj nobelaro. Kaj kiu estas estro de tiu kunveno? La banuso. Kaj ni ne havas banuson. Do sen banuso nek impostoj aŭ armeo ekzistas. Lia pastra moŝto, sinjoro ĉefepiskopo de Kaloĉa parolis pri nova fortikaĵo apud Dubovac. Sed ĝi, moŝtoj sinjoroj, pli defendados Karniolion kaj Stirion ol reĝolandon Slavonujon. Lia pastreca moŝto parolis, kiele nin defendas la fremda dungita armeo. Jes, defendas! Ja en jaro 1566. niaj senditoj jam priplendadis ĉe la ĵoĵuna parlamento, kiamaniere la niaj defendantoj devastigas la landon, la parlamento do malpermesegis per severa leĝo, ke ili ne faru plu tiele. Sed kiel oni respektas tiun leĝon? La germanaj kavalerianoj paŝtigas siajn ĉevalojn ĉien sur la paŝtejoj de niaj servutuloj. Ĉu la transkurintoj sub Tomo Severoviĉ ne uzurpis al sinjoro Herendiĉ la tutan bienon? Jen demandu la nobelan nian fraton Delia, kiele la oficiroj de sinjoro Ivan Asperger uzurpis al li en Steničnjak, kion li posedis. Demandu jen la nobelajn homojn el Moravĉe, kaj ili vin diros, kiele per haramioj iliaj domoj devastiĝis. Ni defendados nin, sed defendados sub la banusa standardo.

Sekve moŝtoj klasoj kaj ordenoj, mi opinias, ke ni per la sinjoroj komisarioj sciigu lian moŝton gubernatoron, ke ĉi tiu trehumila kaj ĉiam fidela reĝolando tre bedaŭras, ke ĝi ne havas laŭleĝan substituton de lia reĝa moŝto kaj, ke ĝi batalados sub banusa standardo kontraŭ la malamiko de kristana komumuno, sed ĝis kiam oni ne restarigos la banuson, ĝi ne povas laŭleĝe plenumi la deziron de sinjoroj komisarioj."

„Tiel, tiel!", kriadis multenombra nobelaro. Pala kaj malgajiĝa ekrapidis Draŝkoviĉ al Alapiĉ, ĵurpetante lin, ke li kvietigu la parlamenton.

Fine la ĝibulo kvietigis ekkoleriĝintajn pasiojn de la kunveno kaj laŭ lia propono konkludis la parlamento jenon:

„Antaŭ ĉio decidis trefidelaj subuloj de lia sanktigita imperiestra kaj reĝa moŝto, kompreninte per la sinjoroj komisarioj la deziron de lia sinjora moŝto, la ĉefduko Ernest pri fortikado de la fortikaĵo Koprivnica kaj aliaj lokoj, starantaj sur la limo de la mizera reĝolando Slavonujo, ke, ĉar sinjoroj k l a s o j por nun havas en la reĝolando nenian leĝan estron, tio estas la sinjoron banuson, plenumonta la plenrajton de la banusa potenco, kiu povus malobeon kaj malzorgon laŭleĝe puni, kaj al la loĝantoj de la regno juĝadi, — ili povas neniajn laboristojn por la Limo permesi, nek ion alian decidi, pri kio oni enmanigos al la sinjoroj komisarioj dokumenton kun reĝna sigelo; sed ke sinjoroj klasoj kaj ordenoj al sinjoro Gaŝpar Alapiĉ la eksbanuso, al lia vicbanuso, al la ĵupanestroj kaj juĝistoj provizore destinitaj, donas tiun ĉi privatan rajton, por ke ili finofaru ĉiujn postrestitajn antaŭe destinitajn laborojn kiel apud Koprivnica, tiel sur aliaj limlokoj, por ke juĝadu kaj regadu laŭ kutimaj leĝoj, kaj ke same tiel devigu impostestrojn de la reĝolando, por ke ili laŭ al ili donita privatrajto kolektu ĉiujn restojn de la reĝaj impostoj kaj landa kamentubaĵo.

Plue decidis sinjoroj klasoj kaj ordenoj, ke oni sendigu senditaron al lia reĝa moŝto nome:

sº Petar Ratkaj de Veliki Tabor, honorinda sº Petar Hereŝinec, la lektoro de zagreba kapitolo, kaj eminenta sº Ivan Petriĉeviĉ, la vicprotonotaro de la reĝolando, kaj ke ili petu por ke oni ree starigu laŭlegan estron, tio estas la banuson."

Malkontenta forlasis Draŝkoviĉ la kunvenon, malgajiĝaj ekiris la generaloj post li. La tuta ilia plano rompiĝis je malmolaj kapoj nobelaraj.

„Sed mi ankoraŭ ne diras: Amen!", ekmurmuris kolere Draŝkoviĉ al siaj kamaradoj. „Mi jam trovos bridojn por ĉi tiuj furiozantaj ĉevaloj. Mi superruzis la ruzajn kardinalojn italajn kaj episkopojn portugalajn, kaj kiel ne ĉi tiun malmoderigan aron!"

Vespere en la sama tago sidis en la kastelo de preposto Želniĉki gaja societo ĉe la tablo: Alapiĉ, Stolnikoviĉ, Vramec. Sole Stjepko Gregorianec malafable kaj enpensiĝa rigardaĉis antaŭ sin.

„Je la bona sano, r e v e r e n d i s s i m e!", levis Alapiĉ la glason, „la ĵetkubo falis sur nian flankon!"

„Je la bona sano!", resalutis la domestro kaj post li Stolnikoviĉ kaj Vramec.

„Kaj vi, sinjoro moŝto? Kiaj zorgoj vin maltrankviligas?", ekdemandis la kronikisto Stjepkon.

„Mi perdis la edzinon, mi perdis la filon, ke mi do gojiĝu? Sed", daŭrigis li levinte la glason, „nun mi iros kun vi nur al unu stelo — al la gloro! Je la bona sano!"

„P e r a r d u a a d a s t r a!", almetis Vramec. Kaj la glasoj sonore ektintis.

XIV.

Estis je krepuskiĝo. La oraj sunradioj rigardetis tra altaj fenestroj de la kastela kapelo en Mokrice kaj reflektis de la nova ŝtono en la mezo de la preĝeja pavimo. La latunliteroj sur la ŝtono alvokadis ĉiun kristanon, por ekpreĝi Dion por spiritsavo de nobela sinjorino Marta de Gregorianec, kies ostoj

ripozis sub la marmortabulo. Antaŭ la ŝtono genuis juna heroo, vestita en brilanta ŝtalo. La origita kasko staris apude. Li kunmetis la manojn, fleksis la kapon, sur la okolo larmo tremetis. La vesperoraĵo tremetis sur la brilanta kasko, sur la brilanta kiraso, la vesperoraĵo kronadis lian junan, heroan frunton, en kiu estis enstampita la signo de l' dolorego. La junulo preĝadis, tutkore preĝadis. Lia buŝo esprimadis la vortojn de „Patro nia", sed lia penso dronadis en doloro, lian animon sufokadis malĝojo. Kion li faros? Kien li iros? Tion Dio scias. Antaŭ nelonge oni alveturigis lian karan patrinon ĉi tien de Zagreb kaj metis la karajn restaĵojn sub tiu ĉi ŝtono. La patro furioza, la patro kolera dronadis en la turniĝo de uragana epoko, por perforte sufoki la konsciencon, por forgesi la mortintan edzinon kaj vivan filon. Sub la patra tegmento ne estas vivo, ne estas plurestado. Ja kiele, kiam li estas senkora! Kaj la frato? Li estas nedecidemulo, li tremas de la patra kolero, kisas sian junan destinitulinon kaj evitas la pliaĝan fraton. Dio! En la naskdomo nek animo! Deŝirita brancо! Kien do? Ja al la trezoro de l' koro, al juna idino de l' oraĵisto. Hieraŭ vespere li estis ĉe ŝi, li ĵuradis al sia karulino, ke li ŝin neniam forgesos, ke li ŝin eterne amos. Ŝi kaj Jerko, la du animoj ekokupis la koron de juna Pavlo. Sed ĉu li povas resti ĉe Dora, sen malutili al ŝia reputacio ĉu li povas ŝin remeti je malica klaĉo, ŝin malfeliĉulinon, kiu pro sia amo tratoleris maldolĉajn turmentojn? Kaj kion li fine farus en la domo de ŝia patro? Li, magnatido, sed sen sia patro malriĉulo, nuda animo sen bulo da tero! Ĉu do povas nobelo paŭzadi dum tiu ĉi tempo? Ne povas. La patrujo vokas, oni devas ekiri, deŝirigi sin de la amatinkoro, se ĝi eĉ krevus! Al la batalo! Al la batalo pro kristaneco! Ha malfacila estis la disiĝo. Antaŭe ja oni deŝirus hederon de jarcenta kverko, ol knabinmanojn de brusto de l' karulo.

„Mi estas ekironta, koro!", diris al ŝi Pavlo, „ĉu vi aŭdas? La sabro al mi tintas, ĝi diras al mi, ke mi estas malkuraĝulo." — „Ekiri, Pavĉjo!", ek-

singultis la junulino, „ekiri inter sabraron, inter pafilaron, kie ĉiu minuto portas la morton! Kie oni ne demandas pri koro, pri amo, pri larmoj! Kie oni sufokadas, buĉadas, kie la homoj forgesas Dion! Ho Dio, se mi estus almenaŭ virkapo, ke ankaŭ mi povu ekiri — sed mi estas virino — ve, mizera virino!“ „Trankviliĝu, dolĉa koro! Mi devas!“, ekmurmuris nevole Pavlo, „jen mia patro furiozas! Li estas malbonon faronta al vi pro mi! La kolerego povus lin plie ekstazigi. Kelka tempo ke pasu, eble li kvietiĝos“. — „Eble?“, rediris malgaje la knabino, „la koro diras al mi, neniam, neniam! Ho ve Pavlo, kial ni tiaj naskiĝis, vi aristokrato, mi mizerulino; kial mi ne estas riĉa, kaj vi malriĉa? Kial ni mizeraj intervidiĝis?“ — „Kaj ĉu vi bedaŭras ĝin, animo?“ — „Ho, mi ne bedaŭras“, ekmurmuris la knabino vigle, kaj malantaŭ la larmoj ekflamis ŝiaj okuloj, „vi vidas, kiele mi estas feliĉa, mi ne fordonus ĉi tiun mian feliĉon eĉ por imperiestra riĉaĵo. Zorgas mi pri via gento kaj nomo! Mi konas nur Pavlon, mi amas nur Pavlon, estu li ĉu malriĉa, ĉu riĉa, ĉu aristokrato, ĉu servutulo. Mi multe ploris, multe suferis, sed mia koro ridis, jes, mi suferis pro Pavlo, pro la amo de Pavlo“. — „Ho gloro mia! Tian animon naskas neniu nia sinjora kastelo!“, rediris milde Pavlo. „Vi do nun forlasas min! Kion mi faros! Mi mortos atendante vin! Ho ne foriru! Sed iru! Mi estos obeema! Vi pli bone scias, kio devas esti, vi ĝin pli bone scias — —“, kaj la knabino ekploris kore. Pavlo saltis, kisis ŝin sur la frunto kaj forrapidis. Li ekiris al Mokrice, kaj Jerko kaj Radak post li. En Mokrice songadis lia patrino la eternan songon. Por viziti ŝin malvivan, ŝin por adiaŭi, kaj tiam al la batalo! Mute li genuis antaŭ la tombo, rigardegante senkompatajn brilantajn literojn, kiuj pruvadis al li sen fino: „via patrino ne ekzistas plu!“ Antaŭ la tombo de l' patrino! Dio oni freneziĝus! Tiuj manoj, balancintaj vin, tiu brusto, nutrinta vin, tiuj afablaj okuloj, pendintaj sur vi plenaj da amo, dum vi malforta ideto songadis la songon — ĉio — nenio! Nenio! Nenio!

Ĉio — plenmano da cindro. Ĉu vi aŭdis, kiel oni fiksis la lastan najlon en la ĉerkon de l' patrino? Oh certe ĝi trairis ankaŭ vian koron. Ĉu vi aŭdis, kiel sur la tombon falis la ŝtontabulo? Jes, jes, ankaŭ vi, filo, volis salti en la tombon. Malbenita morto! Malbenita vivo! Kaj Pavlo fleksis la varmegan frunton sur malvarman ŝtonon kaj komencis kisadi la nomon de la patrino. Tiel li kuŝis, li kuŝis kaj al li estis pli facile.

Antaŭ la kastelo atendadis Pavlon Jerko kaj Radak. Jerko kun krucitaj kruroj sidis sur la ŝtono, dum Radak surventre kuŝis en la herbo.

„Do la estro longtempe forestas!“, ekmurmuris Radak, „jam la suno malaperas“.

„Lasu, li estas ĉe la patrino!“, rediris Jerko svingante per la mano, „ĉu vi scias kiel estas al la koro, dum vi estas sur la tombo de kara mortinto?“

„Ĉu mi scias?“, ekparolis malafable Radak, „ho kaj kiele mi ĝin scias, junulo!“

„Ĉu al vi la senkompata morto forŝiris de l' koro ion karan?“

„Jes, junulo, malico kaj morto.“

„Kiel do, Miloŝ?“

„Lasu tion! Ne estas bone rememorigi al mi tion!“

„Diradu, maljunulo! Jen vi vidas, mi estas amiko al sinjoro Pavlo, amiko ankaŭ al vi. Kial ne?“

— „Kial ne? Hm!“, enpensiĝis la haramio. Certe, vi estas brava knabego. Ĝi estu por vi kiel instruo. Por ke vi sciu, kiel oni veplendas en la mondo, ĉar malfeliĉo venas kiel frosto dum la nokto. Memoru do ĉion. Ne parolu pri ĝi al ĉiu.“

„Diradu do!“, apogis Jerko la kapon per la pugnoj.

„Nu aŭdu! Mi ne estis tia malafablulo de mia junaĝeco, kia mi estas nun. Mi estis gajemulo kaj koboldo, mi ja per la dentoj petole prenis viron ĉe la zono portinte lin trans la akvon. Ne ekzistis malkvieta ĉevalo, kiun mi ne kvietigis, ne ekzistis junulo, kiun mi ne estis superĵetinta, tra naŭ montoj

resonadis mia voĉo, kaj kien mia pafilo „cak“ tie ankaŭ la animo „amin“. La tuta Limo rakontadis pri Miloŝ, rakontadis turkoj Bosnianoj, ĉar mi estis al ili diabla beno, rakontadis ankaŭ junulinoj tra vilaĝoj, ĉar antaŭ Miloŝ ĉiuj rondodancestroj restis kun nevenka trajto. Militi kontraŭ la turkoj estis mia profesio, ĉar per plugilo mi en jaro apenaŭ unu fojon eksulkigis. Mi peladis la friponojn, kiel vulpojn en arbaro, kaj se feliĉo donis, la tendaro ekbrulis, ke ĉe tia kandelo ankaŭ popo povus kanti liturgion el la libro. Pri tio sciis niaj homoj, do tuj kiam ekardis fajro tie malantaŭ turka limo, ili dirus: „Je la kapo, ke ĝi estas mano de Miloŝ.“ Dum festotagoj mi lasis la turkojn en paco, ĉar sur herbejoj troviĝadis dancoj, kiel do povus esti rondodanco sen mi? Foje dum preĝejfesto estis da invititoj en la domo el apuda vilaĝo, inter ili estis ankaŭ Mara Vukŝan —“

Tie ĉi Radak minute silentiĝis.

„— nu, kion do mi diru al vi? En la tuta Limo ne estis tia knabino. Tiel belega kiel hontema kaj abundanta per ĉiuj bonaĵoj, ĝuste laŭ mia deziro kaj volo. Pri tio mi ekparoletis al mia patrino, kaj la patrino diris: „Estas jam tempo, filo, jen mi estas malforta, kaj nenia anstaŭigo, ekfrapu sur la pordo de Vukŝan kaj Dio benu.“ Mi do foriris sinsvati. Vukŝan regalis min per brando kaj kuko kaj ekdiris: „Brava vi estas, Miloŝ, kaj se Dio kaj sankta Nikolao donos, mi ne bedaŭros, ke vi fariĝos mia bofilo.“ Post kelka tempo tondradis tra la Limo pafiloj de edziĝaj festantoj — kaj mi alkondukis la anstaŭigon al la patrino, mi alkondukis Maran. Kiel feliĉa la patrino kiel mi feliĉa! — Ja, filo, tia bofilino ne ekzistas en naŭ vilaĝoj, kia ŝi estis kvieta kaj perfekta, rapida ĉe laboro kaj ĉion komprenema!“ Do kie la patrino ne trovis prilaŭdon, trovis mi. Se mi estus fordoninta tri ŝargojn da oro kaj krom tio la pafilon inkrustitan mi ne trovus pli bonan, pli fidelan edzinon ol Mara. Multaj ĉagreniĝis, ke la rondodancestro ne estis al ili algluiĝinta, sed tamen vi aŭdis nek de virinlango ian ofendantan vorton kontraŭ Mara.

La tempo pasadis al mi kiel rapidrivero, kaj mi ne bedaŭris malfacilan laboron kaj suferon, kiel mi ja bedaŭrus? Mi estis feliĉa, militadis kontraŭ la turkoj, kiel antaŭe, sed mi atakadis pli kuraĝe, defendadis min pli rapidece. Nun mi sciis, kial mi batalas, mi sciis, kion mi defendas. Dum unuaj tagoj estis al Mara malfacile disiĝadi de mi, ŝi mizera timis, ke min ia malbono ne trafos. Kiel ne, mia kara, juna edzino! Ŝi al mi estis inkliniĝinta kiel ĉevalido al sia patrino. Sed de tempo al tempo ŝi alkutimigis sin. Kion vi volas? Ne estis ŝerco. Vi devas kaj ree devas. Kiel jam Dio destinis al iu: ĉu pafilon, ĉu libron. Tia estas la mondo. Apud nia vilaĝo staras supro, de kie oni je duonhoro malproksimen vidas. Ĝis la supro akompanadis min Mara kiam mi ekiradis kontraŭ la turkoj, kaj tie ŝi mizerulino elstaradis rigardante post min, ĝis kien la okuloj atingadis, dum mi survoje plendkantadis, por ke min Mara aŭdu. Sur la supro min Mara ankaŭ atendadis, kiam mi revenadis de l' batalkampo; ŝi deprenadis de mi la valizon kaj longan pafilon, kaj iru gaje al la vilaĝo. Mi ne kuŝiĝis sen oka[1] da vino kaj sen ŝafidripo. La panjo ŝpinadis ĉe la fajrujo, Mara alkroĉigadis blankajn manojn ĉe mia nuko, dum mi komencu rakontadi, kiel estis, kiel ni turkojn Bosnianojn teren fleksadis, kaj kiel de pseŭdoturkoj restis nuraj ĉapoj. „Do Miloŝ“, diradis la edzino, „se mi ne estus certa, ke vi estas kristano same kiel aliaj homoj, se mi ne vidus vin gajan kaj serenan ĉe mi, mi dirus, ke vi estas lupo, ke vi estas vampiro“. „Ne malsaĝumu, trezoro!“, mi rediradis ŝin, „vi ja vidas, ke mi estas kristano, se mi do kelkfoje pli akre enhakas, mi ne estas kulpa, sed tiu besta raso, kiu respektas ne Dion nek Dipatrinon“. Estis ankaŭ da aliaj ŝercoj. Mara gravediĝis. Dio mia, kia plezuro! Sed kion mi rakontas al vi, vi estas ankoraŭ trojuna, senbarba. Dum mi tiame kuŝis en arbetaĵo kvazaŭ serpento, spionante iun turkon, mi fermis la okulojn kaj meditis pri

[1] oka = 1¼ klg., mezuro en Serbujo kaj Turkujo. R. d. t.

Mara, pri hejmo. Kvazaŭ staris ŝi antaŭ mi. Jen kiel ŝi tra la hejmo rapidas, preparas kaj al la panjo faras agrablaĵojn. Post unu jaro estos ankaŭ la baptado, se Dio donos feliĉon. Por la popo mi preparis trijaran prun-brandon kaj por lia edzino novan buŝtukon. Agrable estis al mi meze de la krutaĵo tiel revanta. Pasis somero, pasis vintro, venis ankaŭ printempo, kaj ni ricevis la filon. Se vi estus vidinta lin, ja nigreta infanaĉo, vigleca kaj forta, nu — Kraljeviĉ Marko.[1] Nun la maljuna panjo kvazaŭ freneziĝis. La avinoj en la vilago disputadis, ĉu li similas pli la patron, ĉu la patrinon. Sed mi ridis al la avinoj, mi havis la filon. Tiam ni akre kunkroĉiĝis kun la turkoj. Ni venkis kaj kaptis tutan aron de la furiozaj pseŭdoturkoj. Per dentoj finiĝis, ĉar pseŭdoturko estas pli malbona ol la turko. Ni kaptis ankaŭ la junan Jussufbegon de Poĵega kaj kondukis lin en nian vilaĝon. Pri li sciis la tuta Limlando. Li batalis leone, malavarante eĉ la kapon, sed li ne zorgis pri pastra oro kaj servutula riĉaĵo, lin logadis virinoj. Pro virino li freneziĝus. Nek knabino aŭ virino restis de li sana — ĝusta islama sango de sia patrino. Baldaŭ ke lin la niaj batmortigis. Mi savis lin! Ho stulta mi estis, kia feliĉo, ke li estis pereinta! Sed mi diris al miaj: „Ne estu do malkuraĝuloj! Meze de la ebena kampo buĉu la turkojn, sed dum li havas ne sabron nek pafilon, malkuraĝe estus mortigi lin kiel beston! Atendu! Venos ankaŭ por li la nigra vendredo. Kiam ili hakos niajn militkaptitojn, tiam ni hakos ankaŭ ilin. Sed sen juĝo, sen estro ne konvenas“. La turko estis en la vilaĝo

[1] Filo de l' serba reĝo Vukaŝin. Neniu sudslava heroo estas tiom prikantita, tiom prirakontita kiom li. Lia naskiĝtago ne estas konata, sed certe estas, ke li vivis ĉirkau 1380. j. en sia kastelo Prilip en okcidenta Macedonujo. Kraljeviĉ Marko estis la plej forta heroo sur la mondo, tamen kun plej nobela kaj favora koro —, precipe al la mizeraj klasoj de ĉies popolo. Li mortis la 10. X. 1394. en batalo kontraŭ rumana vojevodo Mirĉet. — Fama kroata skulptisto, Ivan Meŝtroviĉ, plifamiĝis prezentinte Markon Kraljeviĉ en tiel belega skulptaĵo, ke ĝi estis primirata dum la internacia ekspozicio en Roma (1911.) kiel ia miksaĵo de la malnova kaj nova epoko, kiel io granda, impresiga kaj ankoraŭ ne vidita. N. d. t.

kvazaŭ li eĉ ne estas kaptito. Li iradis tra la strato, kune kun ĝendarmo, kantante. Je malbona horo li ekvidis Maran. La turkido ekbolis, kiel oni rakontis al mi. Baldaŭ venis ordono ke ni lin lasu liberan. La sinjoroj interŝanĝis lin per la niaj, militkaptitaj de la paŝao el Poĵega. Foje mi iris je ordono al Ivaniĉ. Reveninte hejmen, oni diris al mi, ke en la vilaĝo estis ia ĉarlatano, malgranda, straba, kaj li kuracis homojn kaj bestojn, vendante ĉiaspecajn pomadojn. Mara diris al mi, ke ŝin subaĉetadis ĉi tiu malgrandegulo per ia pomado, ke li ĉirkaŭiradis la domon kaj demandis pri mi. Pri mi? Kian utilon de mi? Dank' al Dio mi estas ja sana. Mi ne memoras pri li. La trian tagon, oni diras, ke li sian komercaĵon ŝarĝis sur fiĉevalon kaj ekiris al malsupra Limlando. Mi ĝin malzorgis. Ĉu ja ne estas sufiĉe da vagistoj tra la mondo? Mi travintris feliĉe kaj sane. Sed jen kuras la ordono, ke sinjoro banuso Petar Bakaĉ kolektas grandegan armeon kontraŭ turkoj. La vojevodoj kolektis ĉiujn haramiojn, kaj min destinis oni en trupo de Radmiloviĉ. Mi ĝissate estis kisinta la filon kaj edzinon, ne defiksante la okulon de la infano. Alifoje mi kun plezuro ekiradis al la batalo, sed tiun fojon io sufokadis mian koron. Antaŭsento, aŭ io alia. „Miloŝ dia mano vin akompanu kaj revenigu“, eksingultis mia edzino kaj kunmetis la manojn ĉirkaŭ mia nuko.

— Banuso Petar ne estis avinstufulo,[1] ĉar li posedis ferajn dentojn. Ni batu kaj la turko rebatu, ni rebatu kaj la turko forkuru! Petar, la banuso, peladis la friponojn, kaj ili forsaltetis kiel musoj antaŭ kato. Honeste ilin li baptigis, kvieta Limlando, kaj ni kantante hejmen. Mi piediris tage kaj nokte. Ĝis nia vilaĝo estis ankoraŭ du horoj, multe estis da ni, ĉiuj haramioj. Mi rekontis la amikon el alia vilaĝo. „Help' Dio, amiko!“ „Dio helpu“, rediris al mi amiko timeme. „Kio estas, amiĉjo, ke vi malrekte min rigardas? Kiel fartas la gedomanoj?“ „Nenion! ne-

[1] Avinstufulo, kiu stufas avinojn per varmega fero por ke ili donu blankajn monerojn por nigraj tagoj. Al hajduko plej granda ofendo. N. d. t.

nion! malhumoreto. En la domo ĉiuj sanaj!“ „Do dank' al Dio!“, ekgojiĝis mi. Foriris la amiko kun Dio, kaj ni al la vilaĝo. Ni venis ĝis la supro. Mara forestas! Mirinde! Sed atendu, trezoreto, hodiaŭ mi vin antaŭiros. Tiam subite aperis antaŭ ni Ĝorĝe, la filo de nia vilaĝestro. „Per la nomo de Dio, viroj, pli rapide!“ „Kio estas?“. ekkriis ĉiuj. „Rapidegu al la vilaĝo! Turkoj el Poĵega la ĉi matenon invadis; ili forkondukis la brutaron kaj sklavojn!“ Mi frosttremis. „Kio estas, Ĝorĝe, je Dio?“, ekdemandis mi ekstaze. „Ili venis ĉirkaŭ tagmezo kiel fulmo el hela ĉielo ĉiuj sur ĉevaloj. Antaŭ ili Jussuf, kaj kun li tiu malgranda ĉarlatano, jen, tiometa. Certe la turka spiono. Kiom estis da brutaro en la domoj, tiom ili forkondukis. Kaj tiu ĉarlatano kondukis Jussufon al via hejmo, Miloŝ. Ili eniris. Kaj eksonis ĝemado el la hejmo. Ili eltrenis sangantan vian patrinon ĵetinte ŝin teren kiel kadavron, dum la edzinon kaj filon prenis sur ĉevalon kaj kuru al la arbaro. „Salutu la heroon Miloŝ“, ekridis la ĉarlatano, vidinte min ŝtone staranta. Post kelktempo ekbrulis flame via domo. Ili mortigis la popon kaj lian edzinon, detruis la preĝejon. Malbono. Malbono!“ — Sango disverŝiĝis tra miaj okuloj, mi ekblekegis kiel furioza besto kaj kvazaŭ min vento portis, mi ekkuris antaŭen al la vilaĝo ĝis mia domo. Brulruino! Malplena, senhoma! Mi falis teren, sur la ruinojn de mia feliĉo! Mian koron ĉirkaŭplektadis viperoj! „Mara! Mara! Filo! Kie vi estas, kie vi estas? Nenio, nenio! Ve! Ho Dio! Peza estas via mano!“ Mi ne demandis pri la patrino — la najbaroj akceptis ŝin en la domon, pri la turkoj mi demandis — pri la turkoj! Kiam ili venis? Kien ili foriris? En najbara korto staris alligita ĉevalo. Mi sursidis ĝin. Mi transsaltis la barilon kaj kiel freneza al la arbaro. Estis nokto. Super la arbaro la luno. Pelu unu horon, du horojn. Mi konas la turkojn, ili ne galopados la tutan nokton sen malrapidigi. Pelu tri, kvar horojn senripoze, senspire. La sango elŝprucis malsupren la vizago, branĉoj frapadis miajn vangojn. Mia cerbo turniĝadis. Mi kliniĝis al la ĉevalo.

Ĝi estas varmega, ŝaŭmas, ĝiaj kolharoj flirtas, sed ĝi flugas, flugas furie igante kvietan noktaeron ventego. Mi venis ĝis la monta breĉo. Io eklumis antaŭ miaj okuloj. Fajro! Mi haltis. Ke mi vidu. Sube en profundo sidas ĉirkaŭ fajro la turkoj. Trinkas, krias. Inter ili malgranda vireto. Certe la ĉarlatano. Al la arboj alligitaj la ĉevaloj. Kaj malrpoksimete en la ombro? — Jes, jes! Sklavaro. „Mara! Mara! Filo!“, plorkriis mi plenvoĉe, „jen min, jen!“ „Miloŝ mia!“, alkriis Mara. La turkoj saltis. Mi alcelis. Cak! Malviva falis Jussuf. Ili sursidis la ĉevalojn. Cak! pafis mia malgranda pafilo, kaj alia turko falis de la ĉevalo. Mi malprenis la kondukilojn, en la valon, en la valon! „Ha vi, Miloŝ!“, ekkrietis tiu kripla kanajlo. Kaj — lia pafilo ekflamis, kaj mia edzino falis malviva. Mi flugis. En la pafilo ne estas kuglo. Sed ve, la kanajlo ekprenis mian filon ĉe la haroj. Li mortigos lin. Ne. Li levas lin al la ĉevalo. Li forrapidis, kaj la turkoj pro timo post lin. Mi venis ĝis la edzino! Malvarma! Sed la filo estas viva, kvankam ili forportas lin! Pelu! Post ilin. Al mi falis la ĉapo. Al la ĉevalo malaperas la spiro. Mi eltiris la tranĉilon por piketi la ĉevalon en la ripon. Flugu malsupren, supren. Flugante mi ŝargis la pafilon. Jen ilin, nun eliras el arbaro. Ha tio estas la ĉarlatano, kaj tio ĉi mia filo! Jes, jes: nu flugu, ĉevaleto! Proksime ni estas! Proksime. En pafinterspaco. Atendu! Sed ve. La ĉevalo levis sin, falis, elspiris. Ankaŭ mi falis. Ili foriris sen postesigno. Ve, Kristo Dio! Ili mortigis la edzinon, forportis la filon, sole nokte resonas malica rido de tiu satano“. —

Haramio silentiĝis. Kelkduo da grandaj larmoj aperis en liaj okuloj, sur grizaj lipharoj.

„Sufiĉe estas“, almetis li ree, „pri ĉio vi aŭdis. Dio scias, kie estas mia filo, mi post li signon ne trovis. Jen do mi frapiĝas en la vivo kiel akvo je la bordoj. Sed se mi tiun diablon atingus, ekgrincis la haramio, „per la dentoj mi lin disŝirus.“

„Ĉu vi pensas rilate al malgrandeta ĉarlatano?“, kun miro ekdemandis lin Jerko, „eble lin la akvo forportis“.

Ĵus Pavlo venis antaŭ la kastelpordegon.

„Jerko frato!“, aldonis li mezavoĉe, kisinte la junulon, „revenu Zagrebon, gardu Doran kiel vian propran okulon. Adiaŭ!“

„Mi ĝin faros, frato!“, rediris mallaŭte Jerko.

„Ni iru, Miloŝo, en la nomo de Dio!“ La oficiro kaj haramio sursidis la ĉevalojn kaj forgalopis.

Dume Jerko longtempe sidis sur la ŝtono rigardante al tiu flanko, tra kiu Pavlo estas forfluginta.

XV.

Ĉirkaŭ Tri Reĝoj en jaro 1578. regis tre uragana vetero. Frosto, kian la plejaĝaj homoj ne rememoris. Neĝo ĝis la genuoj, kaj la flokoj disŝutadis sin de l' ĉielo kiel el sako. Estis la oka vespere. Tra la stratoj nek ia viva animo, kaj vere, kiu kristano elirus el la hejmo dum tia malbona vetero! La unuasonĝo luladis la geburĝojn de la nobela urbo. Sed la domanoj de majstro Krupiĉ ankoraŭ ne estis kuŝiĝintaj. La majstro sidis kaj briligis sinjoran oran kaskoŝirmilon sidante apud la forno kaj observante per akra okulo la juvelojn ĉe la lucerno, dum apude sidis Dora legante al li la vivon de sanktuloj el granda enkadrigita libro. La knabino estis iomete pala, sed tamen aminda kaj bela. Sur ŝia vizaĝo ne videbliĝis malĝojo,, sed nur sekreta melankolio. Ĵus ŝi estis plenleginta la vivon de sankta Aŭgustino, la zagreba episkopo.

„Sufiĉe, filinjo, lasu sanktan Felicianon por morgaŭ. Jam estas ankaŭ malfrue. Magda enfosiĝis en sia kapkuseno. Frostas, ventegas. Iru, iru!“ La maljunulo observadis la sian trezoron okulangule kun granda prizorgo. Sana ŝi estas, jes. Sed kien ŝia gajeca humoro? Ĝi malaperis post kiam la junulino trasuferis grandegajn tiujn turmentojn. La junulino fermis la libron, leviĝis metinte ĝin sur la breton.

„Jes, kara patro, prave vi diras“, aldonis ŝi; „min sonĝo ekregas. Mi sentas min iom malforta. Verŝajne pro la malbona vetero. Feliĉan nokton,

patro kara!“, kaj ŝi kisis la maljunulon sur la mano dum li la knabinon sur la frunto.

„Feliĉan nokton, kara infano!“

Kaj Dora foriris al sia kamero.

Post kelka tempo ekfrapis iu per frapilo trifoje sur la pordego de l' oraĵisto. La majstro ekmiris. Kiu povas esti en la malfrua noktotempo? Li elmetis la kapon tra la fenestro kaj ekdemandis: kiu dia estas?

„Hejma!“, rediris lin basa voĉo.

Rapide malfermis la oraĵisto la pordegon, kaj la magazenon eniris alta, malafabla viro. La haroj kaj longaj lipharoj estis surŝutitaj per prujno, kaj li forskuinte neĝon, de la ŝafpelto, ĵetis ĝin sur la benkon.

„Ho, ĉu vi, amiko Ivan! Helpu Dio!“, salutis lin la oraĵisto prezentinte la manon al li. „De kie vi?“

„Laŭdata Dio kaj bonan vesperon, kara majstro“, rediris la malafablulo, „mi rekte el Poĵun. Preterirante vin mi ekvidis la lumon, do mi devis eniri ĉi tien, por ke mi iom forbabilu. Nek edzino nek infanoj min atendas.“

„Fraŭlo, mi scias!“, respondis la oraĵisto.

„Do jes! Brr! Malbona vetero. Ĝis la koro mi malvarmiĝis.“

„El Poĵun do. Kiel do tie por ni?“

„La proceson kontraŭ Gregorianec relevos ni.“

„He vi relevu! Sed mi opinias, ke de tiu faruno ne fariĝos kuko“, aldonis la oraĵisto balancante la kapon.

„Nekredema vi Tomo!“

„Mi diris, ne retiros!“

„Ke ni vidu! Tiam — ni havas banuson.“

„Ha jes! Kiun do?“

„Baronon Ungnad, oni diras.“

„Mirinde, lin. Kiel?“

„Por ke la infano havu nomon.“

„Nu, kia li estas? Kion oni diras pri li?“

„Ja tia —“, levetis la alveninto siajn ŝultrojn. „Ĝis nun li estis generalo en Eger. Oni parolas, ke la ĉefduko favoras lin.“

„Ĉu favoras?“

„Oni parolas. Cetere li ne estas pura hejmido. Stiriano, io tia.“

„Mi scias. Mi memeras pri maljuna Ungnad kun granda barbo. Ivan aŭ kiel oni lin nomis. Samobor'ano, ĉu ne?“

„Li estis el Samobor. La patraĵo senrevene foriris. Li ĉion garantie pruntis. Sed nun li certe ĝin resavos, kiam estas banuso.“

„Kaj kia li estos al ni?“

„Oni laŭdas lin, ke estas dècidema. Sed multon vi ne esperu. Intrigulo, ĉe intrigulo. Tiaj ne estas favoremaj al la burĝoj, kaj Stjepko de Medvedgrad ke fariĝos vicbanuso.“

„Mi gratulas! Jen bela kanto por ni! Gardu nin sankta Blaĵ!“

„Oni devas kunigi la fortojn, por ke la sinjoroj ne atingu niajn ĉapojn, ĉar alie malbono al la nobela urbo.“

„Jes, certe. Ili ĉirkaŭtranĉas niajn urbajn privilegiojn kiel oran cekinon. Mi timas. Precipe Stjepko“, — finis pli vigle la oraĵisto. —

— „Vi ne timu, majstro“, rediris la malafablulo. „Probable min vi konas. Kion Ivan Jakopoviĉ ekpensas, tion li devas realigi. Jam de longe pripensas mi pri tiu afero. Jam kiam la formortinta Ambroz estis veninta en nia najbaraĵo, mi saĝumis, ĉu tio estas forigebla. Mi diris al la urbaj sinjoroj kiel oni devas. Ili do aprobe ekceptis la mian proponon. Jes, je unua momento viva flamo. Sed poste eniris en iliajn korojn malbenita envio, kaj ili rajtigis Kaptoloviĉon, ke li la tutan aferon kontraŭ Gregorianec administru. Li do enfosis sin en formulojn kaj sentencojn, dum puran prudenton — post la fornon. Kaj ili elpelis vulpon. Kompreneble nun estas centoble pli malbone. Stjepko fariĝos vicbanuso, kaj li nin malamegas pro — — nu pro via filino. Dume Ungnad kompromisos al la magnatoj en malgrandaĵoj, por ke ili cedu en grandaĵoj. La moŝtoj ĉefdukoj konvikiĝis, ke la spito de la sinjoroj estas nefleksebla, tial ili sendis ilin

la banuson, sed ĉi tiu ne volas alie agi ol laŭ volo de princoj Ernest kaj Karlo. Mi aŭdis pri tio en Poĵun.“

„Nu“, aldonis Krupiĉ, „tio estas malnova guzlo. Kiam vi estas dirinta al mi, ke venos banuso, mi ekgojiĝis, ke estos eble pli bone, sed post kiam vi diris al mi, kiel estas, mi vidas, ke ĉio restos kiel antaŭe. Mi petas vin, kara sinjoro Ivan, mi volonte rigardas ĉiun entreprenon profunden, ĝis ĝia koro, ĉu ĝi estas pura kaj klara. Estas vero, ke kelkaj niaj magnatoj malfavoras nin, tial ke ni ne volas fariĝi servutuloj, ĉar ni volas resti niaj sur niaĵo. Tamen estas diabla afero, serĉi helpon ĉe fremdaj generaloj; almenaŭ mi ne iras volonte en tiun rondon, kiom ajn parolados kelkaj urbaj sinjoroj“.

„Vere, vere“, intermitis Jakopoviĉ lian parolon, „prave vi diras, kara majstro. Sed kiam oni havas antaŭ okulojn pravecon, oni devas iri sur propra vojo.“

„Kiel do?“

„Tiel. Kiam mi defendas min kontraŭ iu, de kiu mi baraktas, mi serĉos helpon de la tria, dum estas ĝuste kaj oportune, sed neniam mi fariĝos haktenilo de la tria. Se mi liberigas min, mi esprimas al li dankon por helpo kaj adiaŭ. Nur ĝis tiam mi kontraŭstaros al la volo de la sinjoroj, ĝis kiam ili ofendados niajn privilegiojn, la oran bullon. Sed sub stirian potencon? Neniam. Ni estas kroatoj.“

„Tiel estas farota. Tion ankaŭ mi diras.“

„Kaj je Dio kaj animo, tiel mi faros. Eĉ hareton ne cedi al la sinjoroj, sed ankaŭ eĉ hareton ne cedi de nia rajto. Vi estas prudenta, saĝa homo, pli saĝa ol multaj niaj sagaculoj. Vin rigardas la burĝoj, vin obeas. Kune ni estas agontaj, mi plume, vi lange. Kaj se Dio donos, fariĝos tiu ĉi nobela urbo, kio ĝi estis kaj kio ĝi devas esti. Sed vi devas min subtenadi, ĉar se nin oni submetos sub volo de l' sinjoroj, tiam ve al ni ĉiuj, sed pleje ve al vi, kaj al via mizera filino. Stjepko ĵuris, ke li devas venĝi al vi, ĉar vi estas foriginta la filon de lia koro.“

„Sinjoro Ivan!“, rediris bonanime Krupiĉ, „Dio

greba klaĉo. Mia filino estas pura, ĝin Dio scias. Ŝi kvietigadis sian koron. Kio do? La amo eniĝis ŝian koron, ĝi ŝin sufokas, sufokas, kaj la mizerulino velkas antaŭ miaj okuloj. Kaj juna Gregorianec estas honestulo, pura kiel la suno. Mi konas la mondon, ankaŭ lin mi konas. Vidu vi, li foriris al la milito, por ke ne estu reaj riproĉo kaj kolero de lia patro. Memkompreneble mi demandis min multfoje, kio fariĝos de tio? Mi demandis min, sed respondon ne trovis. Ke ŝi edziniĝu kun juna aristokrato? Malfacile, apenaŭ kredeble. Ĝi estas kontraŭ moro! Ĉu mi do povas lin forpeladi de l' domo, kiam li estas honesta, kiam li du foje savis ŝian vivon — kontraŭ lia propra patro? Dio tiel donis, ĉio estas en diaj manoj. Mi ne estas kulpa, mi estas honesta zagrebano."

„Dio vin vidu! Kiu vin kalumnias pri tio, majstro, kiu diras al vi, ke vi estas kulpa? Tiel okazis. Mi nur vin de malproksime avertis, por ke memoru vi, ke ni zagrebanoj havos diablan embarason kaj ke la prudento estu atentota, ke oni devas agi singarde antaŭ ol nin la malbono ne trafos; ĉar laŭ ĉio mi dirus, baldaŭ fulmo frapos, kaj ve, se ĝi nin trafos! Tial estu apud mi, agu kun mi, ke ni tiam vidu, ĉu ni estas indaj defendi kiel liberaj burĝoj niajn liberojn, aŭ ĉu ni estas naskitaj por fariĝi servutuloj. Sed estas malfrue, atendu min morgaŭ, tiam ni pluen priparolos. Vi mia, mi via, kaj feliĉan nokton!"

„Vi mia, mi via, kaj ĉion por nia urbo. Bonan nokton!"

Ivan Jakopoviĉ, ido de malnova zagreba familio, estis speciala homo en ĉiu rilato. Kvankam li ne estis nobelo, li estis fiera je sia burĝeco. Burĝa braveco, fervoreco, malmola nefaligebla honesteco ornamis ĉi tiun eksterordinaran viron; ankoraŭ pli — Jakopoviĉ, de la naturo tre sagaca, estis „literatoro" t. e. instruitulo, ne nur kiaj estis patricioj de liberaj urboj, sed efektive lertulo en juro kaj aliaj sciencoj, kiome ili tiutempe ekzistis. Li do kunigis

scias, ke mi estas senkulpa. Min doloregas, ke tiel okazis. Mi preferus, ke mia filino aledziniĝis en burĝa domo, fariĝinte edzino, patrino, ĉar al ĉiu viva en Zagreb estas konata, ke mi ne paradas. Sed sinjoro Ivan, la homa koro ne estas kvietigebla kiel timema ĉevalo, mi do ne volas mian infanon turmenti. Ŝi mizerulino krom tio sufiĉe trasuferis. Bonmaniere mi parolis al ŝi, kaj ŝi estis kiel eble plej antaŭgarda, por ke ne fariĝu rea krio, kia estis antaŭe. Vi scias plej bone, sinjoro Ivan, kia estas zala tutan sian scipovon, por glorigi sian naskiĝurbon, por defendi ĝiajn privilegiojn, kaj la nobelan urbon disfamigi. En tio helpadis lin lia malmola, nefaligebla volo, eksterordinara elokventeco, kaj senindulga trobraveco. Li havis nek infanojn nek edzinon, kaj tamen estis rigardata kiel riĉulo. Li estis en vira aĝo kaj sanega, sendifekta kaj senpasia. La tuta lia riĉaĵo, tuta sciado, tuta sano estis al li nur ilo, por atingi unu celon — la feliĉon de sia patrujo. La samburĝoj rigardis lin kiel ian vivan miraklon, kiun ne ekloĝadis la butikista genio de la iamaj burĝoj.

La magistratanoj kompreneble ne estis al li kore amikemaj, ĉar ili tre sciis, ke Jakopoviĉ rigardas iliajn fingrojn, kio estis tre enua afero. Sed vidinte, ke la popolo inklinas lin, ke li estas en korporacioj rigardata kvazaŭ „dio", kaj ke ne estas pli bona defendanto al la urbo ol Jakopoviĉ, ili riverencis lin, kiam alie ne estis. Sed la magnatoj mem forgesis antaŭ Jakopoviĉ sian perforteman karakteron, respektante lin kompara al si, ĉar li sciis diri la veron en iliajn sinjorajn lipharojn senkomplimente, senfigure. Ili tre sciis, ke Jakopoviĉon ne kvietigos nek dolĉa sinjora vorto, nek ekstaziga rido, nek abunda festeno; sciis ili, ke tiu ĉi viro klopodas nur akran prudentecon, honestecon. Tial ili malamegis lin kiel vivan antikriston, tial ili respektis lin kiel nekurbigeblan honestulon.

Jakopoviĉ sufiĉe trairis la mondon, li estis multan fojon en Poĵun, Praha kaj Wien. Li konatiĝis kun reĝaj korteganoj, kun la kortego mem, li

sciis eĉ pri tio, kiel aliaj burĝoj defendas sian rajton.

Vidinte li la ĝeneralan tumulton kaj ekscitecon de la nobelaro, sciante, ke dum ekstera danĝero ne povas daŭri la interna malpaco, li foriris Poĵunon por vidi, kio estas. Kaj rapide li informis sin, ke rapida Draŝkoviĉ penas pacigi la ĉefdukojn kun kroata nobelaro, sed li bone sciis, ke tio por Zagreb bona ne estos.

„Nun estas la fortoj kunigotaj", diris Jakopoviĉ, decidinte malkaŝe defendi la liberojn de sia urbo kontraŭ ĝenerala atako.

XVI.

La kroatoj ricevis banuson. La ĉefduko Ernest malfacile estas decidiĝinta por redoni al la reĝolando malnovan ĉi tiun honoron, pensante, ke jam venis la tempo, ke la landon ekregu generalo, ĵuronta nur al la reĝo sed ne ankaŭ al la popolo. Sed kiel ajn la turka superforto ekbruligis jam la ungojn de la s t a t u s, tamen ili ne forgesis sian malnovan rajton. Saĝa do kortegano Draŝkoviĉ decidigis sian estron, ke li donu al Kroatujo laŭ antikva moro ĉefon, aldoninte: „Ke oni povas banusigi fidelulon, obeemulon, plenumonta nur la volon de lia princa moŝto." Je unu fojo kuris la famo tra la reĝolando, ke fariĝis banuso de la reĝolandoj Dalmatujo, Kroatujo kaj Slavonujo lia barona moŝto Krsto Ungnad de Sonnek kaj Celje, generalo kaj ĉambelano de lia imperiestra kaj reĝa moŝto. Al tio la popolo tre miris. Pri Ungnad oni malmulte aŭdis, pri li ĝuste neniu pensis, en Kroatujo ja eĉ oni ne sciis, kia estas ĉi tiu viro. Devene li estis Stiriano, homo de fremda sango, oni do ne estis timota, ke lia koro ekflamos por antikva kroata rajto. Sed Ungnadoj posedis bienojn ankaŭ sur ĉi tiu flanko de Sutla jam de nememorebla tempo, ili estis eĉ „enartikulitaj". Kroatoj do ne povis diri, ke al ili oni trudas je forma vidpunkto fremdulon kiel banuso. Plie estis Bakaĉoj grandaj amikoj de Ungnadoj. Krsto mem estis nur militisto — generalo. La pli grandan parton

de sia vivo pasigis li ekster Kroatujo sur ĉevalo aŭ sub tendo. Zorgante nur pri militista disciplino kaj obeo, malmulte sciis li pri liberoj kaj privilegioj de la reĝolando, sed nur pri volo de lia princa moŝto, kaj alian leĝon oni ne bezonis. Li estis ankaŭ vidvo, liaj filinoj vivis en Karniolujo ĉe la parencaro, dum li laŭ komando vagadis tra la mondo, atakadis kaj malatakadis, trinkis kaj ĵetis la kubojn. En jaro 1578. estis komandestro de la imperiestra garnizono en Eger. Tie li sidis kaj senokupiĝis kaptante fiŝojn kaj pafante skolopojn. Mire kroatoj rigardis, ekaŭdinte, kian banuson al ili oni destinas, pli mire rigardis Ungnad mem; eĉ en la soñĝo li ne estis esperinta tian honoron. Li do forlasis la ĵetkubojn kaj vinon, skolopojn kaj fiŝojn, kaj al Kroatujo gaja ekiris. Dume Kroatoj diris: dank' al Dio, ne pridemandante kia li sed nur ke li estas banuso.

En la tago de sankta Agata, la virgulino kaj martirino, tio estas la kvinan tagon de la monato Februaro 1578. estis definita ĉefkunveno de la sinjoroj kaj nobelaro de la tuta reĝolando, por ke estu instalata laŭ atikva, solena moro la nova „longe deziregata" banuso. En Zagreb estas jam venintaj la imperiestraj komisarioj: la ĉefepiskopo Ĝuro Draŝkoviĉ kaj lia sinjoro moŝto Kristoforo Kinigsberg. La magnatoj kaj malalta nobelaro are kolektiĝadis. La deputatoj de ĵupoj (komitatoj) kaj urboj alrapidis sub siaj standardoj, dum la banusa kavalerio etendis sian tendaron sur la Tridenkonplaco (limimpostejo) aŭ „Harmica". Nova episkopo Ivan Moslavaĉki regaladis la nobelaron tagon post tago. La sagaca Draŝkoviĉ estis serena kaj gaja, argumentante al la plej obstinaj magnatoj, ke nun estas ĉio bela kaj bona, kaj ke la privilegioj de l' nobelaro staras sur pli firma fundamento, ol la preĝejo de sankta Stefano. La nova sinjoro banuso ke ankaŭ estas kroata magnato, kiu scios defendi la rajtojn de la patrujo, dum aliajn altrangulojn ke la parlamento laŭvole elektu, ĉar de iliaj princaj moŝtoj Ernest kaj Karlo estas firma volo, ke al la k l a s o j

oni entute konservu ilia rajto. Oni trinkis, manĝis, kantis; ĉio estis serena, gaja, ĉie oni aŭdis: „V i v a t b a n u s!“ Kvankam estis kreviga frosto, ke eĉ glacikandeloj pendis sur zagrebaj tegmentoj, ŝvitis la urba juĝisto, dikventra Ivan Teletiĉ kvazaŭ dum rikolto. La reĝa urbo Zagreb devis doni „laŭ privilegio“ de ora bullo al ĉiu nova banuso, rostitan bovon kaj sufiĉe da pano. Tial la zorgema juĝisto aĉetis de Mato Verniĉ kornhavan koloson je sep hungaraj florenoj kaj sesdek du denaroj, mendante ĉe majstro Niĉjo Tihodiĉ da pano je sepdek ok denaroj. La urba standardo estas rebonigota, la sceptro de l' urba juĝisto rekolorigota, plie la urbaj ŝlosiloj origotaj, kiujn oni al la banuso prezentos, la urbaj pafilegoj rebonigotaj, kaj nova forno en urba domo, kie la banuso estos loĝonta, starigota. Sekve — estis da okupado en ĉiuj flankoj, kaj ĉio, ĉio ĉi falis sur la mizeran juĝiston. „Estos ankoraŭ pli da tiaspecaĵoj“, diris la juĝisto, „ la banuso eĉ favan denaron ne havas. dum lia armeo malsatas kaj soifas. Oni devas liverigi la nutraĵon, la ora bullo tiel ja diras, tiam do estas preferinde malavari al nova banuso, ĉar li povas esti gravega helpo al la urbo“. Sinjoro juĝisto de la nura zorgo nek manĝis nek trinkis. Sed la urba notaro Niĉjo Kaptoloviĉ ŝvitis ankaŭ senkompate. Li enigis sin en sian ĉambreton, ŝlosinte post si la pordon, por elĉarpenti latinan o r a c i o n per kiu li salutos la sinjoron banuson. Kvar plenajn paĝojn li estis jam ete skribinta, kaj finita nur la kapo de l' oracio, kaj la retorika vosto? Hu! Jam du plumojn li estas tramordinta, kaj sankta Spirito ne venas! Fine sinjoro kapelano Ŝalkoviĉ alflikis al ĝi la voston. Sed ne nur li konsumadis la inkon por gloro de Sonneka barono. Lia pastra moŝto kanoniko Ĝuro Wyrffel glorigis nekonatajn verkojn de sinjoro Ungnad per laŭdkanto de naŭdek safikaj strofoj.

Kompreneble ke en nobela urbo estis da ĉiaspeca parolo.

La bakistino Tihodiĉ rakontis al Magda, kiu denove trankvile sidis en sia budo, ke sia kara Niĉjo fakte

knedas la panon por la instalo. Ŝi aŭdis eĉ pri tio, ke la banuso eniros la urbon sur araba blankĉevalo, kies kolharoj estos per pura oro plektitaj.

Sinjorino Frey estis pleje okupata. Ŝi traflugadis la stratojn kiel senkapa muŝo, ĉi tie klaĉis, tie babilis, do de ĉie plena sako da novaĵoj.

„Ho kara aminjo!“, ekklakis ŝi invadinte frumatene la magazenon de Ŝafraniĉeva, „bonan matenon kaj bonan sanon! Se vi vidus la paradon, kiu estos al nova banuso! La bovon oni jam aĉetis, dum la pano estas jam bakata. Por pafilegoj ili bezonas dek funtojn da pulvo, ĝi estos komedio! Je Dio mi timas. Kiam tiel pafas la granda pafilo, mia koro kiel tintilo klakas. Plie oni diras, ke la nova banuso havas mantelon de delikata silko, kaj sur ĝi puraj steloj.“

„Ĉu vere!“, ekmiris ebrieta Ŝafraniĉeva.

„Jes, diablon!“, ekkrietis malgranda Ŝafraniĉ enirinte la butikon, „pri kia silko vi sonĝas! Ĉapon de ursa felo, mi diras al vi.“

„Sed ĝin diris al mi mia maljuna“, rediris Freyeva, „li en la loĝejo de l' banuso, en urba domo fiksis en pordojn novajn najlojn. Li diris ankaŭ al mi, ke nova banuso estas nigra, alta viro, kaj ke li tre volonte manĝas rostitajn fiŝojn.“

„Ha jes!“, forskuis la malgranda butikisto, „ursan felon, mi diras ree al vi. Kiel alta, kiel nigra? Malgranda, blonda li estas. Ni urbaj sinjoroj scias pli bone pri tio.“

„Sed aŭdu, Andrija!“, ekmurmuris la butikistino. „Aminjo Freyeva devas pli bone scii pri tio. Ŝia maljunulo aŭdis pri ĉio ĉi, fiksante la najlojn. Ne parolu al mi malsaĝe.“

„Nu jes, edzinjo! Sinjorino Frey prave parolas. Alta, nigra kun oraj steloj!“, obeis la butikisto sian trofidelan kamaradinon.

„Domaĝo, eterna domaĝo“, ekklakis ree la najlistino, „ke Grga Ĉokolin el la urbo malaperis, li scius ĉion precizege rakonti. Li estis kapeto, ĉu ne?“

„Jes, jes!“, jesis la butikistino, „saĝa kapeto. Kien li do malaperis?“

„Gardu nin Dio de la malbono. Sed de tiu tempo, post kiam li foriris al Medvedgrad, viva animo lin ne vidis“, grave intermetis la najlistino. „Tion sciu sankta Dio mem. Ĝi ne estas pura afero, ne. Oni diras, ke li sur nigra kaproviro al Klek forrajdis. Gardu nin sankta kruco“, krucosignis sin la avino.

„Domaĝe, li estis bonulo. Ĉu ne, kara Andrija?“

„Jes, bonulo!“, rediris la butikisto.

„Nur kelkan fojon li troe trinketis da vino“, diris la najlistino.

„Ho ankaŭ da brando, ankaŭ da brando!“, almetis la najlistino.

„Jes, da brando!“, jesis la butikisto.

„Ankoraŭ nun ŝuldas li al mi du denarojn, tiu drinkulo!“

„Grga dum nokto ankaŭ ĵetkubis kun muskeduloj“, aldonis la najlistino.

„Sed de kie la mono al li?“, intermetis la butikisto.

„Prave vi diras, amiko Andrija!“, fervoriĝis la najlistino, „de kie la mono al li? Sed ke mi diru vin. Li faris oron, kaj la diablo — helpu al mi sankta Blaĵ — kaj la diablo helpis al li. Li estis nigra studento, tio ĝi estas.“

„Ĉu vere!“, ekmiris la butikistino.

„Li ke faris oron!“, ekmurmuris majstro Andrija karesante sian ventron. „Moŝto magistrato lasis rompi la pordon de lia butiko. Kaj kion oni trovis? Kion? Tri rustitajn razilojn, du potojn da leporgraso, kaj malnovan pelton. Kaj da oro jen nek tiom!“

„Sed, Andrija, vi stulta kapo“, ekkoleriĝis Ŝafraniĉeva, „aŭdu, ke aminjo Frey diras, ke li estis nigra studento!“

„Nu jes, jes edzinjo! Nigra studento!“

„Ankaŭ fripono kaj trompisto li estis. P u n c t u m“, finis la najlistino. „Sed, mi petas iom da brandeto. Ha, ĝi varmas. Dankon. Frostas, la nazo povus defali. Adiaŭ aminjo, adiaŭ amiko. Jen, vidu“, sin turnis ŝi en la pordo, „Grga estis fripono. Mal-

feliĉan Doran, kiel li ofendis ŝin, honestan knabinon. Kaj la juna sinjorido Gregorianec — bela viro, ĉu ne? Forlasi la knabinon tiel, kiel malplenan glason. Ĉi tiuj viroj, ĉi tiuj viroj — viva peko — dum ni mizeraj malfeliĉulinoj.“

„Jes, la viroj estas viva peko“, kapjesis Ŝafraniĉeva.

„Viva peko!“, eksonis Ŝafraniĉ malfacile ekspirante. Dume la najlistino forrapidis tra la neĝo por elspioni novajn novaĵojn tra la urbo.

En la strato ŝi renkontis sin kun la longulo Ĝuka Garuc, kiu staris kaj senkompate batis grandan tamburon en la rondo de estimataj metiistoj kaj vigla junularo. Freyeva haltis kaj aŭdis, kiel Garuc en la nomo de moŝto magistrato al ĉiu kaj ĉiujn sciigas, kiel morgaŭ estos solena instalo de lia moŝto sinjoro banuso, kaj ke estas treege malpermesite en tiu tago ĵetadi balaaĵon kaj verŝadi lesivaĵon sur la straton, kiel estis kutimo en nobela urbo, ĉar tiamaniere tre facile oni povus multekostajn vestojn de la sinjoroj magnatoj difektigi kaj malbonigi.

Aperis ankaŭ la kvina tago de la monato Februaro en jaro 1578. Tra zagrebaj stratoj svarmis multega popolo ĉu de alta ĉu de malalta gento. La pafilegoj tondradis, la sonoriloj sonoradis. La neĝon la popolo ne atentis. La ĉetegmentaĵo de ĉiu domo estis tro ornamita per la popolo. La pafilegoj tondradis, la sonoriloj sonoradis. La banuso venas, venas la banuso! Ĉe Kamenita vrata staris la urbaj sinjoroj: la dika Teletiĉ, tenante la origitajn ŝlosilojn, Andrija Šafraniĉ a s s e s o r o, tenante la standardon kun tri turoj, korporacioj, kaj antaŭ ili korporaciaj majstroj, vestitaj en manteloj kaj tenante bastonon kun ora pomo. Inter ili promenis tien reen so Niĉjo Kaptoloviĉ, zonita per mallonga sabreto, tusetante kaj mallaŭte ripetante sian faman p e r o r a c i o n. En tiu rondo staris ankaŭ malproksimete la estro de forĝista korporacio Blaĵ Štakor, kaj apude meditema Ivan Jakoboviĉ, la deputato de urbo Zagreb.

„Sinjoro Ivan!“, ekŝovis la seruristo per la kubuto la literatoron. „Vidu, kiel oni krias kaj aklamas. Ĉiuj estas gajaj, kiel je Kristnasko. Mi ne bone vidas en tiu malhela akvo. Je Dio, vi estas saĝa kapo, diru al mi sincere, ĉu ĉi tiu tago estas la ŝlosilo al nia feliĉo?“

„Hm!“, rediris Jakopoviĉ, „kiu scias, kio estos morgaŭ. Ni iru por vidi. Ĉiaokaze estas bezona prudento kaj konkordo.“

„Jes, jes! Mi diras, la animon en sin, sinjoro Ivan! Ke ni vidu. Pli bone estas, se oni ĉe la fino ridas“, aldonis serioze Ŝtakor.

„La banuso, venas, iras la banuso!“, resonadis tra la popolamaso. Trompetoj trompetis, tamburetoj sonegis. V i v a t b a n u s! kriadis la popolo. Kaj la procesio proksimiĝis al Kamenita vrata. Antaŭe sinjoro protonotaro Mirko Peteo sur flama nigra ĉevalo, tenante ruĝan silkan standardon, kaj sur ĝi blazonoj de l' regno: Dalmatujo, Kroatujo kaj Slavonujo. Post li rajdis cento da banusaj kavalerianoj en bluetaj manteloj. Post ili vicigis sin la deputatoj de ĵupoj (komitatoj) kaj urboj sub siaj standardoj ĉiuj ĉevale. Poste venis deko da imperiestraj trumpetistoj kaj dek tamburistoj sub plumĉapeloj ĉevale, post la muziko alta vitra veturilo kun imperiestraj komisarioj, kaj post ili — la nova banuso. Flama blank-ĉevalo kun nigra stelo sur la frunto lin portis. La kolharoj de l' ĉevalo estis longaj, interplektitaj per oraj fraĝoj. La surbrusto de l' ĉevalo estis el ovala jaspisŝtono, kaj en ĝi engravuritaj arabaj literoj. La ĉevalo estis per linfelo kovrita. Vigle balancadis la kapon la blanka ĉevalo, petole ludadis ĝiaj maldikaj piedoj sur la ŝtono. La banuso mem estis viro malgrandeta, korpulenta. Lia vizaĝo ronda, sed plena da sulkoj, oni dirus: inerta. Flava barbo malleviĝis ĝis la brusto, dum super la senesprimaj, grizaj okuloj eliĝadis densaj blondaj brovoj. Heroan aspekton kaj tenadon li ne posedis. Li inerte faligis sin en sia alta, pinta selo, kvazaŭ lin la tuta parado enuas, nur kelktempe li elreviĝis kaj opstinece levis la kapon, kiel kutime faras altranguloj kun malalta

saĝo. Lia vesto ne estis kroata. Sur la kapo sidis ronda brilanta kasko kun ora ŝirmilo, dum super la kasko flugpendis blanka kaj ruĝa plumo. Sur lia brusto brilegis fera kiraso kun oraj kojnoj, dum la kirason frapetadis medalo kun portreto de la imperiestro Rudolfo II. La glavo kaj zono estis enkadrigitaj en delikata arĝento, dum malsupren lia dorso malleviĝis ursa felo. Strange aspektis tiu ĉi ruĝeta malgrandeta kirasulo inter la brilanta aro da riĉaj magnatoj, ĉevale akompanantaj la banuson. Keglevičoj, Bakačoj, Draŝkoviĉoj, Maleniĉoj, Gregorianecoj kaj aliaj sanegaj kaj malafablaj herooj kroataj, ŝutitaj per oro kaj juveloj, almilitis la rigardojn de l' scivolema popolaĉo.

Antaŭ Kamenita vrata la banuso haltis. La pafilegoj ektondris. La juĝisto prezentis al li la orajn ŝlosilojn, en la rondon antaŭ la banuson ekpaŝis, tremante kaj pala, longulo Niĉjo Kaptoloviĉ. Du foje ektusis, tri foje riverencis kaj per la lango kaptis la faman Ciceronon:

„M a g n i f i c e, e g r e g i e, s p e c t a b i l i s d o m i n e banuso! Kiam foje en antikva tempo fama heroo Herkuleso staris sur vojkruciĝo, du vojoj estis antaŭ li; unu facila kuranta al abundaj, fruktodonaj kampoj, kaj la alia kruta, ŝutita per dornoj kuranta al alta supro —“

Ungnad komencis malkviete palpebrumi.

— „al alta supro“, daŭrigis Kaptoloviĉ iom konfuzita. „Tiu abunda kampo estis la vojo de lukso, dum tiu kruta supro la vojeto de virteco. Mi do demandas, g l o r i o s e p r o r e x n o s t e r,[1] kiu estis tiu Herkuleso? Ĉu ĝi estas pridemandota, kiam mi rigardas vian altkreskan korpon, vian malluman heroan okulon? Ĉu ĝi estas pridemandota, ĉu Herkuleso ekiris la krutan vojon de virteco, kiam ni jen per niaj propraj okuloj rigardis, kiel via moŝto bonvolis surgrimpi ĉi tiun nian malnovan Griĉmonteton?“

Ungnad ne estis tro inklina al latinaĵo, sed li

[1] Ho glora nia vicreĝo.

tamen tiom komprenis, ke li laŭ figura peroracio fariĝis de malalta alta viro, ke li ricevis anstataŭ grizajn je unu fojo nigrajn okulojn. Por povi pluen daŭrigi sur kruta vojeto de zagreba virteco, li mallonge abruptis:

„Bene! Bene!“, ekpikis la ĉevalon kaj ekrapidis antaŭen kun la nobelularo. Kompatinda Kaptoloviĉ staris kun malfernita buŝo, ĝis kiam lin la kunpuŝiĝo ne kuntrenis kun si al la supra urbo.

Antaŭ delegitoj de zagreba kapitolo, antaŭ la tuta komunumo da sinjoroj kaj nobelularo kroata metis barono Krsto Ungnad la dekstran sur sanktan Evangelion, ĵurante al la popolo, ke li defendos la privilegiojn de la regno. Tri foje oni levis lin supren, kriante: „Vivat banus!“ — kaj Kroatujo havis sian banuson. Ungnand komence en miro rigardis, kion oni faras ĉi tie, ĉar li dum vivo neniam similan estis vidinta. Sed kiam la famaj status et ordines komencis elekti la funkciulojn, unue kiel vicbanuso Stjepko Gregorianec, poste la ceterajn, kiam en longaj latinaj oracioj komenciĝis diskuto, kiamaniere plibonigi la feliĉon de l' kompatinda patrujo, komencis Krsto oscedi, dirinte al sia oficiro, Melkior Tompa de Horŝova:

„Mi estas malsata. Morgaŭ pluen, por hodiaŭ sufiĉas!“

Gaje aklamis la nobelularo, disiĝante al siaj kasteloj.

„Ni venkis!“, de ĉie estis aŭdebla, „Gregorianec estas vicbanuso.“

Bonhumore, laŭtvoĉe festenis la popolo ĉirkaŭ rostita bovo sur „Harmica“; pli gaje festenis la sinjoroj tra la kasteloj. Ĉe sinjoro preposto Nikola Želniĉki estis hodiaŭ eksterordinara festeno. Fronte la tablo sidis la nova vicbanuso — malafabla Stjepko Gregorianec en riĉa vesto de ruĝa veluro, ĉe lia zono larĝa sabro. Hodiaŭ estis li eksterordinare bonhumora, liaj mallumaj okuloj flamis, ĉiu vejneto al li ludis. Apude sidis la trezoristo Mihajlo Konjski, la juĝisto Blaĵ Pogledić, kanonikoj Šiprak kaj Vra-

mec kaj aliaj nobelaj sinjoroj. Sed je miro ĉe tiu ĉi tablo sidis ankaŭ la urba juĝisto Teletić, notaro Kaptoloviĉ kaj literatoro Mato Vernić. La sagaca Niko Želniĉki volis kunigi burĝojn kaj magnatojn, por ke ili eble jam unu fojon interpaciĝu.

Sur grandega tablo vaporumis rostita ŝafido. El altaj vitraj kruĉoj briletis la oro de kroata vinberbranĉo. La lingvoj kuris al la sinjoroj senĝene, oni tostis, kantis, ŝercis kaj eĉ sufiĉe maldelikate. Sole Stjepko parolis malmulte, kaj trinkis multe. Je unu fojo saltis Gregorianec:

„Vere, ĝuste bela ŝafido, akvo venas al mi sur la dentojn, observante ĝin. Tiel same estis al kelkaj kaj kelkaj, kiam ili observadis mian Medvedgrad, sed nun estas al tiu ĉi litanio amen.“

„Je Dio, magnifice!“, komencis lin kvietigi la dommastro, rigardante la burĝojn.

„Bene, bene reverendissime!“ rediris la vicbanuso, „mi estos trankvila. Sed mia honorinda amiko, jen, ni estas multaj, dum la ŝafido estas malgranda, kaj mi estas diable malsata, mi ja la tutan Zagrebon formanĝegus. Kial vi pli prefere ne rostigis tutan bovidon, estas ja sufiĉe da ili en Zagreb, ĉu ne sinjoro juĝisto Teletić?“

„Dank' al Dio ke ne ekzistas lupoj en nia libera urbo!“, rediris ĉagrene la urba juĝisto.

„Ho sinjoroj ĉesu“, saltis Vramec, „ ne venenu la dolĉan donacon de dia mano per malama veneno. Paco kun vi!“

„Jes, prave, pastro mia!“, ekridis ebrie la vicbanuso. „Ni manĝu, trinku! Sed jen, mia tranĉilo estas malakra! Ej urba juĝisto! pruntedonu al mi vian sabreton, por ke mi distranĉu la ŝafidon, por alio ĉi tiu tranĉileto sen tio ne uzas! Nu! Dume via poeta lanreatus Kaptoloviĉ parolu al la ŝafido nekrologon!“

„Ha! ha! ha!“, ekridis la nobeloj.

„Donu do la sabreton! Donu nu, mia Teletić!“, levetis sin la vicbanuso.

„Kvankam estas ĝi malgranda, ĝi estas akra, magnifice“, levis sin ankaŭ la urba juĝisto, „vi povus ektranĉi vin.“

„Donu la sabron!“, furioze ekkriis Stjepko, „por kio sabro al tiuj butikistoj?“

La butikistoj tuj montros al vi“, ekkoleriĝis Vernič.

„Kion? Ho! ho! Ĉu tiel? Vidu, vidu! Do ankoraŭ minacas al mi ĉi tiu zagreba fibesto? Sed ĉu vi scias, ke mi estas vicbanuso? Aleno, martelo, kudrilo, — jen estas por vi malkuraĝuloj!“

„Stjepko!“, prenis lin ĉe la mantelo Konjski.

„Ah kio Stjepko!“, liberigis sin la vicbanuso, „jes mia koro ekboliĝis; nun mi estas sinjoro, nun mi baptos tiujn ĉi makleristajn friponojn laŭ mia sinjora volo, jes, mi eĉ forbrulos tiun ilian kavan vespujon pro ĉiuj iliaj malnovaj pekoj.“

„Tio estas perforto s u b s a l v o c o n d u c t u! Tiel agas rabisto“, malkvietiĝis Vernič, kaptinte sian sabron.

Tra la vizaĝo de Gregorianec fulmo ekflamis, la okuloj ekbrilis.

„Rabisto, vi diras, fripono!“, ekkriis li senvoče, „vi, vi estas rabistoj, vi forrabis mian filon, jes la filon, jes la filon, ho vi sklavoj! Atendu — fulmo vin! —“ kaj Stjepko prenis la kruĉon, eksvingis kaj kun tuta forto ĵetis ĝin kontraŭ urba juĝisto. Sed ĉi tiu pli rapide estis deturninta la kapon. La kruĉo brufrapis la muron, dispecetiĝis en cent pecoj dum ora vino spruce makulis la timigitajn gastojn.

En tiu momento ekfulmis la sabroj. Estos da sango! Nun la gastoj interatakos sin.

„Paco kun vi!“, ektondris Želnički. „Tiu ĉi domo estas de l' paco, sed ne rabista groto. Enigigu, sinjoroj, la sabrojn kaj hontu, redonante al mi domaĝon por la amo! Magnifice, mi ne sciis, ke vian spiriton ekloĝis malpura fantomo, dume vin, urbaj sinjoroj, mi petas pardonon pro tio, ke vi estis sub tiu ĉi tegmento ofenditaj!“

„Ĉu ankaŭ vi tiel?“, ekridis la vicbanuso, „B e n e! Iru ni for el ĉi tiu pastra nesto. Kaj al vi zagrebanoj, mi ĵuras per viva Dio, akre mi venĝos. Aŭ mi, aŭ vi!“

Kaj furioze forlasis la vicbanuso kun aliaj noboloj la kanonikejon.

Post mallonga tempo komunikis la magistratanoj al estimindaj burĝoj, kio okazis sur kapitolo. Ne malmulte malkvietiĝis la urbo.

„Fermu la urban pordegon!“, ordonis Jakopovič.

„Sed sinjoro banuso diris“, rediris la juĝisto, „ke ĝi estu dum parlamentagado tage kaj nokte malfermita.“

„Fermu la pordegon“, reis Jakopovič, „je mia respondeco. En tiu ĉi urbo ni estas mastroj, kaj mi estas via deputato en parlamento. Dirigu al la burĝoj, ke ili restu maldormaj. Zorgu ke nokte estu armeo en la urbo.“

„B e n e!“, diris la juĝisto, „fariĝu laŭ via. Vi estas nia deputato. Antaŭ ĉio fermu Kamenita vrata, kaj la ŝlosilegon konservu la senatestro Petar Krupič.“

Laŭ pratempa kutimo ne konservadis nokte en Zagreb la ŝlosilegojn de urbpordegoj la lugardistoj, sed laŭvice la urbaj senatanoj aŭ burĝoj, tial ankaŭ ĉi tiun fojon sendis la juĝisto la ŝlosilegojn al la maljuna oraĵisto.

Estis ĉirkaŭ la deka nokte. La luno flugpendis super Kamenita vrata, kaj ĝia lumo brilegis je glacio, kiel je juvelŝtono. En la urbo ĉio kvieta kaj trankvila. Sole de „Harmica“, de tendaro de la ebriaj banderiistoj estis aŭdeblaj krietoj kaj krioj.

„Kara patro!“, diris Dora, „jen mi preparis al vi la ŝlosilegon, lampon kaj silikon, se estus necese malfermi la urbpordegon. Kaj jen estas la mantelo kaj ĉapo, ĉar estas kreviga malvarmo. Gardu vin, je Dio, kaj nun bonan nokton, kara patro!“

„Bonan nokton al vi, kara Dornjo!“, rediris la oraĵisto, kuŝiĝinte sur la benko en sia magazeno. Feliĉege ripozis ankaŭ la imperiestraj muskeduloj en la gardistejo sub Kamenita vrata, kiuj estis hodiaŭ sub komando de kapetano Blaj Pernhart ĉi tie postenigitaj.

Je unu fojo oni aŭdis antaŭ la pordego piedbatojn kaj bruon. Oni komencis forte frapadi de ekstere la urbpordegon. La dekestro Ivan Un-

reuter saltis por veki la oraĵiston. Li ekkuris al lia domo kriante: „Ho majstro! Vigle! Oni frapas la pordegon!“

Post mallonga tempo eliris el la domo la maljunulo Petar, vestita per mantelo, portante grandan lumilon.

„Kiu dia estas?“, ekdemandis Krupiĉ.

„Malfermu! La parlamentanoj sub salvo conductu de lia reĝa moŝto“, resonis de ekstere la nekonata voĉo.

La oraĵisto malfermis la urbpordegon. La larĝaj flankoj disiĝis, kaj en la urbon invadis areto da furiaj rajdistoj, ĉiuj portantaj flamajn torĉojn, kiuj per sanga lumo lumigis la blankan neĝon.

En unua momento Krupiĉ ektremis. Li rekonis la estron de la aro Stjepkon Gregorianec kaj sian najbaron Mihajlon Konjski. Sed baldaŭ li rekonsciiĝis.

„Bonan vesperon kaj feliĉan nokton! via moŝto!“, kliniĝis la maljunulo antaŭ Stjepko.

„Kial do vi fermas la pordegon, malkuraĝuloj? Probable ke vin iu ne forŝtelas? Ĉu vi ne aŭdis la ordonon de l' banuso? Kaj kiu vi estas, homo?“, ekdemandis maldelikate duonebria Gregorianec.

„Petar Krupiĉ, oraĵisto, je servo al ŷia moŝto!“, rediris trankvile la maljunulo.

„Ha! ha! Ĉu vi, maljuna kanajlo! Vi la patro de tiu publikulino, kiu ensorĉis mian filon! Ha bone, ke mi vin atingis, ido de hundo! Nun al mi vi ne forkuros! Jen al vi la pagon, diablo!“, ekkriis kvazaŭ furia la vicbanuso, frapinte per la pugno la maljunulon sur la vizaĝo, ke lin la sango kovris. La furiulo saltis eĉ de la ĉevalo, ekprenis la oraĵiston ĉe grizaj haroj, trenante kaj frapante lin kiel mutan beston.

„Ve! Ve! Je diaj vundoj! Helpu! Mi pereos!“, ekĝemis la mizera maljunulo. Senkonscie klinis li al la tero, dum ruĝeta sango ekmakulis la blankan neĝon.

„Knaboj ekfrapu ankaŭ vi!“, sin turnis la vicbanuso al siaj homoj, „pro ĉi tiu fihomo pereis du viaj kamaradoj Ivĉjo kaj Laĉjo! Venĝu vin!“

Kiel deĉenigitaj hundoj saltis la servistoj por piedpremi la maljunulon.

„Mortaĉu, malkuraĝulo!“, ekkriis unu, eksvingis per hakilo por dehaki la kapon al la maljunulo. Sed kiel leono sin ĵetis sur lin la dekestro Unreuter, kaptis lian manon kaj luktego komenciĝis.

„Al helpo!“, ekkriis la dekestro.

Ĵus aperis de l' oraĵista domo virino, vestita en blanka nokttualeto. Ŝi flugis kiel fulmo, tremis kiel vergo. Nudaj etaj piedetoj dronadis en la neĝon, luksaj haroj malleviĝis malsupren la ŝultroj, dum sanga ardo de l' torĉoj malkovrigis teruron sur vizaĝo de l' junulino.

Kaj ŝi ekvidis la sangantan maljunulon.

„Patro!“, ekkriis ŝi. „Jesuo! Mario!“ Kaj sin ĵetis teren al la patro.

„Ha!“, ekgrincis Stjepko subite ekvidinte la knabinon, ‚tio estas tiu publikulino. Ej servistoj, buĉu la serpenton“.

„For!“, ektondris forta voĉo, „enviciĝu vi muskeduloj, pretigu la pafilojn!“

Stjepko ektimis. Kvardek muskeduloj subite elkuris el la gardejo sub komando de kapitano Pernhart, alcelinte la pafilojn kontraŭ vicbanuso kaj liaj homoj.

„Dekestro Unreuter!“, turnis sin la kapitano al la juna soldato, superreginta la servistojn, „donu la signon al la burĝoj!“

La dekestro elĵetigis la pafilon supren.

„Vi sekve, moŝto sinjoro“, daŭrigis la kapitano al Stjepko, „rabiste malrespektis salvum conductum. Ekiru nun trankvile hejmen vi kaj viaj kamaradoj, kaj mi la okazintaĵon avizos al mia generalo.“

La vicbanuso ekgrincigis la dentojn, ekrapidante kun sia sekvantaro al la domo de sia bofrato Konjski, serpente ĉagreniĝa kaj preta flame ruinigi Zagrebon.

Je la pafo de la dekestro kolektiĝis subite mul-

tego da burĝoj ĉirkaŭ la sangigita maljunulo. Insultoj kaj krioj resonadis tra la nokta silento kaj en ĉies koro bolis la venĝo.

„Ke ni ruinigu la domon de Mihajlo Konjski!“, oni aŭdis de ĉie; „ke ni batmortigu Gregorianecon!“

„Haltu, fratoj!“, ekparolis laŭte Jakopoviĉ, subite enirinte la rondon de furiozantaj burĝoj, „haltu. La medvedgrada estro premas nin per forto, kaj ni lin premos per leĝo. Sange li ofendegis nin, nin liberajn burĝojn, ĵurinte al ni, ke falos aŭ li aŭ ni. Bone. Jen mi metas la dekstran sur la sangantan kapon de ĉi tiu inda maljunulo, sur la kapon de ĉi tiu ĉasta virgulino, kaj mi ĵuras al vi per viva Dio, ke mi ne ripozos, ke mi ne dormos, ĝis kiam ne falos la fiera tirano Stjepko Gregorianec.“

„Ĵuru ankaŭ vi!“, ekvolis Blaj Štakor la popolamason.

„Ni ĵuras!“, ekkriis la burĝoj, levinte la manojn al la ĉielo.[1]

XVII.

Post kelkaj tagoj depost fama instalo de la banuso Ungnad estis uragana nokto. La suda vento blovegis, ke la branĉaro rompiĝadis; la neĝo degelis kaj neĝakvo fluegis de l' tegmentoj; la flamiga luno briletis sur la ĉielo, dum la nuboj sin persekutadis kvazaŭ furioza kurĉaso. Dum ĉi tiu uragana nokto flugetis de Markplaco al Mesniĉka kvartalo malgrandeta ombro, timeme sin alpremante al la muro, por ke ĝin neniu viva vidu. Tio estis viro vestita en mantelo. Li venis al iu domo, apud kiu staris ĝardeno. En la domo brulis la lampo, el la domo oni aŭdis multvoĉan bruon. La viro haltis, klinis du, tri fojon la kapon, okulmezuris la barilon. En eta sekundo grimpis li sur la barilon, kaj de la barilo sur maljunan pomujon, staranta apude la domo. De tiu arbo estis videbla kaj aŭdebla ĉio, kio en la domo okazas. La hometo sursidas la branĉon, kliniĝinte kroĉas sin al la arbo, kaj estis nerimarkebla,

[1] Autentika. N. d. t.

ke sur tiu pomujo estas viva estaĵo. Se iu lin tiumomente observis, li vidus, kiel liaj viglaj okuloj avide rigardas, kion oni faras en la domo. Ĝi ankaŭ estis rigardinda.

En la domo de Ivan Jakopoviĉ — en vasta ĉambro — sidis ĉirkaŭ la tablo rondo da diversaj homoj, kaj laŭ la muro post ili staris la ceteraj. Ĉirkaŭ la tablo de Jakopoviĉ kolektiĝis la magistratanoj: Teletiĉ, Kaptoloviĉ, Verniĉ, Blaŝoviĉ, Župan, Barberin kaj Bigon, dum malproskimete staris la estroj de aliaj korporacioj, por konsiliĝi, kiamaniere repagi la honton, kiun la urbo estis ĝisvivinta de sinjoro Gregorianec.

„Jes“, komencis serioze Jakopoviĉ, „miaj fratoj kaj burĝoj de nobela urbo, venis la momento, ke ni montru, ke ni estas liberaj, sendependaj viroj. Je tio vi ĵuris, kaj se vi ĝin eĉ ne faris, vi devus vigle salti. Sur via tero, en sfero de via juĝorajto, sub reĝa s a l v u s c o n d u c t u m vi vidis, kiel la medvedgrada sinjoro, mi ne scias per kia krimula furio instigita, levis la manon kontraŭ via homo, kontraŭ inda maljunulo, kiel senkulpa sango de l' maljunulo malsekigis nian landon. Ankaŭ tion vi aŭdis, kiel la sama nia granda malamiko ĵetis hontoplenajn vortojn al nia sinjoro juĝisto kaj aliaj sinjoroj ĉe la tablo de sinjoro preposto. Se ni estas viroj, se ni estaj indaj de niaj liberoj, ni pruvigu kio ni estas kaj repagu la honton, se eĉ iros ĝis la reĝo mem.“

„O p t i m e, o p t i m e a m i c e!“, ekbalbutis tra la nazo tresaĝa Kaptoloviĉ. Min ankoraŭ brulas tiu „fripono“, per kiu epitetis min lia sinjora moŝto vicbanuso ĉe la fritaĵo. Mi do opinias, ke tio estas ĉefa kulpo, ĉar kvankam sinjoro vicbanuso ne donis al ni vangfrapon, tamen li, insultinte nin kiel „friponoj“, diris al ĉiu unuopa burĝo, ke li estas fripono, kaj ege ofendis „h o n o r a b i l e m m a g i s t r a t u m“ kaj la tutan urbon. Ne estas agrable al mia koro, ke sinjoro vicbanuso ĵetis en neĝon la ŝatindan majstron Krupiĉ ŝirpinĉinte lin iomete, ĉar maljuna Krupiĉ povus en tiu malbona vetero ankaŭ malvarmumiĝi. Ĉio ĉi ne estas laŭ leĝo, kio do ne

estas laŭleĝa, tio estas kontraŭleĝa, i d e s t: la maljustaĵo devas esti punita. Nu — q u i b e n e d i s t i n g u i t, b e n e d o c e t.[1] Mi agas nur laŭ leĝo. Kion do diras nia leĝo, nia ora bullo? Aŭskultu. C a p i t u l u m d e v i t u p e r i i s[2]: „Se iu donas vangfrapon al iu, aŭ tiras je haroj, pagu cent denarojn."

„Sed, kara frato!", interrompis lin Mato Vernič, „tiu leĝo valoras, se mi vin, aŭ vi min vangofrapas, aŭ se estimindaj majstroj reciproke sin ŝirpinčas. Inter burĝoj ĝi valoras. Sed vicbanuso ne estas submetita al nia juĝisto."

„Vidu, vidu!", rediris Kaptolovič, „tiun diablon mi tute forgesis. Q u i d f a c t u r i? Kion do? Mi opinias: interkompromisu ni kun la vicbanuso. Li pagu —"

„Kaj mi opinias, ne!", ektondris bonkreska Blaj Štakor, pugne frapinte la tablon. Respekto al niaj moŝtoj sinjoroj, amo kaj honoro al vi, nobelaj korporaciaj fratoj, sed kio estas tromezura eč kun pano ne estas bongusta. Ni portas sur la ŝultroj nur unu kapon, sur la dorso nur unu haŭton. Venu iu, dehaku mian kapon aŭ forigu la haŭton, ĉu mi diru al li: „interkompromisu", donu groŝon por mia haŭto, du groŝojn por mia kapo. A? Ĉu vi tiel agus? Certe ne. Venu iu en mian forĝejon, fuŝpalpu per la pugno sub mia nazo, kion mi? Saltu al lia kolo, kaj „ŝuk" per martelo la kapon, ke li memoru la vojon alian fojon. Kaj kio estas por mi la forĝejo, tio estas por ĉiuj ni la nobela urbo. Kial ni havas la muregojn? Ke katoj sur ili promenu? Kial privilegiojn? Ke vermoj ilin manĝu? Certe ne! Batu ĉiun sur fingroj, kiu sin miksas en niaj aferoj. Kia elturniĝo, kia ceremonio, kia longa litanio? Mi pro mia rajto antaŭ neniu rigardas teren, nek vendas mian sangon je dinaro. Maljuna Krupič estas nia homo. Se estus nur pro kataro, facile por tio, li ne estas virino. Sed se tiuj furiaj lupoj estus lin buĉintaj kvazaŭ bruton, helpus lin ne sankta Kuzma nek Damjan. Sinjoro Kaptolovič parolas tre saĝe, ĉar kiam li estas sinjoro, devas esti saĝa kapo, sed mia simpla prudento alie rezonas. Se ni estas viroj, tordu la manikojn, se ni estas avinoj, iru post la fornon por ke aliaj kuiru al ni kaĉon. Resume do mi opinias jene: Ĉi tiu nia sinjoro Jakopovič multfoje pruvis, ke li zorgas pri ni kaj nia rajto. Sekve se ni al li konfidos niajn rajtojn, ili ne estos en koto enfositaj. Li agu por ni laŭ lia sagaca kapo kaj ĉiu el ni povas kviete dormi."

[1] Kiu bone distingas, bone instruas.
[2] Capitro pri insultoj.

„Tiel estas!", unuvoče ekkriis la burĝoj.

„Sed", aldonis Teletič, „eble estas la afero reordigebla antaŭ la banuso, la sinjoroj estis ja ebrietaj."

„I n v i n o v e r i t a s, a m i c e j u d e x,[3] ridante rediris Vernič.

„Sinjoro Jakopovič faru, kio estas necesa!", maltrankvile interrompis la burĝoj.

„Mi volas, miaj fratoj!", leviĝis la dommastro. „Por vi sangon kaj vivon. Morgaŭ ekiru ni al la banuso, por protesti antaŭ lia persono kontraŭ la perforto de Gregorianec, kaj por levi la proceson če la reĝa kurio. Kaj poste mi persone iros antaŭ la reĝon, mi iros kiel via delegito en poĵunan parlamenton, kaj tie mi klare kaj laŭte komunikos al la sinjoroj, kian perforton kontraŭ ni oni faras. Dume vi, fratoj, atentu. Revizu vian armilaron, purigu viajn pafilegojn, preparu la municion, ĉar Gregorianec havas multajn amikojn, kaj pli granda malbono povus okazi. Do fariĝu kio ajn! Estu niaj kaj Dio helpu!"

„Dio helpu!", ekkriis ĉiuj.

La hometo sur la arbo konvinkiĝis, ke la socieo estas disiĝonta. — Li degrimpis do kiel kato sur la straton kaj repenetris sin trans la Marka placo. Estis noktomezo. En mezo de la placo staris la longulo Garuc, tenante grandan hakilon kaj kornon, kaj kriegis per lupsimila voĉo:

„Mastroj kaj mastrinoj, la dekunua batis —"

„S e r v u s, Ĝuka!", ekkrietis post li la hometo

[3] En vino la vero, amiko juĝisto.

kaj frapinte lin sur la dorso, ekrapidis al la kastelo de Mihajlo Konjski.

„Ki—e—l?“, rigardaĉis Garuc. „Ĉo—ko—lin? Spirito? Helpu al ni, sankta Floriano!“, kaj krucosigninte sin ekkuris la mizera noktgardisto al sia domo.

Ĉokolin — ĉar tio li estis — haltis antaŭ domo de Konjski, kliniĝis kaj ĵetis ŝtoneton al la lasta fenestro. La fenestro malfermiĝis.

„Ĉu vi, Ĉokolin?“, ekdemandis lin basa voĉo de l' fenestro.

„Jes, via moŝto!“, rediris duonvoĉe la razisto.

„Nu kio? Pavlo?“

„Li estas en Zagreb. Estis ĉe oraĵist-filino. Intencas edziĝi kun ŝi.“

„Stultulo, vi balbutas!“

„Mi estas ĉe sobra prudento, moŝto. Li intencas edziĝi kun ŝi.“

„Je tri cent!“

„Kvietiĝu, moŝto! Tio ne efektiviĝos. Jen mi kulpa. Sed io alia ruliĝas post la monto. Mi diros ĝin al vi en du, tri. Hu! Mi frostas.“

„Kio estas?“

„La zagrebanoj levas la kornojn kontraŭ via moŝto.“

„Kiel?“

Ĉe Jakopoviĉ kuniĝis tiuj saĝaj burĝaj kapoj, kiel ili atakos vin.“

„Ĉu multaj?“

„Sufiĉaj. Sed se eĉ tuta armeo estus da ili, ne estus timinde, ĉar tuta ilia saĝo starus en avelo. Sed Jakopoviĉ, li estas diablo, tio estas serpento. Hu diabla tia vento! Kiel blovas! Ili interkonsentiĝis, ke juĝe kontraŭ via moŝto agos. Tiel antaŭ la banuso, kiel antaŭ la reĝo kaj poĵuna parlamento. Mi venos morgaŭ, postmorgaŭ por ĉion klarigi al vi. Mi iras!“

„Kien vi volas? Venu en la domon!“

„Mi ne povas. Mi estas okupita. Bonan nokton, via moŝto!“

La razisto foriraĉis; venis ĝis urba reduto sur

suda parto. Esploris, ĉu estas proksime la posteno. Tiam li treniĝis al la sur muro staranta arbo. Tie alligis la ŝnuron, kaj facile malrapide deglitis malsupren de la reduto.

„Haltu!“, per unu fojo eksonis la voĉo de l' posteno de malproksimeta turo.

Eĉ animo ne resonis. Pafilo ekflamis, la kuglo frapis la neĝon, dum la razisto funde de la muro ekridegis.

„Bonan nokton, frato! Domaĝo por la pulvo! Alian fojon celu pli bone!“

Kaj la razisto malaperis.

Senpacience promenis sinjorino Klara tra samobora kastelo. Ŝi havis veston de nigra veluro. Senpancience ŝi promenis, jen dismetante la ardon en la kameno per arĝenta ŝovelileto, jen rigardante tra la fenestro. Estis malvarma, malhela tago. En la valo fumiĝis la nebulo. Ia serpento mordis ŝian koron. Ŝi estis nekutime pala, nur ĉe la okuloj ruĝiĝis subokulaĵoj, sed tio estis de larmoj. Iafoje ektremis ŝiaj lipoj, sin fermis la okuloj, dum per la mano konstante karesis ŝi la veston.

Per unu fojo ekgrincis la pordo. Klara konsterniĝis. En la ĉambron eniris Ĉokolin, kota, malseka.

„Jen min, sinjorino!“, kliniĝis la razisto.

„Fine!“

„Nenia miro. Eĉ nun mi estas sen spiro. La tutan nokton mi vadis en neĝo ĝis la genuoj, dum la lupoj senĉese parolis al mi: „Bonan vesperon!“

„Kio estas?“, levis Klara scivole la kapon.

„Malbono estas. Pardonu, moŝto, ke mi ĉi tiun fojon estas korniko.“[1]

„Parolu — diru ĉion!“, elspiris senpacience Klara, sidiĝinte kvazaŭ laca sur la seĝon.

„De kie ke mi komencu? Pro ĉagreno algluas sin mia lango al la palto.“

„Kio estas kun Pavlo?“

„Li estas en Zagreb. Vi scias, ke lia onklo Bal-

[1] Auguro pri malfeliĉo. N. d. t.

tazar estas malsaĝulo kaj strangulo. Li malamas la patron de Pavlo. Por venĝi sin al li, donacis Mokrice al Pavlo, ke la junulo fariĝu sendependa. Li estas plenaĝa. La imperiesto pro la heroaĵo ĉe Kupa nomis lin kapitano, sendite al li oran ĉenon. Nun, vere, estas li sia mastro."

„Kion do?", larĝe malfermis Klara la penetremajn okulojn.

„Kion?", levis la razisto la ŝultrojn. „Li edziĝos kun filino de l' oraĵisto."

„Tio ne ebla estas, tio ne devas fariĝi!", saltis Klara, tremante kvazaŭ vergo.

„Sed ĝi fariĝos. Kiu malpermesus al li?"

„Vi mensogas. Tio estas fabeloj."

„Fabeloj? Ne, via moŝto. Aŭdu. Veninte li de Kupa kun sia tiu vlaha antikristo, li rekte direktis sin al Dora. De kiam mi apenaŭ elnaĝis tiame el Sava, fariĝinte mi via sekreta servisto, mi piedsigne persekutadis de malproksime la junan sinjoron Gregorianec. Li ke min ne vidu, kaj mi lin ĉiam. Diabla estas tia afero precipe pro tiu — nu diabla, mi diras, afero. En milito, tra la vilaĝoj estis pli facile. Kiu konas Ĉokolinon? Sed en Zagreb, kie konas min eĉ en mallumo ĉiu avino, en Zagreb, kie oni scias, ke mi estis okupita ĉe la pramo, kie oni opinias, ke mi estas malviva, tio ne estas kata tuso. Sed post Pavlo ankaŭ mi altreniĝis. Mi vizitis ankaŭ la maljunan Gregorianec. Li estas bovovire furioza kontraŭ la junulo. Nun dum agado de l' parlamento, li loĝas ĉe Konjski. Vestita mi kiel kamparano de Gregorianec mi estis ankaŭ en la kastelo mem. Sed Krupiĉ estas proksime. Facila laboro por mi. En la korto de Konjski estis malnova garbejo. Tie mi eniĝas sub la tegmenton kaj vidas ĉion, kio ajn okazas ĉe Krupiĉ. Krupiĉ kuŝis vundita en lito — certe vi aŭdis, sinjorino, kiel lin maljuna Gregorianec je Agata festo ĝismorte batis."

„Mi aŭdis. Parolu pluen!"

„Do la maljunulo en la lito. Dora sidas apude, ligas lian kapon. La maljunulino Magda ekbrulas la oleolumilon. Estis jam krepuskiĝo. Krupiĉ eksvin-

gas per la mano; verŝajne li deziris trinki, ĉar Dora prenas la kruĉeton doninte ĝin al li. Sed per unu fojo „frap" kruĉeto la teron, dispeciĝinte; Dora ektremis, kaŝinte la kapon en la patran liton. La maljunulo iom leviĝis, rigardante al la pordo. Sed en la ĉambron eniris Pavlo. Bela knabo li estas, je mia razilo! Se vi nur vidus lin, sinjorino!"

„Kanajlo! Ne balbutu! Parolu!", ekkoleriĝis Klara.

„Sed jes! Kiam ĝi estas vero. Pavlo ekrapidis al la lito, falis genue antaŭ la maljunulo kaj la heroo ekploris tute kiel virino. Mire observadis lin la oraĵisto, dum Dora duone levinte la kapon de la patra kapkuseno ŝtelrigardis Pavlon. Ŝtele, sed tiel strange — nu oni ja scias, kiel la virina kapo rigardas viron. Ili ekinterparolis. Pri kio, mi ne aŭdis. Sed la maljunulo kvazaŭ ĝenadis sin kaj rifuzadis, dum Pavlo incitadis, petadis kaj ĵurpetadis. Per unu fojo la maljunulo apogis la kapon je manoj, kvazaŭ meditante. Kaj relevis la kapon, karesis la filinon, kapjesinte al Pavlo. Gaje saltis la junulo, gaje la junulino. Krupiĉ metis la manojn sur iliajn kapojn, la maljunulino Magda ekploris en angulo, dum Pavlo prenis la kapon de Dora kaj kisis la knabinon."

„Ho!", ekkriis furioze Klara. Malespere skuis la kapon, konvulsie disŝiris la nigreperlan kolumon, ke la dikaj eroj diskuris tra glata pavimo. „Haltu serpento, haltu; viaj vortoj estas veneno al mia animo, via lango estas serpento, kiu trapikas mian koron. Li Doran!", kaj la kolera virino saltis, kaj komencis iradi kun levita kapo, flamantaj vangoj tra la ĉambro, dum Ĉokolin flegme kolektadis la perlerojn.

„Li Doran! Tiun ordinaran knabinon, sengentan, ĉirkaŭpreni, kisi — ho Jesuo, mi frakasos ilin tute frakasos! Sed eble ĝi estas nura amaĵado? Kiel, ke li edziĝas ne — ne — ne. Tio estas neebla. Vi mensogas kaj centoble mensogas!"

„Kia feliĉo", rediris flegme Ĉokolin. „Sed mi eksciis per ĉambelano de Baltazar Gregorianec, al

kiu la cekinoj de Stjepko malfermis la buŝon, ke oni traktas pri edziĝo."

„Ve! Ve! Ĉu mi estas tia mizerulino! Ĉu kuraĝis tiu furioza junulo disigi la oran reton de mia amo, en kiu kaptadis sin kelkcento da fieraj viraj kapoj. Ĉokolin! Prenu ĉion, ĉion kion vi vidas, kion trovas en ĉu tiu kastelo, nur helpu, se vi Dion scias", balbutis bela Klara. „Helpu!", daŭrigis ŝi pli kviete, „ĉu estas rimedo kontraŭ koro, kiu vin ne volas? Ĉu estas kroĉilo por ligi vin al tiu, kiu vin forrifuzas, ĉu estas? Oh Dio! Mi freneziĝos, mi freneziĝos!" Kaj la virino sin ĵetis sur la ripozilon malsekiginte la riĉan kapkusenon per maldolĉaj larmoj.

„Sinjorino!", ekparolis post momento Ĉokolin, staranta antaŭ la ripozilo. „Sinjorino, delasu vin de l' furioza junulo. Delasu la revojn."

„Ke mi delasu lin?", laŭtigis Klara per doloriga tono, „kion vi, mizerulo, scias? Mi ja volis, Dio estas mia atestanto. Mi sufokadis la furiozan koron. Vane. Mi kredis, ke la tempo estingos la fajreron, ĝermanta en mia koro. Sed memoro, malbenita ĉi tiu memoro, tage kaj nokte memorigis lian nomon, nutradis tiun malbonan fajron, kaj nun flagras mia koro per furia flamo, — nun mi devas lin havi aŭ —"

— „frakasi lin kaj ŝin!", rediris flegme la razisto. „Sinjorino, delasu la malsaĝulon. Dispremu lin, forĵetu lin. Ĉio ĉi estas revo. Aŭdu pli malbonajn sciigojn. La domo brulas super via kapo. Ungnad fariĝis banuso. La plena potenco estas en li. Samoboron garantiaĵe oni fordonis al via bopatro Ungnad, tio estas unu duonon, kaj la duan al Gregorianec. La banuso pagis sian ŝuldon al Gregorianec, kaj la duan duonon ,tio estas la vian, estas li perforte reokuponta.

„Ĉu vi freneziĝis?", ekkriis Klara.

„Ne. Atendu, sinjorino unu, du tagojn, kaj vi vidos!"

„Ĉu kontraŭ mi ja komplotas ĉiuj inferaj for toj?", ekdemandis la virino senkonscie.

Ĵus ekludis trompeto de la turgardisto. Venas

gasto. Du minutoj ne pasis kaj al sinjorino Klara prezentis sin alta, nigreta oficiro vestita en fero: sinjoro Melkior Tompa de Horŝova, adjutanto de la banuso.

„Nobela sinjorino!", almetis la alveninto, „antaŭ ĉio respekton kaj riverencon de mia estro, lia sinjora moŝto barono Krsto Ungnad de Sonnek, la banuso. Al via moŝto estos bone konata, ke la kastelo kaj loko Samobor apartenas de pratempo al sinjoroj Ungnad, kaj ke ĝi erarvoje venis en la manojn de via bopatro Leonardo Grubar en unu duono. Kio do estas de komenco malĝusta, tio kun tempo ne povas fariĝi ĝusta. Tial ankaŭ lia sinjora moŝto p a l a t i n o Nikola Bator juĝis kaj alĵugis la tutan Samoboron al la gento Ungnad, kaj mia estro dirigas al via moŝto, ke vi ne prokrastu transdoni la kastelon kaj lokon Samobor; ĉar se ĝi ne okazos amike, okazos malamike; do lia sinjora moŝto banuso donas al via moŝto du tagojn por pripenso, kaj se amike li ne atingos sian rajton, li atakos per armita forto por almiliti sian patraĵon!"

La okuloj de Klara flamis, jen ŝi paliĝis, jen ruĝiĝis, tremante apoganta sin je la tablo.

„Nobela sinjoro!", fine ŝi rediris. „Komuniku al via estro riverencon kaj respekton. Duonon de Samobor, kie mi regas, garatiaĵe fordonis la karmemora Ivan Ungnad al mia bopatro por okmil da hungaraj florenoj, kaj se ilin sinjoro banuso pagos, mi redonos al li la kastelon. Sed ne antaŭ. Sinjoro Ungnad ankaŭ konsideru, ke oni la homojn ne forpelas kiel hundojn. Por tiuj du tagoj belan dankon al li. Nenion mi estas pripensonta. Mi decidis. Sinjoro banuso faru eksekucion armile, mi havas ankaŭ pulvan municion, ankaŭ da homoj mi havas, kvankam mi estas virino. Banuso estas en la lando por gardi ĉies rajton, sed ne por piedpremi ĝin por sia utilo. Tion vi diru al via estro, kaj nun, nobela sinjoro, Dio kun vi!"

„La diriton de via moŝto", kliniĝis Tompa, „mi komunikos al la banuso; li agu laŭ sia plano."

Kaj li foriris.

Du tagojn poste estis ĉirkaŭ Samobor kaj en ĝi eksterordinare vigle. Samoboraj burĝoj strange rigardis, kio tio estos, ne sciante al kiu parto iri. Sur la kastelo fermita pordego, en la kavoj ĝissupre la akvo, sur la redutoj la feraj pafilegoj. Per ĉiuj manoj oni laboradis kaj konstruadis en la kastelo. La homoj paŝadis tagnokte, vicigadis plenajn sakojn da sablo, fosis minujojn, akrigis la sabrojn, dum sinjorino Klara rondiradis instigante, kuraĝigante, riproĉante kaj laŭdante. Sed el la matena nebulo de la dua tago eliĝis stranga, pikanta serpento, eliĝis kaj sin plektis ĉirkaŭ la kastelo — la banusa armeo. Pezaj pafilegoj malafable rigardaĉis la kastelon, brilantaj lancoj elstaris kvazaŭ densa spikaro, dum longaj arkebusoj spione celis ĉiun fenesreton, ĉiun kapon. Ĉi tiun armeon kondukis persone Krsto Ungnad.

„B e n e!“, diris li, eksciinte la respondon de Klara, „mi faligis la turkon, mi superregos ankaŭ la virinan jupon. Ŝi volas ludi batalon. Jam bone! Antaŭen, knaboj!“

Ankoraŭ unu fojon eliris la banusa heroldo sub blanka standardo antaŭ la reduton, postulante la nobelan sinjorinon Grubar en la nomo de l' banuso, ke ŝi transdonu la kastelon, sed ŝi respondis: „Kiam la moŝto banuso tiel malproksimen penadis, li penadu ankaŭ pluen!“

Post minuto resonadis la monto per tondro. Flamo post flamo eliĝis post blanka fumo de pafilego, tondro post tondro ekskuis la aeron, kuglo post kuglo frapadis malnovajn muregojn de Samobor. Kaŭrante spionadis arkebusistoj malantaŭ arbustoj, arboj kaj kie ajn elstariĝis la kapo sur la reduto, forblovis ĝin la kuglo. En la bastiono promenis Klara. Ŝia brusto ege ŝveliĝadis, ĉiu tondro de l' pafiloj ekskuis la virinon. Sed ŝi ne timis. Jen ŝi preĝadis, jen instigadis la homojn. Ŝi alpaŝis al la fenestro. Jen! Taĉmento de l' banusaj piedistoj atingis ĝis antaŭ la pordego. Homego antaŭ la taĉmento eksvingas per hakilo, por ĝin detrui. Klara prenas la pafilon, alcelas, malŝargas kaj la homego

rulfalas de l' ponto en la akvon. Sed la atako pliiĝis. La tuta regimento da piedistoj kun ŝtupetaro alkuras ĝis la unua reduto. La kugloj pluvas el la kastelo. La banusanoj malzorgas ilin. Nun trans la kavo ili apogas la ŝtupetaron, nun supreniras ĝin. Tondro ektondris, flamo ekflamis, fumo vualis la ĉielon; ŝtonoj, homoj, ŝtupetaro, pafilegoj flugas en la aero. Ĉokolin ekbruligis la minon ĵetinte trupon da banusanoj aeren.

„B e n e!“ diris Ungnad vidante, kiel liaj homoj flugas dispecitigitaj en la aero. „Kanonistoj, ŝargu, envicigu la pafilegojn; kanonadu la superan kastelparton; piedistoj malantaŭen!“

„Ha, ha!“, ekridis en la kastelo Ĉokolin, „la banusaj muskeduloj flugas pli bone ol hirundoj; ili estas jam ie ĉe sankta Petar en la paradizo. Tion ni profitis ĉe turkoj.“

La pafilegoj enviciĝis kaj alcelis unu lokon, la bastionon de Klara. Tondro! La kuglo trairis la fenestron, pecetigis la multkoloran vitron. Tondro! La kuglo enkuris tra fenestro kaj rompis la oritan drakon kaj marmorkonkon. Klara de teruro tremegis; pala, senforta sin premis al angulo.

Jus invadis senspire la ĉambron Ĉokolin ĉifonita, sanganta, nigra.

„Sinjorino! Ni estas perditaj! La banusanoj invadas tra la minujo en unuan reduton. Duono da niaj falis de malbenitaj arkebusistoj. Al la kastelmastro, la unika kondukinto, la kuglo forportis ambaŭ krurojn.“

„Ne, mi preferas morti!“, rediris la virino.

„Kaj via filino?“

„Vere! La turmastro donu la signon.“

„Bone!“, kaj Ĉokolin forkuris.

La trompeto ekludis, la kanonado eksilentis.

„Ekiru antaŭ la banuson sinjorino, pli rapide!“, ekkriis la en la ĉambron reveninta razisto. „Memoru ankaŭ, Ungnad favoras virinojn. Ĉe vi estas ora reto.“

„Silentu!“

„Mi ne volas. Ĉu Pavlo? Ĉu Klara ne povas

venĝi sin al Pavlo, se vi estos potenca. Venĝo! Ĉu vi aŭdas, sinjorino, venĝo! Iru antaŭ la banuson!"

La kastelpordego larĝe malfermiĝis, kaj la ponto malleviĝis. El la kastelo eliris kun mallevita kapo Klara, nigre vestita. Ŝi estis pala, ekscitita, ŝi estis pli bela ol iam ajn. Sed apenaŭ ŝi iom demoviĝis de la pordego, ekkuris renkonte al ŝi la banuso sur flamĉevalo, en brilanta kiraso. Klara eklevis la okulon, kaj kvazaŭ ŝin io ĉe la koro malvarmigis. La banuso haltis, Klara kliniĝis.

„Via sinjora moŝto, banuso!", komencis ŝi per emocia tono, „la karto falis, falis je via profito. Mi volis provi la feliĉon, ĝi forlasis min. Malforta mi estas, virino, vidvino. Jen mi fordonas min al akra sorto. Ekregu la kastelon, mi ekiros kun mizera infano en dian mondon. Kien? Mi ne scias. Sed unu favoron mi petas de vi. Lasu min ankoraŭ unu tagon travivi sub ĉi tiu tegmento, por ke mi kolektu mian mizeraĉon, kaj tiam — mi ekiros!"

Petante levis ŝi larmplenajn okulojn, kunmetinte la manojn sur malkvieta brusto.

Ne malmulte ekmiris la banuso je beleco de Klara. Kvankam bruta kaj maldelikata, eksaltis lia koro neordinare, aŭdinte la de Klara sonoran voĉon, ekvidinte, kiel tiu ĉi pala belulino dum kreviga malvarmo staras antaŭ li sola, venkita.

„B e n e!", rediris li pene delikata. „Nobela sinjorino sin tre trompas, konsiderante, ke mi estas idolano, kaj ke mi ŝin forpelos en la vintro el sub la tegmento. Nobela sinjorino povis tuj amike tion fari, kaj oni konsumus malpli da pulvo. Ĉiu postulas sian rajton, do mi ankaŭ. Sed sen tio povas nobela sinjorino ankaŭ pluloĝi en tiu kastelo, nur ke ĝi estas mia. Kaj tial ke estas hodiaŭ kreviga malvarmo, kaj ni hodiaŭ laceturmentis nin kraketante, mi invitas min al nobela sinjorino kiel gasto, ĉar mi estas malsatega. Miaj kaj viaj homoj iru kun kara Dio en siajn loĝejojn. Sinjoro Melkior", alvokis Ungnad la adjutanton.

„Via moŝto ordonas?", alkuris ĉevale Tompa.

„Forkonduku la armeon en la lokon malsupren

en loĝejon. Vi iru tranokti ĉe la prioro, ebriigu vin bele, kaj salutu lin. Mi iros al nobela sinjorino festeni! Adiaŭ, Melkior. La afero urĝas min, mi estas tre malsata!"

„Via sinjora moŝto, banuso!", kliniĝis Klara per eta rideto, „mi vidas, ke vi ne sieĝis ĉi tiun kastelon pro via profito, sed tial ke vi komencu la banusecon per brilanta aspekto de heroeca grandanimeco. Tial gloron al vi kaj dankon de mizera, izolita vidvino. Eniru moŝto en vian kastelon, en vian posedaĵon. Se mi estus ĝia mastrino, mi akceptus la faman gaston en tiu loĝejo, kiel oni akceptas karan parencon; sed via moŝto estas ĉi tie mastro, kaj mi servos vian moŝton kvazaŭ humila servantino."

La banuso desaltis la ĉevalon, prezentis la manon al bela vidvino kaj ambaŭ ekiris en la kastelon.

En la koridoro renkontis ilin Ĉokolin.

„Sinjorino", sufloris la razisto al Klara, „mi forgesis unu diri vin. Pavlo ne kisis Doran unu fojon, tri fojon li premis ŝin al la koro. Venĝo! Kaj la venĝo bezonas potencon."

Malluma nokto falis. En monto, en valo uragano kaj neĝo. La servutuloj ĵetis la mortintajn kamaradojn de la kastelaj redutoj en profundegon. Grakante rondflugadis nigraj korvoj la kastelon. Davor[1] festis festenon.

En la kastelo regis trankvilo. En malgranda ĉambreto tremetis la oleolumilo el roza vitro, fiksita sur la plafono. Pro duonlumo apenaŭ estas rimarkeblaj la vizaĝoj. En blank-marmora kameno kraketis ruĝa flamo. Sur mola lulseĝo balancis sin la banuso. Apud la kameno sidis Klara kun mallevita kapo. Ruĝa lumo de l' fajro ludis magie sur ŝia palvizaĝo, en la brilantaj okuloj, saltetante tra ŝiaj oraj haroj.

La maldelikata batalisto rigardis kaj rigardis ne povante satrigardi la virinon.

Kaj reŝaŭmiĝis la ora kroata vino kaj pli vigle

[1] Davor, Marso, milita dio. N. d. t.

flagris la flamo kaj pli forte blovegis uragano kaj pli pasie ŝveliĝadis la brusto kaj — — — — — en Samobor Lada[1] festenis.

Kaj post du semajnoj benis la samobora prioro la kuniĝon inter sinjoro banuso kaj barono Krsto Ungnad de Sonnek kaj sinjorino Klara Grubar.

Post la edziĝfesto renkontis en la kastelo Klara la raziston; ekridegis kaj diris al li:

„La via plenumiĝis. Venĝo! Mi havas potencon. Mi estas banusino!“

XVIII.

„Trezoro, ĉu vi aŭdas, mia vi estos, jes mia“, ekparolis Pavlo per delikata voĉo sidanta en la ĝardeno de Krupiĉ apud Dora dum ia somera tago en jaro 1578.

„Unu jaro ne pasos, kaj vi fariĝos mastrino de mia domo, de mia bieno, de mia koro.“

„Se tio estus, Pavlo, se tio estus“, ekmurmuris honteme Dora. „Oh, nek por imagi. Kiel mi estus feliĉa. Sed la patro, via patro! Memoru vi ja, kiel li estas kolera je mia mizera paĉjo, je mi! Oh Pavlo! Mi timas malbonon, mi timas — —“

„Silentu, silentu, trezoro! Ne parolu pri tio al mi! Ĉu vi volas, ke serena ĉielo mallumiĝu al mi, aŭ enversi maldolĉan absinton en dolĉan kalikon de l' amo? Mia patro! — Dio! — Mi scias, kion li estas kulpa al via hejmo, mi scias.“

„Sed li estas via patro!“, rediris Dora. „Jen mi mizerulino malpacigis vin kun via patro, mi malfeliĉulino metis mian patron en ĉagrenojn.“

„Silentu, trezoro, silentu!“, vigle baris la junulo al ŝi la vorton, „mi estas viro, mi devas mediti kaj, vere, ofte mi dum maldormo meditis pri tio. Nenion mi finmeditis, ol ke mi amas vin per animo, koro, vivo. Mia patro! Jes! Mi esperis, ke lia furiozo cedos, sed bedaŭrinde mi vidas, ke ne. Mi ĵurpetegis lin, vane. Mi falis antaŭ lin, li rifuzis min. Mi ne forigis min de la patro, — la morto de l' patrino

[1] Lada, diino de l' amo. N. d. t.

pelas min de li. Oh, Dora, silentu, ĉar jen malgajajn scenojn vi vekas en mia animo. Mi ne devas, ne povas vin neami. Ne meditu pri tio, ĉar malvarma prudento estas al amo, kiel frosto al rozo. Kaj kion vi volas pli? Ĉu via patro ne estas pli ofendita, ol mia? Ĉu mi ja ne estas la filo de Gregorianec? Kaj jen, la bonkora maljunulo forgesis akrajn ĉagrenojn, kaj vidinte ke ni du kore amas unu la alian, ke de unu kaj la alia koro krevus, se nin malbona sorto disigus, tiam li ankaŭ diris: „Estu laŭ via volo“. Ĉu ne estas tiel; nu diru mem, ĉu ne?“

„Jes! Dank' al Dio!“, ekspiris la knabino, malleviute sian kapon al la brusto de Pavlo.

„Diru ankaŭ, ĉu mi ne devas?“, daŭrigis Pavlo. „Nobelulo mi estas, kaj honesteco gloras ĉiun homon, kiel do ne la nobelulon. Ĉu mi kuraĝus elmeti publike mian malnovan blazonon, ĉu mi ne estus sendanka malkuraĝulo, forlasinte vin malgajan, suferinta pro mi tiom da ĉagrenoj, dum klaĉlangoj malice vin kalumniis? Vere, malkuraĝulo, eĉ nigra malkuraĝulo mi estus. Jen vidu, mi estas via ŝuldanto. Vi ankaŭ estas mia ŝuldantino!“

„Mi?“

„Jes vi. Ĉu mi ja ne savis vian vivon? Jen, knabino, tie ĉi devas ni kvitiĝi. Kaj tian ŝuldon oni redonas nur kore, anime. Tial ne saĝumu! Ĝi estas la volo de Dio!“

„La volo de Dio!“, ripetis Dora, kaj flamaj ŝiaj okuloj fiksis sin en la junulon. „Mi ne saĝumos, mia Pavlo, mi ne saĝumos. Kaj kia helpo de tio? Kiam mi estas tiel sola okupita, strange estas al mi ĉe la koro. Ĉu estas pravo, kion vi agas, ofte mi demandas min. Kaj tiam en mia kapo strangaj konfuzoj. Ne estas prave, ofte mi diris, jen kiom de tio da ĉagreno kaj malpaco! Do Pavlo estu rezignota? Li? Neniam, eh neniam, diras al mi la koro. Prefere mi ja mortus. Sed vidu, Dora, ree mi diras al si, per vi estas Pavlo malfeliĉa!“

„Mi malfeliĉa? Per vi? Malsaĝa kapeto!“, delikate riproĉis ŝin Pavlo.

„Sed mi nur tiel blinde pensas. Malfeliĉa estas

li, mi diras. Li estas sinjoro, li estas riĉa, vi estas mizera malriĉulino, li ricevus nobelan sinjorinon — alian! Oh, ne, ne alian, tion mi ne elportus", ekkriis la knabino vivece, prenante la manojn de Pavlo, „ke vi amus iun alian. Kaj tiam kiam mi enpensiĝas, jen mi vidas min sidanta, sidanta en via domo kaj brodanta brodaĵon, belan zonon. Kaj mi atendas, ĉu Pavlo baldaŭ venos. Dume vi ŝteliras malrapidete ĝis min, kredante, ke mi tion ne scias. Sed jes, kiel mi ne scius? Mi ne bezonas la okulojn. La koro frapas pli vigle, la koro scias, ke vi estas proksime. Mi do saltas al vi, mi kroĉiĝas ĉe via nuko, mi vin ki — ha, ha, ha!", la knabino ekridis kaj ekploris, „ĉu ne, ke mi estas malsaĝa, tre malsaĝa! Ne, ne, ne tio ne povas esti, tio estus trobele, trobele!", kaj Dora emocie kovris la vizaĝon per la manoj.

„Tio estos, ĝi devas tiel esti, mia knabino!", ekĝemis feliĉega Pavlo, alpreminte la knabinon al la brusto. En la ĝardeno subite ekgrincis sablo. Dora saltis. Malantaŭ la arbetaro aperis malafablulo Radak.

„Estas la horo, estro! Via taĉmento seligis la ĉevalojn. Estas ordono, ke vi ekiru trans Savon en banusan tendaron ĉe Odra."

„Jam bone, Radak! Dankon."

Kaj Radak foriris, dum la junulo forte kisis la fianĉinon kaj ekiris al sia taĉmento.

La knabnio ekiris ĝis ligna barilo por vidi forirantan amaton. Si apogis la kapeton je la pilono, ŝia vizaĝo brulis de la amo, dum flamaj okuloj persekutadis karan batalanton. Ĉe vojkurbiĝo forklinis Pavlo la kapon kaj salutis la junulinon, ŝi balancis per kapo al li du tri fojojn, kaj revenis al la benko, staranta antaŭ la domo. Ŝi sidiĝis sur la benkon kaj ekbrodis la brodaĵon. Strange estis al ŝi ĉe la koro. Jen ŝi brodis, jen levis la kapeton rigardante antaŭ sin. Ĉu ebla estas tio, ĉu ebla estos tio, ke ŝi fariĝu de Pavlo? Ŝi tiris la manon tra la frunto por konvinkiĝi, ke tio ne estas sonĝo, ke tio estas veraĵo. Veraĵo? Oh mia Dio! Kio estas ĉiuj trasuferitaj turmentoj, ĉiuj elverŝitaj larmoj kompare al

sola ekpenso, esti edzino de Pavlo! Stranga lumo tremetis antaŭ ŝiaj okuloj, al la koro penetras ia dolĉa premeco, sango saltas al ŝia kapo, kaj por la brodaĵo malbone.

El la kobolda lumo disvolviĝadis vivplenaj fantomoj antaŭ okuloj de la knabino. Ŝi imagis sin en la ĝardeno apud kastelo de Pavlo. La suno brilis, la floroj floris kaj birdoj kantis plenvoĉe. En la ĝardeno serpentumis blankaj vojetoj, randitaj per densaj herbokovroj. Tie ŝi promenis kolektante la florojn. Ha jen, jen la plej belan rozon! Ke ŝi kolektu ĝin! Kaj ŝi etendis la manon kolektonte. Ve! El la herbokovro saltas homo. Ja Pavlo! Kiel ŝi ektimiĝis! Sed ne estis tempo por timi. La heroo ĉirkaŭprenas ŝin, kisas sur la frunto, rekisas ŝin. Kiel bela sonĝo! La knabino malprenis la brodaĵon, fermis la okulojn kaj al ŝi estis agrable. Ŝi revis, revis, sed baldaŭ vekis ŝin vigla interparolo. Ŝi ekvidis la patron iranta kun la juĝisto, notaro kaj pastro. La sinjoroj tre vive interparolis. Post ĉiu paŝo ili haltis, svingante per la manoj kaj balancante la kapoin.

„Tio, tio estas al Dio plorinda!", ekkoleriĝis la dika juĝisto, „tio estas peko ĝis Dio, kion oni faras ĉi tie. La medvedgrada estro, post kiam li fariĝis vicbanuso, turmentas nin pli malbone ol servutulojn."

„Per amorem dei,[1] kio ree estas?", ekdemandis la kapelano.

„Horribile dictu, terure, pastra moŝto!", ektrompetis per la nazo Kaptoloviĉ.

„Nu per Dio parolu, sinjoroj, kia estas tiu nova perforto?", ekdemandis trankvile Krupiĉ.

„Nur pasis kelke da monatoj, ke li vin, majstro, atakis kruele ĉi tie ĉe Kamenita vrata —"

„Kaj nin, salva auctoritate magistratus[2], ĉe la fritaĵo baptis per idola nomo: fripono", aldonis Kaptoloviĉ.

„Mi scias", respondis Krupiĉ, „sed pro tio ni protestegis antaŭ sinjoro banuso kaj levis proceson

[1] Pro dia amo.
[2] Ne estu riproĉinde al la magistrato.

antaŭ la reĝa kurio. Pro tio estis sº Ivan Jakopoviĉ en Poĵun.“

„S i c e s t, tiel estas!“, almetis Ŝalkoviĉ.

„Kaj ĉio laŭ ordo kaj leĝo“, finis Kaptoloviĉ.

Sed apenaŭ via vundo cikatriĝis“, daŭrigis la juĝisto, „jen novan malicon. Ĉirkaŭ Georg-festo la virinoj el Graĉani: Jela Bedekoviĉ kaj Bara Haramija lavis tolaĵon apud la rivereto Topliĉica. Sed jen dum pura paco el arbaro invadas kontraŭ ili Andrija Kolkoviĉ, la servisto de Gregorianec kun kelko de tiuj hajdukoj kaj frapu la virinojn — —“

„S a t i s, sufiĉe! Sodomo, Gomoro!“, krucosignis sin Ŝalkoviĉ.

„Ne estas sufiĉe“, diris la juĝisto. „Kiam la virinoj komencis krii kaj plorkrii, ke ili plendos ĉe sinjoro vicbanuso, tiuj antikristoj ekridegis, dirante, ke ili plendu, kaj ke al ili diris la estro ke ili nur batu tiun zagreban bestidaron, ke ili eĉ virinojn ne ŝparu, ĉar li rekompencos ilin pro tio.“

„Bestidaro, ĉu ni estas bestidoj!“, prenis Kaptoloviĉ, la kapelanon ĉe la brako, „bonvolu via moŝto pripensi, ni ke estas bestidoj!“

„Liberigu nin, Sinjoro!“, krucosignis sin la pastro.

„Sed tio ne estas ĉio“, daŭrigis la juĝisto, „estas ankoraŭ pli de tiu litanio. Mijon Kramar, nian samburĝanon, tute senvestigis la servistoj de Gregorianec apud Kraljev-brod, kaj li mizerulo devis dum pluvo atendi en arbetaro, por povi reveni hejmen.“

„Jen vidu, vidu vi!“, etendis Kaptoloviĉ la manojn.

„Oh p r o l e s d i a b o l i!“[1], ekĝemis la kapelano.

„Kaj nun venas la plej malbona!“, diris la juĝisto.

„Aŭdu ni!“, intermetis Kaptoloviĉ.

„Jes, aŭdu kaj krucosignu vin. Hieraŭ vespere dum mi sidis ĉe vespermanĝo, invadis mian domon

[1] Oh diabla kovitaĵo!

edzino de majstro Koloman, kaj kun ŝi nia inda asesoro Ivan Bigon. La virino kriis kaj ploris, mi pensis, ke lupo formanĝis al ŝi bovidon. Sed kiam Bigon komencis klare rakonti: centoble pli malbone. Antaŭ kelkkvar tagoj sendis nia bona Bigon kvar siajn ĉevalojn al Adriatiko por alveturigi oleon. Mi diris al li, ne faru ĝin, ĉar Gregorianec ordonis al ĉiuj servistoj rabi la zagrebanojn, kie ajn venos al ili okazo. Sed kion vi volas, Bigon, kiel mi diris, sendis la ĉevalojn. Kiam estis ĉevaloj ĉe Kraljev-brod, atakis ilin la Gregorianecanoj, elbatis la servistojn, dum la ĉevalojn forpelis Molvicen.“

„Kvar ĉevalojn, ĉu vi aŭdis, tio ne estas groŝo“, aldonis grave Kaptoloviĉ.

„Bigon ne havis tempon sekvi la ĉevalojn; estis okupita en sia magazeno, ja foira tago. Iru, diris li al majstro Koloman, sia boparenco, iru, boparenco, Molvicen al Gregorianec, ke li redonu miajn ĉevalojn. Kaj Koloman fakte levis sin. Kiam li antaŭ malafablan Stjepkon, dirinte: kiu li estas kaj kion li volas, kaj ke estas vera honto, kion faras liaj servistoj, tiam mia Stjepko serpente ekridis, dirinte al Koloman: Ni iru, ni iru, majstro, malsupren en la korton, por ke ni vidu, kia estas tiu afero. Sed apenaŭ ili en la korton, ekpalpebrumis Stjepko al la servistoj, kaj ili saltu sur mizeran Koloman kvazaŭ hundoj, fortrenu lin al la kabano, senvestigu lin tute kaj per palisoj preskaŭ ĝismorte batu lin. Stjepko ridis al tio kaj diris al Koloman: — Nun ni vin hufigis, zagreba hundo; foriru kaj salutu la respektindan magistraton. Ĝi venu gastigi sin al mi en Molvice, kaj mi ĝin ankoraŭ pli grase regalos. — Kaj nun kuŝas la mizera Koloman kiel lamulo en la lito.“

„Nin tiel regali, respektindan magistraton regali per aveluja graso,[1] ĉu vi aŭdis, moŝto sinjoro kapelano?“, koleris la notaro. „Nin, kiuj havas rajton doni bastonadojn, sed ne ricevi ilin. Diru al mi, ĉu li estas dia kreitaĵo, ĉu li estas baptita animo?“

[1] Bastonado. N. d. t.

„Et libera nos a malo,[1] rediris pie la kapelano.

„Kion do nun estas farota de ni?“, ekdemandis la juĝisto.

„Hm!“, balancis per la kapo saĝe la kapelano.

„Kion nun?“, ripetis Kaptoloviĉ.

„Malaĝrablaĵon por malagrablaĵo!“, almetis Krupiĉ, aŭskultanta ĉiun ĉi rakontadon silente. „Fidu al vi kaj al via fiĉevalo!“

„Sed per Dio, majstro!“, intermetis timeme Kaptoloviĉ, „tio estas delikataj aferoj, tion oni devas skribe —“

„Kion skribe, sinjoro notaro!“, rediris la oraĵisto. „Vi bastonojn ne sentis, por vi estas facile skribe, sed mi ilin sentis, mi burĝo. Pro kio verŝadi inkon, dum sango, fluas? Mi ne estas altrudemulo aŭ malpacemulo, sed kiam oni venas ĝis karno, tiam oni skribas, jen tiel —“ kaj la oraĵisto levis la pugnon.

„Bene, bene sed —“, aldonis Kaptoloviĉ.

„Nenion „sed“, rediris la oraĵisto. „Sinjoroj, ni iru al sinjoro Jakopoviĉ. Tion oni ne devas prisilenti. Li konduku nin al la banuso Samoboron, mi ankaŭ iras kaj sº Kaptoloviĉ iros ankaŭ kun ni, por ke ni kore diru al li ĉion, ke li estu al ni je helpo, ĉar li promesis esti severa kaj justa.“

„Optime! Ĉio tio ja estas“, ekspiris pli libere Kaptoloviĉ, „nur laŭ leĝo. La banuso estas efektive severa kaj justa, atentante nenies amikecon. Sed jes! Ion mi ekmemoris. Kun malplenaj manoj oni ne povas aperi antaŭ la banuso. La banuso volonte manĝas kaj trinkas, kaj al sinjorino banusino verŝajne plaĉos, kiel al ĉiu virino, sukeraĵoj. Mi do opinias, ke ni kunportu ad captandam benevolentiam al lia ekselenco banuso siluron kaj kvin litroduonojn da malnova vino, kaj al sinjorino banusino du konusojn da blanka sukero. La siluron mi havas hejme, la vinon donos moŝto sinjoro juĝisto, dum la sukeron ni aĉetos je urba konto ĉe Ŝafraniĉ por floreno kaj naŭdek denarojn. Ĉu vi konsentas?“

[1] Kaj liberigu min de la malbono.

„En nomo de Dio!“, diris Krupiĉ, „sed nun ni iru, sinjoroj!“

„Ni iru!“, konsentis ĉiuj, kaj ekiris al la domo de Ivan Jakopoviĉ.

Du tagojn post ĉi tiu viva interparolo de zagrebaj sinjoroj, promenis je la dua posttagmeze sinjorino banusino en kastelĝardeno de Samobor. Sinjoro banuso, homo iom kuŝemula, depost kiam li atingis la gravegan banusecon, dormetis en sia ĉambro, por ripozi post malfacila peno, kaŭzita de cervaĵo kaj vino Okiĉ'a. Plie novaj fortoj estas akirotaj, ĉar morgaŭ oni devis iri al la tendaro kaj poste kontraŭ turkoj. La koro de sinjorino Klara eĉ malmulte ne sopiris al dormetanta mastro, li ja lasis al ŝi bravan, anstataŭanton, sian karan gaston, sinjoron regimentestron, Bernardon de Lernon, devene francon, kiu speciale ekplaĉis al praha kortego, kaj kiu eĉ al sinjorino Klara ne estis malplaĉa. Sinjoro Lernon ne estis Dio sciu kia belulo, same kiel barono Ungnad. Li estis homo malgrasa, pala trofrue matura; sed sinjoro de Lernon estis homo alta, fleksebla, kun nigraj okuloj, nigraj lipharoj, delikata akra nazo, kavaliro de la kapo ĝis la kalkano. Krom tio de Lernon ne parolis maldelikate, sed glate, delikate, dum la lango de Ungnad sciis ekhaki kvazaŭ sabro.

„Pardieu! mi miras al vi, bela sinjorino!“, ekbabilis senĝene apud Klara paŝanta regimentestro, „ke via beleco kaŝis sin en tiu ĉi arbara dezerto. Venero loĝas sur Olimpo, en paradizejo, kaj ne en ursa kaverno.“

„Mirinda ŝajnas al vi tio, sinjoro de Lernon,“ ekridis kontraŭvole Klara, „nu diru, kiam vi min flatas pro beleco, diru al mi, kio estus dezerto, se en ĝi ne ekzistus beleco?“

„Jes, jes, ĉarmega sinjorino, sed kio apartenas al la ĉielo, ti brilu sur la ĉielo; la stelo nenie havas lokon, ol sur la ĉiela helo.“

„Lasu, kara kolonelo. Mi scias, ke mi ne estas al vi alia stelo, sed „u r s a m a j o r“, ursino. Se mi aperus inter viaj markizinoj, certe mi ŝajnus al vi simpla.“

„Vi pekas kontraŭ vi mem, bela sinjorino!“

„Se do estas vero, kion diras via moŝto, ĉu ne ekzistas nekonita mondo kaj nekonitaj steloj? Imagu, ke vi estas dronisto, dronanta kontraŭ la perlo aŭ ministo kiu sub la tero malkovris oron.“

Lernon volis reflati al la sinjorina vorto, sed antaŭ ŝi aperis malgranda Ĉokolin, ekparolinte per kroata, al la franco nekonata lingvo.

„Moŝto sinjorino! Vi ricevos gastojn. En loko Samobor estas zagrebanoj, ankaŭ la patro de Dora; ili venos por plendi maljunan Gregorianec pro perforto. Kaj Gregorianec malamas la zagrebanojn, ĉar li koleras je Dora. Sekve la zagrebanoj ne povas esti pravaj. Jen al vi unuan okazon!“

Kaj la razisto malaperis.

La okulo de Klara neordinare ekbrilis.

„Pardonu min via moŝto“, diris ŝi al la kolonelo, „en grava afero mi devas ekserĉi mian edzon.“

Kaj per rapida paŝo ŝi ekrapidis por veki la banuson.

„La zagrebaj sinjoroj alvenis“, raportis la servisto.

„B e n e! Ili eniru!“, koncizis la banuso, kiun Klara estis relasinta.

En la ĉambron eniris Jakopoviĉ, Teletiĉ, Kaptoloviĉ kaj Krupiĉ.

„Ho sinjoroj zagrebanoj“, etendis sin la banuso, „kion novan vi ree portas?“

„La siluron, vinon kaj du konusojn da sukero, via ekselenco!“, ekbabilis Kaptoloviĉ, malfacile kliniĝante.

B e n e! Dankas!“, ekridis Ungnad, „sed por tio ne estas bezona d e p u t a c i o.“

„Nenion bonan ni portas“, serioze ekparolis

Jakoopviĉ, „ĉar estas, kun via permeso, sinjoro banuso, ĉe ni ĉio malbona.“

„Malbona! Kiel do?“

„Sinjoro vicbanuso rigardas nin kiel servutuloj jes, kiel bestoj, dum ni estas liberaj homoj. Aŭskultu, via ekselenco, kaj juĝu.“

„Parolu!“ rediris la banuso. — Per viveca lango, akraj vortoj rakontis Jakopoviĉ pri ĉiuj maljustaĵoj, kiujn Zagreb ĝisvivis de Gregorianec kaj li finis:

„Jen vi aŭdis, sinjoro banuso, kio nin premas. Ni do postulas la justecon kontraŭ tiu perforto. Kiam ekbanusis via ekselenco, vi diris, ke al ĉiu vi severe juĝos. Jen ni burĝoj de malnova Zagreb postulas helpon, ian sanigilon de vi. Montru vian justemon. Revenigu al ni pacon kaj liberecon, ke ni estu, kio ni estis. Montru ke sub via sceptro pli valoras la leĝo ol sinjoreco.“

„B e n e!“, moke rediris Ungnad. „Mi ne kredas, ke sinjoro Stjepko estas tia antikristo, li ja estas vicbanuso. Eble viaj homoj iom pligrandigis. Kaj mi ne scias“, daŭrigis li, ekkaresinte la ruĝan barbon, „kial vi venis al mi? Kial? Certe mi estas banuso, sed vi ne volas scii pri banusa juĝo. Ĉu vi ne levis proceson kontraŭ Gregorianec antaŭ la reĝa kurio, kaj ne antaŭ banusa tabulo? Por kio vi min bezonas?“

„Al la zagrebano juĝas sole la reĝo, kaj zagrebano povas unu alian plendi nur antaŭ lia reĝa moŝto, tia leĝo estas de pratempo“, vire ekparolis Jakopoviĉ. „Niaj burĝoj ne apartenas al la banusa tabulo.“

„He jes! Tio estas tre malsaĝa leĝo, miaj karaj, tio estas malnovaj skataĵoj“, respondis la banuso, „pro vi malriĉuloj vojaĝos la sinjoroj Poĵunon. Iru, iru, tio estas viaj revaĵoj. Ke sinjoro Stjepko batis vian servutulon, virinojn e t c a e t e r a, kio do tio estas? Iru ankaŭ nun Poĵunon. Serĉu tie kuracilon, por kio mi bezonas al vi? Malpacemuloj, ribeluloj, malkvietuloj vi estas.“

„Sed nia rajto!“, vive ekparolis Jakopoviĉ, „ĉu ni estas bestoj?“

„Rajto! Ha, ha! Ĉu vi havas pli grandan rajton ol mi? Iru kun kara Dio, mi estas dormema.“

„Sekve via moŝto ne volas ŝirmi nin?“

„Fidu al vi kaj al via fiĉevalo. Mi estas dormema, ĉu vi aŭdis, kaj morgaŭ ni devas al la batalo.“

„Bone“, decide finis Jakopoviĉ, „la banuso ne scias, kio estas pravo, sed ĝin ekscios la reĝo ankaŭ kia estas lia banuso. Adiaŭ, via ekselenco; nun ni scias, ke nenion ni povas esperi de la banuso kaj jen mi ĵuras, ke vi memoros la momenton en kiu vi ekpikis la koron de zagrebanoj!“

Koleraj foriris zagrebanoj de Ungnad, sed pleje ĝemis Kaptoloviĉ:

„Sekve nek la siluro nek vino, nek sukero iom helpis. Ĉio neniom. Jen al vi justecon!“

XIX.

Barono Ungnad levis sin kun sia armeo laŭ ordono de la ĉefduko Karlo por forpreni de la turkoj malnovajn kroatajn fortikaĵojn: Buĵin, Zrinj, Ĉazma almilititaj de bosnia Ferhat-paŝa'o, kaj intencis la idolistan forton forpuŝi de Una. En kelkaj malpli grandaj bataletoj li vere disrompis la turkojn, sed li ne sciis tute eluzi sian feliĉon. Kvankam heroo sabre, estis Ungnad de neakra prudento, kaj batalante jen ĉi tie jen tie senracie, li konsumigis multegon da heroa sango. Krom tio la kroataj sinjoroj ne tiel al li alteniĝis kiel iam al Franjo Slunjski kaj en la armeo ne estis konkordo. Maljuna Gregorianec kun kelkaj liaj anoj certe treege teniĝis al la stiria barono, iĝinte malfidelaj al siaj eksliganoj, evitantaj la germanojn. Sed kontraŭe grava parto de la nobelaro, kaj je ĝia fronto malgranda eksbanuso Alapiĉ, komencis malafable rigardi la fieregan baronon. Ungnad kondukadis la armeon tien reen, jen nezorgante pri bona okazo por ataki la turkojn, jen kun malgranda trupo atakante aregon da turkoj.

Krom tio ofte li forlasis la armeon kaj vizitadis Zagrebon por sekrete konsiliĝi kun Hallek, Draŝkoviĉ kaj ceteraj favoratoj de la ĉefduko Ernest. Jes, oni parolis pri li, ke lia ĵuro en kroata parlamento ne estis ol vanta komedio, tial ke li antaŭe ĵuris en Praha al la imperiestro Rudolf, ke li faros nur tion, kion al li ordonos la ĉefduko Ernest. Dum la sinjoroj tiel en anguloj murmuretis, klopodis zagrebanoj per ĉiuj manoj por demakuli la hontindan vundon, kaŭzitan de Stjepko Gregorianec. Ili elektis Ivanon Jakopoviĉ kiel urba juĝisto, kaj Maton Verniĉ kiel notaro, sciante, ke tiuj estas viroj kuraĝaj kaj sagacaj, kaj konvinkiĝinte, ke sinjoro Teletiĉ estas bonulo sed nezorgulo, kaj sº Kaptoloviĉ ke multe parolas kaj malmulte agas. Jakopoviĉ ekiris ankaŭ al la ĉefduko Ernest por pruvi al li ĉiujn ĉagrenojn kaj mizerojn de malgaja zagreba komunumo, dum en poĵuna parlamento li per tondranta voĉo kaj fulma parolo ektondris, ke la kroatajn magnatojn io sub gorĝo kvazaŭ sufokadis:

„Mi venas antaŭ vin, ho moŝtoj k l a s o j k a j o r d e n o j“, ektondris li, „ne kiel deputato de libera urbo, kies nomo estas fama de praa tempo, sed kiel ĝemanta sendito de plorigita komunumo, kiu ĝemas kaj spiregas sub kruda premado, forgesante jam kio estas justeco kaj leĝo, kaj en malespero prenante akran sabron. Kaj kiel ne? La ĉagreno nin batas, malsato frapas, brulas nia domo, senfruktaj niaj kampoj, maljunuloj tremas antaŭ perforta mano, virinoj tremas antaŭ la furio, dum nia malnova leĝo tiu nemakulita sanktaĵo de niaj patroj, kuŝas en polvo kaj ĝin senkompata piedo premas kun malica furiozo. Ĉu vi do demandas, ho moŝtoj k l a s o j k a j o r d e n o j, ĉu estas tiu tirano al ni la turko, malbenita malamiko de kristaneco? Mi diras al vi, ho sinjoroj, ke ne estas la turko. Hejma magnato, kristana sinjoro eniris en nian kvietan urbon s u b s a l v u s c o n d u c t u m rabante pli forte ol la turkoj, kaj en la momento, kiam la armiloj estas levotaj konkorde kontraŭ la pereiganto de sankta nia kristana kredo, la sabro devas

esti eltirata kontraŭ nia hejma perforto. Helpu, ho sinjoroj, ĉar alie ni pereos, sed ni pereos sole kun la sabro en la dekstra mano.

Tiu parolo kvazaŭ forta frosto brulsignis kiel la banuson tiel la kroatajn sinjorojn, precipe, post kiam oni aŭdis, ke la reĝo ordonis, ke oni faru juĝan esploron antaŭ la kurio kontraŭ sinjoro Stjepan Gregorianec. Ankoraŭ unu fojon ekprovis la sinjoroj, se ili eble povus eligi ĉi tiun malagrablan proceson de la kurio kaj transmeti ĝin antaŭ sian propran tribunalon. Kelkaj sinjoroj faris nome konkludon en sia kunveno komence de la jaro 1579., ke Petar Hereŝinec, zagreba kanoniko, kaj Gašpar Druškoci, notaro de varaĵdina ĵupo (komitato) ekiru en la preĝejon de sa Stefano, kie estas konservataj en la kesto la diplomoj kaj privilegioj de la regno Slavonujo, kaj ke ili detale esploru, ĉu la plendo ne apartenas al la banusa tribunalo, ĉu zagreba ora bullo ne perdis eble sian valoron, tial ke la sinjorojn kostas multe da monelspezo, vojaĝante Poĵunon antaŭ la kurion. Vane. La ora bullo estis firma leĝo. Jam la trian tagon post Pentekosto en jaro 1579. komencis sinjoro Lacko Imbriĉ Jamniĉki, nobela juĝisto de zagreba ĵupo kaj „reĝa homo“ kune kun sinjoro Blaĵ Šiprak, zagreba kanoniko, juĝan esploron, en monaĥejo de sa Francisko en Zagreb, kontraŭ Stjepko Gregorianec pro la forto, ruinigo de paco kaj s a l v u s k o n d u c t u m. Kaj post kiam so Imbriĉ eldemandis cent tridekok da atestantoj, el kiuj multaj jesis la perforton de l' vicbanuso, sendis la juĝisto la protokolon al la kurio.

„Nu, r e v e r e n d e f r a t e r“, ekdemandis Vramec sian kamaradon Šiprak antaŭ la monaĥejo, „kiel elfalis la afero por medvedgrada estro?“

„Malbone“, rediris Šiprak, „veraj kaj fidindaj atestantoj, precipe imperiestraj oficiroj, bombardistoj de Ivaniĉ kiel ankaŭ nobelaj sinjoroj kun ĵuro konfirmas, ke estas vera ĉio, kion diras la zagrebanoj.“

„Centfoje mi diris al Stjepko, ke li estu kristano, sed li ĉiam idolisto; mi ne amas tiujn opstinajn bur-

ĝojn, sed fine ili ankaŭ ne estas bestoj. Fariĝu nun al li!“

Veninte en sian loĝejon, trovis Vramec je miro sian baptanon — Pavlon. Meditante sidis la juna heroo ĉe la fenestro.

„Do, do!“, ekmiris la dika kanoniko. „Ĉu mi sonĝas. Vere! Sinjorido Pavlo. Bela gasto vi estas al mi. Via baptopatro kvazaŭ ne ekzistas en la mondo, sendanka filo. Jam duonjarcenton mi ne vidis vin. Mirinde, ke vi eĉ hodiaŭ venis! Do de kie, do kion?“

„Pardonu, honorinda sinjoro baptopatro!“, ekparolis Pavlo, kisinte la manon de la baptopatro, „ke mi pli ofte vin ne vizitis, sed —“

„Sed“ — interompis lin la kanoniko, „jes, sed, tiu via „sed“ estas al vi — f e m i n i n i g e n e r i s, en ĵupo ĉu ne? Pavlo, Pavlo, mi ne scias, kio tio estos! Ĉiu laŭ sia prudento forĝas la feliĉon por si mem, sed cent okuloj pli vidas, kaj ordon senpune oni ne detruas. Gardu vin! Sed kia vi estas al mi, malpurigita! De kie vi venas?“

„De Una, sinjoro, baptopatro, de Una. Mi estis en la armeo de la banuso. Ni ekbatalis kun la turkoj!“

„Ĉu feliĉe?“

„Feliĉe kaj malfeliĉe. Ni tute frakasis la turkan armeon, sed de miaj cent belaj soldatoj ne restis pli ol dek vivantaj.“

„Kiel tio?“

„Ĉar la stiria banuso ne kondukis nin al la batalkampo kiel heroojn, sed kiel bestaron en ĥuĉejon. Kaj precipe nin kroatojn. Li ŝparis la muskedulojn, jes, sed ni kun sabro kontraŭ pafilego' Sed honorinda sinjoro baptopatro, estos jam tempo rakonti pri tio, sed antaŭ ĉio mi venis peti de vi unu favoron.“

„Parolu, filo!“

„Mi volas edziĝi!“, ekparolis decide Pavlo.

„Vi? —“, ekmiris unuan momenton la kanoniko. „Nu dank' al Dio, se nur estas saĝe“, korektis sin maljunulo.

„Saĝe estas, ĉar estas honeste“, rediris Pavlo, „mi demandis mian koron centfoje; kaj la koro diris al mi jes.“

„Koro kaj prudento! — Filo mia, tio ne estas egala“, ekrigardis lin kun zorganta okulo la kanoniko. „Kian do junulinon vi elektis? Certe ja nobelulinon?“

„Noblan kore, burĝinon gente.“

„Ĉu —?“

„Doran Krupiĉ, sinjoro baptopatro!“

„Pavlo! Malpura volupto vin ebriigis.“

„Min ekregis la koro pura kiel estas la dia ĉielo.“

„Sed via patro?“

„Mia patro — kaj ĉu vi ne demandas: „via patrino?“ Vi ja scias sen tio ĉion, sinjoro baptopatro. Mia koro estas viva flamo, sed se mi rememoras tiun teruran nokton, mia koro glaciiĝas kaj mi plu ne memoras, ke mia nomo estas Gregorianec. Sed tamen mi memoras. Diru al mi, honorinda sinjoro baptopatro, ĉu devas nobelulo nei, kion li diris, ĉu li devas rompi la ĵuron, per kiu oni ĵuras je viva Dio?“

„Ne devas!“, pene rediris la kanoniko.

„Ne devas, diras vi honorinda patro. Aŭdu do vi. Antaŭ ol mi ekiris al la batalo, mi prenis el la mano de dia servisto la sanktegan korpon de l' Savinto, por min fortigi. Tio estis en Mokrice. Tie do genufleksante antaŭ dia vizaĝo kaj super la tombo de la patrino mi ĵuris sur la sankta hostio, ke mi prenos Doran Krupiĉeva kiel mian veran laŭleĝan kamaradinon.“

„Pavlo, Pavlo! Kion vi faris? Dio kompatu al via animo, mizera filo!“

„Dio estas atestanto al mi, mi bone faris!“, ekkriis la junulo ekgenuinte antaŭ la kanoniko, „kaj vin, spirita mia patro, mi ĵuras je Dio, vi benu ĉi tiun ligon per pia mano kaj mi estos feliĉa. Vi ĝin benu, ĉar — ĉio cetera forŝiris sin de mia koro.“

„Mi —“, elreviĝis la maljunulo.

„Ĉu malpermesas ĝin al vi la dia leĝo?“

„Ne malpermesas.“

„Plenaĝa, mia mastro mi estas.“

„Sed burĝa knabino!“

„Jes burĝa knabino, baptopatro! Ĉu vi rememoras min, kia mi estis antaŭe? Sovaĝulo, perfortema mallaboremulo. Kio estis al mi leĝo, kio kredo? Bagatelaĵoj. Mi vagadis tra la mondo kiel erarinta ŝafo. Sed apenaŭ mi ekvidis Doran, kvazaŭ la suno eklumis en mia animo! Klare mi vidis, kia mi devas kaj kia ne devas esti. Malaperis la furio kaj peko, kaj en mia koro aperis sankta, kvieta trankvilo, kaj kredo al Dio, al la amo. Kvazaŭ min inspiris la sankta spirito, mi saltis sur heroajn miajn piedojn, eklevis la sabron por verŝi la sangon por la patrujo, por sankta kristana religio. Nun mi estas pli bona, nun mi estas pli kvieta, nun mi estas homo, kaj ĉion — ĉion ĉi faris la kvieta, senpretenda burĝa knabino. Al ŝi ke mi ne repagu? Oh sankta patro, kompatu min!“

La kanoniko ekmeditis. Fine li levis la manojn kaj metinte ilin sur la kapon de l' junulo, diris:

„Fariĝu la volo de Dio — kaj via! Mi volas, filo!“

„Oh dankon, centoblan dankon, sankta patro!“, gaje kisis la junulo la manon de l' kanoniko.

„Post Tri reĝoj!“, respondis Pavlo.

„Nur?“

„Antaŭe mi estas ordigonta la domon en Mokrice.“

„Bone. Sed hodiaŭ vi restos ĉe mi?“

„Ĝis la tagmezo, honorinda sinjoro baptopatro.“

„Kial?“

„Ankoraŭ hodiaŭ vespere mi devas esti en Mokrice, kaj post du tagoj ree ĉe la armeo.“

La saman tagon posttagmeze sidis sinjorino banusino en la bastiono de Samobor-kastelo. La banuso en la armeo, sinjoro de Lernon en Zagreb, kaj la tempo pasas malrapide. La banusino legis libron titolitan: „Amadis de Gaule“, tio estas, „interesaj aventuroj de kavaliro Amadis el Gallujo.“ Momenton ŝi legis, post momento ĵetis la libron en angulon.

Kiel ne? Kiel ke la banusinon ne enuigas ĉi tiu fantazia fabelo? Ŝi sopiris al la vivo, vera vivo: ŝi deziris venki per unua bato. Kaj por kio ŝi bezonas la kompatindan heroon Amadis, interbatalanta kun malafablaj gigantoj, malicaj malgrandeguloj, teruraj teruraĵoj por almiliti sian trezoron. Ĉio ĉi estis enua. Mallevinte la kapon, krucinte la manojn sur la genuoj, enpensiĝis la bela Klara. Kio vi estis? Riĉa edzino de Grubar. Kio vi estas nun? Glorata banusino kroata. Ne, ne! Ĝi estas mensogo — kruda mensogo! Kio vi estis, kaj kio vi estas nun? Komercaĵo — kruda komercaĵo. Kie estas al vi amo, kie la koro? Ĉu vian floron de junecaj tagoj rosigis la amlarmo? Ne. Ĉu kiso el koro ekflamigis viajn, luksajn lipojn? Ne. Ĝi estis sango — kruda, furioza sango, nenio alia. Timeme levis la banusino la okulojn, kaj ŝia rigardo haltis sin sur la pentraĵo. Jen vivon al vi — vi estas ora serpento — vi estas Dalila. Klara saltis en ŝiaj okuloj eklumis larmo. Ĉu ne eksaltis mia koro, ekvidinte lin? Ĉu mi ne volis lin ami kore — Pavlon? Mi falus ja antaŭ lin kvazaŭ Dion. Kaj li min forpuŝis kiel balaaĵon! Mi do devas min venĝi. Venĝi? Ĉu ĉi tiu infera fajrero estas malamo, ĉu amo? Ha ĝi estas amo, flamanta furioza amo! Ĉar Ungnad, Ungnad estas urso, kaj la edzino estas al li aminda nur tial, ĉar ŝi estas virino.

La banusino alpaŝis la fenestron. La varmegan frunton premis ŝi al la vitro. Jen subiras la suno. La nekonstantaj radioj tremetas sur la frunto de l' banusino. Subiras la suno, subiras la espero!
En tiu momento eniris la ĉambron la servisto.

„Kio estas?“, ekdemandis Klara, forklininte la kapon.

„Antaŭ minuto, moŝto via!“, rediris la servisto, „anoncis sin ĉe la pordisto la nobela sinjoro kapitano Pavlo Gregorianec —“

„Kion li diris?“, ektremis la banusino.

„Jes, sinjoro Pavlo Gregorianec kaj irante el la batalkampo donis ĉi tiun leteron por moŝto sinjorino de lia ekselenco sinjoro banuso. Li enmanigus ĝin mem, sed via moŝto bonvolu lin senkulpigi, ĉar estas jam malfrue, kaj al li estas urĝe al Mokricen.“

„Donu!“, elŝiris mortpala banusino la leteron de la servisto „kiu tio estis, kiu?“, kaj ĵetis la leteron sur la tablon.

„Sinjoro Pavlo Gregorianec“, respondis la servisto.

„Foriru!“, eksvingis Klara kaj la servisto foriris. Maltrankvile promenis la banusino tra la ĉambro.

„Li! — Proksime mi! Kaj ne volas antaŭ min, antaŭ banusinon! Ĉu mi estas besto? Ĉu mi estas serpento? Ho ke mi povu lin disŝiri“, daŭrigis ŝi, ruĝiĝinte de kolero. „Ĉi tiun honton mi redonos lin! Ĉokolin scius kiele. Ĉu mi lin alvoku? Ne. Al Pavlo urĝas en Mokricen. Ankaŭ por mi la afero urĝas — ankaŭ mi iros Mokricen!“

Klara eksonorigis!

„Selu mian ĉevalon“, diris ŝi al la servisto.

„Bone, moŝto!“

„Sed selu ĝin rapide! Mi devas — ankoraŭ ĉivespere Mo — ne — Susjedgrad'on!“

„Ĉu mi akompanos vian moŝton?“

„Ne, sola mi iros!“

„Sola, en la nokton?“

„Selu la ĉevalon, ne demandu! Ĉu vi vidas sur la muro tiun pistolon? Mi per kuglo trafendos vian kranion, se viaj piedoj ne estos pli rapidaj ol la prudento.“

Estis bela somera nokto. La ora luno staris super malluma monto, la steloj briletis kvazaŭ lampiroj ĉe herbokovro.

La arbaro sternis sian ombron trans la ŝoseon, en malluma riveretujo spektrumis briliante la lunlumo — dum ĉie kviete, ĉie trankvilo, eĉ cikado ne estis aŭdebla.

El samobora kastelo elflugis flama nigra ĉevalo, kaj sur ĝi nigra sinjorino sub nigra tulo. La ĉevalo flugis, apenaŭ tuŝetante la teron, malantaŭ la sinjorino flirtis nigra tulo, kvazaŭ ke nokte flirtas mortanĝelo per malhelaj flugiloj; apud ŝi sur la tero flugis ŝia ombro, kiel malbona konscienco de peka

animo. Ŝi eĉ mem ektimis de sia ombro. Nun ŝi kurigas la ĉevalon al la Karniolia limo. Jen en la lunlumo blankigas kastelo Mokrice! Kaj pli vigle kurigas la virino la ĉevalon. Nun ŝi estas antaŭ kastelo, nun desaltas la ĉevalon. Dank' al Dio, la pordego estas ankoraŭ malfermita. Ŝi eniris.

„Kiu vi estas?", ekdemandis en miro la pordisto.

„Hejma! La estrino de via estro, silentu do", ordonis la sinjorino, „jen al vi oran riglilon por via buŝo. Konduku min al li."

„La sinjoro dormas."

„Konduku min al li", piedofrapis la nigra virino, dum el sub nigra tulo aperis blanka mano, kaj en la mano malgranda pistolo, argente enkadrigita.

La pordisto ektimiĝis. Silentante kondukis la sinjorinon antaŭ la kuŝejon de sia estro.

„Foriru", diris ŝi al la servisto, „ne timu pro li; jen tenu, gardu al mi ĉi tiun pafilon." Kaj la pordisto foriris.

Senbrue malfermis la virino la kuŝejpordon kaj eniris, kaj haltis kvazaŭ ŝtono.

La kuŝejo estis malgranda. Tra alta fenestro lumis ora lunlumo kaj falis sur la ripozilon, sur kiu kuŝis vestita Pavlo. La lunlumo briletis sur luma armilaro, staranta super lia kapo, tremetis ankaŭ sur bela vizaĝo de l' junulo, dormanta. La unuasonĝo lin ekfaligis. Li estis bela, trobela. Super la fermitaj okuloj malleviĝis longaj malhelaj okulharoj, ĉirkaŭ blanka frunto falis nigregaj haroj, dum liaj lipoj ridetis, ĉarme ridetis. Verŝajne li en sonĝo rigardis amindan figuron. La virino disigis la tulon, la luno perfidis ŝian palan vizaĝon — Klara! Mute ŝi staris, mute observadis la junulon, kvazaŭ kiam vi staras rigardante kristalan lagon, en kiu respegulas sin la luno kaj steloj. Sur la brusto ŝi krucis la brakojn, apenaŭ ŝi spiris. Ekĝemis! Kaj stariĝinte super la kapo del' junulo, kisis lin senbrue sur la frunto.

„Dora!", ekmurmuris Pavlo el sonĝo, ĉarme ridante.

„Ve!", ekkriis Klara kaj kiel serpento salte leviĝis.

„Kiu estas?", ekkriis Pavlo, vekiĝinte.

„Mi — —"

„Kiu?"

„Klara", kaj kvazaŭ svenita mallevis Klara la belan kapon al sia brusto.

„Vi — vi — ekselenca sinjorino? Kio do kondukas vin ĉi tien dum malluma nokto, sub fremdan tegmenton, en ĉi tiun kuŝejon?"

„Kio min kondukas ĉi tien? Demandu la furiozantan sangon, kiu rapidas tra la vejnoj kiel venena serpento. Demandu ĉi tiun lokon, kie al aliaj homoj frapas koro, dum al mi ventegas uragano. Demandu ĉi tiun cerbon, kiu ne pensas, ne prijuĝas, sed nur vian postsignon spionas — vian postsignon!" — La voĉo de l' banusino tremetis kaj brilantaj larmoj brilis en ŝiaj okuloj...

„Ĉu vi forgesis, ke vi estas la edzino de alia?"

„Mi ne forgesis."

„Ĉu vi scias, ke vi estas kroata banusino?"

„Mi scias!"

„Kaj tamen —"

„Kaj tamen mi metis ĉion sub la piedojn kaj venis ĉi tien. Jes, mi venis ne propravole, ne laŭ mia decido, io min pelis, pelis, kaj se eĉ antaŭ ĉi tiu kastelo estus aperinta infera fendego, ĝi min ne haltigus. Pavlo, Pavlo", eksingultis la virino genufleksinte antaŭ la junulon. „Aŭskultu min! Nur unu fojon mi amis en mia vivo — vin amis. Ĉu vi scias, kiel ruliĝas rapidfluo, kiam printempe krevas glacia ŝelo de monta rivereto? Kiu ĝin haltigos? Moku min, mi vin amos; malbenu min, mi vin amos; piedpremu min, mi ree vin amos. Mi estas la edzino de alia, jes. Sed pastro ligas sole la manojn, ne la korojn; la koroj ligas sin mem. Pavlo, mi servos vin kiel servistino sian mastron, mi adoros vin kiel Dion, nur kuru kun mi for de tie ĉi, for el la lando, trans la maron. Mi petas, petas!"

„Sufiĉe, sinjorino!", salte leviĝis la junulo, dum liaj vangoj ekflamis de kolero, „mi vidas vi

estas malsanema, febro vin trakuras. Por ke mi vin resanigu, mi diros al vi trion: Pavlo Gregorianec estas nobelulo, militisto kaj fianĉo!"

„Fi — anĉo!", saltis Klara, de teruro larĝe malferminte la okulojn, „vere do — —"

„Triobla honesto min ligas, moŝto sinjorino, ke mi ne povas sekvi vian voluptan deziregon. Unu fojon dum mia vivo plektadis sin ora serpento ĉirkaŭ mia koro, sed mi ĝin prenis kaj ĵetis for de mi. Tio estu sufiĉa por vi, forlasu tuj ĉi tiun kastelon, — ĉar mi estas fianĉo!"

„Do vi — vi edziĝos kun Dora?", ekdemandis Klara ĝemante.

„Jes kun Dora, sinjorino, kies vestorandojn vi ne estas inda kisi!"

„Ha, ha, ha!", ekridis Klara, „je infero kaj paradizo, vi ŝin ne prenos", kaj kvazaŭ freneza forkuris la banusino.

La luno kaŝiĝis post la brancaro, dum mallumo sterniĝis pluen kaj pluen. Tomba silento. En Mokrice songas Pavlo pri Dora — jen kiel ŝin persekutas nigra flugilhava serpento — nun ĝi ŝin atingis — nun ĝi ŝin ekkaptos —ne tio estas serpento — tio estas vi, Klara! En samobora kastelo, en sia bastiono sidas Klara sur la tero. Ŝia brusto nudigita, haroj malligitaj, apoginte kubutojn per la genuoj rigardaĉas ŝi la pentraĵon murmuretante: „Dalila, Dalila, Dalila!"

XX.

Je Tomaso festo en jaro 1597. kunvokis la banuso kroatajn sinjorojn Zagreben en ŝtatan kunvenejon. Li kunvokis ankaŭ sian armeon, por ĝin inspekti, por ke ekiru kontraŭ la turkoj kaj rebonigu kion li malsaĝe malbonigis. Memkompreneble tio tute ne gajigis la zagrebanojn, ĉar ili sciis, ke la sinjoroj estas ĉagrenintaj je ili, kaj ke povas de tio fariĝi malbono, precipe depost kiam estis Ivan Jakopoviĉ per kuraĝa parolo en poĵuna parlamento malkovrinta neaŭdeblan perforton de kelkaj sinjoroj. Tial ili kun tuta forto klopodis, ke la kurio diru la sian kontraŭ Stjepko Gregorianec. Kaj tie ĉi tre ekhelpis ilin princo Ĝuro Zrinjski, la reĝa t a v e r n i k o, kiu alie malmulte sin miksis en la disputoj de kroataj sinjoroj kaj kiu pro sia granda heroeco estis pli favorata ol amata de la reĝa kortego. Ĝuro sciis movigi la proceson, atentegante, ke la tribunalo ne flankumu de rekta vojo. Estis jam la tempo. Sinjoro Stjepko heroaĵis leone kontraŭ turkoj, volante per tiaj heroaĵoj kovri siajn pekojn, faritajn hejme. Lia filo Niĉjo edziĝis kaj vivis ekster la patra domo kun sia juna edzino. Estinte tiel la maljuna Stjepko sola, kaj ĉagrena je sia filo Pavlo, eniĝis en sian malgajan malafablan animon, volonte prenante ĉiun okazon, por ke li sur sanga batalkampo distriĝu, kaj sian kaŝitan furiozon dronigu en turka sango. Tiaj heroaĵoj tre plaĉis al Ungnad, ĉar Stjepko estis lia — dekstra mano. Tial li malmulte atentis la plendojn de zagrebaj burĝoj, defendante sian vicbanuson en ĉiuokazo: kiel antaŭ la reĝo tiel antaŭ parlamento. Kaj Stjepko ne zorgante la kolrompeblan proceson en Poĵun, pekadis kiel eble plej je tiu konto. La zagrebanoj ne kuraĝis jam iri al Sava-pramo, ĉar ilin tie la servistoj de Gregorianec senkompate atendis kaj prirabis. Ankaŭ sur Zagorje'a ŝoseo spionadis la homoj de l' vicbanuso zagrebajn komercistojn, rabante de ili la tutan komercaĵon. Urbaj servutuloj en Graĉani plorplendis kaj ĝemis, ĉar la vicbanuso rabigis al ili en urba arbaro gebovojn, porkojn kaj kaprojn. Jes, eĉ honorinda zagreba kapitolo kviete rigardis, kiel la servistoj de Gregorianec sur kapitola posedaĵo martiras la urbajn oficistojn, kiel la vicbanuso senkompate prirabadis la vinberejojn burĝajn en Bukovec.

„Kvietiĝu, fratoj!", konsoladis la sagaca Jakopoviĉ malkvientajn burĝojn, „kvietiĝu, iras tempo portas ŝarĝon. Kiam la mezuro estos plena, akre ni al la tirano toston maldolĉan tostos!"

Unu semajnon antaŭ sª Tomaso alveturis en la urbon en krepusko granda veturilo, ekskortita de aro da kavaleriistoj. Sur la placo de sª Marko la veturilo haltis.

„Kie estas la juĝisto?“, eksplodis malafabla kavaleriisto kontraŭ mizera Garuc, kviete staranta antaŭ magistrato, kvazaŭ kalkulante la neĝerojn, kiuj malrapide malleviĝis de malhela ĉielo. La malfeliĉulo tre ektimis.

„Ju-u-u-ĝisto! Tio estas sinjoro urba juĝisto?“, ekbalbutis Garuc.

„Do jes, malsaĝa kapo!“, akre rediris lin la malafablulo. „Kial vi glutas la vortojn, stultulo? Ĉu panbulo sidas en via gorĝo?“

„Ne—e, via moŝto!“, ektremis Garuc. „La juĝisto, tio estas sinjoro urba juĝisto estas tie ĉi — tie ĉi en la magistratejo — li faras kalkulojn.“

„Vi do, ligna sanktulo, ekkuru kiel eble plej rapide, kaj diru al via juĝisto, ke li lasu la kalkulojn, ĉar alvenis Zagrebon iliaj sinjoraj moŝtoj gebanusoj. Tial la juĝisto rapidege prizorgu por loĝejo, por forno, ĉu vi komprenis, mutulo?“, finis la dekestro de l' banusaj kavaleriistoj.

„Je—es! Via sinjora moŝto estos servita!“, rediris Garuc malalte kliniĝinte, kaj ekkuris supren laŭ la ŝtuparo al la ĉambro de l' juĝisto por ĉion, laŭ ordono, raporti. Dum ĉio ĉi okazadis, observadis la ekskorton da banusanoj mizera junulo, kaŭranta sub la arkaĵo de l' magistratejo. Tio estis Jerko. Malsaĝe li okulaĉis la kavaleriistojn kaj veturilon, iafoje kun stulta rido la kapon balancante al urbaj policanoj, al kiuj la mutulo estis tre konata.

Post nelonge eliris antaŭ la pordon Jakopoviĉ. Alpaŝis al la veturilo, demetis la ĉapon kaj diris:

„Bonvenu, ekselenca sinjoro banuso, estu salutata, eminenta banusino, en tiu ĉi urbo! Jen mi jam ordonis al la notaro Verniĉ, ke viajn moŝtojn konduku en la urban loĝejon, ke ĉion preparu laŭ la deziro de viaj moŝtoj.“

„B e n e, b e n e“, rediris malafable Ungnad el la veturilo, „nu rapide, sinjoro juĝisto! Jam bone! Sed ke nur fariĝu rapide, ĉar vi vidas, sinjorino banusino tute tremas de tiu malbenita malvarmo. N o t a b e n e! Ne forgesu la fornon kaj vespermanĝon!“

„Mi zorgis pri ĉio, sinjoro banuso!“, rediris la juĝisto. „Ho Garuc, kuru por hejti la fornon. Kaj nun mian komplimenton al via ekselenco kaj mi deziras al via moŝto kaj al eminenta sinjorino banusino — feliĉan nokton!“

„Bonan nokton, kara juĝisto! Bonan nokton!“, rediris la banuso; „forportu lin diablo!“, ekmormuris li mallaŭte.

Ĉar tiamtempe la banusoj ne posedis sian konstantan loĝejon en Zagreb, tial ke ili loĝis ekster la urbo en siaj firmaj kasteloj, devis zagrebanoj ĉiaokaze havigi loĝejon al la banuso, veninta Zagrebon. Sekve sinjoro notaro Verniĉ kondukis la banuson ne malproksime de l' magistratejo, en brikan domon, destinitan por la loĝejo de la banuso. Ungnad kaj Klara enloĝiĝis tie, dum la notaro prizorgis, ke ankaŭ sinjoro Melkior Tompa havu la tranoktejon. Por ke sinjorino banusino dum tiu kreviga malvarmo iomete varmigu sin, metis Garuc, la ŝarĝon da lignoj sur sia mizera dorso, por ilin transporti el la magistratejo en la banusan loĝejon. Vidinte Jerko kurbiĝantan mizeran tamburiston sub peza ŝarĝo, saltis, prenis Garucon ĉe maniko kaj duonon da lignoj ŝarĝis sur sian mizeran dorson, ke estu al la mizerulo pli facile. Kaj ambaŭ ekiris por varmigi la noktejon de l' banusino.

Malkontete promenis la banusino tien reen tra la vasta ĉambro, kalke blankigita. Kiam la argila fornego forte varmiĝis, ŝi demetis la drapan mantelon kaj promenis plu rapidpaŝe. Ŝia bela frunto estis malserena, ŝia brusto maltrankvile leviĝadis. La banuso sidis ĉe la tablo, foliante diversajn leterojn. Je unu fojo levis Ungnad la okulojn kaj komencis observi sian malkontentan edzinon.

„Kio do estas al vi, mia sinjorino?“, ekdemandis li Klaran, kial vi estas tiel malgaja?“

„Nenial“, rediris la banusino.

„Diru ja, kio vin doloras?“

„Kio min doloras? Ĉu mia Krsto havos sanigilon por tio?“

„Kiel ne. Ĉu mi ne estas banuso?“

„Dankon je tia banuseco. Tie ĉi do ni kristnaskos en ĉi tiu dezerta groto! Belan dankon je tiu ĉi beleco kaj komforto, preparitan al vi de zagrebanoj. Ĉu tio ĉi estas loĝejo por banuso? Eĉ la monaĥoj havas pli belajn loĝejojn.“

„Sendube tio estas vera.“

„Belaj homoj, tiuj zagrebanoj.“

„Nigraj malnobluloj, sinjorino mia.“

„Jes, nigraj malnobluloj, eĉ pli. Ĉu tiel oni akceptas la gebanusojn?“

„Vere, tio estas malnoblaĵo.“

-„Kaj tiu fiera juĝisto! Ĉu vi vidis lin? Anstataŭ servi nin persone, jen li sendas siajn homojn. Mi — mi malamas tiun Jakopoviĉ.“

„Ankaŭ mi malamas lin.“

„Ĉu vi scias, ke ĉio ĉi estas ĝusta spito kontraŭ mi? Ĉu vi scias?“

„Kiel, kial?“

„Banuso — sinjoro — Krsto, ĉu vi amas min? Diru la veron, ĉu vi amas min?“, daŭrigis Klara per kvieta tono kaj kroĉis la blankan brakon ĉirkaŭ la nuko de l' banuso.

„Vi demandas, ĉu mi vin amas?“, rediris la banuso duonmirigita, dnonekscitita.

„Ĉu vi pro mi faros ĉion, kion ajn mi ekdeziros?“

„Ĉion!“

„Kaj ne pridemandos, sed agos nur laŭ mia volo?“

„Jes.“

„Bone. Venĝu min!“

„Vin? Al kiu? Kaj kial?“

„Al zagrebanoj“, finis Klara kaj ravige rigardante la banuson, malleviĝis sur la seĝon apudan. „Jam longe bolas kolero en mia koro kontraŭ tiuj malkuraĝuloj. Mi procesis kun samoboranoj. Ili rifuzis al mi tributon. Mi per forto atakis ilin, sed ili kontraŭstaris kaj furiozante mortigis mian kastelmastron. Mi volis puni la krimulojn, sed du la plej grandaj el ili transkuris Zagrebon. Mi dirigis al la magistrato, ke oni transdonu al mi la samoborajn

krimulojn; sed ili ke ne volas, ĉar burĝo devas defendi burĝon. Pleje kontraŭstaris la maljuna orajisto Krupiĉ. „Ne fordonu mizerajn niajn fratojn“, li diris, „sinjorino Grubar estas furioza lupino. Ŝi buĉus ilin en sia diabla nesto. Ni ilin ne fordonu.“ Kaj ankoraŭ ili dirigis al mi, ke mi ne konsumu tiom da senkulpa sango, ĉar lavu mi min kiel ajn, banu mi min en sango, ke mi tamen kiel ĉasta virgulino ne eliros el tiu bano — mi ke restos Grubareva.“

„Ĉu tion dirigis al vi tiuj bestidoj? Tion?“, kolere saltis la banuso. „Nu atendu, mia Klara, mi lernos pri respekto tiun butikistan fiinsektaron! Je mia sabro, mi ĝin faros.“

„Oh mia estro!“, daŭrigis la banusino larmante, „tio tuŝis mian koron, kvazaŭ min serpento mordis. Sed ankoraŭ pli! De tiu tago levis la samoboranoj kontraŭ mi sian malican langon. Ili kunmetis mokajn kantojn kaj rimojn pri mi, kantante ilin kune kun zagrebanoj tra la foirejoj. — Ĉu vi aŭdas, moke al mi.“

„B e n e, b e n e!“, rediris Ungnad, „mi kantos al tiuj kanajloj, kiel kantas la kato al la musoj! — Trankviliĝu, kara Klara, trankviliĝu! Memoros zagrebanoj, kio estas banuso Ungnad!“

„Sed, ĉu vi ne havas rajton puni ilin, la krimemajn friponojn, ĉu vi ne havas kaŭzon, se ili eĉ ne estis ofendintaj vian edzinon“, pli vigle daŭrigis la banusino. „Ili ja ne volas respekti vian tribunalon, nek vin, la landestron, sed fieriĝas kaj taksas sin pli bonaj, ol ceteraj nobeloj de la regno.“

„Jes, jes!“, jesis Ungnad, tordante ruĝetajn lipharojn, „prave vi diras, ho banusino!“

„Krsto!“, petis Klara, „se estas vero, ke vi min sincere amas, Krsto pruvu ĝin nun, venĝu min nun, vipu tiun fiinsektaron per venenaj serpentoj de via koleregо, ĉar je Jesuo kaj Maria, ĝis kiam vi ne plenumos, kion mi diris, mi ne permesos al vi min eĉ ektuŝi!“

„Ho-ho-o! Ne koleru, mia Klarnjo, ne koleru“, ekridis sinjoro Krsto, „Dio vidu vin, ĉion mi faros, kion vi ekdeziros, mi eĉ pli faros. Ĝuste, bone estas,

ke venos mia armeo, mi enloĝigos perforte miajn soldatojn ĉe zagrebanoj; miaj bonaj homoj manĝu kaj trinku kiel akridoj sur plena spiko, ĝis kiam ili ne malplenigos ĉiujn zagrebajn kuirejojn kaj kelerojn; ĉio, ĉio estu por festeno al miaj soldatoj: zagrebaj staloj, fojno, brutaro — kaj virinoj!"

„Ha! tia estas bona!", rektiĝis Klara dum en ŝia okulo trakuris flamo, „nun mi vidas, ke vi amas min, mia sinjoro!", kaj la edzino ĉirkaŭprenis la banuson pasie, furie.

La sekvintan tagon ekvenadis la armeo de l' banuso Zagrebon. De tamburoj kaj trompetoj resonadis la urbo. Unue kroataj bluetaj kavaleriistoj kun longaj lancoj; tiam kavaleria b a n d e r i o de aliaj kroataj sinjoroj; poste flavaj karnioliaj piedistoj dungantoj, du fortaj bandoj de vlahaj haramioj, limaj bombardistoj, stiriaj kirasuloj kaj unu standardo kun hispanaj dragonoj kun longaj glavoj. La armeo ne iris kutime al ia bivako proksime de la urbo, sed trupo post trupo enmarŝis la urbon, kaj loĝiĝis perforte ĉe la geburĝaro. Pala de kolero venis la urba juĝisto en loĝejon de la banuso.

„Kio estas, mia bona juĝisto?", ekridis moke la banuso sidante ĉe kruĉo da vino.

„Kion, ekselenca sinjoro, vi demandas?", rediris la juĝisto, pene haltigante sian koleron. „Pardonu min via moŝto, sed mi miras tian pridemandon. Ĝis nun ĉiam estis kutimo, ke la banusa armeo loĝas sub tendaro, sed jen nun marŝas trupo post trupo en la urbon; la soldatoj perforte invadas en la domojn, disrompas la pordojn, loĝiĝas kontraŭ leĝo ĉe kvietaj burĝoj, postulante, ke oni havigu al ili manĝaĵon kaj trinkaĵon. Kaj de kie? Ĉu via moŝto ne scias, ke estis malbona rikolto, ke mankas grenaĵo en la urbo, ke minacas malsato?"

„Malsato? Ha! Ha! Ha!", rediris la banuso. „Vi rakontas al mi teruraĵojn, kiujn mi verdire ne povas kredi. Malsato — kaj viaj dikaj sinjoroj de la magistrato! Iru vi, vi ŝercas!"

„Mi parolas la veraĵon, sinjoro banuso, je viva

Dio, ni estas malriĉaj, kaj viaj soldatoj estas malsataj lupoj. Mi ne scias, kies estas tiu ĉi ordono, ke oni surmetas tian ŝarĝon al la mizera urbo, sole mi scias, ke tio estas pura forto kontraŭ pravo kaj justeco."

„Ĝi estis mia ordono, juĝisto", brufrapis la banuso per pugno la tablon, „mia ordono, ĉu vi komprenas?"

„Sed tiu ordono ne valoras, moŝto sinjoro!"

„Mi estas via gasto, miaj soldatoj estas al mi infanoj, e r g o vi devas nutri ankaŭ ilin. P u n c t u m. Se viaj sinjoroj burĝoj nur eksiblos, mi montros al ili, kio estas Ungnad, do se vi ne estas kontenta, iru vin tiam Poĵunon plendi min. Adiaŭ!"

„Mi ankaŭ iros, Dio estas mia atestanto", rediris la juĝisto kaj foriris.

Dum la banuso kaj juĝisto tiel vive disputis, en alia flanko de la domo babilis Klara kun sinjoro de Lernon.

„Virinoj, vi diras, ke estas egoistaj", ekridis la banusino, eltirinte la manon el la dekstra de l' ĝentila markizo. „Ne, ne, markizo! Ĝuste virinoj oferas al viroj pleje."

„Pro egoismo, moŝto sinjorino!", rediris la markizo.

„Parolu ni sincere. Vi volas diri, ke vi almilitis Klaran de Ungnad, ĉar Klara volis vin superregi, ĉu ne? Tio estas iome vero, ĉar sinjoro Krsto Ungnad — — havas multe da ŝtataj okupadoj. Ĉu tiel estas? Sed sinjoro markizo de Lernon ne adoras en tiu dezerto nur unu stelon. Klara de Ungnad estas lia amaĵistino, sed krom ŝi ankaŭ la aliaj."

„Moŝto sinjorino!", ruĝiĝis la markizo.

„Silentu, silentu", rediris la banusino, „mi scias ĉion, sinjoro Bernardo, ĉion. Ankaŭ mi havas fidelulojn. Sed mi ne koleras. Mi estas nur duone via edzino, ĉu mi povas postuli, ke vi estu sole mia? Jen, ke mi ne estas egoista. Libere serĉu vi la mielon en aliaj floroj, Bernardo, mi scias, ke vira sango ne estas fidela."

„Klara!"

„Silentu! Aŭdu min! En ĉi tiu urbo troviĝas trebela knabino, Dora, filino de l' oraĵisto Krupiĉ. Mi malamas tiun knabinon, mi deziras malbonon al ŝi. Ne demandu, kial. Do kiel mi diris, mi ne estas egoista. Mia servisto Ĉokolin povas vin certigi, ke Dora estas belega, kaj mi amos vin pli forte, se vi amos Doran."

„Klara!"

„Nenion plu. Mi malamos vin, Bernardo, se vi ŝin ne amos. Adiaŭ!"

Kaj la markizo disiĝis de la banusino.

Malsuprenirante la ŝtuparon la kolonelo meditis pri la senco de la vortoj de Klara. Apud pordego troviĝis kelke da banusaj servistoj, nedelikate ŝercantaj kun surd-muta mizerulo Jerko.

„Oj! Aŭdu min!", sin turnis la kolonelo al unu el la servistoj, „ĉu vi scias, kie estas la domo de l' oraĵisto Krupiĉ?"

„Apud Kamenita-vrata, via moŝto!"

„Kaj ĉu vi scias, kie mi povus trovi la de la banusino serviston, Ĉokolin?"

La mutulo elreviĝis kvazaŭ lin serpento mordis.

„Ĉokolin dum tago estas malfacile trovebla, via moŝto", rediris la servisto, „li estas kvazaŭ strigo, ne montriĝas al la publiko, sed nur dum nokto rondiras. Sed jes, li loĝas en la domo de s° trezoristo Konjski, tie li tage dormas."

„Bone!", rediris la kolonelo kaj ekiris al Kamenita-vrata. Lin sekvis Jerko.

La kolonelo eniris la magazenon de l' oraĵisto.

„Bonan tagon, moŝto sinjoro!", salutis lin Krupiĉ ĉe la amboso.

„Bonan tagon, majstro!", kroataĉis la kolonelo. „Jen majstro, mi bezonas arĝentajn spronojn, nu faru ilin al mi."

„Via sinjora moŝta estos servita!", rediris la oraĵisto, „mi havas jam faritajn. Dora, Dora!"

Post nelonga tempo aperis Dora.

„Kion ordonas vi, kara patro!", ekdemandis la knabino.

„Belega ŝi estas!", opiniis la kolonelo, „prave diris Klara".

„Alportu el la kamero arĝentajn spronojn por moŝto sinjoro."

„Tuj, kara patro!"

En ĉi tiu momento malfermiĝis la pordo kaj mizera mutulo Jerko etendis senvorte sian ĉapelon, almozon petante, sed sekrete observante la kolonelon. Dora revenis, kaj la kolonelo komencis elekti la komercaĵon kaj rigardi la filinon de l' oraĵisto.

„Donu, Dora, denaron al mizera Jerko!", diris la maljunulo al la knabino.

Tiam la junulino direktis la manon al sia monujo kaj ĵetis ridetante al la mutulo krajceron en la ĉapelon, dum la mutulo dankis balancante per la kapo kaj rigardante Doran per sia brilanta okulo kvazaŭ ian sanktulinon.

„Prave diris Klara", ekmurmuris la kolonelo, „fariĝu laŭ ŝia volo. Nun al Ĉokolin."

XXI.

„Do nenion?", saltis furioze la banusino preskaŭ renversinte de kolero la lampon, apude starantan.

„Bedaŭrinde nenion, moŝto sinjorino", respondis Ĉokolin, levinte la ŝultrojn. „Kompatinda sinjoro markizo de Lernon malmulte dankos al sinjorino banusino por tiu amaĵa konsilo, ĉar lia dorso meze de kreviga vintro fruktiĝis per prunoj."

„Diru, Ĉokolin, kiel ĝi estis, diru?". ekdemandis la banusino forŝovinte la riĉegajn buklojn de la frunto.

„Ĝi estas tre malgaja rakonto, moŝto sinjorino! Ian tagon venis al mi sinjoro de Lernon en la domon de s° Konjski, laŭ via instigo, kaj komencis eldemandi min pri Dora Krupiĉeva. Mi tuj komprenis kien tio celas. Mi kondukis lin en la ĝardenon, ke nin neniu viva rimarku, kaj tie mi diris al li, kiamaniere estos ĝi efektiviĝebla. Kredu min, via moŝto, min ankaŭ tre ĝojiĝis tiu diablaĵo, ridante en la animo, kiel sinjorido Pavlo trovos malplenan

kolombejon, ne eksciinte pri la putoro. — Do mi diris: Grga, kunigu vian saĝon, por ke vi braviĝu! Ĉar, bonvolu kompreni via moŝto, mi ankaŭ estas konkuranto de la juna Gregorianec!"

„Vi?", en miro ekdemandis la banusino.

„Jes, mi. Vi ridas, sed tamen estas vero. Kiam mi estis pli bona homo, mi petis ŝian manon, sed la maljuna oraĵisto malkaŝe ekridis al mi. De tiu tempo certe mi iomete malboniĝis, pri la amo mi eĉ ne songas — nun restis nur galo, ĉio ĉi bolas en mi — bolas kiel infera flamo. Sed kial rememoriĝi pri tio? Do mi diris al sinjoro markizo jenon. Inter la ĝardenoj de Konjski kaj Krupiĉ estas alteta muro. Ĝi estu nia vojo. Oni devas atendi, kiam Krupiĉ ne estos hejme. La maljuna Magda ronkas kiel hamstro, eĉ pafilo ŝin ne vekigus. Kaj ĉe Krupiĉ logas du hispanaj dragonoj, grandaj drinkuloj. Al la animoj de tiuj herooj mi gluigos min per brando, kaj sinjoro markizo estas oficiro, antaŭ li ili perfidus eĉ Dion pro submetiĝo, kiel do ne forpreni la knabinon. La dragonoj garde staru, ke la knabino ne faru spektaklon, dum sinjoro de Lernon povas al sia rabaĵo per ŝtupetaro trans la barilo, ĵetas sakon sur ŝian kapon kaj forportas la knabinon en la garbejon de Konjski, kaj finita afero, kaj gaja koro de via moŝto. Tiel mi diris, kaj preskaŭ tiel fariĝis. Mi preparis la ŝtupetaron, venis la nokto, Krupiĉ ekster la domo, Magda ronkas, la hispanoj niaj. Mi rigardis ĉion ĉi el la garbejo. Estis trankvile. Dora sidis en la kamero kaj labrois. Tri foje mi ekgrakis kiel signo al la hispanoj. Kaj tri foje regrakis ili al mi kiel respondo. Estas bone, mi pensis. „Nun oni devas komenci, sinjoro markizo, kaj bonan sukceson!" La markizo suriris la barilon, kaj malrapide malsupreniris per la ŝtupetaro en la ĝardenon de Krupiĉ. „Ho ve!", ekkriis oni el la ĝardeno de Krupiĉ. La voĉo de l' markizo! Al la diablo! Kio estas tio? La hispanoj forestas. „Helpon! Helpon", ĝemadis de alia flanko la markizo. Mi elrigardis trans la barilon. Ho ve! Ia diablo submetis al la markizo kaptilon por lupoj, kaj li sin kaptis en ĝi. Mi volis jam salti por liberigi

lin, sed subite penetris malantaŭ de la domo ia homo, kiun mi ne povis rekoni, kaj komencis senkompate bategi la malfeliĉan sinjoron, dum li ve kaj ve, ke estis kompatinde aŭskulti lin. Alkuris eĉ la burĝoj kun torĉoj, kaj iu forĝisto Blaĵ Ŝtakor komencis forĝi per pugnoj sur la dorso de l' markizo, kriegante: „Tenu la ŝteliston, tenu la rabiston!" Kompreneble mi devis tie ĉi gardi mian dorson, nobela sinjorino; la mortintoj ne leviĝas el la tombo, kaj la zagrebanoj kredas. ke mi estas morta. Mi trenigis min sub la garbejon kaj diris pie:

„Ho ĉiela korto kompatu al la dorso de l' sinjoro markizo!"

„Malbenita malsukceso!", ekkriis la banusino, „kaj kio poste?"

„Poste? Mi ne scias ĝuste. Sole mi aŭdis, ke la burĝoj terure krias, ke sinjoro markizo kuŝas en la lito kiel vundita Jesuo, kaj ke hispanajn soldatojn iu diablo ebriigis, ke ili kiel garboj kuŝis."

„Sed kiu, kiu malbonigis al ni la kalkulon, Ĉokolin, kiu?", ekkoleriĝis la banusino.

„Kiu?", levis la razisto la ŝulbrojn, „tio, tiu demando mordas ankaŭ min. Mi donus eĉ la dekstran okulon, por elflari tiun sekretan manon, kiu disŝiris mian araneaĵon. Mi sidis la tutan tagon en unu loko, cerbumante, sed nenion kaj nenion. Je mia razilo, se en mi estas trunketo da kredo en mirakloj, mi suspektus, ke ĝi estis Dio mem. Sed ĝi devis esti homo, ĉar nek Dio nek spirito submetas kaptilojn por lupoj. Ĝustadire, via moŝto, mi estas disiĝonta de vi, mi estas forlasonta la malfeliĉan Zagrebon."

„Vi ĉu foriras?"

„Mi devas."

„Sed kial?"

„Mi timas, ke iu trovis mian posesignon, kaj tio estus malbone por mi."

„Vi ne devas for de mi", ordonis la banusino.

„Kaj kiu min malpermesas?"

„Mi."

„Kiel? Per kio?"

„Mi perfidos vin."

„Kaj mi vin.“

„Memoru, malkuraĝulo, ke mi estas banusino, kiu kredos al tia sentaŭgulo?“

„Estas vero“, almetis malkontente la razisto. „Al la diablo, mi foregisis pri juĝistoj kaj leĝo. Sed kion vi volas de mi?“

„Pavlo volas edziĝi kun Dora!“

„Kompreneble. La unuan tagon post Tri Reĝoj edzigos ilin la kanoniko Vramec.“

„Tio ne devas okazi.“

„E, ĝi ne fariĝu. Al mi estas ĝuste.“

„Ne ŝercu. Vi devas ĝin malhelpi.“

„Do kiel?“

„Estas via zorgo.“

„Mi lasos mortigi la sinjoridon sur la ŝoseo post la arbetaĵo. Ĉu tiel estas bone?“

„Diablo!“

„Aŭ — —“

La razisto sufloris ion en la orelon de la banusino, kaj ŝi kapjesis.

„Jen al vi oron!“, almetis laŭte la banusino, etendante al la razisto plenan monujon.

„Dank' al Dio, ke mi ekkonis viajn planojn. Sed kiam ĉio finiĝos, ĉu mi povas for el Zagreb?“

„Vi povas.“

„Sed antaŭe mi venos por mia vojaĝokosto.“

„Venu!“

„En tiu momento ekflugetis la ombro antaŭ la pordo de l' banusino en la koridoro, malaperinte el la domo. Kantetante kaj tintante per plena monujo ekiris la razisto al sia noktorestejo eĉ ne rimarkinte la ombron.

Ĵus eksonis tra la nokta silento la raŭka sono de Garuc:

„Ho mastroj kaj mastrinoj, la dekdua batis!“

„Ha, ha!“, ekmurmuris por si la razisto, „mia amiko Garuc kokorikas la noktomezon. Ĝi estas ies funebra kanto!“

La ombro kvazaŭ de malproksime sekvis la piedosignojn de Ĉokolin. Vidinte, ke la razisto estas enirinta en la domon, li sin direktis al urbaj mu-

regoj, malrapide malsuprenirinte ĝis la bordo de l' rivereto Medvednica. Antaŭ malgranda kabano tri foje ekfajfis.

„Kiu estas!“, sonis basa voĉo, kaj el la kabano eliris haramio Radak. „Ĉu vi estas, Jerko? Sufiĉe mi vin elatendis. Kiajn novaĵojn portas vi?“

„Malbone estas — tre malbone!“, rediris mallaŭte Jerko. „Iru, Miloŝo, iru, kuru en Mokricen. Klarigu al Pavlo, kiel la franca kolonelo volis pereigi Doran, kaj kiel mi malbonigis liajn kalkulojn. Sed ŝi ankoraŭ ne estas savita. Vi scias, ke mi ofte vizitas la loĝejon de la banuso. Kiu zorgas pri mi? Muta kaj surda mi ja estas. Mi alpuŝigis min ĝis la pordo de l' banusino. Ĉe la banusino estis tiu krimulo la razisto.

„La razisto?“, rediris medite la haramio, „la pafilon mi fordonus, se mi povus lin vidi.“

„Mi subaŭskultis. Ili parolis malbone pri Dora — kaj murmuretis. Malbono estos. Oh Miloŝo, je la tombo de via Mara, kuru, diru al Pavlo, ke li venu, ke li rapide venu, mi ĉi tie atentos.“

„Je honorinda kruco, mi sufokus ĉiujn, sed nun mi iras. Jerko! Bonan nokton!“

Minute malaperis la haramio, malaperis ankaŭ Jerko, kaj en la nokta silento estis aŭdebla nur la murmuretanta rivereto.

Matene unu tagon antaŭ Tomasa festo sidis la juĝisto Jakopoviĉ en sia ĉambro en urba domo. Morgaŭ devas kunveni la parlamento, kaj hodiaŭ inspektos la banuso tiujn kelkajn trupojn por sendi ilin kontraŭ la turkoj. Malkviete karesis Jakopoviĉ sian frunton, meditante, kiel li morgaŭ malkovros la perforton de l' banuso, perforte enloĝiginta malsatan kaj soifantan armeon kontraŭ rajto kaj moro.

Je unu fojo elreviĝis el siaj meditoj la juĝisto, antaŭ la pordo ektintis spronoj kaj antaŭ la juĝisto aperio Melkior Tompa de Horŝova, adjutanto de l' banuso.

„Sinjoro jugisto!“, malafable koncizis la mili-

tisto, „bonan tagon. Min sendas lia ekselenco, sinjoro banuso.“

„Kion do deziras lia ekselenco, ho nobela sinjoro“, kviete ekdemandis la juĝisto.

„Mia ekselenca estro tre koleras je la urbo. Kaj kiel ne? Li malsatas, vi ne nutras lin, li soifas, vi ne tringigas lin, li malvarmas, vi ne varmigas lin, dum la noktoj estas mallumo, kaj vi ne lumigas al li, la armeo ankaŭ malsatas kaj soifas.“

„Nobela sinjoro!“, rediris la juĝisto, „vere mi ne konas tiun leĝon, laŭ kiu devus ĉi tiu nobela urbo nutri, trinkigi kaj varmigi sinjoron banuson. Li estas nia gasto, do kion oni povas fari oni faras bonvole, kvankam la urbo estas malriĉa, ĉar la hajlo la tutan nian rikolton nuligis. Nia ora bullo citas nur ke la urbo donu al la banuso bovon kaj cent panojn, kiam li unuan fojon venas Zagrebon, sed tio ne povas okazadi sen fino, kaj tiom malpli ni estas devigitaj nutri lian grandan armeon. Ke la armeo malsatas kaj soifas? Kion mi povas por tio? Kiam ĝi ĉion formanĝis kaj fortrinkis, kio estis en la urbo, tiel ke ĉe la malriĉaj aperas la malsato, kiam la mizera popolo devas manĝi sekan herbaĵon anstataŭ karno. Tion ĉi diru vi al sinjoro banuso.“ —

„Tion ĉi mi ne volas diri al li, tio min eĉ ne koncernas“, rediris la militisto. „Sole al vi, juĝisto, mi sciigas la ordonon de la banuso, tio estas: ke la urbo devas ĉiutage doni al sinjoro banuso dum restado en Zagreb, dek pokalojn da malnova vino, dek panojn, dek funtojn da bona bovaĵo kaj dek vakskandelojn, kaj krom tio avenon kaj fojnon.“

„Kaj mi diras en la nomo de la urbo, kies estro kaj juĝisto mi estas, ke ni tion ne donos!“, decide rediris la juĝisto.[1]

„Jam bone, ho juĝisto, vi ne donu, ni tiam prenos!“, ekkriis la adjutanto.

„Kaj mi solene protestas en la nomo de la tuta burĝaro kaj loĝantaro de la nobela urbo.“

[1] Autentika. Rim. d. t.

„Protestu se eĉ ĝis la lasta tago. Nun vi scias, kio vin atendas. Adiaŭ!“, finis Tompa kaj foriris.

Post kelka tempo eksonoris sur gardoturo la sonorileto: „Habernik“.

„Brulas, brulas!“, oni aŭdis tra la stratoj. Virinoj, infanoj, burĝoj kuris palaj tra la urbo.

Kaj la sonorilo pli forte eksonoris.

„Brulas, brulas!“

„Kie, kie?“

Kompatu al ni Dio kaj sa Florijano!“ Num eksonoris ankaŭ la sonorilo de sa Marko. Teruro trakuris la burĝaron.

Ekscitita ekkuris la juĝisto al „Dverce“ sur urban muron. Apud la preĝejo de sa Marko leviĝis blanka fumo super la tegmento de unu domo, kaj el la fumo ekflamis flamo. Kies domo estas ĝi?

„Ĝi estas la domo de Marko Tutkoviĉ, sinjoro juĝisto!“, ekkriis unu urba policano, alkurinte laŭ monto sen kasko.

„Kiu ĝin ekbrulis?“

„La rajdistoj de Gregorianec. Kelkkvindek da ebriaj rajdistoj alkuris ĝis sa Margareta kaj komencis pafi el pistoloj kontraŭ la tegmento. Estas nura pajlo. Ĉio pereos. Malfeliĉa Tutkoviĉ!“

„Kial vi do ne defendis?“, ekdemandis severe la juĝisto.

„Mi ja volis, sed ili komencis pafi kontraŭ mi. Kaj nun ili ekiros al Harmica, kaj tie brulados la domojn.“

„Kuru kiel eble plej rapide al la urba domo! Kvindek burĝoj prenu la pafilojn kaj iru tra Kamenita vrata al Harmica, kun ili iru Krupiĉ kaj Blaĵ Štakor!“

„Oh spectabilis, spectabilis!“, alkuris tute spireganta kaj ploranta la kapelano Šalkoviĉ. „Oh bestiae infernales![1] Vi scias, kiajn belajn pirujojn, pomujojn, prunujojn kaj persikujojn — ĉiuj enokuligitaj arboj — mi havis en la ĝardeno. Kaj ĉiujn, — ĉiujn forhakis al mi tiuj antikristoj — ĉiujn; kaj igis la fajron por rosti la ŝte-

[1] Oh bestoj inferaj.

litan porkidon. Ĉiujn! Mi petas, ke oni s o l e n n i t e r protestu."

„Tie ĉi ne estas alia protesto krom tia!", rediris furioza Jakopoviĉ, levinte la pugnon kaj ekkuris returnen al la urba domo. Sed post du paŝoj haltigis lin plorkrianta dika Ŝafraniĉ la butikisto.

„Sinjoro juĝisto, mian edzinon, mian karan edzinjon atakis spasmoj. Kiel travintros ŝiaj bovinjoj, belaj bovinjoj, a? Kiel? Tiuj antikristoj, tiuj hispanaj dragonoj forportis al ni du garbarojn da fojno. Kaj kion trinkos mia edzinjo? Tiuj antikristoj forportis mian brandon."

„Lasu min, frato Andrija! mi havas pli urĝan okupon; oni devas defendi la urbon", rediris la juĝisto kaj pluen ekkuris.

Sed veninte sur Marko-placon, terura vidaĵo! Ebriaj soldatoj renversis la budon de Magda farinte grandan fajron. La kompatinda maljunulino kuŝis senkonscie sur la ŝtuparo de sa Marko. Ĉirkaŭ la fajro ronde dancis la furiozuloj, svingante per lancoj, sur kiuj estis enpikitaj kokidoj, anseroj kaj pano. Apud la rondo staris granda barelo da vino, kaj sur la barelo rajdis ebria soldato, premante vivan porkidon anstataŭ kantosako. Kaj malproksimete tiradis je haroj hispanaj dragonoj duonovivan urban notaron, Verniĉon. „Sufiĉe!", ektondris Jakopoviĉ, „la mezuro pleniĝis. Ho policanoj prenu la lancojn, kaj ataku tiujn ebriulojn! Ekludu, tamburisto! Oni sonoru flanken, ke la burĝoj armile kolektiĝu. Fermu la urbajn pordegojn! Elveturigu la pafilegojn sur la ĝardenojn. Venigu al mi la ĉevalon!"

En daŭro de minuto atakis la urbaj policanoj per helebardoj la ebrian aron kaj liberigis Verniĉon. La dragonoj kaj piedistoj ekkuris kontraŭ Kamenita vrata, ĉar la armeo staris en vicoj en malsupra urbo. La sonorilo sonoris, la tamburo sonegis, la burĝoj ekprenis la pafilojn kaj lancojn. Kiel fulmo flugis ĉevale la juĝisto, por certiĝi, ĉu la pordegoj estas ĉie fermitaj. Sur la bordo de Medveŝĉak krakis la pafiloj repuŝante tie la banderiistojn de Gregorianec.

„Nun venu al mi Ungnad!", ekgrincis Jakopoviĉ, „ke ni vidu, ĉu li prenos de ni, kion ni ne donas!"

„Jes, jes, sinjoro juĝisto", ekkrietis la malgranda Ŝafraniĉ bataleme svingante per grandega lanco, „nenion ni donos al ili, nenion, eĉ pipron por denaro al tiu stiria banuso. Venu iu de tiuj hispanaj ranuloj — kiel muson mi lin per mia lanco — jen — tiel!"; kaj la butikisto forte puŝis la lancon aeren.

Tiam ektondris pafego. Ŝafraniĉ paliĝis kaj sufloris tremante al Garuc staranta apude kun tamburo:

„Jesuo, Maria! Kara amiko Garuc, ĝi estis ja pafilo!"

„Eĉ granda pafilo, amiko Ŝafraniĉ", rediris la tamburisto.

„Ĝi povus al la homo forblovi eĉ la kapon?", ekdemandis tremante la butikisto.

„Certe, se ĝin la homo havas", rediris Garuc.

La burĝaro staris prete sub armiloj, kaj je ĝia fronto la juĝisto Jakopoviĉ kun blueta urba stardardo sur la ĉevalo.

Tiam alkuris de Kamenita vrata la forĝisto Ŝtakor kun envolvitaj manikoj, sub larĝa kasko, kun nigra vizaĝo, portante pezan pafilon sur la ŝultro.

„Kio estas, je Dio, ho majstro?", ekdemandis la juĝisto.

„Malbono, sinjoro juĝisto!"

„Parolu, je Dio, ho majstro!"

„Kvindeko de ni pulvumis sufiĉe sukcese, kaj la ebriaj banderiistoj de Gregorianec levis la kalkanojn pro niaj pafiloj. Ni sur la monto, dum ili sub la monto, ni kontraŭ ilin, kaj ili kuru. Sed nun venis alia diablo. La banuso revizis sian armeon sur Harmica, kiu kriegis kaj spektaklis, ke eĉ la ĉielo ekskuiĝis. „Herooj", diris li ridante al furiozanta armeo, „fidu al mi, kaj se al vi tiuj zagrebaj kanajloj ne faras laŭ via deziro, tiam vi frapu ilin. Ili diras, ke ili plendos vin ĉe lia reĝa moŝto. Fariĝu! Tie ĉi mi estas via reĝo kaj neniu alia. Aŭdu la sonorilo so-

noras en la urbo kontraŭ ni, vidu, la pafilegojn ili alcelis kontraŭ la banusa armeo, ferminte sin en siajn muregojn. Sed kelkaj estas ekster la muregoj, tiujn ni tenu, ilin ni ataku!“ — „Ilin ni ataku!“, ĉiuj ekkriis, mi do timas, sinjoro juĝisto, ke tiuj diabloj ne ekbrulos niajn mizerajn samurbanojn. Oh helpu, sinjoro juĝisto!“

„Ha! Jen nian feliĉon“, ekkriis la juĝisto kaj saltis de la ĉevalo, „iru kun mi, majstro Blaj!“

La juĝisto kaj forĝisto ekiris al la loĝejo de la banuso. La pordego estis ŝlosita. La juĝisto frapis trifoje je la pordeĝo kaj la servistoj de l' banuso malfermis ĝin tremante.

„Ĉu estas hejme sinjorino banusino?“, ekdemandis la juĝisto per tranĉa tono.

„Jes“, respondis hezite la servisto.

La juĝisto rapidis al la ĉambro de la banusino. Klara sidis pala kaj muta ĉe la tablo, apogante la kapon je la brakoj. Ekvidinte la juĝiston, ektimis kaj etendis la manon al la pistolo, staranta sur la tablo.

„Moŝto sinjorino!“, almetis la juĝisto. „Lia ekselenca estro kaj banuso krude ŝercumas kun ni por nia gastigaĵo. Li kaj lia armeo senigis nin de nutraĵo, kaj nun volas liaj furiozaj trupoj ekbruli nian suburbaĵon.“

„Kaj kion mi povas por tio?“, ekdemandis la banusino.

„Tio ne devas fariĝi. Komprenu, ke la banuso kun armeo staras ekster la urbo. La burĝoj ekprenis la armilojn, fermis la pordegojn, vi do estas nia kaptito; se do eĉ unu domo suburba ekflamos, ekflamos ankaŭ ĉi tiu domo super via kapo.“

„Ĉu vi freneziĝis?“, ektremis Klara.

„Ne, moŝto sinjorino! Ni havas sanan prudenton! Sidiĝu, skribu al via mastro, ke li delasu la furiozaĵon, kaj forlasu la armeon, ĉar — ĉar alie li ne vidos vin plu.“

„Sinjoro juĝisto!“

„Nun ne estas horo por ŝerci. Sidiĝu, kaj skribu! Aŭ letero aŭ — kapo!“

Senspire sidiĝis Klara skribi kaj enmanigis al la juĝisto skribitan leter-paperon.

„Jen!“, diris ŝi.

„Adiaŭ, sinjorino! Gardu la kapon, ne eliru el la domo.“

Kaj la juĝisto kun forĝisto foriris.

Post mallonga tempo ekkuris la urba rajdisto tra Kamenita vrata al Harmica, enmanigis al la banuso la ordonon de Klara kaj dirigon de Jakopovič: ke la burĝoj paciĝos, se la banuso sub sigelo ĵuros, ke li forlasos la armeon.

De kolero ludis la vizaĝo de Ungnad, leganta la leteron, kaj sidanta sur la ĉevalo meze de siaj oficiroj.

„Legu la hontaĵon, legu!“, li sin turnis al siaj kamaradoj, „ĉu vi iam vidis tian malrespektan balaaĵon? Malbenitaj kanajloj, je mia sabro, mi volus ilin frakasi per fera pugno, sed — ho stultulo — stultulo — ke mi lasis la banusinon en tiu vipernesto! Mia Klara — pereos! Kion — kion, sinjoroj, mi estas faronta?“

„Hundoj!“, ekgrincis Gregorianec. „Tio estas regna perfido, la ekzekutisto havos priokupon.“

„Jes, jes!“, aldonis protonotaro Mirko Peteo, „tio estas bona, tio poste efektiviĝos; sed nun ne estas alia ol savi la banusinon. Tial via ekselenco sendigu la leteron al la zagrebanoj kaj forsendu la armeon Ivaniĉ'on. Kaj poste — nu ni havos okazon en la parlamento!“

„Tiel estas“, jesis Melkior Tompa.

La banuso de kolero ŝirpinĉadis la ruĝan barbon. Skribis la leteron, premis la sigelon kaj enmanigis ĝin al la urba heroldo. Tiam li rajdis kun oficiroj de trupo al trupo, sufloris al ĉiu trupestro kelke da malkontentaj vortoj kaj ekrajdis malgaja kun kelko da magnatoj en la urbon. La armeo en miro ekmarŝis silente al Sava kaj forlasis Zagrebon.

Dum furiozaj soldatoj rabadis tra la nobela urbo, staris Jerko apud la ĝardeno de Draškovič kontraŭ la domo de Krupič. Pala kaj meditema ri-

gardis li jen al Kamenita vrata, jen al la domo de Krupiĉ, jen al Marko-placo, de kie oni aŭdis furiozan kriegon. Dio! Ankoraŭ Pavao ne venas, Krupiĉ foriris kun trupo laŭ ordono. Dora sola en la domo, malbenulo Ĉokolin en Zagreb, kaj furiozaj — soldatoj. Oh, se almenaŭ maljuna oraĵisto restis hejme, sed li ne volis haltigi sin de la knabino, oni devis defendi la urbon. Dio! Dio! Se nur malbono ne okazos! Nun li aŭdis de policanoj preterpasantaj, ke oni fermos la urbajn pordegojn. Pavlo ne povos en la urbon. La banusaj piedistoj, hispanaj dragonoj preterkuris lin al la malsupra urbo, persekutataj de la armitaj burĝoj. Dio! Kioma kunpuŝiĝo! Ĉu ne povus malbono trafi la knabinon? Li iros mem en la domon por gardi ŝin. Sed en tiu momento ekgalopis du rajdistoj kontraŭ lin. La viziero kovris al unu la vizaĝon. Jerko ektremis, stariĝis antaŭ la pordo de Krupiĉ, levinte la bastonon. Sed la sekreta rajdisto palpebrumis al sia kamarado, kaj ĉi tiu eksvingis, ekfrapis Jerkon, kaj ekkriinte falis teren la mizera sanganta junulo.

„Foriru“, diris la rajdisto sub la ŝirmilo al sia kamarado, „mi vin ne bezonas, vi estas soldato. Savu vin. Jen al vi ankaŭ mian ĉevalon.“ La nekonatulo saltis de la ĉevalo kaj ekrapidis en la domon de l' oraĵisto.

Dora estis sola. Pala pro timo preĝis Dion por sia patro, por ke lin pasu la morta danĝero. Ekvidinte la fremdulon, saltis ŝi kiel ektimigita cervino.

„Sankta Dio!“, ekkriis la junulino.

Ho kvietiĝu, knabino!“, aldonis la alveninto per raŭka voĉo, „kvietiĝu, se vi Dion konas. Mi estas malfeliĉa soldato. La viaj tute nin frakasis, kaj mi ricevis akran vundon. Ne perfidu min. La viaj mortigus min. Mi laciĝis, mi ne povas pluen! La vundo brulas, mia gorĝo flamas. Donu akvon al mi, donu akvon al mi!“

„Mi vin ne perfidos“, timeme rediris la knabino, „ĉar mi al neniu deziras morton, do se vi estas eĉ niaj malamikoj, Dio ordonas, ke oni devas eĉ

al malamiko fari bonon. Sed kial vi ne levas la vizieron?“

„Mi levos, mi levos ĝin!“, rediris la rajdisto, „sed donu akvon al mi!“

„Jen, jen ĝin al vi!“ prezentis Dora al li la kruĉon da akvo. „Ĝi estu al vi saniga!“

La rajdisto prenis la kruĉon per ambaŭ manoj.

„Vidu, knabino, se ne iras iu al la domo!“

Dora ekiris al la fenestro por rigardi, dum en tiu momento ŝutis la nekonatulo ian polvon en la akvon.

„Neniu estas proksime“, diris la knabino.

„Ĉu vi ne havas vinon, knabino?“

„Mi havas, sed ĝi estas malbona por vundoj.“

„Via akvo ne estas bona, ĝi estas malklara, varmeta. Provu mem!“

„Ke ĝi ne estas bona? Mirinde! Antaŭ ne longe mi alportis ĝin.“

„Nu provu mem!“

„Do, ke mi vidu!“

„Dora prenis la kruĉon, almetis ĝin al la buŝo kaj sorbetis.

„Prave vi diras, ĝi estas maldolĉa. Mirinde!“

„Petas, alportu al mi guteton da vino.“

„Tuj. Atendu vi ĉi tie. Tuj mi revenos.“ La knabino foriris, dum la nekonatulo forkuris el la domo. kaŝis sin en la ĝardeno, kaj en minuto transiris la muron de la domo de l' trezoristo Konjski.

Post mallonga tempo jen revenis la filino de l' oraĵisto, kunportis ankaŭ la kruĉon da vino. La domo senhoma. Kio estas tio? Kien metis sin la nekonata gasto? Ĉu tio estas sonĝo? Ne. Jen sur la tero kuŝas brodita monujo kun blazono. Verŝajne la rajdisto perdis ĝin.

De timo Dora krucosignis sin. Ke ĝi ne estas fantomo de la diablo? Gardu nin Dio! Iu maltrankvilo ekregis ŝin. Ŝi komencis iradi tra la ĉambro. Ŝiaj brakoj glaciiĝis, dum la kapo brulis kvazaŭ fandanta fero.

„Dio mia!“ Kio tio estas?“, prenis la knabino la frunton.

Antaŭ ŝiaj okuloj brilis, sur la brusto kvazaŭ falis monto, dum la gorĝon kvazaŭ serpento kuntiris. La knabino ekŝanceliĝis, kaptante la aeron per la manoj.

„Patro! Pavao! Aeron!“, ŝi ekkriis, falis, ekspiris kaj elspiris.

„Dora! Dora mia!“, ekĝemis de ekstere laŭta voĉo, kaj en la ĉambron penetris spireganta malpurigita kapitano Pavlo. „Jen mi trez.... Jesuo Kristo!“, ekkriis li, kvazaŭ lian koron eniĝis tranĉilo, „ĉu ĝi estas infera trompaĵo? Dora! Dornjo!“, ekprenis li malvivan knabinon ĉe la brako, „malviva, malviva! Oh malbenita mi!“

Kaj kvazaŭ freneza falis la junulo apud la junulino.

XXII.

„Fratino, kara fratino!“, eksufloris Freyeva, veninte en la butikon de Ŝafraniĉeva. „Ĉu vi scias, kio estas kun Dora Krupiĉeva?

„Ion mi tiel aŭdetis, sed ĝuste mi ne scias, kara fratino!“, respondis negaje Ŝafraniĉeva. Mia memoro taŭgas por nenio, depost kiam tiuj hispanaj sentaŭguloj disportis al mi la fojnon kaj forportis la brandon.“

„Kompatinda mia najbarino! Jes, jes! La vipo de Dio atingis nin mizerajn. Sed ke mi diru al vi pri Dora. Je Tri Reĝoj fakte ŝi estus edziĝonta kun la juna sinjoro, kaj hieraŭ oni trovis ŝin malvivan — malvivan. En la vizaĝo ŝi estis tute nigra, oni diras, ke ŝi mortis de nigra pesto.“

„Helpu al ni sankta Blaĵ! Mi devas tuj incensi la butikon per junipero, kaj dum daŭranta pesto oni ne devas trinki akvon, jes, neniel la akvon!“

„Kontraŭe nur vinon kaj brandon, kara fratino. Jes, de nigra pesto mortis la junulino. Pro tio ŝi ne hejme kuŝos sur katafalko, sed en kapelo de sª Johano sub Mesniĉka-vrata, kaj oni portos ŝin la sekvintan nokton al la tombejo.“

„Tio estas malgaje.“

„Eĉ tre malgaje. Sed vidu, tio estas la fingro de Dio! Fiereco kaj dandeco ekposedis la knabinon, kaj jen, kiel ĉio ĉi finiĝis. Du, tri fosiloj estos nun ŝia tuta sinjoreco. Nun vi scias kaj nun adiaŭ, kara amikino, mi devas hejmen, por ke mia lakto ne kazeiĝu.“

„Ekkompatu Dio al ĉiu pekulo! Adiaŭ, amikino, Frey!“ En la urbo estis bruo kaj spektaklo. Pro subita morto de Dora ekscitiĝis la tuta burgaro. La malpli altaj vere kredis, ke pesto mortigis la solfilinon de l' oraĵisto, sed la pli saĝaj homoj konjektis, ke tio ne estis pesto sed ies peka mano, kion ankaŭ la apotekisto Globicer konstatis. Sed ankoraŭ pli ekcititaj estis la burĝoj de la nobela urbo pro alia kaŭzo.

Koleraj je zagrebanoj kunvenis kroataj s t a t u s en sia parlamento, kaj tie laŭ propono de Ungnad konkludis kontraŭ zagrebanoj jenon: „Tial ke la burĝoj de l' urbo: zagreba Griĉ-monto volas per siaj malnovaj privilegioj detrui la liberecon de la regno Slavonujo, tial ke ili malice levis la plendon ĉe lia ĉefduka moŝto Ernesto kontraŭ sinjoroj banuso kaj vicbanuso; tial ke ili lian ekselencon sinjoron Stjepan Gregorianec malhelpis en plenumado de lia vicbanuseco, ofendadis sinjorojn s t a t u s e t o r d i n e s, publike kontraŭstarante al la banuso, ili sekve regu libere solaj inter la limoj de sia urbo, sed ili estu ekzilitaj el la komunumo de ĉi tiuj reĝolandoj kaj de ĉiuj regadoj de ceteraj sinjoroj, kaj ke estas malpermesite al ili komerci kaj kun komercaĵo vojaĝi tra la regno, dum antaŭen ke la parlamento kaj banusa tribunalo lokumu sin laŭ volo kaj deziro de sinjoro banuso en alia, pli opurtana urbo.“

„Nun boju la malkuraĝuloj!“, akre ekridis Gregorianec, „ili formanĝu la kaĉon por si kuiritan.“

Ĉu tiel, sinjoroj?“, diris juĝisto Jakopoviĉ. „Fariĝu! La karto falis; malagrablaĵo por malagrablaĵo. Timu al niaj akraj dentoj, ni ŝercon ne komprenas, sed de tio estos eĉ pli.“

Do la juĝisto kunvokis kunsidon. Multego da

burĝoj svarmis en la urba domo. La kolero bolis en la animoj de l' burĝoj; la sinjoroj volas ekstermi Zagrebon. En la konsiliĝejon eniris Jakopoviĉ pala kaj malserena, kun pergameno en la mano.

„Mi mem iras antaŭ la reĝon, fratoj, por diri lin, kion oni faras de ni, kaj en via nomo mi enmanigos al li ĉi tiun pergamenon!"

Ĉiuj eksilentis, kaj la juĝisto komencis legi la plendon por la reĝo:

„Ĉi tiu urbo de pratempo libera sub reĝoj karmemoraj, ke falis en grandan mizeron. Mizero ĝin premas, malsato minacas ĝin, ĉar mankas greno, sed super ĉio ruinigas ĝin forto de najbaraj sinjoroj. Zagreb, ke estis ĉiam fidela al la krono kaj ne lasis sin forlogi per la vojevodo Ivan de Erdelj, kaj nun ĝi falas nek kulpa nek ŝulda en mizeron kaj honton. Nome en la parlamento je Tomaso-festo, ke la banuso, protonotaro kaj aliaj sinjoroj faris komploton kontraŭ Zagreb farinte neaŭdeblan kaj malican konkludon, ofendanta ne sole Dion kaj lian justecon, sed laŭ kiu estas la burĝoj kvazaŭ malbenitaj kaj ekzilitaj el la kristana komunumo, kaj kvazaŭ ili ne estas regnanoj. Pro tio lia reĝa moŝto sin turnu per milda okulo al Zagreb, estu ŝildo de la urbo kaj indulge nuligu la konkludon."[1] Kaj detale raportante: kian perforton faris al la urbo la banuso kaj vicbanuso, la plendo petas, ke la reĝo sendu du korteganojn, por ke ili per propraj okuloj certiĝu, kiel estis, kaj ke li al Zagreb redonu malnovajn privilegiojn.

Tondre aklamis la burĝoj la heroan juĝiston kaj sur siaj ŝultroj portis lin apud loĝejo de l' banuso en lian domon.

Bruo estis en Zagreb, kaj silento en la domo de Krupiĉ. En la kamero kuŝis la morta virgulino, en ŝiaj manoj estis arĝenta krucifikso, kaj ĉirkaŭ la frunto krono. En angulo kaŭris maljunulino Magda, preĝante la rozarion. Ŝi preĝis — ne, ne, ŝi estis freneza, sensenta; Dora, baptinjo, ke mor-

[1] Autentika. N. d. t.

tis! Sensencaĵo! Tio ne povas esti — ne povas. Tion certe elpensis malbonaj homoj, Dora verŝajne dormas. Ve, se ŝi estus malviva, ke ŝi plu ne vekiĝus, en kavon ke oni ĵetus ŝin; tiuj belaj okuloj, tiuj etaj manetoj, tiuj belaj haroj, ĉio ke estas polvo? Dio! la koro de la maljunulino krevus; io ŝin sufokas, sufokas, kaj larmetoj pluvetas sur ŝiajn velkintajn manojn.

Ĉe la tablo en mezo de la ĉambro sidas Pavlo. Li estas neĝepala, la haroj falis malsupren la frunton, liaj okuloj flamas. Nenion li aŭdas. Li apogis sin je la brakoj, rigidajn okulojn fiksis en la malvivan junulinon. Centfoje li demandis sin, ĉu tio ĉi estas Dora, ĉu ŝi estas malviva, ĉu tio ne estas sonĝo, ĉu tio ĉi ne estas ŝerco? Ĉu mi ne kondukos ŝin al mia kastelo vivan, sanan, kaj feliĉe kun ŝi vivos? Do kiam radio de la lumo falas sur la vizaĝon de Dora, ekflamas ankaŭ la okulo de l' junulo, pensanta — ŝi estas viva. Kaj antaŭ la junulo kuŝas sur la tablo brodita saketo, kaj sur ĝi nobelula blazono. Hodiaŭ vespere oni portos Doran en la kapelon de sa Johano, kaj morgaŭ — morgaŭ en la tombon.

Dume la maljunulo Krupiĉ sidas kvazaŭ ŝtono en sia magazeno. Li neploras, neĝemas, nepensas, nesentas. Ĉirkaŭ li kvazaŭ nebulo flugpendas; se iu penetrus en la magazenon, se forportus tutan lian argentaĵon kaj oraĵon — li ne moviĝus — li restus ŝtono. Kaj la koro? Ĝi estas muta, sed en ĝi infero brulas.

Senbrue malfermiĝis la pordo de la kamero de Dora. Senbrue eniris Jerko kun ĉirkaŭvolvita kapo. Li venis ĝis Pavlon kaj metis la manon sur lian ŝultron.

„Pavlo!", ekmurmuris li.

Sed respondo ne venis.

„Pavlo! Aŭdu! Pavlo! Frato! Mortigu min!"

En miro ekrigardis lin Pavlo.

„Mi estas kulpa!", daŭrigis li kun tremanta voĉo, „jen, mi ne gardis ŝin sufiĉe, kaj la serpento mordis ŝin. Mortigu min!"

„Ne, ne, Jerko!", eksplodis Pavlo, „mi estas

kulpa, mi, frato. Mi — mi ŝin lasis trolonge en tiu infera faŭkego. Oh Dio, Dio! Kion, kion mi estas faronta? Mi freneziĝis!", kaj ĵetis la kapon al la tablo.

„Mortigu min! Mi amis ŝin, amis same kiel vi. Kio estas por mi la vivo? Sed ne — ne! Ankoraŭ mi devas vivi — ankoraŭ. Radak scias — kial. Adiaŭ Pavlo, adiaŭ Dornjo!", kaj la junulo foriris.

Apudege antaŭ Mesniĉka-vrata staris kapelo de s[a] Johano. Unu nur altaro ornamis la nudajn murojn, sole la malgranda lumo briletis en tiu mallumo. Estis plu de la deka vespere. Meze de la kapelo staris nigra ligna portilo, sur kiu dormis eternan sonĝon la filino de l' oraĵisto. La kadavro estis kovrita per blanka vualo, nur la kapo estis videbla. Bela, kvieta estis ŝia vizaĝo, nur po ie videbliĝis nigraj makuloj. Kaj en la kapelo trankvile, trankvile, kaj lignaj sanktuloj ragardadis la junan mortintinon. Post kelka tempo ekgrincis la pordo. En la kapelon eniris Pavlo. Li estis tre trankvila. Senbrue li paŝis al la knabino, kvazaŭ timante, ke ne veku ŝin. Kaj stariĝis super ŝin.

„Tio vi estas? Vi? Mia amo, mia feliĉo, mia vivo! Kaj nun malviva, nun polvo, nun nenio. En ĉi tiuj restaĵoj mortis ĉiuj miaj deziroj, miaj esperoj. En la tombon, Dora, vi kunportos mian vivon, dum mi restos — viva mortinto!" Kaj li ektuŝis per la lipoj la malvarman frunton kaj kisis la virgulinon por lasta fojo.

Sed je unu fojo io ekbruis post la altaro. La junulo elreviĝis. Kvazaŭ en la seruro turniĝis ŝloŝilo kvazaŭ malfermiĝas sekreta pordo. Pavlo sin kaŝis post la kolono en la mallumo. Kaj fakte! Super la altaro malfermiĝis pordo de sekreta koridoro kuranta el la supra urbo, submonte, al la kapelo.[1] Famo de l' torĉo subite eklumis, kaj en la

[1] Ĉi tiu subtera koridoro, kuranta de suda promenejo (iama kapucenejo) ĝis la domo de ia Zaĥ ekzistas ankorau nun. Ĝi estas konstruita el brikoj, volbita, surkalkaĵita. Antau kvardek jaroj malkovris ĝin tiama posedanto de l' domo, trovinte en ĝi malgrandan ĉerkon, kiu tuŝita tuj polviĝis. Poste la posedanto fermigis la koridoron. Rimar. de l' traduk.

preĝejon malleviĝis malsupren la ŝtuparon alta virino nigre vestita portanta la torĉon.

„Foriru! Lasu min Ĉokolin!", ŝi turnis sin al la koridoro, „via servo finiĝis; la sajlaron vi ricevis, nun vi povas foriri el Zagreb!"

Kaj la pordo ree fermiĝis. La virino venis ĝis la malviva knabino. Deprenis la vualon kaj la torĉo eklumigis la vizaĝon de Klara. Ŝi starigis la kapon super la kadavro. „Mi devas vidi vin, mia konkurantino", ekmurmuris ŝi per sarkasma rido, levinte la torĉon. „Vi, vi do venenis mian vivon, ruinigis la feliĉon? Malsaĝulino, jen, nun vi kuŝas venkita antaŭ mi. La tempo cikatriĝos la vundon, kaj mi tamen ricevos Pavlon."

„Vi ne ricevos!", ektondris Pavlo, saltinte de l' kolono. „Neniam, vi malbelaĵo de la virina sekso! Jen trian fojon Pavlon de Gregorianec por ĵuri per ĉi tiuj karaj restaĵoj, ke neniam plu li ekamos virinan kapon, se eĉ venus anĝelo el la ĉielo, se eĉ polviĝus lia malnova kaj fama blazono! Jen Gregorianecon trian fojon, por diri al vi, ho infera malbonaĵo, ke li vin malamas, ke vin malestimas, ke vin forkuras, kiel oni forkuras la peston. Na tuŝu ĉi tiujn sanktajn restaĵojn, infera degeneraĵo, ne malordigu per pesta spiro la paradizan dormon de tiu ĉi anĝelo. Rigardu, oh rigardu ĉi tiun senkulpan vizaĝon kaj ŝtoniĝu kvazaŭ krimulo antaŭ statuo de Gorgono. Jen, ĉi tie ripozas mia feliĉo, mia espero, mia vivo, kaj ĉion tion — ĉion frakasis via malvirta serpenta koro per diabla malico."

„Pavlo, je nomo de Dio!", ekkriis Klara de teruro, tremante kvazaŭ de febro.

„Ne alvoku Dion, pekulegino, ĉar li aŭdos vian blasfemigan ĝemon, kaj per kolera tondro detruos ĉi tiun sanktigitan tegmenton. Jes, vi faris tion — vi."

„Mi?"

„Ĉu vi konas tion ĉi", rediris Pavlo, eltirinte el la sino la broditan saketon. Ĉu ĉi tio ne estas blazono de Ungnad kaj Tahi, ĉu ĉi tio ne estas blazono de Klara de Ungnad, adultulino, mal-

ĉastulino kaj venenantino? Kaj la saketon oni trovis apud malviva Dora, ĉu vi aŭdas, apud malviva Dora, oj virina monstro!"

Klara mallevis la kapon, sed rapide rektiĝis.

„Jes", diris ŝi, „estas vero, Pavlo! Mi venenigis Doran per veneno nekuracebla. Sed ĉu vi scias, kial? Ĉar mi freneziĝis, furioziĝis pro vi. Se oni intence pekas, mi ne estas pekulino. Mia prudento ne plenumis tiun pekon, koro mia pekis. Se ne estus sukcesinta al mi pereigi ĉi tiun knabinon, se vi estus ŝin ĉirkaŭprenanta kvazaŭ edzinon mi venenus min mem, ĉar tiel longe ĝis kiam mi vivas, mi ne tolerus, ke vin alia amas, kaj mi ĉiun vin amantan venenus, eĉ se vi ne amus ŝin. Pavlo, mi amas vin kiel Dion, kiun mi pekulino malfidis; sed se mi povas pasigi kun vi unu tagon, unu horon, unu minuton da amo, mi eltrinkus ĝisfunde glason da veneno. Se vi min malamas, se vi min malestimas, Pavlo, venĝu vin!"

„Mi ne volas, malĉasta virino! Jen ni estas solaj ĉi tie; neniu nin vidas. Ĉi tie estas mia akra sabro, ĉi tie kuŝas mia trezoro, mortigita de vi. Se al mi plaĉus, mi puŝus la ferajon en vian viperkoron, kaj liberigus la mondon de la vivanta morta peko. Sed mi ne volas. Ĉi tiun sabron mi eklevis por la savo de la kristanaro, kaj antaŭe mi dehakus al mi dekstran manon kaj antaŭe mi ĝin duope rompus, ol makuli ĝin per via naŭza sango; mi estas heroo, mi ne estas ekzekutisto, kies profesio estas ekzekuti venenintinon. Ne, alian venĝon mi pretigas al vi. Iru, portu kun vi dum tuta via vivo vian malĉastan volupton, kiel ĉiaman nekuraceblan vundon, ĝi brulu vin per infera flamo, ĝi turmentu vin per eterna soifo, kaj kiam viaj vangoj velkiĝos kaj kiam via korpo sekiĝos, flagru ankoraŭ la furio en via koro vulkane. Kaj kiam vi dum trankvila nokto eksercos ripozigan dormon, ĉi tiu senkulpa infano stariĝu antaŭ vi, pala kaj kun larmantaj okuloj, kaj ĉi tiujn okulojn alfiksu al vian varmegan koron kvazaŭ glacian tranĉilon. Velku kaj vivu, vivu kaj

velku. Malbenita estu ĝis la tombo kaj trans la tombon!"

„Ho ve!", singultis Klara genufleksanta kun klinita kapo antaŭ la kadavro.

„Iru, pekema virino, lasu min, por ke mi lastan fojon ekpreĝu apud mia Dora", kaj senbrue kisis la junulo la mortintinon.

Kvazaŭ furioza saltis la banusino kaj malespere forkuris tra sekreta koridoro.

La sekvintan tagon vizitis la kapitano la tombon de sia amatino. Sed en miro li ekvidis, virinon sidantan sur la tombo. Li ekiris pli proksime. Ĝi estis Magda, tenanta sanktigitan rozarion.

„Magda!", vokis la kapitano, sed la maljunulino — nenion.

„Magda!", ripetis la kapitano, metinte la manon sur ŝian ŝultron. Ŝi estis malviva. Kiel lasta postsigno de l' vivo briletis larmo sur la vizaĝo de l' bona avino. Ŝi estas ekdorminta preĝante sur la tombo de sia baptanino.

XXIII.

Estis Kristnasko. Ĉarmega nokto. La ĉielo hela, surŝutita per oraj steloj. Mortiga malvarmo, dum tra la zagreba montaro kaj valoj la neĝo ĝis la zono. Sur seka branĉaro briletis la prujno briliante, dum la lunlumo briletis la neĝon, kvazaŭ la tero estas ŝutita per perloj. Estis trankvile, kviete estis tra la monto, nek vento skuadis la branĉaron, nek monta rivereto tondretis tra la profunda valo, malkvieta vento paŭzis, kaj monta akvo dormetis sub firma glacio. Estis Kristnasko, solena tago. El la neĝamaso elrigardis nigraj vilaĝaj dometoj, kaj el la dometoj gaje briletis la lumoj en la vintran nokton. La popolo ĝojiĝis al rememoro de l' ĉiela reĝo, naskiĝita en Betlehem. Dolĉa trankvilo malleviĝis al la homa animo, kaj la gorĝo plenvoĉe kantis: „Jen naskiĝis ĉiel'-reĝo!" Sed unu animo en la monto ne sentis la ĉielan trankvilon, en tiu animo

ne flamis Kristnaska fajro, en ĝi flamis infera flamo; tiu animo ne vokadis Dion sed diablon. Freneze kuris tra la supro kaj valo ia hometo, senforta, ĉifonvestita, laca. Ĝis la genuoj vadis li la neĝon, ĝis la zono dronadis, de malvarmo brulis liaj vangoj, el la manoj sango fluis, la hometo spiregadis. Kvazaŭ vundita lupo li kuris supren, prenante pikantajn brančojn, kvazaŭ erinaco volviĝis kaj malsupren malleviĝis, ne zorgante, se li frapis la kapon je ŝtipo, kaŝita en la neĝo aŭ je ŝtono apudvoja. Kurante li estas perdinta la mantelon, perdis ankaŭ la ĉapon, sed li kuris sen deturnante sin, kvazaŭ lin pelas malbonaj spiritoj per vipervipoj. Tiu homo kuris pluen de Zagreb — pluen en la monton — oni vidis, ke li estas transkuronta la monton. Nun li venis en la valon ĝis la ŝtono sub kruta ŝtonego. Li sidiĝis sur la ŝtonon. Du tri foje ekspiris, kvazaŭ volas kapti la spiron, perditan dumvoje. Li prenis de la kolo multkoloran tukon kaj envolvis la kapon, du tri foje surblovis la frostajn manojn, eltiris el la sino boteleton, ĝin klinis, ekglutis iomete kaj ekĝemis. Pli facile estis al li, ĝi lin varmigis. Li forklinis sin ĉirkaŭen, estante en kaŝejo, la lunlumo ne povis lin perfidi. Reklinis la boteleton. A! Ĝi estas bona! Malbenita malvarmo! Kia kreviga malvarmo! La tero kvazaŭ krevas sub piedoj. Cirkulanta sango ja glaciiĝos. Se nur la monton oni trapasos — tiam facile. Sed aŭdu! Aŭdu! La homo ektimis. Sur la supro de li kurita, la brančoj rompiĝas, la neĝo krevas. Ĝi estas ili! Jes! Ili. Kuru, mizerulo, kuru! La hometo ektremis! Klinis la kapon por aŭskulti. Jes, jes, ĝi estas ili! Kuru! Kaj kvazaŭ serpento, kiam vi ĝin ektuŝas, sin ĵetis la hometo supren, ekiris post la ŝtonegon kaj ekkuris en la arbaron. Oh se somero estus, belega somero, kiel facile oni formoviĝus; sed estas malvarmo, estas neĝo! Malbenita neĝo! Kiel serpento treniĝas post vi postsigno en la neĝo, kaj vian piedon en la neĝo perfidas tiu ĉi malbenita okulo de hela ĉielo — tiu fatala luno. Se estus almenaŭ uragano, nuboj; sed la ĉielo vitre hela. Malbenaĵo! La hometo estis moviĝinta en la arbaron. Post kelka tempo aperis ĉe la ŝtono sub la ŝtonego du homoj. Unu grandegulo kun pafilo, sub alta ĉapelo. Sur dekoltita lia brusto gluiĝis la prujno, dum liaj lipharoj estis blankaj de l' glacio, sed lia okulo brulis kiel paŝtista fajro meze de malluma arbaro. Tiu homo estis maljuna haramio Miloš Radak. Alia homo estis pli juna, envolvita en ĉabrako, kovrita per felĉapo. Ankaŭ lia okulo flamis, ankaŭ lia brusto leviĝadis. Tiu junulo estis Jerko.

„Ĝis ĉi tien treniĝas lia postsigno“, almetis Jerko iom sin klininte.

„Oni devas serĉi pluen!“, rediris Radak.

„Jes, certe!“

„Ni iru!“

„Ke ni iom ripozu!“

„Eĉ por la reĝa krono ne!“

„Malproksimen li ne povis formoviĝi. Momenton.“

„Eĉ momenton ne. Mi antaŭ nek sidiĝos, nek kuŝiĝos, nek manĝos kaj trinkos, ĝis kiam estas viva al li la kapo sur la ŝultroj.“

„Mi laciĝis.“

„Vi do restu! Sed memoru, tie ĉi troviĝas multego da lupoj, Jerko.“

„Mi ne timas.“

„Ni serĉu do pluen!“

„Jen, apud la ŝtono en la neĝo freŝan sangon, jen eĉ boteleton! — Malplena ĝi estas!“

„Fakte freŝa sango. Li estas vundita. Li ne estas plu ol de minutoj de ĉi tie.“

„Vidu! Malantaŭ la ŝtonegon li ekiris! Ĉu vi vidas liajn piedosignojn apenaŭ rimarkeblajn? La neĝo estas ankoraŭ mola!“

„Sed ili kuras supren la monton!“

„Nu iru!“

Haramio kaj Jerko subiris la ŝtonegon supren la monton. La neĝo grincis, brančoj rompiĝis, piedo glitis sur la glacio, sed ili antaŭen — antaŭen laŭ piedosignoj. Kaj ili venis sur la supron. Brilanta luno balancis super la monto — antaŭ ili neĝa dezerto.

„Jen!“, ekkriis Radak. „Rigardu ĉi tien al la pinto de alia supro. Ĝuste nin helpas la lunlumo. Vidu, io nigra moviĝas supren la monton. Ĝi estas homo.“

„Jes. Nun mi vidas. Ĝi estas homo.“

„Diable kuras la kanajlo.“

„Kvazaŭ lin persekutas la diablo.“

„Ĝuste tiel.“

„Ni ekmarŝu rapide, Jerko!“

„Haltu, maljunulo! Nun estas bone, nun li estas nia. De tiu pinto oni povas en la valon, sed antaŭen oni ne povas. En alia flanko estas kruta ŝtonego. La kanajlo devas laŭvale, aŭ antaŭen aŭ malantaŭen. Kaj la monto estas subirebla. Vi iru malsupren de la monto kaj direktu norden en la valon, mi ekiros de l' sudo, kaj jen la muson inter du katoj. Donu al mi pistolon, Miloŝ!“

„Jen ĝin al vi! Je sankta Nikolao, junulo, via cerbo taŭgas. Bone vi planis. Mi iros malsupren de la monto dekstren, kaj vi maldekstren. Adiaŭ kaj bonan feliĉon!“

„Sed, viva li venu en niajn manojn, maljunulo!“

„Viva aŭ malviva, laŭ volo de Dio“, rediris haramio kaj ekiris dekstren malsupren la monto, dume la junulo foriris maldekstren.

La hometo feliĉe atingis la alian valon. Dank' al Dio! Malproksime de li estas la furiozuloj, ili ne atingos lin. Al la diablo! Jen antaŭ li aperis alta kruta ŝtonego. Li ne povas antaŭen. Oni devas subiri la monton, oni devas norden laŭ valo antaŭen. Antaŭen — antaŭen! La manoj krevas al li, la sango penetras la haŭton. Antaŭen! Liaj haroj fariĝis glacio. Antaŭen! La piedo al li pli kaj pli profunden eniĝas. Antaŭen! Antaŭen! La inferaj spiritoj ne ripozas. Nun la valo serpentumas inter la monto. Malgranda maldensejo aperis antaŭ la forkuranto. La luno lumas kvazaŭ tago. Meze en la maldensejo ekvidis la hometo grandegulon rapidantan kontraŭ la valo. La hometo komencis tremi, ne de malvarmo, de teruro. „Tio estas li!“, duonviva li ekmurmuris. Malantaŭen! Malantaŭen! Sed ankaŭ la grandegulo

ekvidis la forkuranton. Li kuras, kuras! Ĉu vi aŭdas, kiel la neĝo grincas pli kaj pli forte, pli kaj pli proksime! Malantaŭen! Malantaŭen en la valon! Kaj de lia kapo falis la tuko. Lia vizaĝo neĝe paliĝis. Nur sur la frunto ruĝiĝas la cikatro kvazaŭ viva karbo. La grandegulo postrestas. La hometo forklinis la kapon; ekĝemis. Dank' al Dio! La piedo de haramio glitis. Li falis, eniĝis en la neĝon. Savita vi estas. Malantaŭen, malantaŭen! Nun kuras la valo pli alten en la arbaron. Tie estas densa arbaro. Dank' al Dio! Sed kio tio estas? Ĉu infera fantomo? Aŭ kio? Ĉe la valo-enfluo staras homo, envolvita en ĉabrako, en lia mano pistolo. Jes, jes, pistolo! La luno ne trompas. Kiu estas tio, kiu? Ja vere. Tio estas mutulo Jerko! Tiu malkuraĝulo. Antaŭen!

„Ha! ha! ha!“, eksonis la ridego de Jerko tra la dezerta valo, „infera elĵetaĵo, jen vin en miaj brakoj!“

„Ĉu mi estas diablo“ — ekploris la hometo dum lian koron kvazaŭ prenis feraj ungoj. Kuru! Kuru! Malfeliĉulo! Kien? Ĉi tie Jerko, tie haramio, ĉi tie morto, tie pereo! Kien? Kiel vulpo ĵetis sin la hometo en arbetaron. Tie troviĝas branĉoriĉa kverko. Rapide surgrimpu la kverkon, tiuj diabloj estas ankoraŭ sufiĉe malproksime. Li surgrimpis la kverkon kaj kuŝiĝis sur branĉo. Tie li kuŝis mute — apenaŭ spirante.

En la valo renkontis sin Jerko kaj Radak.

„Kie li estas?“, ekdemandis Radak.

„Al via ja flanko de mi li kuris!“

„Sed ne, al la via, dia homo!“, rediris haramio. „Li kuris antaŭ mi. Se mi ne estus falinta, mi lin estus kaptinta.“

„Ne, mi diras vin!“

„Do certe lin la diablo mem ne transmetus trans ĉi tiun ŝtonegon. Ĝi estas kruta, glata, kvazaŭ vi estus ĝin per hakilo tranĉinta.“

„Eble tien!“, turnis haramio la kapon al alia valflanko, kie staris altaj arboj. La luno malrapide leviĝadis kaj ĝia lumo falis sur la apudvojan kverkaron.

„Ha infera satano!“, ekkriegis haramio, ekvidinte palan homan vizaĝon sur la kverko, „ĉu vi tio estas, vi? Ĉu vin tero elĵetis, por ke mi malvarmigu la maldolĉajn vundojn per via sango? Jerko, Jerko! Rigardu tien, ĉu vi vidas, ĉu vi vidas? Jen estas nia rabaĵo! Kaj ĉu vi scias, kiu estas tiu monstro, kiu estas tiu besto?“

„Kiu?“

„Tio estas la malbenito, kiu mortigis min edzinon, kiu forrabis mian filon, kiu piedpremis mian feliĉon kaj vivon!“

„Ĝuro Ĉokolin, — pseŭdoturko, tiu ĉarlatano?“, ekdemandis Jerko.

„Jes li! Lasu min, lasu min, por ke mi lin kaptu, por ke mi pecon post peco ŝiru de lia korpo, sufokigu lian koron.“

„Ne makulu vian manon per ĉi tiu abomena sango. Mortigu lin!“

„Kaj kie estas mia filo, satano?“, plore eksplodegis haramio, „kie estas mia unika filo? Parolu, diablo!“

„Mi ne scias“, sonis la voĉo de l' kverko, „mi vendis lin kiel sklavo en Konstantinoplo!“

„Jesuo Kristo!“, posteniĝis la maljuna soldato, sed baldaŭ releviĝis. „Aŭdu, monstro, aŭskultu min bone! Vi mortigis mian edzinon,forrabis filon, forbrulis domon. Kaj kiam mi staris apud mia mortinta Mara rigardante, kiel el ŝia koro penetras ruĝa sango, mi ĵuris al Dio jene: „Mi ĵuras je malviva ĉi tiu edzino, tiel helpu al mi justa Dio kaj mia kristana kredo kaj tuta ĉiela kortego, ke mi ne trankviliĝos kaj ripozos, ke mi ne ektuŝos, kio agrabligas mian gorĝon kaj plaĉas al mia korpo, ĝis kiam mi ne venĝos la edzinon, ĝis kiam al ŝia mortiginto vivos lia kapo sur la ŝultroj. Tiel ne perdiĝu mia semo de l' koro, de l' brutaro kaj pano, de l' pano, per kiu sin oni nutras. Kaj se mi ne plenumos, je kio mi ĵuris, mi ne trovu fraton en frato, amikon en amiko, kaj kiel ajn mi penadu vane mi penadu, kaj ĉio rustaĵo fariĝu, kaj oni konduku min de monaĥejo al monaĥejo, kaj oni ne trovu sanigilon

por mi, kaj fine mi boju kiel hundo, ekfrapu min la ĉiela alto, kaj formanĝegu min infera malalto, kie la diabloj turmentos mian animon eterne. Amen.“

— Ĉu vi aŭdas, krimulo, tiel mi ĵuris. De tiu tago mi vagadis tra la mondo, serĉante ĉi tiun diablon, kaj lin serĉante mi griziĝis. Mi ne trovis animon krom de mia estro, kaj tiu estro amis knabinon, kaj tiun knabinon vi mortigis. Mi ree do ĵuris, ke mi venĝos lin. Jen feliĉon! Mi vin trovis, monda veneno, mi trovis ĉion, kion mi serĉis, nun estas agrable al mi — nun —“

La homo sur la kverko komencis treege tremi, lia vizaĝo kvazaŭ estis ŝutita per cindro, bluaj lipoj tremetis al li. Malespere prenis la branĉon, alprenis la kapon al la arbo kaj ekkaŭris kiel sovaĝa kato.

— „Nun —“, ekkris haramio — „nun estas la horo!“ La pafilo ekkrakis, branĉoj ekmoviĝis, homo sur la kverko ekkriegis, leviĝis kaj kiel ŝtono falis en la neĝon. La kuglo trakuris lian kranion.

„Ni iru!“, ekmurmuris haramio, fortranĉinte la kapon de l' razisto, „nun la vivo sufiĉas por mi. Mi venĝis Maran kaj mian estron.“

„Ni iru Milošo! Dio ekkompatu al la peka animo“, aldonis kun teruro Jerko kaj ambaŭ ekiris al Zagreb.

Estis Kristnasko. En nokta trankvilo sonis la sonorilo de Šestine, vokante fidelulojn al noktomeza meso. Kaj la orgeno ektondris kaj popolo ekkantis: „Jen naskiĝis ĉiel-reĝo!“

Kaj malproksime — en monta valo blekegis aro da malsataj lupoj ĉirkaŭ la trunko de malviva razisto.

XXIV.

Kvankam kroataj sinjoroj estis koleraj je zagrebaj burĝoj kaj ilian trobravan gvidanton Jakopoviĉ pro evidenta konstraŭstaro en la urbo sur „Griĉ-monteto“, tamen ili komencis mediti, ke la perforto de l' banuso kaj malbonaj agoj de l' vicbanuso superas ege la leĝecon, kaj kiel la banuso

volis premi la zagrebanojn per sia armeo, ke la samon li povis fari al la klasoj (status), se ili en ĉio ne obeos lian volon aŭ ĝustadire la de l' ĉefduko Ernest. Kaj Gregorianecon ĉiuj evitis, ĉar li kvazaŭ freneziĝis de sia hejma malpaco, farante rabiste malutilon ne nur al la burĝoj sed ankaŭ al la nobelaro, humiligante la kroatajn sinjorojn. Pro tio aperis voĉoj inter aristokrataro kontraŭ la banuso kaj plejparte kontraŭ la vicbanuso, kaj inter ili pleje la malgranda Gaŝo Alapiĉ. En la komenco, nature, tiu ĉi kontraŭstaro estis ne forta. En jaro 1580. ne agadis la parlamento en Zagreb sed en Varaĵdin, kaj antaŭ lian reĝan moŝton en Praha estis sendita preposto de Ĉazma Mikaĉ kaj sinjoro Ivan Zabok, por instigi koleron de l' reĝo kontraŭ zagrebanoj kaj senkulpigi sian vicbanuson. Sed kiam la saman jaron la ĉefduko Ernest perforte dispelis la deputataron en Poĵun, ne volante redoni al Hungarujo plenan liberecon, precipe ke oni forigu la fremdulojn altrangajn, kiam la lando ekbolis de kolero kaj Ernesto devis ŝtele kuri Wienon, tiam elreviĝis ankaŭ la kroataj sinjoroj, kaj la potenco de Ungnad ekŝanceliĝis. Jakopovič estis persone antaŭ la reĝo, tagtage venadis leteroj pri la perforo de Gregorianec, kaj malgraŭ laŭdoj de sinjoro Krsto[1] pri Stjepko kiel plejforta kolono de l' kortego kaj kiel fidela servanto de l' intrigulo, episkopo Draŝkovič, kvankam Krsto priskribis zagrebanojn kiel mensogulojn kaj krimulojn, tamen la mezuro pleniĝis. Kaj ke ne naskiĝu pli granda skandalo antaŭ la leĝo kaj popolo, ordonis la reĝo, ke oni trarigardu la privilegiojn de la urbo Zagreb,koncesiante, ke la juĝo eldiru la sian pri la malkonsento inter la vicbanuso kaj zagrebanoj.

Muta kaj medita sidis Stjepko en Medvedgrad; rigardis antaŭ sin longe, longe. En lia animo estis multegaj pasioj, en lia kapo svarmis strangaj pensoj. Ia maltrankvilo vestis lian vizaĝon, ia sekreta antaŭsento turmentis lian animon. Ĉiuj liaj revoj vapo-

[1] Ungnad.

riĝis. Lia filo Niĉjo ne havis vivan idon, pri Pavlo li nur ekaŭdis, ke post la morto de Dora forlasis Zagrebon por batali kontraŭ la turkoj; kaj tiel pereos lia malnova gento. Tio estas vundo — akra vundo, kiu neniam cikatriĝos. Se lin almenaŭ iu konsolus en tiu dezerto — sed neniu, tute neniu. Ĉiuj amikoj lin evitis, ĉiuj lin forlasis, la perfidulon.

El tiuj meditoj elreviĝis lin trumpeto de l' pordisto. La ĉambron eniris la servisto.

„Kiu estas?“, malkontente ekdemandis Stjepko.

„Lia moŝto — la banuso!“, respondis la servisto.

„La banuso?“, ekmiris Stjepko.

Post kelka tempo eniri en la ĉambron barono Krsto Ungnad. Sur la kapo staris griza hamstra ĉapo, dum la jako kaj pantalono estis de dika cerva felo.

„Bonan tagon, frato Stjepko!“, salutis la banuso iom kolere la vicbanuson.

„Ke Dio donu, frato kaj sinjoro banuso!“

„Ĉu vi scias ke estas hontaĵo, kio okaziĝas“, daŭrigis kolere Ungnad, ĵetinte la ĉapon sur la tablon. „Hontaĵo, mi diras vin.“

„Kio estas?“

„Prefere min ne demandu. De l' kolero mi min formanĝus. Sen tio, kvazaŭ la diablo ĵetas ŝtiperojn sub miajn piedojn. Mi ne scias, kio estas kun mia Klara. De la lasta Kristnasko ŝi tute aliiĝis. Io penetris ŝian kapon. Nokte saltas ŝi el la lito kriante: „Ĉu vi vidas ĉi tiujn larmantajn okulojn? Tio estas la glacia tranĉilo. Tio doloras, tre doloras.“ Kaj pene mi ŝin trankviligas. Dumtage ŝi sidas, sidas kun mallevita kapo kaj laŭte preĝas „Patron nian“ post „Patro nia!“ senĉese kaj senfine. Al la diablo! Bela amuzilo. Ĉu ne? Kaj nun ankoraŭ tio.“

„Kio do?“

Stjepko, donu al mi la manon! Ĉu ne, ke vi estas mia amiko?“

„Tion, mi kredas, vi scias ankaŭ mem.“

„Kaj ke vi estos al mi tia ĉiame?“

„Je mia blazono, mi estos.“

„Certe, vi estas iom kruela, — sed tia, vere, ankaŭ mi estas, jes, je mia sanktulo. Mi sufokus tiujn kanajlon, zagrebanojn.“

„Parolu pli klare, sinjorino banuso!“

„Pli klare? Bone. Mi venas en la nomo de l' reĝo.“

„De l' reĝo?“, paliĝis la vicbanuso.

„Jes. Frato, vi malsukcesis. Verŝajne ankaŭ al mi baldaŭ oni sonoros. La reĝo ordonis, ke oni studu la privilegiojn de l' zagrebanoj.“

„Mi scias ĝin.“

„Kaj kia rezultato? La komisio diris,ke la zagrebanoj estas pravaj„ ke ili apartenas sole sub reĝan, sed ne sub banusan tribunalon. Tiel ke staras nigro sur blanko en la leĝo. Mi ne komprenas tion. Kaj post tio skribis al mi la reĝo.“

„Kion?“

„Ke vi min kaj la parlamenton malbone informis. Ke vi faris perforton al zagrebanoj, ribeligis la reĝolandon, ke vi ne venis antaŭ reĝan tribunalon, kvankam vi estis citita, ke vi malrespektas la leĝon, vi, kiu devus gardi la leĝon.“

„Pluen! Pluen!“

„Ke oni devas kontentigi la urbon.“

„Kiel?“

„La proceson kontraŭ vi finu la kurio — dum vi, vi devas demeti la vicbanusecon laŭ artikolo de l' reĝo Alberto.“

„Demeti la vicbanusecon!“, Stjepko ŝtoniĝis marmor-pala. „Do tio estas danko al mi?“

„Tio, kompatinda frato! Oni volis, ke ĝi okazu publike en la parlamento, ke vi estu forigita antaŭ okuloj de tiuj butikistoj, sed mi skribis al Rudolfo. Trogranda honto ĝi estus. Skribu do al la reĝo, skibu al la parlamento, ke vi ne volas plu esti vicbanuso, ke vi estas malsaneta, aŭ io simila.“

„Mi, mi?“, ekploris Stjepko mordante la lipojn.

„Skribu, mi petas vin! La abdikaĵon mi devas sendi al la reĝo, ĉar —“

„Ĉar?“

„Ĉar alie fariĝos publika skandalo!“

„Mi skribos“, ekmurmuris Gregorianec, prenis la plumon kaj skribis la abdikaĵon.

„Bene! Pri tio ekster mi scias neniu. Kaj nun estu ni gajaj! Donu da vino, donu da vino!“

Superregita per la kolero falis Gregorianec sur la seĝon.

„Ĉio, ĉio pereis! Ĉiuj miaj esperoj nuligitaj, kaj la venĝo, ah la venĝo mia!“

„Lasu tion! Dank' al Dio, vi havas ja sufiĉe!“

„Sufiĉe? Kio estas sufiĉa? Ĉu vi pensas pri arĝento kaj oro? Mi malzorgas pri tio. Mia honoro, mia espero — ĉio moko!“

„Sed nu! Donu da vino, por ke mi iom gajigu min ĉar mi sen tio dum „Patronia“ de Klara oscedas.“[1]

En la parlamento okazinta en jaro 1581. en Varaĵdin abdikis skribe la vicbanuso Stjepko la vicbanusecon. Persone li ne venis; kial, li ne dirigis. Ankaŭ Ungnad diris ke ne scias, pro kio li abdikis, tamen tiel la banuso kiel parlamento tre sciis: pro kio, sed ili silentis kaj elektis Gašparon Druškoci, kiel vicbanuson. Samtempe retiris la klasoj la konkludon, laŭ kiu estis Zagreb ekzilita, kaj ke antaŭen komvenados la banusa tribunalo kaj parlamento en Zagreb.

„Estas bone,“ diris Jakopoviĉ, „sed la mezuro ankoraŭ ne pleniĝis. Ke ni aŭdu la kurion!“

XXV.

Tute sola estadis Stjepko Gregorianec en sia kastelo, kolera je mondo, kaj homoj, tute sola li estadis kvazaŭ urso en sia ejo. Verdire la klasoj donis al ti ateston sub sigelo, ke li fervore plenumadis la vicbanusecon, ili eĉ titoligis lin kapitano de la reĝolando, sed Stjepko maldolĉe ridis al tio sciante, ke tion la sinjoroj faris ne pro li, sed pro la ŝateco al la aristokrataro. Pasis jaro al jaro, la haroj de Stjepko ekgriziĝis, fiera kapo ekkliniĝis,

[1] Vidu Krĉeliĉ: „Hist. eccl. Zagr. paĝ. 269.“ N. d. t.

lian koron mordis sekreta, nekuracebla vermo. En siaj sonĝoj li vidadis Pavlon, belan heroon, kiun li nur estas ekaminta, kiam li lin per kruda forto forpuŝis de la koro. Ofte eksprucis lian okulon sekreta larmo, ofte li ekĝemis: „Kie, kie vi estas mia Pavlo!“ Sed Pavlo forestis. Ofte aŭdis la maljunulo pri li de soldatoj, kiel li leone batalis ĉe turka limo, kiel li ĉiun minuton hazarde elmetas la kapon. Sed en Zagreb, en Medvedgrad ne estis Pavlo. La pli junan filon li ne amis, li estis virinamanto, li kvazaŭ ne estis la sango de Gregorianec. Jaroj post jaroj pasis, Stjepko delasis la landan kapitanecon. Tra densaj arbaroj li ĉasis cervojn, ursojn kaj lupojn. La iama furiozo tie ankoraŭ reviviĝis en li, tie ankoraŭ ekflamis lia okulo, kiel fulmo sur vintra ĉielo. Ne sole tiam, sed ankaŭ kiam li ekvidis Zagrebon — fatalan Zagreb — tiun tombon de lia feliĉo. Ankaŭ nun ne estis kvietaj zagrebanoj, ankaŭ nun procese minacis ili al lia kapo. Do kie ajn povis Stjepko ekpinĉi la urbon, li faris tion. La reĝo Rudolfo mem skribe el Wien la 6an de Majo en jaro 1583. riproĉis lin, ke li delasu de sia anarhio, sed vane, — Stjepko rabadis kiel antaŭe. Je lia malfeliĉo mortis Stjepan Draŝkoviĉ, kiu sciis bridi la reĝajn juĝistojn, por ke malakcelu la proceson. La kroataj sinjoroj pli forte stariĝis je siaj piedoj forrifurzante ĉiujn allogajn koncesiojn de la ĉefduko, kaj malŝatis Stjepkon, kiu aliformigis sin kortegano, dum kontraŭ la banuso Ungnad oni kriadis plenvoĉe, kion antaŭe oni sekrete paroladis. „Ne, ni ne volas Stirianon kiel banuso“, kriadis Gaŝo Alapiĉ en aristokrataj kunvenejoj, „ni ne volas la homon, kiu ne scias kroate eĉ sin krucosigni; kiu ne venedas en la parlamenton, kiu ne havas por si propran armeon, ĉar lian armeon komandas la ĉefduko Ernest. Kiel li povis konsenti la 15an artikolon de pojuna parlamento, kiu metas nin sub germanan komandon? Kiel li povis permesi, ke oni fortranĉu kroatan apud mar-landon de l' banuseca povo? Kial li ne subskribas sin ankaŭ kiel banuso de Dalmatujo? Ĉu ĝi ne estas de pratempo kroata lando? Kial li

enlasas en kroatan limon germanajn generalojn. Li sin subskribas grafo de Celje, de Sonnek? Por kio utilos tio al ni? Tiu ĉi banuso ne respektas niajn liberojn, tiu ĉi banuso volas ligi nin kun Stirio. Sed tion ni ne volas, kaj volas neniel!“

Kaj sinjoro Krsto ne longe banusadis. Akre koleriĝis la reĝo eksciinte, kion faris Ungnad al zagrebanoj; baldaŭ li estis vokita Wienon, kaj en jaro 1584. en dimanĉo „Quasimodo“ la reĝa dekreto sciigis la sinjorojn status et ordines en zagreba parlamento ke sº Krsto Ungnad de Sonnek estas „pro malsano“ levita de la banuseco. En sama parlamento Ivan Jakopoviĉ la zagreba juĝisto estis proklamita nobelo.

Kiam la sinjoroj disiĝadis el la parlamento, malgranda Alapiĉ stariĝis antaŭ la urban juĝiston.

„Vivas Jakopoviĉ“, diris li kore: „Vi faligis tiun germanon, ho juĝisto, neniu alia. Mi estis kolera je vi, sed nun mi vidas, ke vi estis prava. Donu la dekstran al mi. Vi estas brava homo.“

Kaj vive premis Gaŝo la manon de Jakopoviĉ.

Al Stjepko venadis pli kaj pli nigraj sciigoj, en maljunaj tagoj, ke oni lin juĝos pro ofendo de la publika ordo. Tia honto! Esti juĝata! Niĉjo Želniĉki, la unika homo, kiu sin de li tute ne estis izolinta, skribis al li: „Ne prokrastu. Periculum in mora. Koncernas la kapon. La zagrebanoj gajnos, via moŝto kompromisu kun zagrebanoj, ĉar kiel mi diris, estas malbone.“

De kolero disŝiris Stjepko la leteron. „Mi ke kompromisu kun tiuj marĉandistoj, mi Gregorianec, antaŭe la fulmo — oh Dio, akre vi min ekbatis!“

Kaj venadis pli kaj pli danĝeraj sciigoj.

„Mi cedos!“, ekgrincis Gregorianec, „mi devas. Se mi ne cedos, ili garantiaĵigos mian bienon, miaj infanoj pereos. Mi devas. Oh prefere mi trinkus venenon.“

Kaj li skribis al zagrebanoj proponon por paciĝo.

Sed Griĉ-urbanoj rifuzis la proponon de Stjepko, tial ke, diris ili, la kondiĉoj ne sufiĉas.

De furiozo ekflamis Stjepko. Tion li ne estis esperinta.

„Bone! Se ili ne volas, ankaŭ mi ne volas!“

Sed ian tagon venis en Medvedgradon Mihajlo Konjski, lia bofrato.

„Stjepko!“, diris li. „Mi estis en Poĵun. Mi kaj Želničkі malakceladis la juĝon kiom eble plej multe. Oni plu ne povas. Petadis mi kaj aliaj sinjoroj. Sensukcese. Mi estis ĉe la taverniko. Li eĉ aŭdi ne volas. Mi ekiris al lia reĝo mem, kaj Rudolfo nekompleze forskuis al mi: „Pri sinjoro Gregorianec vi parolas al mi? Ĉu vi deziras misuzi mian reĝan favoron? Ĉu mi estas estro laŭ Dia favoro por ŝirmi rabistaĵojn? Profunde mi konas vian bofraton! V a l g a m e d i o s!*, li estas granda pekulo kaj peza estu al li la juĝo. La reĝa kurio estis malrapida, tre malrapida, sed ni zorgos, ke ĝi tiun „c r i m e n l a e s i s a l v i c o n d u c t u s n o s t r a e m a j e s t a t i s“ pli rapide finigu. Sed“, daŭrigis li pripensante: „Gregorianec vere estis brava heroo kaj probatalanto de l' kristaneco. Tial diru al li, sinjoro Konjski, ke li tute obeu miajn fidelajn zagrebanojn, ĉar alie ve al li!“ Tion ĉi, Stjepko, tion ĉi diris la reĝo mem. Mi ĵupertas vin, ne surdigu vin al tiu averto. Memoru pri via gento, pri viaj infanoj! Cedu!“

„Ve al mi, la reĝo mem diris!“, rediris superregita Gregorianec. „Miaj infanoj. Jes! Mia gento, ha, ha, ha! Mi faros, Mihajlo, mi faros. Mia gento? Ĉu vi vidas tiun nubon malaperanta sur okcidento: ĝi estas mia gento. Mi faros! Skribu al zagrebanoj. Mi faros, kiel vi deziras.“

Malmulte da tagoj poste, t. e.en jaro 1590. kuŝis Stjepko en sia kuŝejo. La zagrebanoj ankoraŭ ne estis respondintaj. Granda zorgo, akra doloro vestis la frunton de l' maljunulo. Li, tiu fiera aristokrato, senigita de honoro, senigita de idaro, indulgata de mizeraĉaj burĝoj! Li rememoris la pasintaĵon, — memoris sian Pavlon — memoris ve

Martan!“ Kaj enigis la frunton en la kapkusenon. Sed je unu fojo, kvazaŭ tondro penetris la intestojn de l' tero! La muroj ekmoviĝis, la armilaro super lia kapo ektintis. Tondro post tondro, fulmo post fulmo. Stjepko saltis pala pro teruro. En la ĉambron penetris la servisto.

„Kio estas?“, ekdemandis Stjepko tremante.

„Je dia nomo! Kuru , via moŝto! Tertremo! Unu bastiono krevis de l' supro ĝis la malsupro; la orienta muro kaviĝis, dum la kapelo de s[a] Filipo kaj Jakovo estas nura ruino.“

Oj, ankaŭ vi min perfidas, malnova kastelo!“, ekĝemis Stjepko dolore: „Ni iru, ni iru, ni iru al Ŝestine! Tie ĉi ne ekzistas plu la vivo!“[1]

Je Marko-festo en jaro 1591. en la deka antaŭ tagmezo haltis veturilo antaŭ kunvenejo de zagreba kapitolo. El ĝi eliris kaduka kaj malgaja mastro de Medvedgrad subtenata per du servistoj. Malrapide supreniris li la ŝtuparon kaj eniris en la ĉambregon. Tie sidis ĉe verda tablo la zagrebaj kanonikoj, anoj de l o c u m c r e d i b i l i s, dum flanke staris la zagrebaj burĝoj Grga Dombrin, Jakob Ĉerski, Mato Vernič, Ivan Pluŝĉec kaj Andrija Ĉičkovič.

„S e r v u s h u m i l l i m u s, pastraj moŝtoj!“, salutis Stjepko la kanonikojn kun mallevita kapo, „bonan tagon sinjoroj zagrebanoj“, turnis li sin al la burĝoj. „Mi venis por konsenti kun vi eternan pacon“, kaj laca mallevis sin Stjepko al la seĝo.

Ĉu via ekselenco deziras sciigi nobelan urbon pri siaj kondiĉoj?“, ekdemandis Dombrin.

„Ne, ne, diru nur vi la viajn!“, rediris Stjepko kun mallevita kapo.

Se tiel estas“, almetis Blaĵ Šiprak, la zagreba kanoniko, „tiam mi legos la skribaĵon: Ni kapitolo de la zagreba preĝejo per tio ĉiujn kaj al ĉiu igas scii, ke antaŭ nian vizaĝon persone venis lia moŝto sinjoro Stjepan Gregorinaec, unuflanke, kaj indulgemaj kaj

---

[1] Autentika. Vidu la arkivon de Kukuljevič III. paĝ. 71. N. d. t.

moŝtoj sinjoroj Grga Dombrin, Jakob literatoro Ĉerski kaj Ivan Pluŝĉec, vera burĝo, en la nomo de nobela libera urbo kaj tuta zagreba komunumo Griĉ-monto, aliflanke, konsentinte antaŭ ni eternan konkordon kaj pacon inter si propravole kaj per vivaj vortoj de siaj buŝoj. Nome ke en pasintaj jaroj fariĝis du malpacoj kaj procesoj inter la nobela urbo kaj lia moŝto sinjoro Gregorianec. La unua pro malbona trakto kaj superforto faritaj al nobela burĝo Petar Krupiĉ, la oraĵisto ĉe Kamenita-vrata, en la deka tago de Majo en jaro 1578. dum enkonduko de sº Krsto Ungnad de Sonnek en banusecon de la regnoj: Dalmatujo, Kroatujo kaj Slavonujo; la alia proceso dum agado de la sama parlamento de la regno Slavonujo pro ofendoj kaj insultoj faritaj en la domo de honorinda sº Nikola Želniĉki, la zagreba preposto, al la burĝoj Ivan Teletiĉ kaj Mato Verniĉ de la sama sº Stjepan Gregorianec, kiuj ambaŭ procesoj estas levitaj antaŭ lia reĝa moŝto mem de la nobela urbo kiel akuzanto kontraŭ sinjoro Stjepko Gregorianec kiel akuzato, kaj por kiuj procesoj estis jam destinita lasta templimo antaŭ la reĝa kurio en Poĵun, kaj kiuj ankoraŭ nun nesolvitaj estas. Sed tial ke kelkaj sinjoroj amikoj, amante la pacon de ambaŭ partioj, kaj dezirante ilian konkordon kaj savon, fervore klopodis, ke la akuzoj kaj procesoj ĉesu, tial ambaŭ diritaj partioj konsentis antaŭ ni eternan pacon sub jenaj kondiĉoj: unue fordonas sº Stjepko Gregorianec siajn kampojn kaj monton, aportenantajn al Medvedgrad, komence de la fonto Topliĉica, irante laŭ monteto Medvednica, kaj de Medvednica ĝis la rivereto Blĵnec kaj antaŭen ĝis la kapelo de sª Ŝimun sub la monto al la dirita urbo kaj ĝiaj servutuloj kiel liberan kaj trankvilan fruktuzon, t. e. por gajnrajto de lignoj, paŝtejoj, kalkobrulando kaj ŝton-rompado ĉu por domkonstruaĵoj, ĉu por firmado de la fortikaĵoj de la dirita urbo. Plie estu komuna paŝtejo al la servutuloj de sº Gregorianec kaj nobela urbo tiu du hektara herbejo, apartenanta al la bieno Ŝestine, kaj nun posedas ĝin Lovro Puntihar, la servutulo de sº Gregorianec. Super tio

estas sº Gregorianec pagonta sumon da mil hungaraj florenoj — floreno po cent denaroj — al la juĝisto, juĝantaro kaj ĉiuj burĝoj de la zagreba urbo kaj tio en tri jenaj templimoj: la unuan la sekvintan Palmodimanĉon, la duan en la tago de sª Triunuo, kaj la trian templimon en Mihajlo-festo. Fine prizorgu sº Gregorianec, ke ankaŭ liaj filoj sºj Pavlo kaj Nikola Gregorianec publikigu similan pacdokumenton antaŭ ia ajn locum credibilis. Kontraŭe deklaras la juĝisto kaj tuta komunumo de la zagreba Griĉ-monto, ke ili delasas je sia kaj de siaj infanoj nomo de la diritaj du procesoj, kaj ke ĉiuj plendoj, skribaĵoj kaj dokumentoj faritaj kaj eldonitaj en ĉi tiu afero de kiu ajn juĝejo en la regno estas senfortaj kaj senpovaj kontraŭ sinjoro Stjepko Gregorianec."

La kanoniko haltis. Trankvile aŭskultis Gregorianec la postulon de zagrebanoj, nur kelkfoje li maldolĉe ekridetis.

„Sinjoroj zagrebanoj multon postulas", balancis li per la kapo „tre multe. E, ili estas ja mastroj. Mi miras, ke ili Medvedgradon ne postulis! Sed eĉ ĝi fariĝu. Ĝi estas ja amaso da ŝtonoj."

„Ĉu via moŝto ne konsentas propravole ĉi tiun pacon?", ekdemandis la kanoniko.

„Jes! Jes! Mi konsentas — propravole — ĉio estas bona — ĉio!", rediris Stjepko kaj ekirinte al la pordo diris: „Adiaŭ sinjoroj! Mi estas ekironta!"

Malrapide ekveturis la veturilo de Stjepko kontraŭ la monto.

XXVI.

Estis posttagmeze ian printempan tagon en jaro 1592. La monto estis trankvila, la aero pura, arbaro hela kaj verda kaj en la arbaro multego da multkoloraj floroj. Sur monta vojeto aŭdiĝis malbasa sonorilo. El la densejo eliris vilaĝano portanta lanternon kaj tintanta per sonorileto kaj post li aperis blanka remeta monaĥo, tenanta en brodita saketo la sanktan hostion. Tiu ĉi monaĥo iris al Stjepko Grego-

rianec, por lin fortigi per la dia korpo por lasta fojo. Li marŝis kun mallevita kapo, vi ne povis distingi lian junan vizaĝon sub la kapuĉo, kaj se vi eĉ povis, vi vidus, ke lia vizaĝo estas malserena, la okuloj larmantaj. La monaĥo venis ĝis la ekstera pordego de l' duone detruita Medvedgrad.

„Kie estas la estro?", ekdemandis li la pordiston.

„Ĝuste antaŭ la kastelo, patro Jerolimo", rediris la pordisto krucosignınte sin antaŭ la sakramento. „Li sidas sub la vinko. Malbone estas al li, malbone, sed li tiel volis. Ni devis lin alveturi el Ŝestine."

La monaĥo ekiris al la kastelo. Lia koro forte batis. Li levis la okulojn, haltis, ektremis.

Sub la vinko sidis mastro Stjepko. Liaj haroj estis blankaj, vizaĝo pala, velkita, okuloj malklaraj. La kapon li klinis posten, apoginte ĝin je la arbo. Li rigardis, rigardis malproksimen. Antaŭ li genuis Niĉjo kaj ties edzino Anka, antaŭ li genuis ankaŭ bonkreska kavaleria oficiro — Pavlo Gregorianec.

„A v e c o e n a d o m i n i!", salutis la maljunulo, klininte la kapon, la korpon de Dio. „Jen, infanoj, estas la horo! Oni devas ekiri! Dankon, sankta patro! Dezirege mi vin atendis! Oj venu rapide, por ke mi pentu antaŭ vi!"

La pastro pli proksime alpaŝis kun mallevita kapo. La infanoj ekiris flanken en la kastelon. La pastro kliniĝis super la kapo de l' maljunulo, kaj ĉi tiu murmuretis siajn pekojn al la servisto de Dio. Se estus en la maljunulo pli da vivo, li sentus, kiel varmegaj larmoj gutas el la okuloj de l' pastro sur lian frunton.

— „sed unu peko, spirita patro!", finis Stjepko tremante, „premas mian animon kvazaŭ kruda ŝtono; mi timas, ke por ĝi neebla estas indulgenco. Mi amis knabinon, vilaĝaninon, kaj ŝi naskis filon. Sed mi malzorgis la vilaĝaninon kaj infanon, mi volis eĉ mortigi la infanon, sed ĝi laŭ dia favoro malaperis. Ĝi eble pereis, eble vivas en mizero, eble min malbenas —"

„Ĝi ne malbenas!", ekkriis la pastro kaj forŝovis la kapuĉon de la kapo falinte surgenue, „ne malbenas, patro! Tiu infano, tiu perdita filo portas al vi la lastan benon de Dio, tiu filo, via Jerko — patro, estas mi — mi!"

La maljunulo konsterniĝis.

„Vi — vi —", kun miro diris li preninte per la manoj la kapon de Jerko... „Jes, jes! Vi ne mensogas! Viaj vizaĝtrajtoj perfidas vin, ke vi estas Gregorianec! Jes, jes, mia! Mia filo!", ĉirkaŭprenis la maljunulo sian filon. „Oj dankon al vi, Eternulo! Nu, filo, finu. La morto ne atendas."

La monaĥo plenumis la sanktan riton, kaj la infanoj revenis al la maljunulo.

„Infanoj", diris li per malforta voĉo, „mi estas ekironta. Mi estis fiera, fierega. La mano de Eternulo min fleksis. Sed nun mi estas pura. Min apsolvis mia perdita filo — ĉi tiu via frato."

„Jerko!", ekkriis Pavlo.

„Lasu, Pavlo, lasu", daŭrigis la maljunulo, „la tempo flugas, alproksimiĝas la morto. Poste ĉirkaŭprenu lin, poste! Ho filoj, mi vidas: nia malnova gento pereas. Mi volis ĝin multobligi, glorigi, sed Dio alie decidis. Vi, Niĉjo, ne havas viran idon. Vi, Pavlo, neniam havos filon, ĉar tion malpermesas al vi — kiel vi diris min — la solena promeso, kaj Jerko estas dia. Nenian esperon mi portas en la tombon, super mia tombo velkos mia gentarbo. Fariĝu la volo de Dio. Kaj dankon al vi, ke vi ree venis. Pro vi min la koro premis. Sed ne kulpigu min troe. Mi ne kulpiĝis la morton de Dora, tion Dio scias. Klara estas — Dio ŝin ekkompatu!"

„Li ankaŭ ekkompatis; de frenezeco ŝi mortis", aldonis Pavlo.

„Do en mia nomo rekompencu la maljunulon Krupiĉ. Gardu lin, ekhelpu lin, kaj li pardonu min. Adiaŭ, Niĉjo kaj Anka, amu vin reciproke! Adiaŭ, Pavlo, estu kristano kaj heroo! Adiaŭ, mia Jerko, oj preĝu Dion por mi! Adiaŭ ankaŭ vi, malnova kastelo!", sin turnis Stjepko al Medvedgrad, „vi lulilo de multaj generacioj. Jen egalan sorton ni dividas.

Fiere altiĝis vi, altiĝis ankaŭ mi. Al vi krevis la ŝtona koro, krevas ankaŭ al mi, polvo vi, polvo mi. Jen noktan bloveton. Adiaŭ, infanoj — Marta — —" kaj sen la animo falis la mastro medvedgrada. Ankoraŭ unu fojon ekrigardetis la suno malantaŭ Okiĉmonto kaj vidis tri fratojn, ĉirkaŭprenantajn antaŭ malviva patro.

Kion la maljunulo diris, tio ankaŭ okazis. Pavlo falis apud fidela sia Miloŝ en jaro 1604. kiel kavaleria regimentestro kontraŭ turkoj. Niĉjo mortis sen vira ido en jaro 1610., kaj la nomo de Gregorianec malaperis el la mondo.

Ĉarmega, abunda estas vi verdo-monto de mia naskiĝloko, vi unua vidaĵo de mia infaneco. Kaj se mi levas la okulojn kontraŭ vi dum la vespera suno ludas super la suproj kaj malsuproj, dum sian oron ŝutas ĝi super via verdaĵo, en mia animo vekiĝas pentraĵoj el pasinteco: bravaj herooj, fieraj nobelulinoj, kruelaj tiranoj, mizeraj servutuloj, kaj malnova Medvedgrad, flamanta per viva ruĝo, kvazaŭ ĝi reviviĝis! Sed ne! La malnova kastelo falas, falas; sed antaŭen, malsupre sub la monto altiĝas brilanta, potenca kiel juneca heroo — nia urbo Zagreb.

FINO.



KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr .....
FILIA Nr 14
w Białymstoku

La plej malnova el ĉiuj Esp. gazetoj, fondita en 1895

LINGVO INTERNACIA

Centra organo de la Esperantistoj

elirante post la 15. de ĉiu monato.

Jara abono: 5 fr. (2 Sm).

Presa Esperantista Societo, Paris, 33 rue Lacépède.

Duonmonata internacia gazeto

„ESPERANTO"

Oficiala Organo de „Universala Esperanto Asocio".

La plej ofta, la plej legata! Aperas en jurnala formato. Enhavo tre diversa kaj interesa.

Jara abono 4 fr. (Sm 1.60) — Unu numero 15 cm.

Direkcio: *10, Rue de la Bourse — Genève (Svisujo).*

AMERIKA ESPERANTISTO.

Oficiala Organo de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko.

Jara abono: St. 1.25 (Sm 2.50). Specimena ekzemplero 15 cendoj (Sm —.30).

Literatura - Propaganda - Informa.

De la januara (1911) numero sub nova direkcio kaj kun tute nova aspekto, la gazeto estas unu el la plej interesaj kaj plej gravaj esperantaj gazetoj en la mondo.

Redakcio kaj Direkcio: Washington, D. C. Usono.

The British Esperantist.

Ĉiumonata gazeto redaktata en la lingvoj angla kaj Esperanto.

Oficiala organo de la Brita Esperantista Asocio.

Enhavas 20 paĝojn da Kroniko, Bibliografio, Literaturaĵoj ktp.

Oni abonas ĉe la Sekretario de B. E. A. 133—136, High Holborn, London W. C.

Kosto de la jaro abono 3 ŝilingoj (1.50 Sm).

Japana Esperantisto.

Internacia Ilustrata Esperanta Revuo.

Oficiala organo de „Japana Esperantista Asocio".

Ĝeneralaj informoj kaj literaturoj de la Ekstrema Oriento kun multaj ilustraĵoj.

Jara abono 2 yen = 2 Sm.

Adreso: Japana Esperantisto Marunouchi, Tokio, Japanujo.

Plej granda esp. librotenejo.

Ĝiaj korespondantoj estas en: Bohemujo, Brazilio, Danujo, Germanujo, Granda Britujo, Hispanujo, Hungarujo (Kókai Lajos, Budapest IV.), Italujo, Polujo, Rumanujo, Rusujo, Svedujo, Svisujo kaj Usono.

Plej bonstilaj libroj, krom tiuj de nia Majstro, estas skribitaj de Dro. Kaz. Bein (Kabe).

Librejo HACHETTE & KIO.

La Revuo.

MONATA LITERATURA REVUO

La sola kiu publikigas

Artikolojn de Dro. L. L. Zamenhof.

48 paĝoj ĉiu numero

Redakcio kaj Administracio: *Librejo Hachette & Kio., Paris, Bd. St. Germain, 79.*

Specimena numero senpage ricevebla.

Časopis Českých Esperantistů.

Kun literatura aldono:

„Legolibro de Bohemaj Esperantistoj"

eliras monate (krom augusto kaj septembro).

Redaktoro: Ed. Kühnl. — *Jar abono:* K 3.—

Esperanta Biblioteko Internacia.

Tiu-ĉi biblioteko enhavas facilajn legaĵojn de ĉiulandaj Esperantistoj. Ĝi tial bonege taŭgas por ekzercado de la lingvo ĉu dum la grupaj kunvenoj, ĉu per privata legado.

Ĝis nun aperis 20 numerojn.

Prezo po numero 0.100 Sm (0.20 M.) — Serio de 12 numeroj (afrankite) 1.250 Sm (2.50 M.) — Ĉiu libreto enhavas minimume 40 paĝojn. Oni postulu plenan liston.

GERMANA ESPERANTISTO.

Monata gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto. □□□ Monatsschrift für die Verbreitung der Esperantosprache.

Tiu gazeto, unu el la plej malnovaj esperantaj ĵurnaloj, estas redaktata esperante kaj germane, kun ĉiam variita enhavo: Originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj temoj, propagando, kroniko, literaturo, bibliografio, korespondo, konkursoj, konsiloj por la praktika vivo, instruoj por lernantoj, oficilaj informoj ktp.

Jara abonprezo 3 M. (1.50 Sm) en ĉiuj landoj.
Prova abono por 6 monatoj 1.50 M. (0.75 Sm).

LA INSTRUANTO.

5a JARO DE „LIBERAJ HOROJ"

Ĉiumonata organo por lernantoj de Esperanto.

Tiu ĵurnalo, eliranta la 15an de ĉiu monato ce as prezenti al esperantistoj facilajn kaj instruajn legaĵojn. Ĝi estas daŭrigo de la multe ŝatataj „Liberaj Horoj", antaŭa aldono al „Germana Esperantisto". Lerta kunlaborantaro helpas la redakcion, liveri al lernantoj facilan, sed tamen interesan kaj bonstilan literaturon. La praktikan uzon de nia lingvo instruas dialogoj, modeloj de leteroj, tekstoj kun apuda nacilingva traduko ktp.; amuza parto liveras interesajn problemojn kaj humoraĵojn.

Jara abonprezo 2 M. (1 Sm). Por abonantoj de „Germano Esperantisto" kaj membroj de G. E. A. en Germanujo kaj Aŭstro-Hungarujo nur 1.50 M. (0.75 Sm). Por la cetera eksterlando senescepte 2.- M. (1 Sm).

G MÖLLER & BOREL
nden-Strasse 18-19.

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku
KP-F14-0002492